

EKSPREZIDENTO DE KOLOMBIO

ÁLVARO URIBE VÉLEZ



LA CELO ATINGEBLAS

ÁLVARO
URIBE VÉLEZ

LA CELO
ATINGEBLAS

REMEMOROJ

Enkonduko pri la Esperanta eldono

Tiu ĉi verko estis publikigita, en la jaro 2012, unue en angla kaj en hispana lingvoj. Tiu ĉi traduko estas farita surbazite de la unua hispanlingva eldono.

Mi kiel tradukinto juĝis necese aldoni piednotojn por klarigi kelkajn aferojn. Tiuj piednotoj aperas per [bluaj literoj](#) kaj estas komencitaj per la literparo “**NT**” (noto de la tradukinto).

Alia rimarko kiun mi taksas necesa rilatas la demandon ĉu traduki aŭ ne traduki la geografiajn proprajn nomojn: Pri tio, kelkaj legantoj eble volas absolutan respondon jesan aŭ nean. Tamen, mi decidis fari tiurilate la samon kiun mi faris en mia traduko *Ŝakon al la Teroro*, kaj simile al tiel kiel oni faras en aliaj “fremdaj” lingvoj, tio estas: Uzi la esperantaj nomojn kiam temas pri geografiaj propraj nomoj pli gravaj, pli konitaj internacie, kaj nomoj kiuj jam havas plimalpli tradicie uzitan esperantigon, kaj lasi netradukitaj la originalajn nomojn kiam temas pri nomoj malpli uzitaj internacie aŭ en “esperantujo”, nomoj kiuj ne havas tradicie uzitan esperantigon.

Diference de la hispanlingva eldono, en kiu la fotaro situas meze de la libro, tuj post la paĝo 154, en ĉi tiu tradukaĵo tiun fotaron mi metis ĉe la fino.

Luis Guillermo Restrepo Rivas

Tradukinto

Medeĝino¹ (Kolombio), 2012/11 ĝis 2013/08

1 [NT Hispanlingve: "Medellín"](#).

*Por Lina,
kiu reprezentas la familion*

UNUA PARTO

Amo

“Min doloras la morto nur se ne kaŭzas ĝin amo”

GABRIEL GARCÍA MÁRQUEZ

1

—"La trupoj estas pretaj, sinjoro Prezidento."

—"Procedu sub mia responso", mi diris.

Mi fermis la okulojn kaj rememoris iliajn vizaĝojn.

Mi preĝis.

2

Dum pluraj jaroj mi estis amiko de Guillermo Gaviria Correa kaj Gilberto Echeverri Mejía. Homoj de paco kaj bonvolo —kiel multaj kolombianoj—, pro amo al la patrujo ili estis pretaj oferi ĉion. Tial, kiam la 17-an de aprilo de 2002 ili entreprenis la aventuron trairi danĝeran sekcion de la kaf-kultiva regiono de Antjokio, ili fidis ke sia bonvolo estos reciprokata.

El influa familio de Medeĝino okupiĝinta pri entrepren-farado kaj ĵurnalismo, estis filo Guillermo Gaviria, viro profunde spirita; liaj herooj estis homoj kiel Gandhi kaj Martin Luther King, Jr. En sia laboro kiel departementestro de Antjokio (posteno kiun mi okupis kelkajn jarojn antaŭ ol li), dank' al kiu li havis grandan nacian gravecon, li decidis organizi “Marŝon de Solidareco kaj Repacigo” kiu estis planita por alveni ĝis la municipo Caicedo. Ĝi estus marŝo por la paco, kiu dum kvin tagoj trairus kvindek kilometrojn. La celo estis montri ke malgraŭ tiom da jardekoj de ĥaoso kaj sangoverŝo kiel tiaj kiajn travivis Kolombio, ankoraŭ eblus neviolenta solvo. Laŭ ĵurnalaj informoj, Gaviria ordonis al la Polico kaj la Armeo, resti for de la marŝo; li petis ne protekti lin, kaj ke se li estus kidnapita aŭ mortigita, nenian reprezalion estus farota.

Tio estis akto kuraĝa. Dum multaj jaroj la terorisma grupo memnomita Fortoj Armitaj Revoluciaj de Kolombio (FARK) terorizis la regionon de Caicedo kie, krom aliaj krimoj, ĝi plenumis kidnapojn kaj masakrojn de civiluloj. Guillermo konis la danĝerojn al kiuj li sin elmetis: sia patrino, S-ino Adela Correa, estis kidnapita kejkajn jarojn antaŭe far la PLA¹, alia eksterleĝa armita grupo, kaj la Armeo avertis lin pri la danĝeroj de la zono al kiu li pensis marŝi, tamen Gaviria estis juna kaj karisma, poeto kaj dancanto, li posedis la fervoron de vera kredanto.

Tiutempe, la loĝantaro de Caicedo atentigis la tutan landon pro la fakto ke ĝi deklaris sin “neŭtrala” koncerne la violenton kiu vipis Kolombion. Marŝante, do, al tiu municipo, Gaviria kredis firme ke sia pacifisma sinteno prilumus la vojon de la paco por la tuta lando. Li volis elmontri al aliaj kolombiaj politikistoj —inter ili al mi, laŭ onidiroj— ke la konfronto per armiloj ne estas la respondo al niaj

1 NT Popola Liberiga Armeo, hispanlingve EPL (“Ejército Popular de Liberación”).

malbonoj. Tiel do, la marŝo celis fariĝi turnopunkto en la kolombia historio; fariĝi nia Selma¹. Al tiuj kiuj lin avertis pri la danĝeroj, Guillermo respondis: "Mi timas pli la malkuraĝon ne iri". Mi komprenas ekzakte kion li volis signifi.

Proksimume mil homoj akompanis la departementestron en lia marŝo al Caicedo. Inter ili troviĝis Gilberto Echeverri, matura ŝtatisto, amplekse admirita, kiu pli antaŭe estis ministro pri Nacia Defendado, ambasadoro kaj departementestro de Antjokio. Elstara kolombiano kies familion mi konis ekde mia infanaĝo. Tie ankaŭ troviĝis la prezidanto de la Episkopa Konferenco de Kolombio, episkopoj de Medeĝino kaj de aliaj urboj, kaj usonano kiu en 1965 estis marŝinta en Alabamo kun D-ro. Martin Luther King Jr.: Bernard Lafayette, universitata profesoro kaj por-paca aktivulo, kiu same kiel multaj aliaj, identiĝis kun la idealo kiu animis la mision de Gaviria.

Dum kvin tagoj la manifestaciantoj marŝis laŭlonge de la ŝoseo, Ili vestis per blankaj T-ĉemizoj kaj svingis flagojn samkolorajn, ili kantis pri paco kaj donacis rozariojn al la pasantoj. Ĉe pluraj lokoj la enloĝantoj, spontanee, eliris ĝis la ŝoseo svingante blankajn flagojn hejmfaritajn kaj kriante "Ne al la violento!". Tio estis bela spektaklo, sincera kaj kortuŝa elmonro pri la sopiro al paco kaj normaleco de la granda plimulto el la kolombianoj sendepende de iliaj politikaj kredoj.

Havi minimuman racion estintus sufiĉe flanke de la FARK por akcepti tiujn homojn bonkorajn, aŭ, almenaŭ, lasi ilin daŭrigi senĝene ilian marŝon. Tamen, ne okazis tiel. La 21-an de aprilo, lasta tago de la trairado, kiam mankis tri kilometroj por alveni ĝis Caicedo, grupo de teroristoj el la tiel nomata 34-a Fronto de la FARK malhelpis la pason al la piedirantoj. La grupestro estis Aicardo de Jesús Agudelo Rodríguez, alinomita "El Paisa", kariera krimulo kaj vera monstro kiu, laŭ la Kolombia Nacia Polico, responsis pri pli ol 400 kidnapoj kaj 500 murdojn, inter ili la mortigon de la patrino de Cecilia María Vélez, ministrino pri Edukado dum nia regado.

"El Paisa" petis al Gaviria akompani ilin al kunsido kun estroj de la gerilistaro, tamen, rimarkinte ke Gaviria objektis, li mensogis dirante ke ili nur volis ekkoni pli bone la celojn de la marŝo. Gaviria

1 [NT Aludo al la marŝoj de Selma al Montgomery de 1965, en Usono, pinto de la usona movado por civitanaj rajtoj.](#)

sekvis ilin akompanita de kelkaj el la piedirantoj, inkluzive de Gilberto Echeverri —kiu estis unuiginta al li pro solidareco— kaj la usona profesoro.

Horojn poste, tiuj kiuj atendis la departementestron vidis la revenon de liaj akompanintoj. Mankis tamen Gaviria kaj Echeverri, la FARK kidnapis ilin kaj, ĉevalrajde, internigis ilin en la profundon de la kolombia ĝangalo. Ili ekestis du novaj ostaĝoj aldonitaj al pli ol 2.800 aliaj tiujare kidnapitaj far diversaj terorismaj grupoj; senhelpaj viktimoj en malluma kaj abomeninda tempo.

3

Kiom ni laboris por trovi ilin!

Kvar monatojn poste, en aŭgusto de 2002, mi ekestis prezidento de Kolombio. Unu el la prioritataj taskoj de nia regado estis la liberigo de Guillermo, Gilberto kaj ceteraj ostaĝoj. Ĉiutage, senmanke, mi parolis kun la talentaj komandantoj de la Armeo kaj la Polico por koni la progresojn en la serĉado. Skoltaviadiloj flugadis sur ampleksaj teritorioj kaj rekompencoj estis ofertitaj al informantoj kiuj donu la lokalizon de la kidnapitoj. Ni planis ankaŭ, kondiĉe ke la cirkonstancoj estu taŭgaj, militan elliberigon. Ĉiun vendredon mi restis en la prezidenta oficejo ĝis tre malfrue nokte, kaj vokadis al la generaloj, koloneloj kaj oficiroj por ekzameni la antaŭeniron en la sekureco, kaj peti novaĵojn pri la progresoj de la kontraŭ-kidnapaj operacoj. Escepte de tiuj aktoj de deviga ceremonio (akcepti ŝtatestrojn aŭ eminentulojn), en la Domo de Nariño¹, ne okazis renkontigoj de socia karaktero, kaj la ferioj aŭ la tagoj por ripozo estis preskaŭ neekzistantaj. Nia misio estis restaŭri la sekurecon kaj elliberigi ĉiujn kidnapitojn de Kolombio.

Ni laboradis senhalte ĉar nia lando estis en krizo. Tamen ni ne samopiniis kiel kelkaj analizantoj por kiuj Kolombio estis fiaskinta Ŝtato, afero sen espero.

Kiam mi ekestis prezidento, la krima sieĝado estis disvastiĝinta tra nia tuta teritorio: drogtrafikaj ĉefoj, murdistoj, kvazaŭarmeoj, ordinaraj deliktuloj kaj teroristoj (nominale marksismaj, kiel la FARK) deliktis libermoviĝe. Kelkajn monatojn antaŭe la krimuloj lanĉis fajr-bombojn kontraŭ preĝejo kaj murdis —krom multajn plenkreskulojn— kvardek ok infanojn. Ili kidnapis komercan aviadilon; ostaĝigis virinon kiu konkuris kun mi ĉe la porprezidenta kampanjo de 2002, kiun ili estis retenonta dum ses jaroj en la ĝangalo. La FARK eĉ klopodis saboti mian enoficiĝon: dum la solenaĵo ili lanĉis pli ol dek du pafajojn el haŭbizo al la Prezidenta Palaco. La plimulto el ili mistrafis kaj falis sur najbarajn modestajn domojn. Kiel rezulto mortis dek naŭ simplaj homoj.

1 NT Hispane "Casa de Nariño": nomo de la prezidenta palaco en Kolombio.

Tio ne estis pasema krizo. Dum jardekoj Kolombio estadis vipita far la eksterleĝa trafiko de kokaino kaj la teroristoj. La masakroj kaj la vilaĝoj detruitaj per bomboj aperis ofte antaŭ la tutmondaj okuloj. Kun 28.000 murdoj ĉiujare, unu el tiaj indicoj plej altaj en la mondo estis tiu de nia lando. Pli ol du milionoj da civitanoj estis devigitaj fuĝi el siaj hejmoj pro la violento. Multaj el ili rifuĝis en eksterlando, kio donis kialon por paroli pri la kolombia diasporo. Nur Sudano kaj Angolo havis pli grandajn nombrojn. Fariĝis neeble veturi survoje inter la ĉefaj urboj: la armitaj grupoj eligis la vojaĝantojn el la veturiloj ĉe eksterleĝaj trafikhaltigejoj kaj ilin kidnapis dum horoj, tagoj aŭ monatoj ĝis atingi pagon de elaĉeta mono. Kaj tiu ĉi ĥaoso efikis katastrofe en la ekonomion: la lando estis ĵus elteninta la plej malbonan recesion post la 1930-aj jaroj, la sendungado atingis 16% kaj la buĝeta deficino atingis alarmantan nivelon. Kelkajn tagojn post mia enoficiĝo, la ministro pri Financoj, Roberto Junguito, min informis pri la neceso enkonduki radikalajn solvojn ĉar, se ne, ses semajnojn poste ne restos mono por pagi al niaj soldatoj.

Ja, la listo de problemoj estis preskaŭ senfina. Antaŭ ili, kaj sen konkretaj solvoj, multaj homoj rezignis. Ĉu ne intencis ĉion la antaŭaj registaroj? Porpacajn intertraktadojn, militajn kampanjojn, deklarojn de krizo-stato, eksterlandajn mediaciantojn, proponojn de amnestio, interŝanĝojn de kaptitoj ... Kaj, tamen, niaj problemoj plimalboniĝis. Aliflanke, tiuj kiuj ankoraŭ havis la kuraĝon por ŝanĝi la *status quo*-n elmetis sin en danĝero esti mortigitaj: multaj senatanoj, urbestroj, sindikataj gvidantoj, entreprenistoj kaj pastroj estis murditaj dum la ĵuspasinta jardeko. Mi mem estis travivinta almenaŭ dek kvin atencojn dum mia politika kariero.

Ni vivas en epoko kiu vidas la estontecon kun skeptikismo; ĉirkaŭ la mondo multaj homoj perdis la fidon en la kapablo de siaj estroj kaj registaroj por plibonigi siajn vivkondiĉojn. Eble mi estas nekorekteble romantika, aŭ eble tiom da bomboj kaj kugloj turnis min obstina, sed mi ĉiam rifuzis akcepti ke Kolombio estas afero sen espero. Mi kredas pasie en la potenco de la volo por solvi la problemojn, sendepende de kiom severaj ili estas. Mi kredas ke aŭdaca vidado kaj ĝia realigado per konstanta laboro atingos la progreson kaj la bonstaton por nia lando. Ke per la sindediĉo kaj teama laborado de ministroj, estroj de la Armitaj Fortoj kaj ŝtataj funkciuloj, kaj kun la solidareco de la komunumoj oni povas konfronti kaj venki la violentulojn sen kompromiti niajn valorojn. Estis ĉiam la celo de mia registaro: alporti sekurecon, homajn

rajtojn, progreson, egalecon —resume: la regon de la leĝo— al la tuta lando.

Ni sciis, ke tio ne estos facila, ke okazos multaj malsukcesoj kaj seniluziigoj. Sed ni estis pretaj ne ŝpari penadojn, fari ĉion necesan por forigi Kolombion el la abismo, en kiu ĝi troviĝis.

Mi donis, tiam, mia poŝtelefonan numeron publike kaj klopodis respondi la alvokojn de miloj da homoj sendepende de la horo; mi vokis entrepren-ĉefojn de Kolombio kaj la mondo por demandi al ili kion ili bezonas por investi denove en la lando; ĉiusabate mi iris kun la registara teamo al urboj kaj municipoj —sen ekskludi tiujn kiujn oni konsideris danĝeraj—, kaj dum ok horoj aŭ pli ni paroladis kun la aŭtoritatoj kaj la komunumo pri iliaj problemoj kaj ni analizis eblajn solvojn¹. Mi estis tiel enfokusiginta en la detaloj ke ofte mi inspektis la banĉambrojn, ĝardenojn kaj vojetojn de la flughaveno kie mi alvenis kaj se tiuj ne estas puraj, mi sciigis la tiean administrantaron. Iuj nomas tion mikroadministrado, aliaj opinias ke tio estas iom stranga. Eble ili ambaŭ pravas: mi estas konvinkita pri la neceso kombini ĉioampleksan rigardon kun la malgrandaj detaloj kaj dediĉi la vivon por produkti tiutipan transformivan ŝanĝon. Io malpli estus simple nesufiĉa.

Animitaj pro venkoj super kelkaj kontraŭleĝaj grupoj en la unuaj monatoj de nia regado, la kolombianoj komencis kredi denove pri sia lando. Ili memoris ke kiam la suno brilas kaj perforto estas reduktita, Kolombio povas esti paradizo. Ni estis benitaj de Dio per vibra popolo, abundaj naturaj rimedoj kaj eksterordinara beleco. Sendube, Kolombio estas lando inda ke ni dediĉu nian korpon kaj nian animon, kaj ĝia popolo havas senliman potencialon.

Sed tiuj venkoj fruaj ne reduktis la agojn por trovi centojn da ostaĝoj, disaj en ĝangalaj tendaroj, ĉenitaj al arboj aŭ enfermitaj en metalaj kaĝoj, afekciitaj de tropikaj malsanoj kaj for de siaj familioj dum jaroj. Ili estis kvazaŭ soldatoj forlasitaj sur batalkampo. Simboloj de la malbonoj kiujn suferis Kolombio, la situacio de la ostaĝoj estis tia nia.

Estis en tiu kunteksto kiam okazis la ostaĝigo de Guillermo Gaviria kaj Gilberto Echeverri, ruiniga fakto ne nur por iliaj familioj sed ankaŭ por la tuta lando. Du el la plej karaj politikaj gravuloj —

1 NT Tiuj ĉiusabataj Kunsidoj de la Registaro kun la komunumoj, karakterizaj de la regadoj de Álvaro Uribe, estis nomitaj: "Consejos Comunales".

unu la reganto de la departemento Antjokio kaj la alia tre digna homo— langvoris en malhumanaj kondiĉoj. Ilia foresto min vundis kaj ĉiun pasintan tagon ĝi fariĝis des pli neeltenebla. Kiel prezidento de la lando, mi sentis min responsa pri ilia sorto.

Dum la unuaj ses monatoj de mia administracio ni ne havis plian spuron pri Guillermo kaj Gilberto ol la leterojn kiujn la unua skribis al sia edzino, en kiuj li detalis la kondiĉojn de sia kaptiteco. Ni sciis nenion pli.

Kaj poste, fine, ni ekhavis postsignon.

4

"Mi opinias grava eraro de la FARK reteni nin ĉi tie anstataŭ aŭskulti niajn argumentojn", Gaviria diris en unu el la leteroj kiujn li skribis al sia edzino dumostaĝe. Li pasigis siajn tagojn en la arbaro, proksime al riveroj, instruis la anglan lingvon al siaj kunkaptitoj kaj legis, speciale la Sanktan Bibliion. Nokte, dum en penigaj vojaĝoj rajde sur mulo li estis translokita el unu tendaro en alian, li kontemplis la stelplenan ĉielon. "Ĉielo spektakleca" li skribis. Li konservis la fidon ke iel li sukcesos enplanti lian filozofion ĉe siaj kaptintoj. Li diris en siaj leteroj: "Tio kion mi faras estos fruktodona pli aŭ malpli frue. [...] Ĝi estos valorinta la penon se la FARK estas malfermota al la ŝanco de la ne perforto".

Ĝenerale, ĉiuj ostaĝoj en Kolombio havas provizon de granda kuraĝo kaj rezisto. Guillermo kaj siaj kunkaptitoj ne estis escepto. Estas neeviteble, tamen, ke la tempo travivita en kaptiteco sentigu sin. Du el la ostaĝoj malsaniĝis pro leŝmaniozo —tropika malsano transdonita per piko de *muŝo de sablo* kun parazito kiu kaŭzas malfermitajn ulcerojn en la haŭto de la amplekso de ovo kaj kiu etendiĝas rapide se ĝi ne estas traktata adekvate—; alia havis vundon super okulo, kaj ne ekzistis taŭgaj medikamentoj en la tendaro. "Mi multe timas ke li perdos la okulon, se ili permesas ke lia kondiĉo plimalboniĝu," skribis Gaviria; alia ostaĝo kiu ĵus restadis ses jarojn en kaptiteco, suferis atakon de malario jam dek naŭ fojojn. Koncerne sin mem, Guillermo informis ke krom funguso kiu afekciis la piedojn, li fartis bone, sed maltrankviligis lin Echeverri, proksima al aĝo 67-jara, kiu montris klarajn signojn de damaĝo. "Je lia aĝo, oni ne devus riski kiel ni riskas tie ĉi", li skribis.

La senĉesa monotoneco de la pluvo, la dornaj fizikaj postuloj de la vivo en ĝangalo kaj la angoro pro la nedefinite longa apartigo de la familio, povas ŝanceli la plej fortan spiriton. Por emocia subteno Gaviria turnis sin al la radio. Pluraj programoj —inter ili "La Voĉoj de Kidnapo"— aperis por porti al la kolombianoj en ostaĝeco vortojn de kuraĝigo el iliaj familio kaj amikoj. Ili kutime estis elsenditaj antaŭ tagiĝo kaj danke al ili la ostaĝoj kunhavis kun siaj familianoj ĝojon pro la naskiĝo de filino aŭ naskiĝtago de nevo. Detaloj emocie ŝarĝitaj, simplaj mesaĝoj povantaj levi la moralon de la ostaĝoj. "Via

voĉo ĝojigis mian animon. Tio estis tre bela," Guillermo skribis al lia edzino.

Eskapo estis neebla. La ostaĝoj de "alta valoro" —kiel ilin nomis la FARK cinike— estis senĉese kontrolataj kaj se per iu ŝanco ili sukcesis liberiĝi el la katenoj kiuj ligis ilin al arboj, eviti la armitajn gardistojn kiuj ĉirkaŭis ilin kaj tragliti meze de la ringo el teroristoj patrolantaj la eksteran perimetron de la tendaro, ili alfrontis ankoraŭ alian provoson: la ĝangalon kaj ĝiajn multajn danĝerojn. Tie la vegetaĵaro estas tiel dika, ke estas tre malfacile aŭdi aŭ vidi ion lokita pli ol dek metrojn for, gvatis sovaĝaj bestoj —oni diras ke tie estas 3-metraĵ anakondoj kapablaj treni homojn sub la akvo— kaj la ŝancoj perdiĝi aŭ morti estas tre altaj. Ŝajne, la solaj homoj kiuj atingis la lertecon postulita por postvivi en la ĝangalaj areoj kolombiaj estas la teroristoj de la FARK, kiuj, danke al la kvar jardekoj dum kiuj ili estas trairantaj ilin, kutime ili kapablas rekuperi en nur kelkaj horoj la ostaĝon fuĝintan. Returnigita en la tendaron, la eskapinto ricevas brutalajn batadojn kaj estas devigita dormi dum kelkaj monatoj kun katenoj premitaj ĉirkaŭ la kolo kiel puno. Ĉiuj ostaĝoj sciis tion, tiel tre malofte ili provis eskapi.

La doloro pro tio, ke oni havas karulon en kaptiteco nedefinite — en kvazaŭa limbo sen esti mortinta nek tute vivanta— estas sufiĉe por detrui la emocian stabilecon de multaj homoj. Ne mirindas do, ke iuj geedzecoj finiĝis dum la ostaĝeco de unu el la geedzoj, aŭ ke infanoj kreskis kun la frustrigo ne koni unu el siaj gepatroj. Tiaj traŭmatoj tuŝis ĉiujn tavolojn de la kolombia socio, ĉar ostaĝoj estas humilaj kolombianoj, aktivaj soldatoj, membroj de la ekonomia kaj politika elito, ktp. Kiam mi ekestis prezidento de Kolombio, pluraj el ili estis pasigintaj preskaŭ jardekon kiel ostaĝoj.

Inter multaj aliaj, en frua 2003 la FARK estis retenante homojn kiel la eksministron pri Disvolviĝo Fernando Araŭjo, Ingrid Betancourt, eksa prezidanta kandidatino franca-kolombia, kaj la triopo el Marc Gonsalves, Keith Stansell kaj Tom Howes, tri usonaj kontraktintoj forrabitaj dum misio kontraŭ ŝakrado de narkotajoj kiam frakasis la aviadilo en kiu ili veturis.

Tiel do, en tiuj jaroj la ostaĝigo —tiel por tiu kiu ĝin trasuferis, kiel por sia familio— estis tragedio kiu ne konis limojn naciajn, sociajn nek ekonomiajn. Kelkaj homoj eĉ diras, ke ĝi estas pli malbona ol morto.

Gaviria, ĉiama optimisto, vidis tion, alimaniere: "Kidnapo estas speco de morto, el kiu eblas reveni," li skribis. "La sola diferenco estas ke ĝi donas al ni duan ŝancon".

5

La ostaĝoj estis ne malproksime.

Iun posttagmezon malriĉa infano eliris por fiŝi kaj ĉasi en la kamparo de Antjokio. Sur sia vojo li renkontis tendaron de la FARK. Li, scivolema, piediris tra la ĉirkaŭaĵo kaj vidis ion kio ŝajnis esti dekduo da ostaĝoj. La sorto volis ke tiu infano havis fraton en la Armitaj Fortoj, kaj tiu informo disvastiĝis rapide tra la ĉeno de komando. Unu el niaj generaloj ekveturigis la knabeton en arma aviadilo kun lia frato, kaj petis lin montri la lokon de la tendaro. Tiel estis, kiel ni lernis ke la FARK retenis sinjorojn Gaviria, Echeverri kaj aliajn ostaĝojn en areo ĝangala, montara kaj aparta, proksime al riveroj Murri kaj Mandé, kvindek kilometrojn for de la municipo Urrao kaj proksimume nur 130 kilometrojn laŭ rekta linio ekde Medeĝino.

Ke la tendaro estis atingebla per mallonga helikoptera veturo ekde unu el la plej grandaj urboj de Kolombio, tiu fakto estis signifoplena. En multaj aliaj landoj, armeo aŭ polica patrolo, taĉmentita en urbo tiel granda kiel Medeĝino, sendube estus jam detektinta ĝin, sed en nia lando, kun ĝia malsimpla reto de montoj, valoj kaj ĝangaloj, kaj kun tiele malegala soci-ekonomia disvolviĝo, tiu distanco povus bone egalvalori 1600 kilometrojn.

Ni asignis por la kazo plian personaron informiĝfakan. Baldaŭ ni malkovris ke estis cent teroristoj en la najbaraĵo de la tendaro. Inter dek kvin kaj dudek el ili estis responsaj por gardi la ostaĝojn. Krom Gaviria kaj Echeverri estis dek soldatoj, iuj kun kvar aŭ pli jaroj de kidnapiteco. Ni eksciis ke la komandanto de la grupo —krimulo konita per la alinomo "El Paisa"— troviĝis tie, komisiita por inspekti la ostaĝecon de tiuj kiujn la FARK taksis kiel ostaĝoj de "alta valoro".

Ni havis la informon. Ni devis decidi la manieron procedi por elliberigi la ostaĝojn.

Multaj aferoj prizorgigis nin. Prioritaton havis, kompreneble, la vivo de la ostaĝoj. Multaj el iliaj familioj estis favoraj al intertraktita interŝanĝo laŭ kiu la Registaro liberigus el prizonoj centojn da FARK-anoj kaptitaj kaj, interŝanĝe, tiu kontraŭleĝa grupo liberigus la ostaĝojn. Ni neniam formetis tian intertraktadon, sed sub certaj

kondiĉoj, inter ĉi tiuj ke la delongaj membroj de la FARK rezignu la violenton kaj konsentu: aŭ forlasi la landon aŭ partopreni en agrogramon de resocianigo en la kolombian socion. Dum nia regado ni akceptis multajn proponojn venintaj el la internacia komunumo kaj el la Katolika Eklezio por provi intertrakti pri la elliberigo de ostaĝoj. Tamen ĉiufoje kiam ni faris unu paŝon, la FARK malkonfesis siajn proponojn aŭ postulis kondiĉojn kiujn ili antaŭsciis neplenumebajn. Cetere, la ĵuspasinta historio de Kolombio montris ke la elaĉeto aŭ la interŝanĝo de ostaĝoj kontraŭ enprizonigitaj teroristoj donis kuraĝon al la FARK por efektivigi pli da kidnapoj.

La sanproblemoj de la ostaĝoj kunuloj de Gaviria kaj Echeverri en sia kaptiteco urĝigis decidon. Pro ili, kaj ĉar la rezulto de niaj decidoj estis prilumonta la sorton de dekoj de aliaj ostaĝoj, kiuj estis —multaj el ili ekde pluraj jaroj antaŭe— en malhumanaj psikaj kaj fizikaj kondiĉoj.

Kiom pli da tempo devus elteni la lando, ke ni restu senfare dum la ostaĝoj estis konsumiĝantaj en la ĝangalo, for de iliaj vivoj kaj iliaj familioj? Ĉu kvin jarojn? Ĉu sep? Ĉu dek? Ne, La epoko de pasiveco devis finiĝi.

Tuj eltrovinte la lokon de retenado de la ostaĝoj, ni devis agi rapide, ĉar en ajna momento ili povis esti translokitaj al alia tendaro. Tiam mi petis al la Armeo ellabori operacan planon kiu konduku al ilia elliberigo. Ĝi estis devonta minimumigi, laŭeble, la riskon de viktimoj inter la ostaĝoj kaj ankaŭ inter la FARK.

Ni estis dependontaj grandparte de du faktoroj: surprizo kaj impona forto. Ni decidis deploji grandan nombron de trupoj en la areo kiuj subeniru rapide per ŝnuroj kaj baldaŭ trovu la ostaĝojn. Niaj soldatoj estus ekipitaj per megafonoj por averti al la FARK ke neniuj estus damaĝita, se la ostaĝojn ili pace ellasus. Anstataŭ plenumi la operacon dum la nokto aŭ mateniĝo, ni estis ĝin faronta ĉirkaŭ la horo de tagmanĝo, ĉar nia informiĝfako sciigis nin ke la tendaro estis pli trankvila tiam. Dume la Kvara Brigado —la Armea fako responsa pri la areo— provizore ĉesigis la operacojn de du batalionoj kiuj estis sur la kampo; tiamaniere ni esperis ke la FARK estus tiel antaŭzorga kiel eble. Antaŭ la operaco, nia Armitaj Fortoj prenis elare fotojn pri la areo por familiarigi la trupojn kun la tereno. Mi konsciis pri la riskoj kunportitaj de ĉi tiu misio por la estonteco de mia prezidenta laborplenumo: se ni malsukcesus, la probablo de malsukceso de nia sekuriga strategio —jam tiam

generinta grandan diskutadon— estus tre alta. Neniu politika kalkulo, tamen, estis prenita en konsidero: ekde mia porprezidenta kampanjo mi estis insistinta pri la neceso venki la kidnapadon kaj liberigi la ostaĝojn, perforte se tiele necesis. Kaj mi havis klaran mandaton por tion fari.

Komence de majo de 2003 la operaco estis preta por realigo. Ni pesis la riskojn kun la plej granda zorgo. Neniam antaŭe en Kolombio oni provis operacon de ĉi tiu grando, kaj en kelkaj rondoj estis maltrankvilo pri ke nek la Armitaj Fortoj nek nia kapablo kolekti informojn taŭgis por tia defio. Mi ne akordis: mi havis —kaj ankoraŭ havas— plenan fidon pri nia Armeo, kaj la informo estis preciza. Krome, la vivkondiĉoj de la ostaĝoj —fakte, la kondiĉo de Kolombio kiel tutaĵo— postulis urĝan agadon.

La decido estis farita kaj mi donis la ordonon.

6

La tagon de la operaco mi vekigis je la kvina horo kaj diris al Lina:

—Ni devas preĝi.

Mi reokupigis pri miaj laboroj sekvante la proceduroj kiuj regas sekretajn operacojn: mi devis agi kvazaŭ nenio okazus, tiel mi ne veku suspekton inter la eksterleĝaj armitaj grupoj kiuj povus esti enfiltrigitaj en niajn vicajn. Mi veturis de Bogoto al Kalio¹ en la prezidenta aviadilo (FAC-001), kaj en helikoptero mi alvenis al la Nacia Parko Los Farallones (montoj leviĝintaj super la urbo). Mi iris por inaŭguri novan Altmontan Batalionon al kiu ni donis la nomon de la forpasinto Rodrigo Lloreda Caicedo, kuraĝa kaj amata kolombiano kiu estis ministro pri Defendado en antaŭa registaro. Tiaj batalionoj estis avangardaj postenoj en la montoĉeno Andoj; planitaj por malobstrukcii kaj okupi strategiajn lokojn, ilia alteco nin permesas havi avantaĝon super la FARK eltondante ties eskapajn vojojn kaj eble, ironie, meti finon al la amasaj kidnapoj en Kalio kaj ĝia ĉirkaŭa valo.

Minutojn antaŭ ol komenci la inaŭguran paroladon, Marta Lucía Ramírez, tiama ministrino pri Defendado, diris al mi ke la misio estis disvolviĝanta. Se ni sukcesis, ŝi aŭ la generalo Jorge Enrique Mora Rangel —la plej altranga militisto ĉeestanta— devus ricevi konfirmon per poŝtelefono.

Parolante al la homamaso mi pensis pri miaj amikoj kaj kolegoj Guillermo Gaviria Correa kaj Gilberto Echeverri Mejía, pri la dek ostaĝigitaj soldatoj, iliaj familioj kaj ĉiuj forrabitaj en nia nacio. Mi ankaŭ pensis pri la trupoj komisiitaj por la operaco. Mi levis preĝon por la sekureco de ĉiuj. Mia rigardo falis plurfoje sur la generalon Mora Rangel kaj la ministrinon Ramírez, klopodante deĉifri laŭ iliaj esprimoj la ricevon la bona novaĵo.

La alvoko kiun ni ĉiuj atendis kaj esperis neniam alvenis.

1 NT Urbo skribita hispanlingve: "Cali".

7

Dudek jarojn antaŭe, ĉirkaŭ la sama dato, mia patro Alberto Uribe Siera vekigis maltrankvila. Homo gaja kaj karisma li estis, la epitomo de sano, feliĉo kaj vikleco. Senmanka ĉevalrajdanto kaj ŝatanto de toreado, kiu lerte donis rajdante la finan pikon —per la spado, ne per la lanceto— al taŭro. Nenio kaj neniu povis ĝeni sian kutiman bonan humuron. Sed, io sufiĉe stranga pri li, tiumatene de junio 1983 li ellitiĝis kolera, maltrankvila kaj impeta kvazaŭ taŭro.

Alberto Uribe Siera estis loĝanto de tiu *alia* Kolombio: loko de blindiga beleco, kun ĉevaloj, muziko kaj dancado. Paradizo kreita por homoj memfaritaj. Dek kvar jarojn aĝa li forlasis la hejmon por serĉi sian sorton kaj travivi sian propran vivon. Li ĉiam havis gitaron proksime kaj kantis baladon en la plej neatenditaj momentoj. Liaj festoj estis legendaj kaj ofte daŭrantaj eĉ dek tagojn. Donjuaneca kaj posedinta grandan ĉarmon, li estis fonto de ĝojo por tiuj kiuj ĉirkaŭis lin.

Kie plej feliĉa estis mia patro estis en lia bieno. En ĝi laboradis senlace akompanita ofte de unu el siaj filoj aŭ filinoj. Mi rajdis kun li multfoje tra la kampoj de Kolombio, ĉirkaŭitaj de mil nuancoj de verde. Ni ekzamenadis la brutaron kaj helpis ripari palisarojn ĝis la vesperiĝo. "Ho!, Álvaro", li suspiris, "mi bedaŭras diri al vi ke tiu ĉi vivo de brutbredado ne donas multan monon, ĝi estas nur romantika. Oni devas sin dediĉi al ĝi pro amo". Kaj tiam li ridetis, piedbatis sian ĉevalon kaj ni revenis al la domo.

La vivo kiun li pasigadis kiel brutbredisto signifis ĉion al mia patro. Tial ni estis surprizitaj kiam, tri semajnojn antaŭ la mateno en kiu li vekigis maltrankvila, li faris koncedon senprecedencan:

Ni ne plu reiros al Guacharacas¹ —li diris al miaj gefratoj— Ni ne reiros nuntempe tien.

Guacharacas, bela kaj produktema bieno en Antjokio, estis lia preferata proprietaĵo. Li havis ĝin ekde 1975, en partnereco kun brutbredisto de la regiono. Tiutempe la trajno al Puerto Berrio² ankoraŭ iris tra la bieno, kaj la domo estis gastejo proksima al la

1 NT Prononcata "Gŭaĉarakas".

2 NT Municipio proksima al la rivero Magdalena, 191 km. for de Medegino.

stacio. Situinta en regiono karakterizita de homoj laboremaj kaj honestaj kiuj sciis kiel akiri la plej grandan profiton el la grundo, Guacharacas havis kvardek laboristojn kaj ĉefserviston. Tamen, en la 1980-a jardeko la areo komencis fariĝi fortreso de opo de la FARK.

Al mia patro, kiun ĉiam persekutis perforto, ĉi tiaj cirkonstancoj ne estis fremdaj. Li fariĝis plenaĝa en tempo kiam la civila milito inter liberaluloj kaj konservativuloj banis per sango la kampojn de la lando: pli ol 200.000 kolombianoj mortintaj en la jardekoj de 1940 kaj 1950 igis doni al tiu tempo la nomon "La Violento". Esperante havi vivon pli trankvilan, en 1961 li transloĝiĝis al la fora nordo de Antjokio; tamen la sorto volis ke tiu areo —proksima al la urbeto Montelibano, en la departemento Córdoba— estu la naskiĝloko de la Popola Liberiga Armeo (PLA), eksterleĝa armita grupo kiu komencis agadi en kamparaj areoj kaj fortiĝis kun alarma rapido. Meze de la 1960-aj jaroj —mi estis tiam dek du aŭ dek tri jaraĝa—, la PLA venis nokte al la bieno, detruis la agrokulturan maŝinaro, ŝtelis brutojn kaj bruligis nian domon. Tiunokte neniun membro de la familio estis tie tamen mia frato Jaime, iuj lernejoj amikoj kaj mi estis tranoktintaj kelkajn tagojn antaŭe okaze de la lernejoj ferioj. Se ni estus enloĝintaj dum la trudeniro, eble ni estus forrabitaj aŭ mortigitaj.

Iom post iom la FARK estis solidiĝinta kiel la plej potenca armita grupo eksterleĝa en Kolombio. Ĉiutage ĝiaj murdantaĝoj estis pli aŭdacaj ne nur kontraŭ proprietuloj de tero kaj de fabrikoj, sed ankaŭ kontraŭ ordinaraj civitanoj. Mia patro ne estis escepto, spite la minacojn —aŭ, pli eble *pro* ili— neniam li retiriĝis aŭ faris koncedojn.

En majo de 1982 la teroristoj de la FARK lanĉis sian "strategian planon", kiu celis renversi la Registaron per organizado de ribeloj en la ĉefaj urboj de la lando kaj la klasbatalo. Per tiu ĉi plano ili volis solidigi sian militan agadon, fortigita en la tiame ĵuspasintaj jaroj per la kreskanta partopreno de ĉi tiu eksterleĝa grupo en la ŝakrado de narkotaĵoj —kaj precipe kokaino— kiu el Kolombio nutris la kreskintan mendadon de Usono kaj Eŭropo. La narkotajkomerco havigis al la FARK la enspezojn kiujn ili bezonis por ampleksigi sian agadkampon, kaj alveninte al nova areo la grupo postulis du aferojn: monon kaj silenton. La sinteno de mia patro estis klara:

—Mi ne iras unu paŝon nek donas unu peson¹.

Tial ni restis perpleksaj pro lia subita decido ne reveni al Guacharacas. Ĉu li, rezistinte tiom da jaroj, cedus nun pro la premo de la FARK? Ni neniam sciis kun certeco la kialon por tiu decido. Eblas ke li sciis pri iu specifa minaco aŭ ke li estis gvidata nur de intuicio. Nek ni scios kial, en tiu fatala mateno de junio de 1983, rondirinte tra la domo dum longa tempo, li abrupte ŝanĝis sian opinion. Mi povas nur supozi ke Alberto Uribe Sierra ne povis vivi kun tio, kion li sentis kiel kapitulacion. Li estis homo, kiu dum siaj kvindek jaroj vivadis sen fari koncedojn, homo kiu kredis ke la sindona traktadon kian li donis al siaj laboristoj lin liberigis el la kreskantaj tensioj tuŝantaj Kolombion tiutempe, kaj esperis ke sia konduktado estis kunhavita de la lando kaj siaj samlandanoj.

Li ekkaptis la telefonon kaj vokis mian fraton Santiago:

—Prenu min ĉe la flughaveno —li diris—. Ni iros al Guacharacas.

Antaŭ ol forlasi la domon li vokis mian fratinton María Isabel por ŝin inviti. Tiam li prenis sian pistolon Walther. Iam li estis dirinta al mia frato: "Pli bone mortinta ol kidnapita". Li trairis la pordon per vigla paŝo kaj kun la espero kontempli gloran matenon kolombian.

1 NT "peso": la kolombia monunujo.

8

—Sinjoro Prezidento?.

Mi sciis tion ekde la momento kiam mi vidis la vizaĝon de la ministrino.

La unuaj detaloj pri la operaco estis nekompletaj kaj alvenis peco post peco: kiel projektite, ĉirkaŭ la deka matene kvin helikopteroj Black Hawk elteriĝis ekde la flughaveno de Urrao¹; ili portis sepdek kvin soldatojn de la Forto de Rapida Deplojo (elita taĉmento de la Specialaj Fortoj). Ili havis akompanon de du helikopteroj Arpía², taĉmento de komando kaj kontrolo, kaj aviadilo kiu flugis je granda alto por apogo loĝistika. La kalkulita daŭro de la flugo ĝis la tri difinitaj zonoj de descendo —proksimaj al la tendaro de la FARK— estis 18 minutoj, daŭro sufiĉe mallonga por permesi kelkan surprizon, eĉ se la onidiro pri la operaco estis enfiltriĝinta.

Kiam niaj trupoj alvenis al la tendaro, jam la teroristoj estis foririntaj. Naŭ el la dek tri ostaĝoj esti mortintaj. Guillermo Gaviria Correa kaj Gilberto Echeverri Mejía esti inter ĉi tiuj. Ili estis alpaŝitaj malantaŭ oreton aŭ en la nukon, de minimuma distanco. Tri el la ostaĝigitaj soldatoj estis vunditaj kaj unu travivis senvunda. Niaj trupoj faris eĉ ne unu pafon.

Ni ne havis pliajn detalojn sed ja mil demandojn sen respondoj. Ĉu nia informiĝado estis mankohava? Ĉu la trupoj estis eltrovitaj? Kien fuĝis la teroristoj? Kiaj estis la cirkonstancoj de la vunditoj? Ĉu troviĝis stukaĉo en niaj vicoj? La angoro premegis min. Ĝi estis sento malnova kaj familiara. Tiam mi eksciis ke tiu ĉi tragedio persekutos min dum la cetero de miaj vivtagoj. Kaj tiel okazas.

Ne estis la momento, tamen, por la funebro. Necesis agi. Ni estis ironantaj tuj al Urrao, kaj ekde tie al la loko de la masakro. Mi ĉiam kredis pri la graveco de la fizika ĉeesto en la loko de la grandaj krizoj por pli bone kunordigi la respondon, evidentigi aŭtoritaton, kaj preni sur oni la responson pri la situacio. Mi bezonis, krome,

1 NT Municipio en la sudokcidenta regiono de Antjokio; sur ĝia orienta flanko estas la municipo Caicedo.

2 NT Helikopteroj Black Hawk speciale modifitaj kaj plipotencigitaj por la specialaj bezonoj la Kolombia Aera Forto.

honoru la memoron pri la viktimoj kaj kontroli urĝan esploradon pri la eraroj de la operaco. Mi devontigis min vidi la ĝangalon kaj percepti la cirkonstancojn kiajn devis elteni la ostaĝoj, mi bezonis inspekti la lokon por pli bone kompreni la defiojn de la arma operaco.

Mi kunvokis mallongan kunvenon kun la sekureca skipo kaj donis la ordonojn necesajn pro tiu ĉi okazaĵo. Poste ni revenis helikoptere al Kalio, kie ni eniĝis en la aviadilon FAC-001 cele al Medeĝino. Mi sidigis silenta kaj okulfermita. Mi volis ordigi la ideojn. Mi klopodis kompreni la konsekvencojn homajn, politikajn kaj militajn de tiu ĉi tragedio. Dume, miaj kunuloj diskutis: Ĉu ni devas fari rapidan enketon aŭ komisi ĝin al "neŭtralaj" specialistoj? Kiom ni devas rakonti al la familianoj kaj kiam? Kion ni devas konigi al la kolombianoj? Kion signifas tio ĉi por la nacia regado? Kaj por nia plano de sekureco kaj por la ceteraj ostaĝoj?

Mi malfermis la okulojn kaj elnomis la tri principojn kiuj estis gvidontaj nian respondon:

1. Tiun saman tagon, per alparolo al la nacio en televidelsendo, ni diros la veron kun ĉiuj ĝiaj detaloj.
2. Ni akceptos ĉiujn kritikojn kiel validaj kaj ni lernos el ili.
3. Ni ne cedos en nia batalado kontraŭ la teroristoj kaj mi prenos sur min la responson pri la sensukcesa operaco.

Certe, plenan enketon pri la faktoj estis farota. Tamen donitaj la cirkonstancoj, la nacio bezonis koni la veron tuj. Se la konfuzo, la riproĉoj kaj la insinuoj estis niaj malamikoj, la travidebleco estis nia sola partnero. La vero povos esti doloriga; eble ĝi elmontros ke mi agis temerare aŭ tro baldaŭ, aŭ ke niaj institucioj ne estis je la nivelo de la defioj kiujn ni alfrontis. Tiuj estis riskoj kiujn mi devis akcepti. Fonte al tragedio tiom granda, la popolo povis esti en malkonsento kun la agoj aŭ metodoj aplikitaj, tamen ni ne povas perdi *kredindecon*. Sen ĝi, la tuta konfido pri nia regado vanuos.

Ni jam estis perdintaj la ostaĝojn kaj se ni ne traktus tiun ĉi tragedion kun honesteco, digno kaj fortikeco, ni estus perdontaj ankaŭ nian landon.

9

Ĝiaj geografiaĵoj estas la plej granda beno de Kolombio kaj, samtempe, la plej granda obstaklo por ĝia formiĝo kiel nacio.

Beno, ĉar la lando estas provizita per eksterordinara beleco kaj abundaj resursoj. Kvankam ĝia areo estas nur unu procento el la monda tersurfaco, ĝi havas 10 procenton el ties biodiverseco. La strandoj kun blanka sablo laŭlonge de la marbordo ĉe la Karibio estas sekvataj de fekundaj ebenajoj kiuj, interne de la lando, leviĝas tra freŝaj kaj superriĉaj regionoj. La montoriĉaj departementoj kiel Santandero kaj Antjokio, kie mi naskiĝis, estas kvazaŭ simfonio el terasoj, kie ĉiu regiono —glore verda— havas sian propran ekosistemon. Nia lando tenas veran trezoron de valoraj varoj: oro, nafto, smeraldoj, freŝa akvo ... Kelkfoje estas malfacile kredi ke Dio dotis landon per tiom da riĉaĵoj.

Sed la samaj karakterizaĵoj kiuj faras el tiu ĉi areo specialan lokon pro ĝia beleco kaj ĝiaj resursoj estis markintaj la malfacilaĵojn kiuj politike, ekonomie kaj armee devis alfronti la lando tra ĝia historio. "Paradizo por gerilistaro", konsideris Kolombion raportisto de la revuo *Time* en 1956. Fakte, niaj geografiaĵoj estas unu el la ĉefaj kialoj pro kiuj, en du jarcentoj de respubliko, neniu registaro estis kapabla atingi plenan kontrolon super la teritorio. Tri montoĉenoj apartigitaj per profundaj valoj trairas la landon de sudo al nordo. Granda parto de sudo kaj oriento de la amazona kaj orinoka areoj kaj ilia savanoj, kaj grandaj areoj de la marbordo ĉe la Pacifiko havas tre malgrandan loĝantaron. Ĉi tiu karakteriza miksaĵo faris ke Kolombio estu perfekta loko por la funkciado de kontraŭleĝaj armitaj grupoj, kaj ke ili povu reteni ostaĝojn en siaj manoj dum pluraj jaroj.

Mi vojaĝis ĉie en Kolombio; konas mi la dezertojn de la duoninsulo Guajira, la suprajn pintojn de la Altebenaĵo de la Terpomoj¹ kie fontas la rivero Magdalena, kaj la amazonian ĝangalon en Leticia —proksima al la landlimoj kun Peruo kaj Brazilo—, kaj mi povas aserti ke la areo kie estis masakritaj Guillermo Gaviria kaj liaj kunuloj de kaptiteco havas grandegan malfacilecon por penetrado. Ju pli nia helikoptero alproksimiĝis,

1 NT Hispane "Páramo de las Papas".

des pli la grundo malklariĝis: ia baldakeno el arboj, kies alteco estis ĉirkaŭ 14 metroj, etendiĝis al la horizonto ĉiudirekten, kelkaj depresioj, apenaŭ percepteblaj, markis la ekziston de malgrandaj riveroj kaj rojoj. La tuta pejzaĝo regita de la monotoneco de la ĝangala densejo.

Noktiĝis kiam la helikoptero, en kiu ni veturis, malsupreniris prudente sur malgrandan sabloriĉan strandon ĉe la bordo de rivero, tre proksime al la loko, kie estis surteriĝinta nia Speciala Taĉmento. Mi estis akompanita de la generaloj Mora Rangel kaj Mario Montoya, la ministrino pri Defendado Ramírez, Ricardo Galán — konfidinda konsilanto kaj ĵurnalisto al kiu mi petis registri ĉiujn detalojn de nia esploro— kaj malgranda teamo de soldatoj por nin protekti. Dum la haltigo de la helikopteraĵoj motoroj, iuj pasaĝeroj aŭdis pafojn. Atendante la sekurigon de la areo fare de la trupoj, ni estis informitaj per radioaparato ke, pro liaj vundoj, alia el la ostaĝoj estis ĵus mortinta. Ni restis en silento; ŝvebis super ni sufokan senton de malgajo kaj vundebleco.

Kiam sekurigita la lokon, ni eliris el la helikoptero. Inspektis ni la ĉirkaŭaĵon kaj rapide komprenis tion kio damaĝis la mision: kvankam la tendaro kie la ostaĝoj estis murditaj situis ĉe nur kelkaj centoj da metroj for, la deklivo leviĝanta de kie ni surteriĝis estis tro klinata, preskaŭ muro. Iu ajn kiu surteriĝas en la loko ekestas esence kaptita kaj, se tiu povus grimpi sur la deklivo, tio daŭrus tiom longe ke la faktoro surprizo vanuus. Ĉi tio klarigis kial la FARK havis tempon por reagi kaj murdi la ostaĝojn.

Mi vidis, kion mi bezonas vidi.

Ni malsupreniris reen laŭ la deklivo ĝis la helikoptero en kurado kontraŭ la tempo por reveni al Medeĝino. La novaĵo pri la tragedio komencis filtriĝi al la publiko. Ni surteriĝis nokte kaj direktiĝis al la hospitalo kie estis la eksaj ostaĝoj postvivintaj. Kvankam unu el ili estis en tre flegenda stato, ĉi tiu kaj alia soldato, ĉiu aparte, konfirmis la okazintaĵojn de tiu tago kaj klarigis kial la misio rezultis malbone.

Ekde kelkaj semajnoj antaŭe la cirkonstancoj en tendaro estis sombraj kaj la sanoj de pluraj ostaĝoj estis difektitaj. Malgraŭ la lastatempa trankvilo en la najbaraĵo de la tendaro, la FARK estis alte alarmitaj pro, eble, la militaj operacoj disvolviĝantaj en aliaj partoj de la lando. Tiun tagon, la helikopteroj portantaj trupojn flugis malalte super la tendaro, eble miskalkulintaj sian ĝustan

pozicion. Ĉi tio ne estis fatala eraro; laŭ la postvivantoj, en la tagoj ĵusantaŭaj, kelkaj helikopteroj pasis tra la zono de tempo al tempo, dum medicinaj misioj en proksimaj indiĝenaj komunumoj. La eraro estis, ke la superflugo de la helikopteroj ebligis al la teroristoj vidi la piedojn de la soldatoj pendantajn de la pordoj en klara sturma sinteno.

Antaŭ la tujeco de la ofensivo, la teroristoj dispeliĝis kaj forlasis la ostaĝojn solajn kaj ŝnuritajn. Ĉirkaŭ dek minutojn poste ili revenis. Laŭ la postvivantoj, la alinomita "El Paisa" kuris tra la tendaro kriante la komandon:

—Ne forlasu unu viva! Eĉ ne unu!

La ostaĝoj estis devigitaj genui, poste resonis la pafoj. Unu post unu kaj sendefendaj, la kaptitoj falis mortintaj en la ĝangalo.

Kiuj postvivis ŝajnis sin mortintaj. Ili restis senmovaj, kun kuglo fiksiĝinta en sia kapo aŭ kruro, ĝis kiam la teroristoj fuĝis el la tendaro kaj, fine, niaj trupoj povis alveni.

Ni respektoplene aŭskultis iliajn rakontojn. Unuafoje la granda kaj intenco de tiuj murdoj —la maniero kiel ĉi tiuj homoj estis murditaj frostasange— estis evidenta. Unu el miaj kunuloj faris la demandon kiun ni ĉiuj pensis: Kial la FARK estis forrabintaj kaj kruele murdintaj du virojn kiuj faris nenion malsaman ol defendi la repaciĝon kaj la pacon?

La postvivinta soldato rakontis ke lastatempe Gilberto Echeverri komencis montri signojn de malsano, kaj ke la ideo elliberigi lin estis gajninta ian akcepton inter altrangaj membroj de la FARK. Tiam la ostaĝoj insistis pri lia elliberigo kaj kiam ili estis permesitaj paroli kun "El Paisa" Echeverri demandis lin:

Kiel vi povas trakti nin tiele, se ni estas amikoj de paco kaj dialogo kun vi?

La respondo de "El Paisa" resumas kvar jardekojn da suferado en nia lando:

Vi ne estas niaj amikoj —li ripostis— vi estas niaj klasmlamikoj. Niaj utilaj naivuloj.

10

—Kie estas la ĉefservisto? —Demandis mia patro afliktita. Neniu komprenis kial—. Ĉu iu povas bonvole diri al mi kie estas la ĉefservisto?

Horojn antaŭe li eliris el Medeĝino kun mia frato Santiago, kaj Maria Isabel, mia malpli aĝa fratino. Unu el liaj plej bonaj amikoj estis ĵus eliginta el la helikoptero en la lasta momento, ekskuzante sian malfruiĝon pro aliaj devoj. Mia patro levetis la ŝultrojn kaj diris al li gaje: "La venontan fojon". La helikoptero stirita fare de kapitano Bernardo Rivera, piloto konfidinda por nia familio, elteriĝis kaj interniĝis super la montoj verdaj kaj riĉaj de Antjokio. Farinte rapidan superrigardon de la areo, ĝi surteriĝis en Guacharacas ĉirkaŭ la kvara posttagmeze, ĝuste antaŭ ol la tropika suno komencis kaŝi sin malantaŭ la montoj.

Dum la rotoro ekhaltis, ĉirkaŭ dudek laboristoj de la bieno eliris por renkonti mian familion. La staloj, la kortoj kaj unu ponto super la rivero Nus estis proksimaj. Mia patro ekmontris rideton, rigardis la laboristojn kaj kuntiris la brovojn. Li direktiĝis al la domo sen diri unu vorton. Ion li devis serĉi. Dume, kapitano Rivera haltigis tute la helikopteron.

Kiam mia patro estis turmentita de grava maltrankvilo, li kutimis kuŝi sur la planko kaj pasigi la manojn sur sia kapo. Tiele lin trovis Santiago alveninta hejmen.

—Mi certas ke la ĉefservisto estas kun la ĉevaloj —diris al li Santiago—. Li revenos baldaŭ.

Mia patro ne respondis. Li restis sur la planko tenante sian kapon.

Tuj poste sekvis iaspeca paco. La eblaĵo, tro efemera, de tio kio povus —kaj devus— esti normala vivo en la kolombia kamparo. La suno estis jam kaŝita kaj la laboristoj rekomencis siajn taskojn. La ĉevaloj henis en la staloj kaj la rivero murmuris mallaŭte.

Tiam armitaj homoj aperis el malantaŭ la arboj.

Kun la lerteco de persono dudek jarojn pli juna, mia patro ekstaris. Li prenis sian Walther el sia zono kaj komencis pafi senlace.

—Don¹ Alberto, ne! —kriis kapitano Rivera—. Multaj! Ili mortigos vin!

—Tiel estos —mia patro diris, dum li rifuĝis en la kuirejon—. Certigu ke miaj familianoj kaj laboristoj eskapu!

La respondo de la deliktuloj estis tuja: hajlo de kugloj fajfis tra la aero. Mitrajlo trapikis la pordon kaj la murojn. Ĉiuj kuris panikitaj. Maria Isabel rifuĝis en ĉambro de la supra etaĝo, kapitano Rivera en la grenejo; Santiago en banĉambro situanta malantaŭ la domo. Post kelkaj minutoj, kaj ĉar li ne vidis nian patron, li kuraĝiĝis kaj foriris serĉante helpon.

Li kuris ĝis la rivero kaj ĝin tranaĝis cele al proksima ŝoseo. Li aŭdis la pafadon kiu daŭrigis kaj taksis la situacion: ne estis tempo por savpreno. Do li decidis reveni por provi savi nian patron.

—Jen venas la polico! Jen venas la polico! —Li kriis el la alia flanko de la ponto.

La respondo estis paf-ŝpruco kiu devigis lin kuri laŭ zigzago al la vojo. Subite, forta brulanta sento invadis lian dorson kaj faligis lin: kuglo estis pikinta lian pulmon.

Li restis sur la planko anhelante kaj nekapabla moviĝi. Post momento, Santiago povis rigardi supren. Tie, apud li, estis viro. Tiu ĉi vestis kamufluniformon kaj portis sturman fusilon.

—Kial vi estis kriante kaj kurante? —demandis la viro sulkante la frunton.

—Pro timo —Santiago respondis senspire.

—Kiu vi estas?

Mia frato paŭzis por pensi.

—Komercesto de la foiro —li diris— Mi venis por vidi gregon.

La viro rigardis lin suspekteme kaj karesis sian karabenon.

Ĝuste tiam alia viro venis.

—Kio okazas? —La ĵusveninto demandis.

Ekestis longa silento.

—Foriru ni —diris fine la unua viro—. Tie ĉi nenio okazis, ĉu ne?

1 NT Hispanlingva respekta vorteto por sinjoro, uzata antaŭ la nomo.

Santiago atendis surventre. Li sangis kaj la tempo pasis malrapide. Kelkajn sekundojn post la pafado haltis, li aŭdis la eksplodon. La banditoj krevigis la helikopteron. Li levigis sian kapon kaj vidis neniun; neniu spuro de mia patro aŭ mia fratino. Li supozis la plejan malbonon kaj decidis ke la ununuraĵo farebla de li estis serĉi helpon. Ŝanceliĝante li alvenis ĝis la ŝoseo kie brutaroporta kamiono prenis lin. Survoje li petegis ke oni iru savi sian familion.

11

Kiam sonoris la telefono de mia oficejo en Medeĝino, mi estis pretiĝanta por iri al kunveno de la Instituto de Liberalaj Studoj. Iu vokis el hospitalo de Yolombó¹. La kuracisto diris ke mia frato Santiago troviĝis grave vundita kaj eble li ne estis postvivonta. Ke mi devas iri tien kiel eble plej baldaŭ.

La sekretariinoj de la oficejo telefonvokis al la Ruĝa Kruco serĉante helikopteron de helposervo por transloki mian fraton al Medeĝino, kie la medicina prizorgado povus esti pli bona. Jam estis nokte, kaj la respondo estis tuja: sen sunlumo kaj en malbona vetero la helikoptero ne povus surteriĝi. Angorplena kaj sen imagi tion kio okazis, mi eliris en mia aŭto. Hodiaŭe, la vojaĝo al tiu municipo en Antjokio estas farata en iom malpli ol du horoj tra pavimita vojo, sed tiutempe ĝi estis vojo de tero. Duonon de nokto mi resaltis, silente, kaj aŭdante la lokan radiostacion en atendo de novaĵoj pri mia frato.

Subite mi aŭdis jenon:

En la buĉado hodiaŭa, proksime al Puerto Berrio, estis mortigita Don Alberto Uribe Sierra ...

Miaj okuloj pleniĝis de larmoj kaj kun despero mi batis la stirradon.

Nun mi estis parto de la duono de kolombianoj kiuj perdis iun amaton pro la perforto kiu vipis la landon.

1 NT Municipo situanta en la nordorienta regiono de departemento Antjokio.

12

Mia patro estis murdita je posttagmezo de junio 14-a, 1983 dum provo de kidnapo. Li estis alpaŝita dufoje, unu en la gorĝon kaj alia en la bruston, la pafado mortigis lin. Li estis kvindek-jara. Laŭ la atesto de niaj najbaroj kaj la laboristoj de Guacharacas, la krimo estis farita de proksimume dek du viroj el la tiel nomita Fronto 36-a de la FARK. Tiunokte ni pensis ke la krimuloj estis kidnapintaj mian fratinton, sed por nia konsolo ni trovis ke ŝi estis protektita dum pluraj horoj fare de instruistino kiu riskis sian propran vivon pro lojaleco al mia patro. Santiago pasigis kelkajn tagojn en kriza stato en la hospitalo; estis miraklo tio ke li postvivis. La krimuloj responsaj pri la atako neniam estis kaptitaj.

Tiuj, kiuj konis la bonecon kaj malavarecon de mia patro lamentis pro la tragedio, kaj ĉirkaŭ 10.000 homoj el la tuta lando ĉeestis lian funebraĵon. En mia familio lia murdo havis, tra la tempo, korŝirajn kaj neantaŭvideblajn konsekvencojn: Jaime —la unika frato, kiun la homoj kutimis priskribi kiel la heredanto de la humursento kaj la vivoĝojo el mia patro— nekapabla akcepti ties morton, neniam plu estis la sama; li mortis pro kancero en la gorĝo en 2001. Mia duonfrato Camilo kreskis sen sia patro: li estis nur dek monatojn aĝa en la momento de la murdo. Ĉe la funebraĵo, mia edzino Lina sentis sin malbone; kalkajn tagojn poste naskiĝis nia dua filo tri monatojn antaŭtempe kaj kun eta probableco postvivi.

Dek tri jarojn poste alvenis la fina tragedio al Guacharacas. La 25-an de februaro de 1996 —mi estis tiam departementestro de Antjokio— aktivuloj de la eksterleĝa armita grupo memnomita Nacia Liberiga Armeo (NLA)¹ sturmis la bienon kaj bruligis la domon. Kelkajn tagojn poste laboristo kiu elkreskis en la bieno kaj amis mian patron proponis al ni ke li pluloĝos en la bieno kaj okupiĝos pri tio malmulto kio restis. Ni diris jes. La NLA mortigis lin la 31-an de majo tiujara.

Mi amis mian patron kaj nostalgias pri li ĉiutage. La tragedio de Guacharacas signis en mia persona kaj profesia vivo turnopunkton kies influo povas esti nemezurebla, sed ne en tia maniero en kian iuj personoj asertas.

1 NT Hispanlingve: ELN (“Ejército de Liberación Nacional”).

Kelkfoje oni priskribas min kiel speco de Bruce Wayne sud-amerika: privilegiita infano, kiu ĵuris venĝi la morton de sia patro murdita far banditoj. Iu inklina al interkonsenti kun la diablo kaj toleri ĉiajn firuzaĵojn por efektiviĝi sian "mision" sendepende de la prezo, iu kiu eniris politikon kaj alvenis al prezidenteco —laŭ tiuj kiuj tiele pensas— por venĝi kontraŭ la FARK kaj ĉiuj maldekstrismaj grupoj.

Mi devas koncedi, ke tiu ĉi tiu interpreto, kvankam malvera, ne estas tute neracia se oni konsideras la pasinteco de Kolombio. Multaj el la plej malĝojaj ĉapitroj en ĝia historio estis skribitaj per sango fare de tiuj, kiuj intencis venĝon. Ekde la intercivitanaj militoj de la deknaŭa jarcento ĝis La Violento de la jardeko de 1950 kaj, en la lastaj tempoj, dum la mortoj generitaj pro la drogtrafiko, multaj milicioj kaj armitaj grupoj ŝveligis siajn vicojn per homoj, kiuj portis armilojn por venĝi iun murditan patron, seksperfortitan fratino, aŭ parencon aŭ amikon kies terenon iu ŝtelis. Mi ankaŭ travivis tiom dolorigan tragedion kaj sentis la intensecon de la emocioj kiujn ĝi produktas, speciale la rabion. Mi kredas ke tiuj kiuj suferas perdon pro la perforto devas fari decidon kaj ke la plimulto de la kolombianoj elektis la saman vojon, kiun mi sekvis.

Ja, mi sentis grandegan doloron post la morto de mia patro kaj mi ploris kun mia familio. Ni suferis ĉar ni vivis en lando kie hidaj aferoj okazis. Samtempe ni sciis ke ni ne estis solaj: multaj amikoj kaj konatoj ankaŭ perdis amatojn en kidnapoj kaj pafadoj (ĉirkaŭ la sama tempo la FARK mortigis la patron de Claudia Blum —amikino kaj elstara ŝtata servanto apartenanta al konata familio el Kalio, ŝi estis senatanino kaj, dum nia registaro, ambasadorino de Kolombio en la Unuiĝintaj Nacioj— kaj sinjoron Jaime Ortiz, brutbredisto de Urabá). Do ni ne estis solaj, la nia estis doloro kunhavita kun milionoj da homoj.

Tiam mi diris al miaj gefratoj:

La doloro kiun ni sentas estas suferata ankaŭ de duono de la kolombianoj. Tio estas nia persona tragedio kaj nacia problemo. Ni devas iel ĝin alfronti.

Ni venas el familio kiu enplantis en ni la bezonon preni sur nin la problemojn de la lando, gvidataj de civitana konscienco. La celo en tiu momento estis fari ion por la bonstato de niaj kuncivitanoj. Oni instruis nin meti flanken niajn sentojn.

En 1983, kiam mia patro estis murdita, mi estis tridek-jara. Estis mi komencanta avanci en la ŝtata vivo: mi jam estis okupinta plurajn postenojn inkluzive tiun de urbestro de Medegino. Kiam la komenca doloro pro la murdo de mia patro estis malantaŭe, mi akceptis la nomumon far prezidento Belisario Betancourt por esti parto de paco-komisiono en Antjokio. Ni trairis la departementon, organizis forumojn kun la komunumoj kaj faris alvokon por ĉesigi perforton kaj havi publikajn interparolojn kun reprezentantoj de la eksterleĝaj armitaj grupoj, inkluzive de la FARK. Ĉu estis por mi emocie malfacile kunveni kun homoj de la grupo kiu mortigis mian patron, kiam ankoraŭ lia tombo estis freŝa? Jes, sendube. Sed en mia koro mi sciis ke mi devas tion fari.

En la sekvaj jaroj mi parolis kiel eble plej malmulte pri la murdo de mia patro. Mi estis balotelektita magistratano kaj senatano, estis igita departementestro de Antjokio kaj poste prezidento de Kolombio kaj malofte mi menciis mian patron en paroladoj aŭ kunvenoj. Mi volis eviti ke la imago de la publiko pri mi estu asociita kun ideo de martireco aŭ kun la falsa impresoj ke mi enmetiĝis en politikon motivita pro familia tragedio. En intervjuo, post kiam li forlasis la prezidentecon de Usono, George W. Bush rimarkigis ke en neniu el niaj multaj kunvenoj estis menciita la temo pri mia patro. Mi taksis ke sufiĉis rakonti ke mi estas unu inter multaj kolombianoj kiuj suferis pro violento.

Mi konas, fakte, multajn homojn kiuj travivis tian ĉi situacion: edzinoj de soldatoj mortigitaj, gepatroj kiuj suferis la kidnapon kaj murdon de siaj gefiloj, parencoj de senatanoj kaj ministroj, kiuj fordonis sian vivon por la idealo. Kiam mi ekestis prezidento, almenaŭ kvar el la dek tri ministroj de nia unua kabineto estis suferintaj kidnapojn aŭ murdojn far violentaj grupoj kaj la vicprezidento, Francisco Santos Calderón, estis ostaĝo dum kelkaj monatoj en la 1990-aj jaroj. Tamen, ĉi tiujn funkciulojn mi nomumis ne pro tio, ke ili suferis tiujn batojn; mi rimarkigas iliajn kazojn nur ĉar ili estas reprezentantoj de la lastatempa historio de nia lando.

En la lastaj jardekoj mi parolis kun multaj homoj kiuj spertis similajn tragediojn, kaj mi rimarkis ke ĉiuj sentis la samajn emociojn: koleron, kulpo, riproĉo kaj granda malĝojo ... Sed, preskaŭ senescepte, siatempe ni ĉiuj kunfluas en unu deziro: ke ĉesu la mortigoj kaj ni povu vivi en paco.

Venĝo ne solvas ion kaj la violento en Kolombio ne povas esti interpretita en moralaj aspektoj, kiel konfronto inter bono kaj malbono. Kontraŭe, violento estas enradikiĝinta en kompleksa socipolitikaj problemoj: malriĉeco, manko de edukado, anakronismaj ideologioj, socia neegaleco, difektoj de la Ŝtato, la plago de drogŝakrado, inter aliaj, rezultigis ke en du jarcentoj de respublika ekzisto, la lando havis nur kvardek sep jarojn de paco. Evidente, neniu el tiuj faktoroj pravigas violenton, sed formas ja la fontolo de tiu longa ĉeno de tragedioj kiuj batis tiom multaj da kolombianoj. La violenton ne malaperigos nia esprimo de frustrado kaj doloro. Ni devas scii la kaŭzojn de ĉiu el tiuj problemoj, labori por konstrui komunan konsenton pri ĝia solvo kaj havi la forton kaj saĝon por agi.

Nia devontigo al sekurecaj aferoj komenciĝis longtempe antaŭ la morto de mia patro. Kiam mi servis kiel urbestro de Medeĝino ni komencis programon nomita "Metroseguridad", per kiu estis kreata kaj kolektata specialan imposton por financi la sekurigan agentaron. Poste, kun la tempopaso mia doloro fariĝis grandega deziro solvi niajn multajn problemojn, por certigi vivon sen perforto al estontaj generacioj de kolombianoj. Mi dediĉis mian vivon al ĉi tiu idealo, eĉ koste de preskaŭ ĉio alia. Kaj mi pagis koston. Mi metas miajn amatojn kaj min en konstanta danĝero. Mi perdis multajn amikojn kaj aliancinojn. Mi ne faris multajn aferojn kiujn, alimaniere, mi povus fari: mi ne scipovas kanti nek danci, mi ne povas diri ŝercojn; la lastan filmon kiun mi vidis en kinejo estis *La Sola Rajdanta Gardisto*¹, kiam mi estis ankoraŭ infano; mi perdis sennombrajn naskiĝtagojn, familiajn festojn, momentojn gravajn en la vivo. Mi ne plendas, tamen. Tiuj oferoj estas necesaj por plenumi superan intereson: honori tiom da falintaj samlandanoj. Se Kolombio atingas pacon, iliaj mortoj ne estis vanaj.

Laŭmezure, kiel mi kreskis kiel persono kaj progresis en la agado de la politiko, mia doloro daŭre transformiĝis. Mi travivis tiun ĉi transformon kiam mi vizitis niajn soldatojn en la operacaj kampoj; kiam mi iris al la municipoj kaj aŭskultis la popolon dirantan ke siaj vivkondiĉoj estis plibonigitaj, kaj ke multaj familioj restis unuecaj danke al la gvidlinioj de nia registaro; kiam ni parolis kun la miloj da viroj kaj virinoj, kiujn ni helpis por forlasi armitajn grupojn kaj komenci novan vivon de paco kaj responso. En ĉiuj tiuj momentoj mia koro ekspansiis kaj ekde tiam ĉi tiu sento gvidis

1 NT: Angle: *The Lone Ranger*, hispane: *El Ilanero Solitario*.

miajn agojn —aparte kiam gvatis tragedio kaj mallumo kiel la ĉe la masakro en kampara zono de Urrao—. La fina stadio de mia doloro ne estis la malamo, sed la amo. El ĝi fontis —kaj ankoraŭ fontas— miaj emocioj, konvinkiĝoj kaj decidoj. La amo al mia lando, al miaj kunnacianoj, kaj speciale la amo al futura Kolombio kie gepatrojn ne estos forprenataj el siaj gefiloj.

13

—Estas tre malgaja momento por la nacio —mi diris—. Hodiaŭ, la terorisma grupo FARK faris alian abomenindan masakron, alian hombuĉadon.

Tiam, mi diris la nomojn kaj titolojn aŭ rangojn de tiuj, kiuj estis mortigitaj: departementestro Guillermo Gaviria Correa, eksministro pri Defendado Gilberto Echeverri Mejía, leŭtenanto Alejandro Ledesma Ortiz, leŭtenanto Wagner Tapias, unua serĝento Héctor Duván Segura, unua kaporalo Francisko Negrete Mendoza, unua kaporalo Jairsinio Navarrete, unua kaporalo Mario Alberto Marín Franco, dua kaporalo Jean Peña Guarnizo kaj unua kaporalo Samuel Ernesto Cote, kiu mortis kiam li estis portita al hospitalo en Medegino. Mi parolis amplekse pri la maniero kiel ni realigis la informigadon por lokalizi la ostaĝojn. Mi priskribis la ĝangalon kiun mi vidis kaj la malfacileco de la tereno kie la tendaro situis. Mi klarigis detale la manieron kiel estis planita kaj plenumita la operaco kaj la motivon kial la trupoj ne pafis. Mi atentigis, ke la soldatoj portis laŭtparolilojn por averti al la FARK ke iliaj vivoj estos respektataj kaj ke se ili liberigus kaj redonus la ostaĝojn ne necesus pafoj. Mi donis la motivojn kial ni decidis paroli al la nacio tiel rapide kaj raportiti la rezultojn de la enketo, kaj mi emfazis ke la neceso de travidebleco plej gravis super ĉiuj politikaj kaj aliaj konsideroj.

Tiam la kamerao enfokusigis generalon Carlos Ospina, komandanto de la Armeo. La generalo donis siajn kondolencojn al la familianoj de la viktimoj kaj reasertis la devontigo de ĉiuj niaj armeopartoj por sekvi antaŭen kun ilia misio malaktivigi la violentulojn.

Tiam ni prezentis la videaĵojn de interparoloj kun du el la postvivantoj. La vidbendoj estis originaloj: unue ĉar ni ne havis tempon por eldoni ilin, kaj due ĉar ni volis montri la originalajn registraĵojn por forigi ajnan suspekton pri manipulado aŭ trukado.

La unua intervjuo estis efektivigita por *Telemedellín*, loka kanalo, far sendependa ĵurnalisto. La soldato Agenor Enrique Vieyar Hernández rakontis ke la gerilistoj estis ricevintaj la ordonon mortigi la ostaĝojn, kaj ke li estis apud Gilberto Echeverri kiam tiu

ĉi ricevis tri pafaĵojn. Ke la korpo de Echeverri falis sur lin kaj la gerilistoj pensis ke ili ambaŭ mortis, kaj ke tia sortoturno —aŭ akto de Dio— savis lian vivon.

La alia "intervjuanto" estis mi. Pro neceso: serĝento Humberto Aranguren González devis esti urĝe portota al operaciejo. Li donis al ni sian konsenton, tamen nur mallongan konversacion ni povis registri.

Malgraŭ la malgajo kian kaŭzis en ni tiu bildo de tiu ĉi armeano vundita pro la atako kaj detruita pro jaroj da ostaĝeco en la ĝangalo, mi provis ke nia konversacio iru optimisma kaj spontanea.

—Kiel vi fartas, kara serĝento?— Mi demandis.

—Bone, mia Prezidento— li respondis.

—Kiel longe vi estis tie?

—Kvar jarojn.

Kaj poste li rakontis, je sia fojo, ke la gerilistoj estis ricevintaj la ordonon mortigi la ostaĝojn kaj ke niaj trupoj ne pafis.

—Kaj via familio estas el kie? Ĉu vi jam parolis kun ili? —Mi demandis.

La soldato klopodis respondi, tamen komencis perdi konscion. Mi decidis fini la konversacion.

—Ni lasos vin senĝenan ĉar oni operacios vin —mi diris al li mallaŭte—. Ke vi transiru tre bone. Ni petas al Dio ke vi baldaŭ resaniĝu kaj ni forigos el la lando la plago de tiuj banditoj.

Li reanimiĝis iomete kaj diris per tremanta voĉo:

—Dank' al Dio ni eliris vivaj por rakonti ĉi tiun historion kaj diri al la lando kian specon de homoj ili estas.

—Ĉu estas iu mesaĝo kiun vi volas doni al viaj kunuloj? —Mi demandis.

Jes —li respondis— iru antaŭen, ni gajnos la militon. Ĉi tiun militon ni gajnas.

Malmulto restis dirinda. Parolante el la koro kaj sen notoj, mi finis mian alparolon klarigante denove al la lando, ke nia oferto de porpacaj interparoloj kun la FARK kaj ĉiuj aliaj kontraŭleĝaj armitaj grupoj ankoraŭ restis sur la tablo, sed ke unue ili devis ĉesigi ĉiujn

armitajn agojn kaj liberigi la ostaĝojn. Ĉe manko de tia interkonsento, estis nia devo venki la "profesiajn murdistojn", la estrojn de kontraŭleĝaj armitaj grupoj, virojn kiel Pedro Antonio Marín Marín, konita kiel "Manuel Marulanda", kaj Victor Julio Suarez Rojas, alinome "Mono Jojoy". Mi parolis pri la neceso fini ne nur la terorismon en ĉiuj ĝiaj formoj, sed ankaŭ la koruptadon. Estis nia devo protekti nian demokration, kaj por tio mi faris alvokon —ne estis la unua fojo kiun mi ĝin faris— al senrangaj membroj de terorismaj grupoj, instigante ilin forlasi iliajn organizojn. Se tion ili faras, "ĉiuj kiuj prenis la misan vojon kaj decidis reveni hejmen kaj vivi kun ni estos akceptataj kun malavareco".

"Sampatrianoj —mi ekfinis— en la mezo de doloro, mi volas peti al vi ne laciĝu en la tasko venki la teroristojn. Ni reenpostenigos tiujn kiuj estas senvundaj. Ni kuracos tiujn kiuj estas vunditaj. Ni petos al tiuj mortigitaj ke el la ĉielo helpu nin plenumi bone tiun ĉi taskon.

"En ĉi tiu tempo de malĝojo Kolombio ne povas rezigni. Nun estas la tempo kiam ni devas fortigi nian decidiĝon por venki terorismon. Tiu ĉi terorismo kiu ĉiutage ŝtelas al ni moninveston, forprenas el ni ŝancojn de dungado, kondamnas la malriĉulojn al plia malriĉeco kaj Kolombion la vivado en plia subevoluo. Mi scias ke ni povas venki.

"Saĝulo diris ke la kerna valoro estas kuraĝo, ĉar el ĝi naskiĝas ĉiuj aliaj esencaj valoroj. En ĉi tiu horo de malĝojo, en ĉi tiu horo korŝira, ni bezonas la kuraĝon por venki perforton.

"Miajn sincerajn kondolencojn al la familioj de tiuj, kiuj mortis. Nia publiksekuriga agentaro planis ĉi tiun operacon kun plena responso kaj plena prudento. Ĝus koninte ĝian rezulton, la sinjoro generalo Mora Rangel vokis la ministrinon pri Defendado, kaj ŝi informis min. Mi prenas sur min, kiel mi ĉiam estis farinta, la responson".

14

Kolombio funebris dum la tagoj kiuj sekvis la masakron okazinta en la kampara zono de Urrao. Okazis ekzameno de konscienco, speco de nacia dialogo pri la maniero kiel la registaro devus agi en la kazo de la ceteraj ostaĝoj. Iuj homoj sin demandis ĉu ni devus sekvi vojon kun la plej malgranda alfronto ebla kaj, ĉe la mala ekstremo, aliaj petis venĝon, ke ni entreprenu fortan militan kampanjon kontraŭ la FARK kaj aliaj kontraŭleĝaj armitaj grupoj.

La plej fortaj kritikoj devenis el la familioj de la kidnapitoj kiuj restis en ostaĝeco. "Post tiuj tragikaj rezultoj, ni insistas, ke la registaro sin detenu de ajna milita operaco por savi Ingrid Betancourt", ŝia edzo diris al la amaskomunikiloj. Proparolanto de alia grupo de ostaĝoj diris: "Anstataŭ elliberigi la kidnapitajn politikistojn, la solaĵo kion faras tiuj misioj estas stampi ties tombojn". Kaj ekzistis tiuj, kiuj kondamnis la grupon FARK kaj mian registaron egale, akuzante ambaŭ partiojn de "militemaj" sintenoj kiaj plimalbonigis la violenton en Kolombio.

Ni aŭskultu respekte tiujn opiniojn. Ni sciis, tamen, ke jam ne eblis turniĝi malantaŭen. Laŭlonge de nia historio, la lando trapasis la vojon de cedismo¹ en multnombraj okazoj, kaj tio ne funkciis. Cetere, en la tagoj post la tragedio de Urrao ni vidis, ke la plejmulto de la kolombianoj interkonsentis ke ni daŭre iru antaŭen kun nia ofensivo: la enketoj pri publika opinio montris ke la FARK havis iom malpli ol du procentoj de popola apogo —statistike sensignifan procenton— kaj ke la apogo por nia registaro kreskis ĝis preskaŭ 70 procentoj. Ne fierigis nin tiaj procentoj, sed ja nin kuraĝigis la scio ke la fido de la kolombianoj pri siaj institucioj kaj pri la direkto kiun ni prenis restis firma.

Kondamnoj al la FARK alvenis el ĉie en la mondo. En telegramo, Papo Johano Paŭlo la 2-a esprimis "profundan doloron" pro la murdoj, kaj "refoje, la energian kondamnon al la terorismaj atakoj kiuj minacas la pacan kunvivadon kaj ofendas la plej profundajn sentojn de la homaj estaĵoj". La reago de Ingrid Betancourt estis signifoplena: aŭdinte la novaĵon —per radioaparato— ŝi postulis al siaj kaptintoj de la FARK permesi al ŝi registri mesaĝon. Ŝi asertis

1 NT Strategio de cedoj (angle "appeasement", hispane "apaciguamiento")

en ĝi, ke la malsukceso de la operaco Urrao ne devus fariĝi obstaklo kiu, en la estonteco, malhelpu la militistajn elliberigojn fare de la kolombia Armeo. "Mi komprenis ke mi povis nur paroli laŭ mi mem", ŝi poste skribis en sia memorlibro, "sed mi volis substreki la fakton ke libereco estis unu rajto, kaj ke ĉiu ajn peno por reakiri ĉi liberecon estis devo ... La Prezidento devas preni sur sin plenan responson".

Fakte, ni estis decidĝintaj asimili ĉiujn lecionojn el tiu fiasko. Estis klare ke en la operaco en Urrao estis mankoj en la agadkapablo de la Armitaj Fortoj kaj de la informiĝfako, kaj necesis ripari ilin kiel eble plej baldaŭ. Tio estis nia unua celo dum la sekvintaj jaroj.

Ni komencis saniĝi. La tuta Kolombio sciis nun ke nia registaro ne estis cedonta al timigado aŭ tragedio. La atakoj fare de la FARK aŭ aliaj violentuloj nur plifortigos nin. Speciale, la estroj de niaj Armitaj Fortoj sciis ke sia prezidento kaj sia Nacio restus firme malantaŭ ili, eĉ dum la plej mallumaj horoj. Poste, la generaloj diris ke la konfido kaj la solidareco kiujn ili sentis dum tiu tragika tago de 2003 estis fundamentaj por multaj el la venkoj atingitaj.

La ekzemplo de la murditaj ostaĝoj inspiris ne nur kolombianojn, sed ankaŭ multajn homojn tra la mondo. Grupo de Usonaj pacifistoj kandidatigis sinjoron Guillermo Gaviria Correa — postmorte— por la Nobel-premio pri paco, kaj libro de leteroj kiun li skribis dum sia ostaĝeco estis eldonita en la angla kaj la hispana.

En la sekvintaj jaroj ni decidis honori lian memoron kaj tiujn de kiuj estis mortigitaj kun li, en la maniero kiel plej bone ni sciis fari.

15

Dum kvin jaroj ni senlace persekutadis lin: Aicardo de Jesús Rodríguez Agudelo, alinomita "El Paisa", en pluraj okazoj ni estis tre proksimaj trovi lin, tamen "El Paisa", ruza kanajlo, eskapis lastmomente. Tiuj fiaskoj demoralizis centojn da membroj de la informiĝfako kaj de la militistaro persekutantaj lin. Tamen, justeco ne estis al ni neata —almenaŭ ne en tiu ĉi kazo—. Laŭ tio kion diras populara proverbo, kiun mia patrino ofte citis: "Persisto gajnas tion kion sorto ne renkontas".

Ni persistis. Kaj la inklino de "El Paisa" por amoristinoj fariĝis lia ruiniĝo. Parolinte kun iamaj aktivuloj de la FARK —kiuj akceptis nian proponon por sia resocianiĝo kun la kondiĉo plene kunlabori kun niaj publiksekuriga agentaro— la informiĝfako koncentriĝis sur tiun malforton lian. La informoj ebligis al ni konstrui psikologian portreton pri "El Paisa": ilia ĉiutaga rutino, iliaj emoj, malsanoj kaj kunlaborantoj, kaj la amoristinoj kiujn, fine de ĉiu monato, li portigis el Medegino al sia tendaro.

En marto de 2008, la Informiĝada Agentejo de la Nacia Polico de Kolombio (DIPOL) sukcesis enŝovi agenton en la reton kiu provizis varojn —kaj virinoj— al la sekreta tendaro de "El Paisa", lokita proksime de la rivero Murri. Tra la tempo, la agento gajnis la konfidon de la amoristino preferata de la krimulo kaj ŝi raportis ĉiujn detalojn pri la tendaro. La DIPOL povis tiam lokalizi, uzante Tergloban Pozician Sistemon¹ —teknologio kiun ni ne havis en 2003 —, ĝiajn koordinatojn kaj ĉirkaŭaĵojn.

En aŭgusto, la agento de DIPOL konvinkis la amoristinojn pri porti lin al ŝia kutima kunvenejo kun "El Paisa": domo aparta el la tendaro. En pluraj sinsekvaj vizitoj, nia agento kaŝiĝis en la arboj malantaŭ la domo, kelkfoje nur cent metrojn for, kaj inspektis la areon dum li atendis la eliron de la junulino, kion ŝi faris kutime en la fruaj matenaj horoj.

La 21-an de septembro 2008 ni lernis ke "El Paisa" estis en la domo kun la amoristino, la DIPOL, en asocio kun la Komandantaro de Specialaj Operacoj kaj la Kolombia Aera Forto, decidis agi en tiu

1 [NT Tutmonda Loktrova Sistemo, plej konata per la anglalingvaj komencliteroj: GPS](#)

nokto. Preciza bombo falis sur la domon baldaŭ post la eliro de la virino. "El Paisa" ne estis kaŭzonta plian suferon al Kolombio.

Ni havis direktivon en la registaro: se la novaĵo estis malbona, mi mem diskonigis ĝin per televido; se ĝi estis bona, mi preskaŭ ĉiam petis la ministrojn, generalojn aŭ aliajn kunlaborantojn ke ili diskonigu ĝin. Tiun tagon, la taskito estis la ministro pri Defendado, Juan Manuel Santos. Kun korfaciliĝo la lando eksciis, ke "El Paisa" estis finita.

La morto de tiu ĉi krimulo kronis jaron de katastrofoj sinsekvaj kaj ruinigaj por la FARK kaj aliaj kontraŭleĝaj armitaj grupoj: En 2008 pli ol unu miliono da kolombianoj elmarŝis en la stratojn por postuli finon al la terorismaj agadoj de la FARK, pluraj el la plej gravaj gvidantoj de tiu grupo estis alportitaj al la justico kaj sukcesa milita operaco permesis al ni elliberigi, kun eĉ ne unu guto da sango verŝita, plurajn ostaĝoj kiuj restis multaj jaroj kidnapitaj en la ĝangalo.

Kiam nia mandato finiĝis, la ĉiujaraj kidnapoj en Kolombio estis reduktitaj el super 3.000 al 282. Ili ankoraŭ estis multaj, tamen okazis 90 procenta malkresko. La indico de murdoj duoniĝis kaj la mortigoj de senkulpaj civiluloj —inkluzive sindikataj gvidantoj kaj ĵurnalistoj— falis akre.

En ekonomia flanko, investantoj haste revenis al pli sekura Kolombio, ni duobligis nian averaĝan indicon de kresko de la Malneta Enlanda Produkto atinginte indicojn de preskaŭ sep procentoj. La investoj el eksterlando duobligis kaj la eksporto triobligis. Ni negocis pri novaj komercaj interkonsentoj kun Usono, Centrameriko, Kanado, Eŭropa Unio, Merkosudo, Ĉinio, Barato kaj aliaj landoj. Turismo plivigliĝis, kaj nia bela lando altiris, fine, tiun pozitivan atenton ĉiame meritita, apogita de nova kampanjo de reklamado por internaciaj vizitantoj: "Kolombio: la sola risiko estas ke vi volos resti".

La historio pri kiamaniere ni atingis ĉion ĉi estas longa kaj kompleksa kaj inkluzivas la oferon de multaj bonaj homoj.

Ĝi komenciĝas en toreejo.

DUA PARTO

Kuraĝo

“La kuraĝo estas taksata prave kiel la unua el la homaj valoroj
ĉar ĝi estas la valoro kiu garantias ĉiujn ceterajn.”

WINSTON CHURCHILL

1

—Álvaro!

Mi rigardis la homamason kaj vidis mian patron.

—Firma, Álvaro!

Mi estis genuante sur la sablo. Mi atendis la aperon de la taŭro. Estis iom da sensaciemo kaj spektaklo cele impresi la amason kaj eble timigi iomete la beston. En toreado, tiu ĉi manovro —movado konsiderata aparte bela kaj danĝera— estas konata kiel *farolo*¹ *genuante*: dum la kornoj de la besto pasas tre proksime al la vizaĝo kaj kolo de la toreanto, ĉi tiu svingas la mantelon antaŭ la kapo de la taŭro.

La pordo malfermiĝis kaj la taŭro eliris rapide. Tamen li ne venis al mi, deturniĝis al flanko de la areno.

Restu genuante, Álvaro! —Mia patro kriegis super la bruon de la amaso—, Restu tie!

Dum la paso de la jaroj mi pensis sufiĉe ofte pri tiu tago, pri tiu momento inter mia patro kaj mi, kaj pri la signifo kiun ĝi povis havi. Eble estis nur fanfaronajo. Eble estis kazo de patra supereco senbrida. Sed mi ĉiam pensis ke malantaŭ ĝi estis io multe pli granda kaj grava.

Mia patro ĉiam klopodis prepari min por vivo tia kia min atendis. Samkiel multaj personoj de lia generacio, li sciis ke la danĝero estis parto de la ĉiutaga vivo en Kolombio, ke ĝi estis konstanta, unu elemento kiun oni devas preni en konsideron samkiel pluvon, varmon aŭ malsaton. Li pensis ke ĝi estis io kion oni povas venki: aŭ farante alĝustigojn laŭnecese, aŭ retirigante por provi alian tagon. Sed neniam permesi ke la danĝero poltronigu onin.

Facile direbla, sed malfacile farebla. En danĝeraj situacioj la emocioj ŝajnas neregeblaj. Kaj eble tia stato estas tiu natura. Estas verŝajne ke iuj homoj havas iun denaskan kapablon por ignori aŭ subpremi siajn sentojn, por rigardi la morton de proksime kaj ne

1 [NT Proponita de Fernando De Diego por la hispanlingva nomo "farol" kiel uzita en toreado.](#)

timi, sed mia sperto sugestas alie. Dum mia infanaĝo mi devis fari provizon de kuraĝo antaŭ la novaĵoj pri la violento kiu skurgis la najbarojn kaj minacis nian hejmon; kiam teroristoj eksplodigis bombon kiu detruis mian ĉambron, mi ekestis en stato de ŝoko kaj momente mi ne povis moviĝi. Kiel departementestro, kaj kun iom pli da kuraĝo, mi uzis armilon por helpi al kelkaj amikoj eskapi embuskojn. Multaj estis la spertoj kiujn mi devis akumuli por lerni regi miajn emociojn kaj direkti ilin al konstruaj celoj.

Mi ne parolis publike pri multaj el la epizodoj kiujn mi rakontos kaj eĉ mia familio ne konas iujn el ili. Mi neniam sentis la bezonon dramigi aŭ glori la okazaĵojn de mia vivo kaj iuj el ili estas tro doloraj por ilin rakonti pli ol unufoje. Se tion mi faras nun estas ĉar tio povas helpi klarigi, kiu mi estas kaj kial mi regis en la maniero kiel mi faris en Kolombio. Eble tiuj okazaĵoj povas montri manieron, malperfekta, por tiuj homoj kiuj alfrontas similajn defiojn.

Mi suspektas, ke tiutage, en la toreejo, mia patro instruis min la manieron kiel alfronti minacon: rikani, rigardi ĝiajn okulojn kaj palpebrumi, spite ke mia koro batas forte. Mi restis sur miaj genuoj, turnis min al la taŭro kiu iris ĉirkaŭe kaj, fine li rigardis min. Li stamfis forte, preta impeti kontraŭ mi kaj la farolo efikis. Ĉar —kiel mia patro diris— ekzistas nur du manieroj dignaj de eliri el toreejo: aŭ en ĉerko al la tombejo aŭ sur la ŝultroj de la homamaso. En ĉi tia vivo ne ekzistas meza vojo.

2

Ĝis kiam atingas mia rememoro, mi ĉiam pensis ke en la kerno de Kolombio loĝas paradokso: unuflanke ĝi suferas pro la malbonoj kaj afliktoj, kiujn mi menciadis, aliflanke, ĝi estas lando kun preskaŭ nekredebla kapablo por la bono, kie ridado ŝajnas pli forta, la manĝaĵo gustumas pli bone kaj la suno havas specialan brilon. Lerni kunakordigi ambaŭ mondojn estis, dum la plimulto de nia historio, la esenco mem de esti kolombiano.

La plej neforviŝebla konkretigo de la Kolombio mirinda estis ĉiam, por mi, la idilia bieno de miaj gepatroj en Antjokio, la loko kie mi pasigis miajn fruajn jarojn. Ĉiutage mi ellitiĝis frue por helpi kun la taskoj de la bieno. Mi deprenis de mi la malvarmon per matenmanĝo kun maizpano kaj varma kafo aŭ ĉokolado kaj kuris al la stalo. Ni melkis la bovinojn kaj poste ni selis la ĉevalojn. Ni rajdis tra la bieno, fiŝis kaj naĝis en la riveroj, dum ni spiris ĉe la verda splendo de la kampara Antjokio.

Kelkfoje ni helpis kolekti kaj prilabori la kafon, malfacila laboro, precipe kiam oni estas ankoraŭ infano. Mia patro estis multe pli severa kun ni, ol kun la laboristoj kiuj vivis en la bieno. Ni ĉiam devis fari nian laboron bone kaj ĝustatempe.

— Kio okazas al ĉi tiu ĉevalino? —Li nin demandis.

— Ŝi havas problemon en genuo.

— Ĉu vi ŝmiris per kuraca kremo ŝin?

— Jes, sinjoro.

— Ĉu vi faris tion hodiaŭ?

Kaj, kiel plej malfrue, unu horon poste li revenis por kontroli, ke ni faris tion.

Tia konstanta akompano, tia fervoro por la plenumo de la taskoj kaj la kontrolado por certigi la rezultojn, estis nepraĵo por sukcese direkti bienon de tiaj komplekseco kaj grando. Kun kelkcent laboristoj okupiĝintaj pri la kultivaĵoj de sukerkano kaj kafo aŭ pri la brutaro, necesis —mia patro diris— "konstante kontroli ĉiun detalon, labori flanke de la dungitoj kaj koni la metion pli bone ol ili". Kaj ni devis doni ekzemplon fariĝante bonaj teamanoj kaj

restante garde dudek kvar horojn tage, sep tagojn semajne. Iam ajn povis naskiĝi ĉevalino aŭ bovino eliri eksteren de la bieno; unu eraro kaj la rikoltoj povus damaĝiĝi, aŭ besto fariĝi lama por ĉiam. Ĉio povus perdiĝi tro facile.

Ne ĉiuj homoj estas faritaj por tiu speco de laboro, sed mi amis ĝin. Mi sentis min en paradizo. Mi laboris kun mia familio kaj dediĉiĝis entuziasme al ĉiuj taskoj; mi kunformis teamon kun personoj venintaj el multaj regionoj kaj, fine de la tago, mi vidis la fruktojn (kelkfoje laŭvorte) de mia laboro. Ĝojigis min povi helpi en la administrado de produktiva sistemo granda kaj kompleksa, kaj scii ke mi tion faris bone. Ĉi tiu stadio de mia vivo estis fundamenta por la formado de tio kio mi estas.

La bieno situis proksime de la urbeto Salgar, naŭdek sep kilometrojn for de Medeĝino. En la kvindekaj jaroj de la lastpasinta jarcento, la malbonaj ŝoseoj kaj manka transporto faris el la vilaĝo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo izolitan angulon en la sudokcidento de Antjokio, kun kampara vivo centjaraĝa. Tri tagojn semajne, kiam mi estis fininta la devojn de la bieno —tiam la suno estis ĉe ĝia zenito— mi rajdis kun mia frato al la *Integrata Kampara Lernejo de La Liborina* kie la infanoj kaj la infaninoj ĉeestis en alternaj tagoj. Mia unua instruistino, Lilian Álvarez, apenaŭ estis adoleskaĝa, kiam mi eniris la infanĝardenon (kvar jardekojn poste, fiere mi ricevis la helpon kiun ŝi donis al mi dum mia unua porprezidenta kampanjo).

María Izquierdo rakontas, en biografio kiun ŝi verkis pri mi, ke rajdante ĉevalon mi akompanadis fraŭlinon Lilian al Salgar, kie ŝi ricevis sian salajron. Oni ne deva pensi, tamen, ke mi ĉiam kondutis kiel perfekta kampara ĝentlemano, kompreneble ne! Mi havis tiam —kaj ankoraŭ mi havas— bedaŭrindan tendencon al eksplodoj de malbonhumoro. Mi foje kriis kaj ofte pelis min senkaŭza. Por provi direkti tiun energion en konstrupova maniero kaj laŭ indiko de miaj gepatroj, naĝis mi ĉiutage 1500 metrojn en la naĝejo. Tra la jaroj mi praktikis, inter aliaj teknikoj, Nidran Jogon, bicikladon kaj trinkadon de homeopatiaj gutoj, kun miksitaj rezultoj.

Alia zorgo estis mia mallonga staturo: "Tiu knabo neniam kreskos", diris unu el miaj onkloj, "ĉar li ne manĝas sanajn aĵojn kiel fazeola supo. La sola aĵo kiun li ŝatas estas la dolĉaĵojn" (anekdoto kiun ankaŭ María Izquierdo havas en sia libro). Kaj fakte, mi neniam estis tiel granda kaj forta kiel kelkaj el miaj familianoj kaj amikoj. Eĉ nuntempe, ofte multaj homoj estas surprizitaj, ĵus

koninte min, pro mia alteco, kaj mi gardas sekretan kaŝejon kun ĉokoladaĵoj.

Al tiu tempo ŝuldas mi ankaŭ mian amon por la legado, enplantita far mia patrino, Laura Vélez. En 1950, kaj elektita kiel la plej bona studanto, ŝi abiturientiĝis en la *Gimnazio de la Monaĥinoj de la Prezento de Sankta Maria*. Ŝi decidis ne studi en universitato por edziniĝi kun mia patro kaj komenci eduki gefilojn (ili aĝis nur dudek jarojn kiam mi naskiĝis). Tia decido, tipa de la epoko, povus esti malhelpanta ŝian intelektan evoluon, sed Laura Vélez ne estis virino facile deadmonebla kaj ŝi trovis aliajn vojojn por daŭrigi sian edukadon. Tra la jaroj ŝi akiris escepte riĉan kaj heterogenan bibliotekon pri historio, filozofio kaj literaturo, reflektajo de ŝia moderna kaj egaleca mond-rigardo.

Laura Vélez estis virino de konvinkoj enradikiĝintaj: ŝi asertis ke ĉiu homo havis la rajton elekti sian destinon, sendepende de klaso, raso aŭ sekso, kaj ke demokratio estas la sola vojo de virta regado. Ŝi estis preta batali pro siaj kredoj: ŝi partoprenis aktive en la nacia referendumo de 1957 kiu, inter aliaj reformoj, donis al la virinoj egalajn politikajn rajtojn, inkluzive la rajton voĉdoni. Mi rememoras, ke nur kvin-jaraĝa mi kaj ŝi marŝis man-en-mane dum ŝi trairis la vilaĝon por konvinki la homojn pri la neceso voĉdoni "jes". Kiam ŝia sinteno venkis, ŝi diris: "Jam delonge farendis". Ŝi pravis: en Latinameriko nur Paragvajo malfruiĝis pli ol Kolombio por adopti virinan balotrajton. Gajninte la batalon, mia patrino partoprenis en la unua grupo de kolombiaj virinoj kiuj okupis postenojn pro popola elekto: ŝi eniris la Muncipalan Magistraton de Salgar kiel membro de la Liberala Partio kaj ŝi estis ĝia prezidanto baldaŭ poste. Ankaŭ ŝia pli-aĝa fratino, Cecilia Vélez, estis elektita legdonanto de la Konservativa Partio. Tia demokratia spirito estis transdonita al la sekvanta generacio kvazaŭ religio: ili instruis nin trakti egale ĉiujn homojn kaj malmultaj ofendoj estis punitaj tiel rigore kiel snobeco aŭ elitismo.

Kontraste, la intelekta scivolo estis taksata kiel unu el la plej grandaj virtoj. Nia patra avino, kiun ni karesnomis "Jeja", ĉiam kuraĝigis nin demandi ĉion kion ni deziris kaj ame riproĉis tiujn kiuj ŝajnis elĉerpiĝi pro miaj konstantaj demandoj.

Tra la jaroj, mia patrino rimarkis kaj nutris la flamon de persistemo en sia plej aĝa filo. Rigardante min kvazaŭ generalo, ŝi stimulis en mi la deziron pliboniĝi ĉiutage kaj legi la verkojn de grandaj gvidantoj: Rafael Uribe Uribe, Simón Bolívar, Abraham

Lincoln, Winston Churchill, Alfonso López Pumarejo kaj Alberto Lleras Camargo, inter aliaj. Mi eĉ parkerigis plurajn el ties paroladoj kaj ilin recitis dum horoj. Mi ne havas do, kiel iuj pensas, fotografan memoron, sed ja longan trejnadon kio permesis al mi parkerigi longajn paroladojn kaj la poemojn kiujn preferis mia patrino.

Meze de la pasinta jarcento, en kamparaj regionoj de Kolombio, la libroj estis unu el la malmultaj valoraj fenestroj al la ekstera mondo. Alia fenestro estis la radio. Nia ricevilo restis en la salono. Ĝi estis enorma kaj markita Phillips. Mi ankoraŭ rememoras mian patrinon grimpantan sur arbo por pendigi la antenon de la plej alta punkto kiu eblis, en vana provo plibonigi la signalan kvaliton. Nur eblis agordi malmultajn kolombiajn staciojn kaj du internaciajn: La Voĉo de Ameriko kaj Radio Havano, la Castro-isma radiostacio. Du kontraŭaj vidpunktoj kiuj baldaŭ estis kaŭzontaj kaoson en Kolombio. Tiutempe mi ne povis imagi ke jardekojn poste mi starigis kun Fidel Castro rilaton grandparte sekretan kaj iom surprizan.

3

La novaĵoj komencis diskoniĝi de buŝo al buŝo, kaj ili estis teruraj: bruligitaj domoj, sturmoj ĉe la ŝoseoj, terenoj forprenitaj far traigrantaj gerilarmeoj. Neniu troviĝis ekster danĝero. Kaj la perforto venis al mia familio. Mia patrino avo, Martin Vélez, kaj pluraj el liaj gefratoj estis devigitaj forlasi sian hejmon. Kvankam mi ne estis plene konscia pri tiuj okazaĵoj, iel mi perceptis ilin: la unua bildo, kiun mi povas rememori el mia infanaĝo estas tiu de mia patrino fikse rigardanta el la enirpordo de la domo, atenta al la danĝeroj kiuj gvasis ekstere.

Povas esti neeble diri kiam ĝuste la mortigoj komenciĝis. Laŭlonge de la historio de Kolombio ĉiu epizodo de sangoverŝo ŝajnas daŭrigo de la antaŭa. "La Violento" —intercivitana milito okazinta en la kvardekaj kaj kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento— estis, en multaj aspektoj, produkto de la politikaj streĉiĝoj devenintaj de la Milita Milito, kiu falĉis la vivojn de 100.000 kolombianoj inter 1899 kaj 1902; kaj tiu ĉi, siavice, eĥo la multaj intercivitanaĵoj kiuj ruinigis la landon laŭlonge de la deknaŭa jarcento.

Ĉi tiu senelira sinsekvo de konfliktoj havis por Kolombio terurajn konsekvencojn ekonomiajn kaj sociajn, kaj estas unu el la decidaj trajtoj kiuj difinas ĝin ekde la momento de ĝia sendependiĝo. En 1890, la amerika vojaĝanto Frank Vincent, traivinte la landon, skribis: "La humoro de la tuta nacio ŝajnas direktita al la civitana malakordo kaj al la gerilmilitoj. Sekve, dum la homoj plendas pri la malriĉeco, ili ofertas tiel malmultan garantion kaj sekurecon al la vivo kaj al la fremda kapitalo ke ili ne kapablas certigi la ĉeeston kaj la helpon de unu el la du". Unu jarcenton poste liaj vortoj daŭras veraj.

Ĉe la komenco, la problemoj estis ne nur de Kolombio: en la deknaŭa jarcento multaj aliaj latinamerikaj landoj ankaŭ plonĝis en la anarkion kaj la intercivitanan militon post la atingo de siaj sendependecoj el Hispanio kaj Portugalio. Tamen, dum la pasado de la dudeka jarcento, la plimulto el niaj najbaroj —inter ili Argentino, Brazilo kaj Meksiko— sukcesis restarigi, en signifa mezuro, la superregon de la leĝo. Kolombio ne atingis tion. Kial? Dum la ducent jaroj de respublika vivado, Kolombio alfrontis du defiojn

kiuj, intime rilatiĝintaj, plurfoje estis la kaŭzo de nia perdiĝo: 1) Ĝia malfacila geografiaĵaro; 2) La historia nekapablo aŭ rifuzo de la registaroj projekti sufiĉan aŭtoritaton en ĉiujn regionojn de la lando.

Kolombio estas granda lando. Kun areo de 1,15 milionoj da kvadrataj kilometroj, proksimume dufoje la granda de Teksaso, kaj preskaŭ la sama de Francio, Hispanio kaj Portugalio kombinitaj, ĝia loĝantaro estis historie unu el la plej dissemataj de Latinameriko. Kontraŭe al tio kio okazas en multaj landoj de la regiono, kies loĝantaroj koncentriĝas en unu granda urbo, en Kolombio la loĝantoj estas distribuitaj pli-malpli similkvante, en granda nombro de vilaĝoj kaj urboj kiel Bogoto, Medeĝino, Kalio, Kartageno¹ kaj Barranquilla. Bogoto, la ĉefurbo, situanta 2600 metrojn super marnivelo sur bela altebenaĵo de la Andoj, estas disigita de aliaj urboj per ondiĝoj de la montoĉenoj kaj distancoj kiujn la tereno igas enormaj. La samo okazas rilate al aliaj urboj, apartigitaj per altaj montoj, akvejoj kaj aliaj obstakloj. En la epoko de Frank Vincent, vojaĝi de Bogoto al alia loko de Kolombio implicis penigan vojaĝon dum pluraj tagoj rajde sur mulo, tra montoj, meze de ekstrema varmo, voremaj insektoj kaj violento. Kaj, valora ekzemplo, eĉ hodiaŭ, kun modernaj ŝoseoj, la vojaĝo de Bogoto al Medeĝino povas daŭri eĉ ok horojn. Tiu ĉi geografia aranĝiĝo efikis, ĝis tre progresinta la dudeka jarcento, sur la malgranda influo de la centra registaro super la regionoj.

Al ĉi tio antaŭa devas esti adiciita la fakto ke dum multaj jaroj la regantaj klasoj de Kolombio gastigis profundan malŝaton pri la centralizo de la potenco; malŝato kies origino datiĝas ekde la tagoj de la hispana reĝado, por kiu estis preskaŭ neeble kontroli la plenumon kiun al siaj ordonoj donis la vicreĝoj en la transmaraj kolonioj. Post la sendependiĝo, la lokaj potenculoj sentis sin komfortaj kun la *status quo*, kaj faris ĉion kion ili povis por certigi sian restadon kaj por ke sia aŭtoritato ne suferu malpliigon. Niaj unuaj konstitucioj donis al la lando federalan regsistemon en kiu al la centra potenco estis donita malmulto kaj, kvankam kun la tempopaso la lando centralizis sian formon de reĝado, la Ŝtato neniam estis provizita per la rimedoj necesaj por apliki sian potencon super la tuta teritorio. Tiamaniere, kiam en la kvindekaj jaroj La Violento kaŭzadis detruon en Kolombio, la Armeo malhavis la buĝeton sufiĉan por ekipi ĉiujn siajn trupojn per uniformoj, kaj

1 NT Hispanlingve: "Cartagena", havenurbo en la norda marbordo de Kolombio.

havis municion por nur du tagoj de batalado. Siaflanke, la Aera Forto havis nur kvin aviadilojn en funkciado kaj ĝia plej nova municio estis de 1932.

Tia vakuo de registara potenco favoris, laŭlonge de nia historio, la kreskon de milicioj kaj armitaj frakcioj — armeoj kolektitaj far riĉaj homoj, aŭ vagantaj milicioj kiuj postulis terenojn kaj politikajn liberecojn— kiuj, preter la atingo de la centra registaro kaj sendistinge de siaj konsistoj, faris ĉiajn arbitraĵojn krimajn kaj ekonomiajn.

Fine de la kvardekaj jaroj, kaj same kiel okazis en la Militaga Milito, la lando estis profunde dividita pro la Liberala kaj Konservativa partioj. Laŭ kelkaj historiistoj tiutempaj, la ideologio de la unua estis karakterizita de tendenco al forta federala registaro, kaj la dua de ĝia apogo al la principoj de la ordo. Tamen, ne estis la ideologio tio kio igis la kolombianojn aliĝi al unu partio aŭ la alia, ĝi estis la deziro por protekto de la malamikoj, aŭ la venĝo. Kiel ofte okazas en ĉi tiuj kazoj, la aparteno al unu partio fariĝis denaska rajto, kvazaŭreligia afero; kaj la violento estis transdonita de unu generacio al alia, pliseriozigitata pro la malaltaj niveloj de edukado kaj de ekonomia disvolvigo.

En 1948 estis murdita Jorge Eliécer Gaitán, kandidato por prezidento de la Liberala Partio. Lia morto ellasis popolan insurekcion kiu bruligis ministrejojn, magazenojn kaj ĵurnalajn entreprenojn de la ĉefurbo. La okazaĵo —konata en kolombia historio kiel "El Bogotazo"— pliintensigis kaj disvastigis la violenton tra la tuta lando. Eĉ ne estis pardonitaj la izolitaj kamparaj areoj, speciale tiuj kie estis bonaj kultivgrundoj kaj aliaj rimedoj pro kiuj batali. Oni taksas, ke en Antjokio —departemento kie mi naskiĝis, en 1952— estis mortigitaj dum la jardeko 26.000 homoj. Ĉefartikolo en la ĵurnalo *El Colombiano* el Medegino, publikigita du monatojn post mia naskiĝo, diris: "Ni estas en rado kiu giras violence, kie la hodiaŭaj viktimoj fariĝas la morgaŭaj mortigantoj. [...] Ĉiu viktimo nutriĝas per la ideo de reprezalio, pro tio ekzistos sufiĉa malamo en Kolombio dum la venontaj 150 jaroj".

Niaj gepatroj faris ĉion kio estis en sia kapablo cele protekti nin. Tamen, la violento avancis kaj, ĉu vi serĉis ĝin, ĉu vi ne serĉis ĝin, finfine ĝi trovis vin. Unu vesperon —mi aĝis tiam kvin aŭ ses jarojn — pli ol 300 liberalismaj gerilistoj alvenis al la bieno postulante manĝaĵojn kaj ŝirmejon. Mi memoras ilin tre bone: viroj malpuraj kaj maltrankvilaj, kun ĉapeloj kaj ledaj rajdkulotoj, kiuj ridegis el la alto de siaj kreolaj ĉevaloj. Ili estis gvidataj far la fama kapitano

Franko¹, karismohava viro kiu baldaŭ post la murdo de Gaitán estis enirinta en politikon; li pasigis iom da tempo en malliberejo kaj post sia eliro fondis grupon de armita rezisto. Lia bazo de aktivado estis ĉe la najbaraĵo de Urrao, la sama konflikta areo kie duonjarcenton poste la departementestro Guillermo Gaviria kaj la eksa ministro Gilberto Echeverri estos trovinta la morton far la manoj de la FARK.

Mi vidis, kiel mia patrino —engaĝiginta virino kaj kun komenciĝanta politika kariero dank' al siaj propraj meritoj— kuiris por tiuj viroj, kaj kiel mia patro —fiera kaj demokratiema viro— parolis kun tiuj armitaj banditoj. Kaj kvankam la intencoj de la viroj de la kapitano Franko estis relative pacaj (la "Nacia Fronto", tiu politika solvo kiu metus portempan finon al tiu ĉapitro de la kolombia violento, estis tre proksima), mi rememoras ke mi sopiris, en la plej pura kaj elementa nivelo, vivi en ia Kolombio kie neniam armitaj homoj invadus nian bienon, kie mia familio estus sekura kaj kie neniu devus enfermiĝi interne de sia domo, timigita rigardante tra la fendo de la pordo.

1 [NT Temas pri "Juan de Jesús Franco", ĉefo de tiama liberalisma gerilistaro.](#)

4

Kelkaj homoj estis surprizataj kiam, en 2005, mi faris detalan kaj sinceran paroladon pri la patro de Komunisma Ĉinio, dum mi ricevis honoran doktorecon de la Universitato de Pekino.

Mi abomenas la serion de murdoj kaŭzitaj far la regado de Mao, kaj mi malkonsentas kun lia ekonomia administrado. Tamen tiun tagon en Pekino mi parolis pri lia marksisma filozofio tralasanta, iugrade, la evoluadon; kio kontrastas kun la doktrinoj feraj kaj senestontecaj de Lenin kaj Stalin. Mi parolis pri Mao la verkisto por reliefigi la klarecon kaj pragmatismon de liaj tezoj —sendepende de la juĝo kian ni faras pri ili— kaj ĝia distanco de ambaŭ: tiom de la leninisma idealo pri la malapero de la ŝtato kiom de ĝia malo, la stalinisma neado de la individuo favore al ĉiopova ŝtato. Mi ripetis mian interpreton pri la specialaĵoj de la ĉina modelo de Mao kiu donis al liaj posteuloj amplekson por adaptiĝi al la tutmondaj eventojn kaj kiu ebligis al Deng Xiaoping deklari ke "esti riĉa estas gloro" kaj entrepreni la porkapitalismajn reformojn kiuj transformis Ĉinion en la ekonomian giganton kian ni konas hodiaŭ.

Mi komprenas la surprizon kiun kaŭzis mi, la viro kiu por multaj reprezentas la "malmolan", "ultra-konservativan" linion, la "Jankia dogo", parolis pri prezidento Mao kaj ricevis grandan ovacion far grupo de komunismaj studentoj en la koro de la ruĝa Ĉinio. Tio ne estas tiom stranga, tamen, konsiderante ke mi estis studento dum la sepdekaj jaroj de la lasta jarcento, kiam la radikala marksisma-leninisma maldekstrismo pretendis teni la monopolon de la pravo en la ŝtataj universitatoj de Kolombio. Marx, Lenin kaj Mao estis studataj, samkiel briluloj de la internacia maldekstrismo kiel Marta Harnecker, Louis Althusser kaj Nicos Poulantzas. Kaj ĉiujn mi legis detale dum mi studis leĝon en la Universitato de Antjokio.

Tie estis, sendube, fekunda grundo: multaj el miaj kunuloj kredis —allogitaj grandparte far la novaj maldekstrismaj armitaj grupoj, inter ĉi tiuj la FARK— ke la universitato estis la loko el kiu ŝprucus la nepra komunisma ribelo. Dum la unuaj sepdekaj jaroj, multaj klasĉambroj estis forumo de paroladoj instigantaj al perforto kaj al malamo inter sociaj klasoj. La studentaj strikoj kaj okupacioj por proklami la baldaŭan revolucion estis aferoj preskaŭ ĉiutagaj kaj la universitato restis pli da tempo fermita ol malfermita. Multaj

studentoj estis konvinkitaj, ke la mondo iris nedeturneble al komunismo kaj ke la sola ebla debato estis kiu el ĉiuj modeloj estis la plej bona: ĉu la sovetia, ĉu la ĉinia, ĉu la kolektivismo de Ho Chi Minh aŭ ĉu la permanenta revolucio de Fidel Castro?

Miaj ideoj estis radikale malsamaj. Mi ĉiam kredis fervore pri demokratio kaj la superrego de la leĝo. Ankaŭ pri la rajto ricevi instruadon kiu estu libera de ĉesigo aŭ minaco pro perforto. Mi ĝuis studante la verkojn "renversemajn" de "revoluciuloj" kiel Platono kaj Aristotelo, kio estis la kolombia ekvivalento de marŝi tra la kampuso en Berkeley de la Universitato de Kalifornio surportante butonon de la kampanjo Nixon'72. Ja, miaj vidpunktoj estis nepopularaj kaj malmulte allogaj, krome, ili estis eĉ iom endanĝerigaj. Kaj dum kelka tempo ŝajnis ke mi estis ĉe la erara flanko de la historio.

Fakte, Kolombio iris de La Violento al la kresko de la armita maldekstrismo. Ne ekzistis reala intertempo de paco. Efektive, multaj el la partoprenintoj de la unua estis la samaj de la dua: dum la kvindekaj jaroj, Pedro Antonio Marin Marin —konata per la batalnomo Manuel Marulanda, alinomita "Tirofijo"¹— komencis sian vivon en la armita batalado kiel membro de liberala milicio kiu operacis en kamparaj areoj; poste li estis sub la influo de la Komunisma Partio kaj atingis fariĝi la supera komandanto de la FARK, grupo kiu havis sian originon, ankaŭ, en kamparaj batalantaroj de memdefendo, kreitaj dum "La Violento". Tiu transformiĝo ne okazos hazarde: la revolucio de 1959 en Kubo havis signifan resonon en la internacia radikala maldekstrismo kaj gvidis multajn homojn kredi ke la ekzemplo de Fidel Castro povus esti eksportata al la tuta regiono: Bolivio kaj Kolombio estis la elektita scenejo por efektiviĝi la revolucion en Sudameriko.

Nia lando estis "alloga" pro tri ĉefaj kialoj: 1) La milicioj jam tiam ekzistantaj povus esti facile varbitaj aŭ asimilitaj al la marksisma afero (tion konfirmis la ekzemplo de Marulanda); 2) Ni havis unu el la plej daŭraj tradicioj de demokratia regado en la regiono, kio permesus ke la maldekstrismo agadu sen ŝtata subpremo kaj, 3) la grandega breĉo inter riĉuloj kaj malriĉuloj, ekzistanta en Kolombio, estis preparita grundo por la nocio de "klasbatalo", per kiu oni atingus gajni la simpatian de la sindikatistoj, grupoj de studentoj, movadoj de kamparanoj kaj aliaj.

1 NT Alinomo, elparolata "tirofiño", kies signifo estas "trafa pafo".

Etan aŭ neniun koron havas tiu kiu ne suferas rigardante la vivkondiĉojn kaŭzitaĵ de maljusta ekonomia malegaleco. Mi konsciis ekde mia infanaĝo, en la bieno de Antjokio, ke la plimulto el la kolombianoj ne ĝuis la samajn avantaĝojn kiujn havis mia familio (koncerne edukadon, kapitalon kaj posedaĵojn). Poste mi komencis vojaĝi al la departemento Córdoba, ĉe la kariba marbordo, kaj mi vidis homojn vivantajn en dolorige primitivaj kondiĉoj kaj dormantajn en fosajoj aŭ flakoj el koto, protektitajn per kartonoj aŭ ladoj; mi ankaŭ vidis kvartalojn tutajn el loĝejaĉoj en la montoj de la periferio de Medeĝino kaj Bogoto, starigitaj far nur-vivtenaj terkulturistoj devigitaj forlasi iliajn terenojn dum la tumultoj de la kvindekaj jaroj. Mi lernis poste ke tia mizero kian mi vidis en miaj fruaj jaroj estis regiona tendenco: laŭ la Monda Banko, en 1950 Latinameriko havis la plej altan nivelon de neegaleco en la mondo. En la specifa kazo de Kolombio, ĉi tiu neegaleco pliiĝis ĝis la naŭdekaj jaroj. Kiam mi komencis mian universitatan studadon, en 1970, proksimume 75 procento el la kolombianoj loĝantaj en kamparaj areoj vivis en "absoluta malriĉeco" (laŭ ĝia difino, sen ebloj por nutri kaj vesti en adekvataj kieloj).

La maljusteco de tia situacio estis evidenta por mi. Kiel ankaŭ la fakto ke tiu ĉi heredaĵo de ekonomia subevoluo ne estis la rezulto de iu ideologio, sed la rezulto, en granda parto, el la ĥaoso kaj el la senindulga sangoverŝado kiujn Kolombio suferis laŭlonge de sia historio. Efektive, estas sendube ke la anarkio kaj la perforto malkuraĝigas publikajn kaj privatajn investojn, kio siavice influas en la nekapablo, flanke de la registaroj, por ampleksigi la etendon de bazaj servoj (inkludante: infrastrukturon kaj edukadon) kaj tiamaniere plibonigi la vivnivelon de la loĝantaro. La konkludo ŝajnis al mi, tiam, evidenta: se la perforto estis la ĉefa kaŭzo de malriĉeco kaj neegaleco, kiel povus ĝi esti la solvo?.

Alian aspekton mi taksis signifoplena: en Kubo, la fratoj Castro prenis la armilojn kontraŭ militan diktatorecon (poste ili establis sian propran), kaj la armitaj movadoj en Argentino, Peruo, Bolivio kaj aliaj latinamerikaj landoj ankaŭ batalis ofte kontraŭ nedemokratiaj reĝimoj. Ĉi tia ne estis la kazo en nia lando: Kolombio estis demokratio. Kun la escepto de kvar jaroj de militista regado dum La Violento, la kolombia demokratio estis konservata tra la tuta dudeka jarcento. Mi neniam forgesos la manieron kiel, dum mi estis kreskanta, miaj gepatroj bonvenigis eŭforie la revenon de la demokratiaj elektoj en 1958, signo pri ke la pleja malbono de "La Violento" venis al sia fino.

Tiu demokratia tradicio faris el Kolombio escepton en Latinameriko. Ĝi ankaŭ klarigas kial mi rifuzis, tiam samkiel nuntempe, konsideri la FARK, la NLA kaj aliajn kontraŭleĝajn grupojn kiel "insurekcianoj" aŭ "gerilistoj". Tio, kio en la latinamerika kunteksto sugestis virtan lukton kontraŭ subprema militistara reĝimo, ne aplikeblas al Kolombio, kie ĉi tiuj grupoj provas detru la demokration.

Estas vere, kiel iuj homoj argumentis tiam, ke la kolombia demokratio havis difektojn. La politika interkonsento kiu finis La Violenton garantiis periodon de dek ses jaroj dum kiuj Liberaluloj kaj Konservativuloj kundividis por si la potencon kaj alternis en la prezidenteco, fakto kiu lasis neglektita ĉiujn aliajn elektablecojn kaj pravigis —laŭ tiuj kiuj kredis tiele— la ekaperon de la FARK kaj aliaj grupoj kiuj celis socialisman reformon. Tamen neniu movado aŭ politika partio estis fakte malpermesita dum tiu periodo, kaj la asociigoj kun multmembraj grupoj estis respektataj. Unu ekzemplo pri tio estis la asociigo kiun faris la Komunista Partio de Kolombio kun la Liberala Revolucia Movado, alo de la Liberala Partio gvidata far Alfonso López Michelsen, kiu poste estis prezidento de Kolombio.

Ĉiuj tiuj ĉi kialoj malhelpis min kompreni kial miaj universitataj kunuloj ne provis batali por la reformoj kiujn ili volis ene de la ekzistanta sistemo. Eĉ hodiaŭ mi estas konvinkita ke ili povus esti atingintaj politikan influon, se ili estus serĉintaj ĝin: ili apartenis al la elito de la nacio, ĉu ili agnoskis tion aŭ ne. Dum la sepdekaj jaroj, nur proksimume kvin procentoj el la kolombianoj ĉeestis superajn studojn. Aliflanke, la ŝanĝo per demokratiaj rimedoj estis, sendube, pli bona vojo ol pliintensigi la armitan batalon. Vojo kies rezultojn ni jam konis.

Iun septembran matenon mi prenis la biciklon kaj iris al la universitato. Alveninte, mi trovis miajn kunulojn kolektiĝintaj ĉirkaŭ radioricevilo: Salvador Allende, la socialisma prezidento de Ĉilio demokratie elektita, estis parolante.

"Tre verŝajne tiu ĉi estas la lasta ŝanco por adresi min al vi", ni aŭdis ke Allende diris. Li tiam havigis detalojn pri la milita konspiro proksimiĝanta, kaj li fine diris: "Mi pagos per mia vivo la lojalecon de la popolo ... Vivu Ĉilio! Vivu la laboristoj!".

Kelkaj sekundoj da silento sekvis kaj subite ni aŭdis, kiamaniere la aviadiloj de la Aera Forto de Ĉilio bombardis la palacon de La Moneda. La novaĵo estis rapida: Allende estis mortinta kaj la fortoj

gvidataj de generalo Augusto Pinochet prenis la komandon de la regado.

Neretenebla plorado ŝprucis ĉe la studentoj. Allende estis heroo por la maldekstrismo de la tuta Latinameriko. Mi kunhavis ilian doloron. Mi ne akordis kun la politiko de Allende, sed mi kontraŭstaris ajnan formon de ĉesigo de la demokratio kaj de la popola volo fare de iu armita minoritato.

—Renversi demokratian registaron perforte estas ĉiam tragedio —mi diris mallaŭte—. Diktaturoj neniam estas longedaŭraj.

Kelkaj kunuloj akceptis mian kondolencon kaj brakumis min. Aliaj min rigardis furiozaj. Tio estis signo de alproksimiĝantaj problemoj.

5

Se la fakto kreski dum la apogeo de La Violento donis al mi perspektivon pri la lando malsaman al tia kian havis multaj el miaj studkunuloj, la travivaĵoj de miaj universitataj jaroj estis distancigontaj min eĉ pli for de la trairitaj vojoj.

Tiutempe mi havis unu el miaj unuaj spertoj pri entreprena kapitalismo (se tiel diri). Eduardo Navarro, José Roberto Arango — kiu dum mia prezidenteco estis fidinda konsilanto— kaj mi establis, en la nordsuda strato 70-a de Medeĝino, restoracion nomitan La Granda Banano. Mi ankoraŭ estis studento en la Universitato de Antjokio, sed ofte mi prenis tempon por servi klientojn. Nia insigna plado konsistis el frostigita banano kovrita per ĉokolado kaj arakidoj, el ĝi la nomo de la entrepreno. Ni havis glaciaĵojn de bonega kvalito kaj kremfromaĝon kiun ni aĉetis pogrande en la Agrikultura Fakto de la Nacia Universitato kaj al kiu ni ŝuldas grandan parton de nia sukceso. Mi ofte restis en la restoracio ĝis la unua horo frumatene, la horo de fermo, tiam mi iris hejmen, kaj je la kvara horo mi ellitiĝis por iri aĉeti lakton, maizpanojn kaj freŝajn bananojn. Mi lasis en La Granda Banano la provizajojn por la tago kaj je la sepa —horo kiam klasoj komenciĝis— mi estis en la universitato.

Eble por kelkaj kolombianoj la imagaĵo kiun ili havas pri mi ne kongruas kun tiu de la knabo kiu destinas grandan parton de sia tempo por ŝmiri kremfromaĝon sur bananoj kaj servi kiel kelnero ĝis preter noktomezo. Tiel okazis, kaj el tiu sperto mi konservas tre plaĉan memorajon: ne nur ĉar ĝi estis prospera negoco, sed ankaŭ ĉar ĝi estis malgranda fenestro al pli granda vero, kiun, tiutempe, multaj homoj konsideris herezo: kapitalismo funkciis. Dum la sep jaroj, en kiuj mi partoprenis en tiu negoco, La Granda Banano kreis laborpostenojn kaj donis bonajn profitojn.

Tamen, la marksisma—leninisma agitiĝon de la lastaj jaroj de la sepdeka jardeko ruinigis kompaniojn lukrajn kaj dungantajn. Mi estas atestinto pri tio: kune kun mia patro mi estis aĉetinta bienon en la nordoriento de Antjokio por produkti krud-sukerajn blokojn, loke nomitaj "panela". Ni ne domaĝi klopodojn por havigi al la laboristoj bonegajn laborkondiĉojn: justajn salajrojn, domojn, lernejon kaj aliajn konvenaĵojn. Ĉio disvolviĝis bone, tamen, fine de

la sepdekaj jaroj la produktiveco malpliĝis, ni komencis perdi monon kaj la laboristoj postulis salajran plialtigon neracian kaj sen proporcio al la salajroj en ajna parto de la lando. Ni lernis ke la FARK estis aktivaj en la areo kaj estis enfiltriginta en la sindikaton.

Teditaj de la konstanta laboro kaj la forta financa damaĝo, en junio 1979 ni prenis la decidon doni la entreprenon al la laboristoj. Ni sendis kelkajn el ili al la Ministerio pri Laboro por eltrovi kioma estis nia ŝuldo pro pensioj kaj estontaj salajroj. La respondo estis: ses milionoj da pesoj. La kompanio valoris dudek. Ni subskribis la transigon de proprieto en travidebla maniero kaj kun ĉiuj necesaj dokumentoj. En la manoj de la laboristoj ekestis donacaĵo de dek kvar milionoj da pesoj. Tamen, kun granda bedaŭro de nia flanko, la afero ne finiĝis tiam.

Mi ne kaŝas miajn vidpunktojn. Tio estas trajto de mia karaktero, kiu kun la pasado de la jaroj kaj la akumulita sperto fariĝas pli esprimema. Dum miaj jaroj kiel studento en la Universitato de Antjokio mi luktis por ke la lekcioj estu instruitaj ekster la universitatejo, sen interrompoj pro la konstantaj strikoj, por ke tiuj ni, kiuj volis antaŭeniri en nia instruado povu fari tion en relativa paco. Agante tiel, mi esprimis mian konvinkon pri la universitato kiel loko kie malsamaj opinioj estas tolerataj —kaj ne nur la leninisma dogmo tiutempa—; mian kredon pri demokratio, pri la individua libereco kaj pri la superrego de la leĝo. Kaj mi estis preta por defendi tiujn kredojn en paroladoj kaj kunvenoj.

Komence mi ricevis mokfajfadon en provo silentigi min. Sed kiam la fajfadoj malsukcesis, la minacoj komenciĝis. Parole kaj skribe. En la kafejo de la universitato, en mia hejmo aŭ en lokoj kiujn mi ofte vizitadis, mi ricevis, skribitajn sur ĉifitaj paperoj, notojn de la jena stilo:

Vi mortos, perfidulo!

Ni juĝis vin!

La ekzekuto estas proksima!

La situacio fariĝis maltrankviliga. Tamen la spertojn travivitaj donis valoron al miaj konvinkoj, kaj mi pretis defendi ilin. Do, kiam mi komencis ricevi minacojn de morto Mi rifuzis fari cedojn. Kaj ekde tiam mi vivis kun ili.

6

Iun matenon mi vidis tre allogan junan virinon kiu eliris el la universitato akompanita de amiko. Mirblindigite, mi ŝin sekvis tra kelkaj domblokoj, tamen, venkis mia deziro alproksimiĝi. Mi prezentis min kaj ŝi, surprizita, estis rezerviĝema. Mi provizis min per kuraĝo kaj demandis ŝian nomon.

—María Teresa —ŝi respondis.

—María Teresa, vi havas belegan nomon. Kie vi loĝas?

—En Sonsón.

Mi sentis surprizon. Sonsón estas municipo en Antjokio kaj, tiutempe, ĝi estis pli ol kvin horojn da vojaĝo for de Medeĝino. Tiam mi demandis:

—Kiel eblas ke vi povas ĉeesti klasojn en Medeĝino se vi loĝas tiel malproksime?

Ŝi hezitis momente.

—Mi vojaĝas ĉiutage —ŝi respondis.

Mi demandis min ĉu ŝi klopodis eviti min, tamen mi ne estis inklina rezigni. Per unu el ŝiaj amikoj mi ekhavis la nomon de ŝia patro kaj mi serĉis en la telefonlibro: mi volis paroli kun ŝi. Mi ekkonis ke lia patro ne vivis en Sonsón, sed en la urbo, kaj ke "María Teresa el Sonsón" estis Lina Moreno el Medeĝino, studentino pri filozofio kaj filino de tre respektata kaj tradicia familio. Ok monatojn post nia interkonatiĝo ni geedziĝis.

La tagon post nia geedziĝo ni iris al la foiro de brutaro en La Ceja¹. Pro emo kiun mi havis —kaj ankoraŭ havas— kiel kutimo, mi enmetiĝis inter la homamaso por manpremi kun la homoj kaj demandi pri iliaj familioj kaj entreprenoj; ĉiujn mi adresis per iliaj nomoj. Lina restis malantaŭe: rigardis la scenon kun kreskanta surprizo kaj ne malgranda konsterno.

1 [NT La municipo "La Ceja" \(La Ceja del Tambo\) situas en la sudorienta regiono de la departemento Antjokio.](#)

—Mi estis hororigita —ŝi komentis poste kun ironia rideto—. Mi pensis ke mi edziniĝos kun brutbredisto kaj tiun tagon mi rimarkis ke mi edziniĝis kun politikisto.

Ŝi estis iom troigante, ĉar finfine, tiutage mi aĉetis ĉevalinon! Mi diris ŝerce al Lina ke tio estis la "aldonaĵo" por festi nian geedziĝon. Tamen, ŝi pravis: kreskinte mi mergita en la demokratia filozofio de miaj gepatroj kaj en la aktivismo de mia patrino, la politika agado estas en mi kiel ia dua naturo. La sceno tiutaga en la foiro estis nur plia okazo kiam mi faris, kion mi ĉiam faras: atingi amikojn, konstrui aliancojn, interesiĝi pri la aferoj kaj la bonstato de aliuloj.

Eble estas apokrifa la anekdoto laŭ kiu, iu homo —kiam ni ankoraŭ estis tre junaj— demandis al Jaime kaj al mi, kion ni volis esti kiam ni fariĝos plenkreskuloj: Mi estus respondinte "prezidento" kaj Jaime estus respondinte "frato de la prezidento". Ĉu tio okazis, ĉu ne okazis, la esenco de tiu ĉi rakonto estas vera: mia sonĝo ekde infanaĝo estis fari karieron en politiko, kun la celo solvi la problemojn de la lando. Kaj al tio mi dediĉis min kiam mi atingis plenkreskecon.

Mi disvolvis intensan politikan karieron: kiam mi estis infano kaj adoleskanto mi partoprenis voĉdonajn kampanjojn; mi estis elektita urba magistratano de Salgar en 1974; laborinte en *Empresas Públicas de Medellín*¹, mi estis nomumata por grava posteno en la Ministerio pri Laboro, poste en la Administracio de la Civila Aeronautiko kaj, poste, urbestro de Medegino; mi estis elektita magistratano de tiu urbo en 1984 kaj poste senatano de la Respubliko kiam mi aĝis tridek tri jarojn; mi estis elektita departementestro de Antjokio en 1995. Antaŭ ol mi fariĝi kvindek-jaraĝa, miaj kunpatrianoj elektis min prezidento de Kolombio. Mi gajnis ĉiujn elektojn en kiuj mi estis kandidato.

Kun talento, digno, senafekteco kaj ŝia unika stilo, Lina kontribuis al mia publika kariero. Ŝi insistis pri pasigi vivon tiel normalan kaj privatan kiel eble, kaj dediĉi sin al la vartado de miaj du filoj: Tomás kaj Jerónimo. Kvankam en la naŭdekaj jaroj fariĝis necesa la sekurigo por nia tuta familio, ŝi trovis la manieron por iri butikumi sola. Mi maltrankviliĝis multe, tamen mi komprenis kial ŝi faris tion: Tie estis Lina genuante fronte de la taŭro. Ŝi ofte ŝercas, ŝi scias kiel levi la humoron kiam tio necesas kaj, respekte provoki

1 NT Ŝtata kompanio por servoj de elektra kaj gasa energioj, akvo, kloksistemoj kaj telekomunikado.

la sentivecon de la homoj, ne zorgigas ŝin. Kiam mi estis prezidento, kelkaj amikoj donacis al ni hundon: Lina decidis nomi ĝin Mao Referendumo (tiutempe oni diskutadis la okazigon de referendumo pri ebla prezidenta reelektio, kiun oponis Lina). La gazetaro ŝin demandis kial tiu nomo kaj ŝi nur ridetis. Ŝi ankaŭ scipovas, feliĉe, ridi pri mi.

En 1991 ni loĝis unu jaron en Kemбриĝo, Masaĉuseco. Tiutempe mi estis senatano, kaj en Kolombio estis realigata Konstitucianta Asembleo. Dum okazis ĝiaj kunsidoj, mi utiligis la paŭzon de la Kongreso por fari postdiploman studon pri administrado kaj direktado en la Universitato Harvard. Mi devus esti ĉeestinta al Harvard multajn jarojn antaŭe, tamen mi prokrastis tiun ŝancon kiam mia patro estis mortigita, por tiamaniere preni sur min adekvate la aferojn de la familio. Fine, la Konstitucianta Asembleo eksigis la kongresanojn kaj kunvokis por fari novan voĉdonadon. Mi devis, tiam fari kampanjon el Usono. Tio signifis defio: esence, la kampanjoj en Kolombio estas farataj pere de paroladoj kaj, ĉefe, per insista interagado kun la popolo. Tiutempe ne ekzistis poŝtelefonoj nek Interreto —des malpli Skype kaj videokonferencoj— tamen, mi trovis manieron per la ununura ebla solvo: miaj kolegoj en Antjokio instalas laŭtparolilojn ĉe publikaj placoj kaj ŝaltis ilin al telefono. Je certa horo, anticipe fiksita, mi iris per biciklo, kun sako el superbazaro plena de moneroj, al telefonbudo ĉe Harvard Square kaj klavis nombron en Kolombio. Tiamaniere mi povis fari miajn paroladojn vive kaj respondi ĉiujn demandojn de la aŭskultantaro.

Senrigarde ĉu estas dudek aŭ dudek mil homoj aŭskultantaj, mi adresas ilin kun respekto kaj entuziasmo. En tiuj paroladoj el Kemбриĝo, mi imagis ke mi adressed al stadiono plena de homoj. Mi ne estas aparte hontema kaj hodiaŭ mi povas imagi tian scenon kiel vera spektaklo: unu viro kun sako plena de moneroj kaj entuziasme krianta hispanlingve en publika telefono en la areo de la prestiĝa institucio de la *Ivy League*. Iun tagon, policano sekvis min ĝis nia eta apartamento: verŝajne li nur volis certigi ke mi ne estis freneza. Lina ridis multe, kaj eĉ hodiaŭ ŝi faras ŝercojn pri tio.

Tra la jaroj, la implicitaj kaj eksplicitaj minacoj kontraŭ la familio pliiĝis. Ankaŭ la responsoj kaj postuloj propraj de la postenoj kiujn mi okupadis. Kaj la vivo fariĝis pli malfacila por ni ĉiuj. Eĉ hodiaŭ, Lina insistas ke kiam ni geedziĝis ŝi tute ne sciis, ke mi serĉus politikan karieron, des malpli la prezidentecon, tamen ŝi kapablis konservi por mi sian amon, sian paciencon, sian forton

kaj la intelektan kaj politikan subtenon. Mi ĉiam estos dankoplena al ŝi: sen ŝi la trairita vojo estus neebla.

Iun tagon baldaŭ post nia geedziĝo, Lina estis vokita flanken far mia patro, kaj li demandis al ŝi, ĉu ŝi estis komforta kun la ritmo kaj la postuloj de la vivo apud mi. Ŝi ekskuis la kapon supren kaj ridis.

—Ĉu tio ĉi? —Ŝi ekkriis— Estas kvazaŭ nova aventuro ĉiutage!

7

Mallonge post nia geedziĝo ni aĉetis brutbredadan bienon en la tre fekundaj tropikaj ebenaĵoj proksime al la kariba marbordo, en la departemento Córdoba. Ni nomis ĝin "El Ubérrimo"¹. Tio estis la ŝanco por fortigi miajn radikojn, ĝui la amon por la kamparaj aktivaĵoj, sperti vivon pli malrapidan kaj eskapi, de tempo al tempo, el la agitata politika vivo kian mi spertis en Bogoto kaj Medeĝino.

Dum dudek kvin jaroj la domo estis tre simpla: kun nur la bazaj servoj, ĝi estis egala al tiuj de la laboristoj, kio estis ĉiam fonto de fiero por mi. La filoj kaj mi laboradis la tutan tagon kaj niaj ripozoj estis mallongaj dormetoj sub arbo aŭ sur betona planko por malvarmigi nin el temperaturoj de 40 gradoj Celsius. Nokte mi dormis en hamako. La vizitantoj plendis pri moskitoj kaj kuloj. Lina eltenis ilin sen murmuri vorton, la infanoj kaj mi ne sentis ilin. Sed ĉiuj ĝuis la simfonion el lampiroj kaj ranoj kiuj anoncis tropikajn ŝtormojn, tiel belajn kiel danĝerajn.

Mi amis la aŭsterecon de la loko kaj la praktikon de la brutbredada taskaro. Mi ellitiĝis je la tagiĝo por ĉeesti la melkadon kaj dum la tago ni dresis ĉevalidojn kaj priatentis la bezonoj de la brutaro. Nokte ni naĝis longe, kiel mi estis farinta tion infanaĝe pro postulo de mia patrino. Ni klopodis havi gregon kun kreskanta produktivo kaj media daŭrigeblo. Nur ĉe la fino de mia unua regado kiel prezidento mi plenumis la promeson fari pli grandan kaj komfortan domon kun alteco kaj dua etaĝo por ĉirkaŭiri la temperaturojn. Konstruita per materialoj el la regiono, la domo estas malfermita, integrita al la arboj kaj paŝtejoj, oni povas preskaŭ konversacii kun la bovinoj, ĉevalinoj kaj ĉevalidoj kiuj enrigardas en ĝia koridoro. Ĝi havas ventolilojn anstataŭ klimatizilo kaj la akvo retenas la median temperaturon. Mi ankoraŭ dormas en hamako en la balkono, kaj Tomás kaj Jerónimo faras same.

Kiam ni aĉetis la bienon El Ubérrimo ni estis konsciaj ke esti en Córdoba implicis ioman riskon. Fakte, ĝi situis en la areo kie la kontraŭleĝa armita grupo PLA estis invadinta la bienon de mia patro kaj bruliginta la domon kiam mi estis adoleskanto (post lia morto, miaj gefratoj decidis foriri por ĉiam el Córdoba). Dum kelkaj

1 NT Kio signifas "La Fruktodonega".

jaroj mi dormis kun ĉasfusilo kaj revolveron apud mi (sur la planko, sub la hamako). Tamen, ni neniam havis seriozan problemon. Ĝis iu tago de aŭgusto de 1988.

Estis eble la oka aŭ naŭa horo matene. Mi veturis en mia aŭto kun kelkaj kolegoj de la Senato. Lina estis en Medeĝino. Subite ni ekvidis la bienan ĉefserviston kiu, en sia traktoro, atendis nin ĉe la flanko de la vojo. Kiam ni alproksimiĝis li komencis movi siajn brakojn viglege por igi nin halti. Tiel ni faris kaj tiam li informis nin ke iu grupo de la PLA estis proksime de la bieno kun la intenco kidnapi min. Dum momento mi ne sciis kiel reagi, tamen parolinte kun miaj kolegoj, ni decidis malproksimiĝi de la Ubérrimo kaj ekiri al la marborda regiono de Antjokio, kie tiutage ni estis havontaj iujn politikajn aktojn.

Post longa tago da paroladoj kaj da stirado tra senpavimaj vojoj mi revenis al El Ubérrimo. Estis la unua horo matene. Elĉerpita mi piediris al la domo, kie mi trovis ke du el miaj plej fidindaj laboristoj —Silvia kaj Robin— estis atendante min.

—Ili estis ĉi tie ĝis la dek unua —Robin diris. Li estis forta viro kaj bonega laboristo, tamen tiu nokto li ploris.

—Ili diris ke ili revenos —aldonis Silvia—. Ili diris: "Ni scias ke Uribe alvenos laca, kaj ni scias ke li dormas en hamako, do ni revenos je la kvina matene kaj Uribe ne havos tempon por reagi". Ili forrabos vin el ni!

La aktivuloj de la PLA minacis mortigi la gelaboristojn Robin kaj Silvia se ĉi tiuj avertus min. Sed ilia lojaleco estis pli granda ol ilia timo. Mi ĉiam estos dankoplena al ili. Eĉ hodiaŭ ambaŭ laboras en El Ubérrimo.

Mi forlasis la bienon kaj iris dormi en hotelo en Montería¹. Mi sentis min humiligita. La postan matenon mi iris al la Polico kaj al la Departamento Administra de Sekureco (DAS), la ŝtata agentejo de informiĝado, serĉante helpon. Kun kelkaj oficiroj mi revenis al El Ubérrimo iomete antaŭ tagmezo. Robin diris al ni ke la PLA revenis, ke ili estis armitaj kaj ke ili minacis mortigi min se mi rezistus. Ili lasis mesaĝon por mi: mi devus renkonti ilin la saman tagon ĉe bordo de la rivero Sinú kaj porti multe da kontanta mono, se mi pagus, ili lasus min trankvila, almenaŭ dum iom da tempo.

1 [NT Ĉefurbo de la departemento Córdoba.](#)

Estis la oficiro de la DAS tiu kiu ekhavis ideon: unu el liaj agentoj anstataŭos min kaj, je la fiksita horo, tiu iros al la loko de la renkontiĝo. Kiam la kidnapantoj de la PLA, trompitaĵoj pro la falsa kredo ke mi akceptis ilian ĉantaĝon, eliros por renkonti min, granda nombro da policanoj surprizos kaj arestos ilin ĉiujn.

—Ĉio kion ni bezonas estas unu el viaj ĉapeloj —diris la agento —, kaj mi certas ke ni povos aresti ilin ĉiujn.

La ideo estis racia. Tamen, al mi ĉiam ŝajnis neresponse peti al aliuloj ke, je mia nomo, prenu fizikan riskon. Neniu vivo valoras malpli aŭ pli ol la mia.

—Mi konsentas kun via plano —mi respondis—. Tamen mi devas iri.

Diskutinte tion iomete, la agentoj akceptis mian decidon. Ili iris al la loko kaj ĝin pristudis por pretigi la operacan taktikon. Posttagmeze, kiel planite, mi veturis en mia aŭto ĝis la difinita loko proksime de la rivero.

En malgranda restoracio flanke de la vojo, ok kidnapantoj de la PLA atendis min. Ili aspektis tre trankvilaj.

Mi haltigis la aŭton, malfermis la pordon kaj eliĝis malrapide. Mi estis metinta pistolon en mian valizon por se la aferoj fariĝus malbone. Mi havis en la vizaĝo severan esprimon kaj miaj sensoj estis plengardaj. Mia koro bategis. Nur kvin jaroj estis pasintaj ekde la murdo de mia patro.

—Aŭdu vi —diris unu el ili—. Ĉu vi alportis la monon?

—Jes, ĉi tie mi havas ĝin —mi respondis.

—Kiom vi alportas?.

Mi diris la kvanton kaj tiam, kiel ofte okazas en ĉi tiuj situacioj, la banditoj tuj petis pli.

Mi plendis ĉagrenita. Kvankam estis artifiko, la emocio estis aŭtenta.

—Mi ne havas tiom multe —mi diris.

—Tiam vi devas alporti ĝin poste —diris la bandestro—, alie, certe vi scias kio okazos!

Mi nur kapjesis. La krimuloj provis foriri, tamen en tiu momento grupo de forte armitaj agentoj eliris el la ŝipo en kiu ili atendis.

—Vi estas ĉirkaŭitaj! Lasu la armilojn!

La kidnapantoj ne havis tempon por eligi siajn armilojn kaj estis submetitaj kun facileco. La profesieco de la sekurigaj agentoj estis konsiderinda; ĉi tiuj agis sekrete kaj kaptis la membrojn de la PLA efike kaj rapide.

Mi akompanis ilin ĉe juĝisto, al kiu mi petis kontroli kaj lasi skribitan ateston pri ke la kidnapantoj estis transdonataj al la gardado far la Ŝtato en perfekta fizika stato. Mi neniel tolerus ajnan akuzon pri mistrakto aŭ malrespekto de iliaj rajtoj.

Ekde tiu tago en 1988, la kolombia sekuriga agentaro scias kie mi pasigas la noktojn. Ĝi asignis al mi pli ol unu korpogardiston kaj konservas registron pri ĉiu kunveno, ĉiu manĝo kaj pri la vizitantoj kiujn mi akceptas. Ekde mia dua jaro kiel departementestro, mia tuta familio ricevis similan protekton.

Tra la jaroj, la minacoj pliiĝis kaj Córdoba fariĝis unu el la plej nesekuraj areoj de Kolombio. La kontraŭleĝaj armitaj grupoj kiuj agadis tie estis pli kaj pli riĉaj kaj fortaj, kaj pli pretaj uzi violenton por atingi siajn celojn. Mi memoras ke tiun nokton, revenante al El Ubérrimo, mi pensis ke malgraŭ kiom forta kaj longa estis la violento en Kolombio, ĝi povas ankoraŭ daŭre plimalboniĝi.

Tio ĉi aspektis neverŝajna: la maldekstrismaj armitaj grupoj similaj al la PLA, la NLA kaj la FARK estis rapide malaperantaj en aliaj partoj de la mondo; ĉiuj militoj en Centrameriko estis finiĝintaj aŭ alvenantaj al ilia finiĝo; la Berlina Muro estis faligota nur unu jaron poste; la disfalo de Sovetio proksimiĝis; demokratio estis funkcia en la tuta Latinameriko kaj la geriloj estis fariĝintaj afero de la pasinteco. Nur en Kolombio tiaj grupoj estis fariĝantaj ĉiam pli fortaj, pli multnombraj kaj pli bone armitaj, kaj je la unua fojo ili estis minaco al la ekzisto de la Ŝtato.

Ni iris kontraŭe al la historio kaj necesis trovi eksplikon.

8

Ofte, dum la infanaĝo mi ĉeestis kun mia patro kaj miaj gefratoj ĉevalajn spektaklojn kiuj okazis semajnfine. Ili estis oportunoj por kontentigi nian pasion pro la ĉevaloj kaj ensociiĝi kun la partoprenantoj en unika etoso. Ni starigis kontaktojn kun multaj homoj el la departemento, inter ili kun unu familio kiu kunhavis nian amon al ĉevaloj kaj kies ligojn al nia familio venis dum pluraj generacioj. Ĝiaj familinomoj estis Ochoa Vásquez, kaj tri el la fratoj estis atingontaj fifamon: komence de la okdekaj jaroj ili troviĝis inter la gvidantoj de la drogo-kartelo de Medeĝino.

Vidi mian naskiĝurbon fariĝi la tutmonda epicentro de la ŝakrado de kokaino, tio estis korŝira sperto. Komence mi ne atingis percepti la grandon de tio kio okazis, sed en iu ajn momento mi vidis la manieron kiel kelkaj konatuloj kiuj estis ĉirkaŭ mia aĝo — iom pli ol dudek aŭ tridek jaroj— aĉetis luksajn aŭtojn, domegojn, eksponindajn ĉevalojn, inter aliajn aĵojn; elmontroj de subita kaj ekstrema riĉeco. Tian komencan malŝparon sekvis la apero de korpogardistoj, de novaj amikoj kaj, neeviteble, de obskuraj partneroj venintaj el la krima submondo. Multaj el tiuj junuloj apartenis al respektataj familioj kaj siaj agadoj kaŭzis grandan suferon. Mi rememoras pensi tiame: Ĉu la malbonoj kiuj atakas Kolombion ne havas finon?

La respondo estis "ne". Refoje la lando estis submetita al siaj du daŭraj malfortoj: la geografiaĵoj kaj la foresto de la Ŝtato.

Dum la unuaj jaroj, la plejparto el la kokaino de la mondo estis produktita en aliaj latinamerikaj landoj kaj precipe en Peruo kaj Bolivio. Tamen, fine de la sepdekaj jaroj la internaciaj ŝakristoj sentis la bezonon trovi lokon kiu, strategie situanta kaj kun eta risko, permesus al ili preni la folion de kokao aŭ ĝian duonprocezitan staton —konata kiel kokao-pasto— por transformi ĝin en kokaino kaj partopreni en ĝia distribuado; la plej riska kaj profitdona parto de la produktada ĉeno. La kondiĉoj de Kolombio ŝajnis esceptaj: situanta ĉe la norda pinto de Sudameriko (inter la areoj de kokao-kultivado kaj la du grandaj konsumantaj merkatoj, Eŭropo kaj Usono), havanta du oceanojn (perfekta deirpunkto por ŝipoj kaj submarŝipoj) kaj havanta grandajn areojn geografie nepenetreblajn kaj malabunde popolitan (perfekta por kaŝi

laboratoriojn de drogoj). Eĉ pli signife: Kolombio havis malfortan registaron kiu ne regis plene sian teritorion kaj kiu destinis siajn malabundajn rimedojn al la lukto kontraŭ neleĝaj armitaj grupoj. Alivorte, ĝi estis paradizo por la gangsteroj.

En la fruaj jaroj okdekaj, pli ol 80% el la monda kokaino pasadis tra la kolombia teritorio. Kaj el tiu procento, Medeĝino kaj Kalio sumigis la plej grandan parton. Tiu egega kresko de la drogtrafiko estis ebla pro kelkaj faktoroj eksteraj al la rego far Kolombio: la kemiaj prekursoroj malplikostigis la produktadon de kokaino; sociekonomiaj tendencoj en evoluantaj landoj —ekzemplo de tio estas ke ĉiu *baby boomer* tiam fariĝis plenkreskulo—; la kreskanta koncentriĝo de la riĉeco en Usono, inter aliaj faktoroj. De nokto al mateno kokaino fariĝis ranga simbolo en la *jet set* de Los-Anĝeleso, Novjorko, Londono, Madrido kaj multaj aliaj lokoj. Simbolo de riĉeco en epoko kiam ĝi estis ĉio.

"La plej vendita produkto en Hollywood la lastan jaron estis Kolombio" ŝercis la usona humoristo Johnny Carson dum la soleno de la Oskar-Premioj en 1981. Li ne aludis al la kino-produkta firmao¹, sed al nia lando. Carson pravis: la numeroj estis enormaj. Dum lia apogeo, la enspezoj generitaj per la ŝakrado de kokaino estis ekvivalentaj al 6,4 procento de la Malneta Enlanda Produkto de Kolombio kaj dum kelkaj jaroj ili superis la kafon, ĉefan fonton de enspezoj pro eksportoj de nia lando. La giganta kresko de fremdaj devizoj —devenintaj el la narkotaĵkomerco— signife plivalorigis la kolombian peson relative al la monunuoj de aliaj latinamerikaj landoj. La profitmarĝenoj estis neimageblaj: iu studaĵo tiutempa montris ke la prezo de kilogramo da kokaino estis obligita per ducent kiam ĝi estis vendita en Usono. Iu ajn homo kiu havis boaton, aviadilon aŭ grandan nombron de pafiloj, volis preni pecon el la kuko.

Tiom da nelica mono ŝancelas eĉ la plej fortan landon. Ekde tia Panamo regita far Manuel Noriega ĝis Peruo kaj Bolivio, trapasante la sudan marbordon de Florido, la kokaino ŝiris la teksaĵon mem de civilizacio. Kaj en Kolombio ĝi okazigis katastrofon de kolosa proporcio. La narkotaĵtrafiko eniĝis per sia mono nian ekonomion kaj nian socion. En la komenco, la kolombia socio ŝajnis pretervidi, aŭ ne kapablis vidi en tiu minaco pli ol tio, kion vidis Johnny Carson: kokaino estis problemo de "riĉaj landoj". Kaj ekzistis eĉ tiuj, kiuj, per sia "malavareco" provis kovri siajn krimojn.

1 [NT "Columbia Pictures"](#)

Pablo Escobar konstruigis domojn, enmiksigis en la politikon, serĉis per donacoj la apogon de la malriĉuloj kaj ankaŭ movis sian monon inter riĉaj sektoroj.

En 1983, kiam mia frato estis vundita post la sturmo farita de la FARK al Guacharacas kaj nin turnis nin al la Ruĝa Kruco por porti lin al Medeĝino, eblis trovi nur unu helikopteron ekipitan kun la teknologio necesa por flugi nokte kaj sub malbona vetero. Kvankam la helikoptero estis registrita de serioza organizaĵo, laŭ ĵurnalaj informoj tiutempaj sia vera proprietulo estis Pablo Escobar. Malgraŭ siaj kompleksaj instrumentoj, la helikoptero ne povis surteriĝi en Yolombó kaj ĝi devis reveni malplena. Jarojn poste, ĉi tiu incidento estis citita far iuj el miaj kritikistoj kvazaŭ "pruvo" de mia amikeco kun Escobar. Mi ne estis lia amiko kaj neniam mi estis tia, eĉ ne kiam tiu ulo ne estis malaprobe rigardata en kelkaj ekonomiaj kaj politikaj rondoj de la kolombia socio.

La leciono kiun mi lernis tiam estis definitiva. Cirkulante ĉie la tuta mono el la drogoj, ekzistis nur unu maniero por eksterlasiĝi el la klaĉoj: adopti gvidliniojn de absoluta pureco kaj neflekseblajn koncerne la konduton. Do, tiel dum miaj kampanjoj kiel kiam mi prenis sur min ŝtatajn postenojn, mi postulis de ĉiuj tiuj ĉirkaŭ mi sekvi la ekzemplon de Sankta Teresa: "Kiam en dubo, detenu vin". Ni establis serion de striktaj reguloj kaj ni sekvis ilin laŭlitere, senrigarde ĉu iuj homoj povus senti ĉagrenon aŭ ofendon. Mi rifuzis ricevi monon rekte por miaj politikaj kampanjoj, tasko kiun mi delegis en la ĉefoj de kampanjo kies honesto estis eksterduba. Ni estis interkonsentintaj, ke se iu donaco starigis suspekton, estis devige fari profundan esploron pri sia deveno; kaj se la rezulto de ĉi tio sugestus, eĉ kun la plej eta eblo, rilaton kun enspezoj venintaj el narkotajoj aŭ el ajna alia klaso de neleĝaj negocoj, ni redonus la ĉekon. Ni ne faris escepton.

En unu okazo —ni estis en la lastaj momentoj de tre pridisputita kampanjo por departementa regado— ni ricevis grandkvantan ĉekon el donacinto. Proksimume tridek milionoj da pesoj, sufiĉa por fari gravan diferencon en la kampanjo. Tamen, ni redonis la ĉekon ĉar, kvankam ili ne estis certaj, miaj konsilantoj timis ke ĝi povus esti mono el drografiko. Ili sciis, ke mi preferus perdi elekton ol venki per nelicaj fondusoj. Ni gajnis la elekton pro malpli ol 5.000 voĉdonoj.

Fari politikon sen peti permeson al ŝakristoj de narkotajoj, al gerilistoj aŭ al kvazaŭarmeanoj, tio pruviĝis riska en pluraj lokoj de

la lando. En tiuj tagoj kuris la famo, ke Escobar estis dirinta ke kolombianoj devas elekti inter "mono aŭ plumbo". Dume, la kolombia registaro preparis gravan ofensivon. Jaroj de vera frenezo estis baldaŭ komenciĝontaj.

9

Ekzistis speco de infera ludo: post la kreskanta ofensivo fare de la registaro, la drogokarteloj, kiuj celis protekti siajn imperiojn, bezonis fortiĝi. Siaflanke, la gerilistoj bezonis monon por certigi sian pluekziston: la Malvarma Milito estis finiĝanta, kaj kune kun ĝi unu fonto de financado. La ĉefoj de la drogokarteloj kontrolis la komencajn kontaktojn kaj, laŭmezure kiel tiuj kontaktoj progresis, ili semadis kokaon en areoj kontrolitaj far la armitaj grupoj. Necesis malmulta tempo por ke preskaŭ ĉiuj armitaj bandoj en Kolombio fariĝis partoprenantaj en la drografiko. Laŭ *Guerras inútiles*¹ —libro pri la FARK skribita kaj eldonita far la Korporacio Observantaro por la Paco², kolombia neprofitcela organizaĵo—, multaj membroj de la armita maldekstrismo pensis ke la trafiko kaj kontrabando de kokaino estis la "ŝlosila faktoro" kiu havigus al ili la rimedojn necesajn por renversi la nacian registaron.

Ĉio ĉi okazis en la tempo de mia kvazaŭa kidnapo en El Ubérrimo. La historia momento devus supozeble konduki al rimarkinda perdo de graveco de la gerilistoj en Kolombio; tamen, okazis la malo: ili ricevis injektaĵon de miliardoj da dolaroj devenintaj el la kokaino. Tiam ili pliigis siajn fortojn, akiris novajn armilojn, pliigis la kidnapojn kaj atencojn, ili pliaktiviĝis konvinkitaj ke ni estis ankoraŭ en 1968.

Kun malforta armeo kaj nesufiĉaj rimedoj, la kolombia Ŝtato ne havis kapablon por batali kontraŭ tiu ĉi ruiniga alianco. Ĉiufoje kiam la registaraj aŭtoritatoj provis subpremi la deliktulojn, ĉi tiuj respondis per brutala atako. Kiam la kolombia Polico en 1984 faris la unuan signifan entrudiĝon en kokaina laboratorio kaj ĵetis en riveron la drogon —kies valoro, en hodiaŭa prezo, estis 2,6 miliardoj da dolaroj—, la drogŝakristoj venĝis mortigante la Ministron pri Justeco. Kaj kiam la aŭtoritatoj minacis ekstradicii al Usono kapulojn de la droga ŝakrado, la ĉefoj de la karteloj (inter kiuj estis Escobar) pagis plurajn milionojn da dolaroj al la M-19³ por ke tiu ĉi prenu la Palacon de Justeco —laŭ tio kion eltrovis vero-serĉanta

1 NT "Senutilaj militoj".

2 NT Hispanlingve: Corporación Observatorio para la Paz.

3 NT *Movado 19-a de Aprilo*, gerilistoj malmobiliziĝintaj en 1990.

komisiono en 2006—, preno kiu lasis pli ol cent mortintoj, inter kiuj estis pluraj membroj de la Supera Kortumo.

Inter 1980 kaj 1988 estis mortigitaj pli ol 178 kolombiaj juĝistoj, unu ĝenerala prokuroro, la ĉefo de Polico de Medegino, kaj multaj aliaj. En 1989 estis bombata aviadilo de la firmao Avianca en kiu vojaĝis —laŭ tio kion diris la kapuloj— kvin informantoj por la Polico; mortis 108 veturintoj. En la periodo ĵusantaŭa al la prezidenta elekto de 1990, kvar prezidentaj kandidatoj estis mortigitaj, inter ili Luis Carlos Galán, historia gvidanto kun kiu mi koincidis en la Senato kaj kiu elstaris pro sia kuraĝa kaj reflektsebla sinteno kontraŭ korupteco kaj drogtrafiko. Kelkajn tagojn antaŭ tio, Galán estis petinta al mi ke mi fariĝu direktanto de sia kampanjo en Antjokio, mi ne akceptis ĉar mi jam estis engaĝiginta por subteni alian kandidaton, tamen, mi kreis la kondiĉojn necesajn por ke la membroj de niaj politikaj organizaĵoj apogu lin se tiel ili decidis. La morto de Galán vestis funebre la tutan nacion kaj malkaŝis la abismon en kiun Kolombio estis falinta.

Tiame, la falo tamen ankoraŭ ne estis finita. Mankis la apero, en la ĥaosa situacio en Kolombio, de nova kategorio de mortigistoj.

Meze okdekaj jaroj, kelkaj proprietuloj de kamparaj terenoj kunvenis por krei "kvazaŭarmeo" kiuj protektu ilin de la armita maldekstrismo en tiuj areoj kie la Ŝtato ne faris ĉeeston aŭ provizadis nesufiĉajn rimedojn. En la komenco tiuj estis organizaĵoj por privata sekurigo, ekipitaj per leĝeraj armiloj kaj celantaj sindefendon. Eĉ kelkaj el tiuj grupoj laboris en kunordigo kun iuj militaj sektoroj kiuj kredis —malprave— ke ĉi tiu batalantaro aldona povus helpi ilin en sia lukto kontraŭ la gerilistoj. Tamen, same kiel okazis foje kaj refoje en la kolombia historio, la multiĝo de armitaj grupoj sen adekvata regulado kaj superrigardo fare de la Ŝtato pruviĝis esti tragedio. Alivorte: kreigiĝis monstro.

Ja, pli frue ol malfrue, la kvazaŭarmeoj rimarkis ke ili havis neniun al kiu raporti pri sia konduto kaj ebriiĝis per sia povo. La malhumanaj krimoj ne prokrastiĝis: kun la slogano "purigi" la landon el maldekstrismaj armitaj grupoj, ili mortigis multajn senkulpaĵajn kolombianojn. La listo de celaĵoj de la kvazaŭarmeoj inkluzivis ajnan homon suspektita pri havi simpatian kun la gerilistoj kaj komunistoj; sindikataj gvidantoj, ĵurnalistoj, instruistoj, membroj de la Patriota Unio (politika brako de la FARK), inter aliaj. Ili ankaŭ implikiĝis en trafiko de drogoj, kion, same kiel la armita maldekstrismo, ili konsideris la ekonomia motoro por

riĉiĝi kaj plibonigi sian forton (en kelkaj kazoj okazis la inversa fenomeno: simplaj distribuantoj de drogoj deklaris sin kvazaŭarmeanoj celante doni al siaj agadoj falsan glazuron de politika legitimeco).

En 1987 la proksimuma nombro de kvazaŭarmeanoj estis 2000; en 2001 pli ol 17.000 (laŭ tiutempa takso), kio permesis al ili konkurenci kun la FARK koncerne nombron de membroj kaj koncerne kruelecon. Ili responsas pri la murdoj de pluraj personoj, kiuj estis tre proksimaj al mi. Mi rememoras kun speciala korinklino sinjoron Libardo Betancourt, kiu venis el la demokratia maldekstrismo kaj estis mia konsilanto en la Kongreso, murdita far kvazaŭarmeanoj en 1987. La saman tagon de lia morto ankaŭ estis mortigita Héctor Abad Gómez, elstara kuracisto kaj defendanto de la homaj rajtoj. Koninte la novaĵon, mi prononcis emocion paroladon en la Senato por denunci, eksplicite, ambaŭ deliktojn kaj la responsajn deliktulojn. En la sekvintaj jaroj la kvazaŭarmeanoj asociiĝis kun la drogokarteloj —kaj kelkfoje trompe anstataŭis ci-lastajn—; tiu ĉi kuniĝo ŝveligis la vicojn de la plej kruelaj kaj senkompataj ŝakristoj en la mondo.

Fari registron pri la asociiĝoj, konstante ŝanĝantaj, inter la neleĝaj armitaj grupoj kiuj agadas en Kolombio rezultigas pelmelon, eĉ por la kolombianoj. Tamen, se oni rigardas el iom pli proksime, la kialo de tiuj asociiĝoj riveliĝas: la murdado ne agnoskas iun ajn ideologion aŭ logikon kaj, ekde la finaj okdekaj jaroj antaŭen, la forto kiu motivis la krimulojn en Kolombio ne estis marksismo, nek socia maljusteco aŭ iu "justa" atento, estis kokaino. Nenio alia gravis. Riveligis al mi klare, tiam, ke por ĉiuj praktikaj celoj, Kolombio jam ne plu estis dividita inter maldekstrismo kaj dekstrismo, sed inter krimuloj kaj homoj respektamaj al la leĝaro (homoj kiuj konstituas plimulton, fortune por Kolombio). Inter terorismaj drogŝakristoj kaj ĉiuj ceteraj.

10

Lina malfermis la leteron.

Ni juĝis vin, ĝi komenciĝis. Ĝi havis la saman "revolucionan" lingvaĵon de la notoj fuŝe skribitaj kiujn mi ricevis dum miaj universitataj tagoj. Kaj ni konkludis, ke vi estas malamiko de la revolucio. Ni deklaris vin milita celaĵo kaj ni faros justecon.

La "peko" pri kiu ili min akuzis estis reformo al la labora leĝaro, kiun mi defendis en mia posteno en la Senato. La ekzistinta labora kodo havis multnombrajn difektojn, kaj unu el ili estis klaŭzo kiu ligis la retroefikajn laboristajn profitojn kun la inflacio. Tiu postulo estis ruinigante ambaŭ entreprenojn kaj laboristojn: multaj entreprenoj sinkis sub la pezo de siaj ŝuldoj, fariĝinte nekapablaj pagi sian laboristaron. La leĝprojekto, titolita "50-a Leĝo", konservis la laboristajn protektojn kaj per la kreo de pensiaj fondusoj modifis tiujn pagdevigojn kiuj ne povis esti plenumataj, ĉefe en malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj.

Mi estis konvinkita, ke la senlaboreca indico en Kolombio neniam iĝus malpli ol du-cifera se ĉi tiuj reformoj ne estus farataj. Tamen, laŭ la terorismaj drogŝakristoj mi estis piedpremante "la laboristajn rajtojn" kaj meritis esti mortigata.

Dum preskaŭ du jardekoj mi ignoris tiajn minacojn. Tamen, vidinte la vilenton kiu batadis la landon, tiom fare de la "maldekstrismo" kiom de la "dekstrismo", ni ne povis ignori ilin plu. Mi turnis min al iama kunulo de miaj universitataj tagoj kiu havis rilatojn kun maldekstrismaj grupoj. Tiu kiu estis sendinta al mi la leteron estis malgranda frakcio nomiĝinta Jorge Eliécer Gaitan (laŭ la nomo de la prezidenta kandidato kies murdo en 1948 kondukis al "El Bogotazo"), kiu havis intimajn interrilatojn kun la NLA. Mi petis al li provi konstati ĉu la minaco estis reala.

Mi akiris la respondon rapide.

—Senatano, mi faris la enketon kaj eltrovis, ke ĝi estas reala: tiuj homoj intencas mortigi vin —li diris—. Vi devus esti tre zorgema.

Li informis min ke la grupo faris alternativan proponon: ke mi permesu mian ostaĝigon por esti submetata al "juĝo" fare de iliaj ĉefoj. Se ili trovas min "kulpa", mi devus ĉesi subteni la reforman

leĝprojekton, mi estus elliberigita kaj en la estonteco ili ne prenis reprezaliojn kontraŭ mi, kondiĉe ke mi restu for de projektoj kiel tiu kiun mi estis defendanta.

Mia iama kunstudento ne bezonis atendi mian oficialan respondon. Li konis min tre bone.

La sama ekskunulo servis kiel peranto por la transdono de la elaçeta mono por la elliberigo de Manuel Santiago Mejía, amiko de mia familio ostaĝigita en kuna ago far la mortiguloj de Escobar kaj membroj de la NLA. Alia ekzemplo de la miksaĵo el krimaj mafioj kiuj prosperis en Kolombio tiutempe.

Mi same kiel miaj kolegoj —inter kiuj estis kuraĝaj patriotoj kiel Guillermo Alberto González, Fernando Botero Zea, Fabio Valencia kaj aliaj— rifuzis permesi ke ĉantaĝo agu kiel dekonvinkilo. Ni sciis ke tio kion ni faris estis por la bono de la lando, kaj ke ni havis la responson meti la bazojn por mondo en kiu la ekonomio kaj la socio povu prosperi. La Kongreso aprobis la 50-an Leĝon en 1990.

Finfine ne estis mi kiu suferis la plej tujan konsekvencon de tiu ĉi aprobo. Kelkajn semajnojn poste, dum la jarfinaj festoj, mi estis kun mia familio en la bieno de amiko en Córdoba. Lina kaj la infanoj rigardis la novaĵojn per la televido, kiam la prezentisto informis ke Ivan de Jesŭs Gómez Osorio, unu el miaj plej bonaj kolegoj en la Senato kaj kunapoganto de la 50-a Leĝo, estis ĵus forrabita.

Lina kaj la infanoj turniĝis kaj mi sentis siajn rigardojn sur mi. Mi restis kuŝante kaj kun lakona kaj indiferenta gesto de mia mano, mi diris:

Ĉi tiu novaĵo ne povas damaĝi la ĝuadon esti en tiu ĉi bieno.

Ĝi estis loko tra kie kuris malgranda rivero kun freŝa kaj travebla akvo en kiu mi ŝatis naĝi, kaj la gastiganto —al kiu mi aĉetadis brutojn por El Ubérrimo— estis gastama kamparano kiu servis bongustan kokinan stufajon.

Poste, kelkaj komentistoj asertis ke la kidnapo de la senatano Gómez Osorio okazis pro eraro, ke la vera intenco estis forrabi senatanon Álvaro Uribe.

Mia konduto estis taktiko por pacigi mian familion, sed ĉi-foje ĝi estis senutila. Post kelkaj momentoj mi malfermis miajn okulojn kaj vidis mian filon Tomás. Li estis ok jarojn aĝa (iomete pli aĝa ol kiom

estis mi, kiam kapitano Franko alvenis al la bieno de miaj gepatroj). Li estis ĉesinta rigardi la televidon por direkti siajn okulojn, larĝe malfermitaj, al la planko, kvazaŭ vidante fantomon.

Mi estis tre familiara kun tiu esprimo.

11

Dum la jaroj de mia restado en la Senato mi faris la ununurajon kiun mi scipovas fari: labori. Du jarojn post la aprobo de la 50-a Leĝo, mi entreprenis la defendon de alia leĝdona projekto, konata per la nomo "100-a Leĝo", kiu penis reformi la sistemon de sociala sanasekuro. Mi konsciis pri la konsekvencoj kiujn tiu nova defendo estis alportontaj kaj ilia elmontriĝo estis okazonta iam ajn. Ja, denove elĉeniĝis la furiozo de la armita maldekstrismo.

Estis la 9-a de novembro de 1992. Post labortago de malfacilaj diskutoj, mi revenis al mia loĝejo en Bogoto —ĉambron en la tridek-sesa etaĝo de la Hotelo Orquidea Real— je la naŭa nokte. Mi ŝaltis la tekokomputilon kiun mi alportis de Harvard kaj pretiĝis por skribi informon por la Kongreso. Mi estis apenaŭ komencinta, kiam mi sentis la manojn grasaj. Mi refaldis la manikojn kaj iris al la banĉambro por lavi miajn manojn. Elirinte, eksplodis bombo kiu skuis min forte. Ŝajnis al mi ke la dua eksplodo —en rapida sinsekvo— okazis en mia maldekstra orelo kaj la ŝokondo preskaŭ ĵetas min sur la plankon. Mi sentis kvazaŭ unu flanko de mia kapo estis en flamoj.

Dum momento mi estis komociita. Mi sentis tre fortan doloron. Mi reiris al la banĉambro kaj vidis, ke la muroj estis disfalintaj; tri sekundojn pli frue la bombo estus mortiginta min. Sur la alia flanko de la ĉambro la eksplodoj estis dissaltigintaj parton el la fasado de la hotelo: tra fumo okrokolora, restaĵoj de rompitaĵoj kabloj kaj ruinigita meblaro, mi povis vidi, sen la baro de la muroj jam detruitaj, la centron de Bogoto. Mi sentis min kvazaŭ hipnotigita far la lumoj flagretantaj de la urbo kaj de la pluvo, kiu miksiĝis kun la akvo el la rompitaĵoj tuboj jam inundanta tion kio restis el la planko. La fajreroj —flavaj, blankaj, orkoloraj— flugis ĉie. Mi rigardis ilin momente surdigita.

Ŝanceliĝante mi faris unu paŝon antaŭen. Mia maldekstra orelo zumis kvazaŭ batita per martelo. La ĉefaj lumoj de la hotelo estis estingitaj. Dum mi malfermis mian vojon tra la obskuro, lumigita nur far la brilo febla el la urbo kaj la fajreroj, mia kolon alkroĉiĝis al fasko de kabloj defalintaj el la plafono. Mi stumblis kaj la kabloj streĉiĝis. Mi spiradis malfacile. Tiam mi skuĝis kun forto kaj la

kabloj malfiksiĝis. Estis tiam kiam mi aŭdis lamentojn kiuj devenis el supre.

—Helpon! ... —Iu petegis mallaŭte—. Helpu min, mi petas.

La voĉo venis el juna abituriento deksepjara, Julián Rodrigo Sosa Molano, kiu havis la misfortunon —kiu ŝanĝis lian vivon— loĝi en la ĉambro kiu estis ĝuste super la mia. Li estis en la hotelo invitita far Ecopetrol¹ por premia ceremonio pro siaj atletismaj kaj akademaj atingoj. Li estis bonega naĝanto kaj aspiris fariĝi nacia ĉampiono. Tamen, la forto de la eksplodoj tiunoktaj ĵetis la junan Julian kontraŭ la muron de lia ĉambro en la tridek-sepa etaĝo, kaj damaĝis al li la krurojn kaj la vertebrojn, lasante lin paralizata porvive de la talio suben.

Mi supreniris la ŝtuparon kaj trovis la junulon Julián. Kelkaj homoj estis levintaj lin por apartigi lin el danĝero. Mi aliĝis al ili kaj ni malsupreniris la ŝtuparon al la vestiblo. Dum ni malsupreniris, ni vidis, ke la hotelo estis trabalaita ekde la dudek-oka etaĝo supren. Kelkajn etaĝojn pli sube, ni renkontis la sukuristojn kiuj malfermis sian vojon serĉante postvivantojn.

—Ĉu vi fartas bone? Estis du aŭto-bomboj! —diris unu el ili.

Li estis erara: la esploro farita de la Polico pruvis poste ke la bomboj estis instalitaj en la banĉambro najbara al la mia. La konfuzo de la sukuristoj okazis ĉar la forto de la eksplodoj ĵetis grandegan kvanton de rubo en la straton detruinte du aŭtojn.

Dum Julián estis prizorgita far la sukuristoj, mi iris al la vestiblo. Mi estis ŝokita kaj furioza: mi ne estis permesonta ke io ajn haltigu nian aferon. Mi forlasis la hotelan vestiblon sen hasto kaj registrigis min en alian hotelon. Mi ne serĉis medicinan atenton nek parolis al raportistoj aŭ la Polico tiunokte.

La postan tagon mi iris al la Senato, kiel planite, por daŭrigi la diskutadon. Kaj malgraŭ la konstantaj minacoj far la NLA —kiu asertis sian responson pri la bombado en la hotelo kaj aliaj atakoj tiunoktaj en Bogoto—, ankaŭ la 100-a Leĝo estis aprobata. Ili malsukcesis en sia celo: ili nur atingis vundi senkulpulojn kaj movi la Kongreson kaj la nacion por aprobi la leĝoprojekton. Julian progresis: li havas inspiron kaj produktivan vivon kiel inĝeniero, kiel li ĉiam revadis.

1 [NT La plej granda kaj ĉefa petrola kompanio en Kolombio.](#)

Tiunokte ekestis du daŭraj konsekvencoj por mi: 1) La zumado en mia maldekstra orelo ne malaperis, kaj 2) Scivolo pri mia malnova tekokomputilo: neklarigeble ĝi daŭre funkciis perfekte. Mi rememoras ke antaŭ ĝin ŝalti mi tenis ĝin en miaj manoj, tiam ŝaltis ĝin kaj rigardis mire la ekranon. La dosieroj kaj ĉiuj informoj estis sendifektaj. Ie en mia menso mi faris noton pri tiu ĉi miro kaj dek kvin jarojn poste ĝi revenis.

12

La atakoj neniam ĉesis. Sed la plej malfacila parto estis alfronti la minacojn kontraŭ mia familio.

Iun matenon mi eliris el El Ubérrimo por fari kelkajn demarŝojn kiuj estis propraj de la brutobredada agado. Kiam mi revenis, la domo estis ĉirkaŭita far taĉmento de viroj armitaj. Preskaŭ krevis mia koro. Mi eliris el la aŭto antaŭ ol ĝi haltis tute kaj mi kuris al la domo. Por mia korfaciliĝo, ili estis homoj de la kolombiaj Sekurigaj Fortoj: ili estis ricevintaj el la informiĝfako sciigon laŭ kiu tiunokte oni estis kidnaponta min. Ili venis por rekomendi ke ni foriru tuj el El Ubérrimo. Ni enmetis niajn posedaĵojn en la aŭto kaj veturis plurajn horojn. En la vespero ni haltis ĉe malgranda hotelo apud la vojo. En la ĉambro, kaj dum mia edzino kaj miaj infanoj dormis, mi sentis denove la humiligon: mi fuĝis el la bieno jam la duan fojon. Ankaŭ mi sentis kulpon: mi estis submetante mian familion al danĝero.

En 1996 —dum la dua jaro de mia regado kiel departementestro de Antjokio— ni malkovris komploton kiu celis forrabi niajn filojn el la buso survoje al la lernejo. Ekde tiam, ili kaj Lina estas 24 horojn ĉiutage sub la oficiala protekto de niaj sekurigaj fortoj. Jam en 1991 ni estis eskapintaj —apenaŭe— el komploto de la FARK por forrabi mian edzinon Lina. Eĉ mia patrino ne estis libera de minacoj: post kiam mi estis elektita kiel departementestro, mi vizitis ŝin en ŝia hejmo la unuan tagon de la patrino. Ŝajnas, ke iuj sekvis min, laŭ tio ĉi: ekde tiu tago nia informiĝservo detektis plurajn planojn celantajn forrabi ŝin. Neniam ŝi akceptis eskorton aŭ oficialan veturilon, nur konsentis vendi la domon kaj transloĝiĝi al loko kies adreson ni konservis sekreta.

Mi scias kiel malfacila ĉio ĉi estis por la personoj kiujn mi amas. Kiam Jerónimo estis dekdu-jara, li diris ke li ne volis dormi en ĉambroj stratoflankaj, ĉar li timis la bombojn. La minacoj malhelpis mian fraton iri denove al malgranda bieno kiun li posedis. Unu domo de lia bieno estis bruligita far la gerilistoj. Kaj gvatas min la senĉesa timo ripeti la historion: Volu Dio ke miaj filoj ne estu devigataj sepulti antaŭtempe sian patron, kiel okazis al mi.

Kial mi restas en politiko? Ĉar la malĝoja rigardo de Tomás en tiu bieno en Córdoba diris al mi ĉion. En ĝi mi vidis, kiel la heredaĵo de violento en Kolombio estis transdonita de generacio al generacio, kaj mi volas —pro miaj filoj kaj pro ĉiuj gefiloj— ke tiu heredaĵo malaperu. Mia generacio neniam konis eĉ unu tagon de paco: ekde La Violento ĝis la apero de la armita maldekstrismo kaj la kvazaŭarmeanoj, tra la kresko de la ŝakristoj kaj la stariĝo de la drogŝakristoj teroristoj. La Patrujo estis vidanta kuri senhalte la sango de siaj civitanoj. Tial mi avidas ke la generacio de Tomás kaj Jerónimo povu sperti iutage tiun Kolombion mirindan, en ĝia tuta gloro, kun nenio da mizero. Ke ili povu kreskigi siajn gefilojn en tia Kolombio kie la hejmoj ne estu minacataj far homoj armitaj.

Mi kredas je Dio kaj fidas pri en ĝiaj intencoj. Mi kredas persono ĉirkaŭata far la taŭgaj homoj kaj gvidata far la ĝustaj valoroj povas turni la destinon de lando. Tiuj konvinkiĝoj subtenadis min en la plej mallumaj momentoj kaj instigis min iri antaŭen sen ripozo.

Post tiom da jaroj, mia korpo estas kvazaŭ registro de ĉiuj traŭmatoj: mia hararo fariĝis griza, miaj artikoj malmoliĝis kaj, ekde tiu nokto en la hotelo Orquidea Real, mi aŭdo zumas. Mi estis, tamen, kaj en stranga maniero, tre bonsorta: la plej malbonaj cikatroj, kontuzoj kaj ŝvelaĵoj en mia korpo, ne estas pro bomboj nek kugloj, sed pro laborado en la bieno kaj pro akcidentoj en la malsovaĝigo kaj dresado de ĉevaloj. El ie malproksime mi povas ankoraŭ aŭdi mian patron krianta al mi ke mi restu genuante dum li ridas ĉar, en ĉiu ĉi batalado, pli la bestoj ol la homoj faris al mi fizikan damaĝon.

TRIA PARTO

Persisto

“Dio donas venkon al la persisto”

SIMÓN BOLÍVAR

1

—Venu viziti min venontsabate ĉe Hotelo Intercontinental en Panamurbo —diris la voĉo en la telefono—. Mi havas mesaĝon de amiko por vi.

La alvoko estis de Gabriel García Márquez kaj la "amiko" riveligis esti Fidel Castro.

Estis en frua 1997. Mi estis reganto de Antjokio kaj mi strebis konservi kelkajn el la progresoj kiujn ni faris en la departemento. La alvoko de Garcia Márquez ne estis tute neatendita: kelkajn jarojn antaŭe ni estis interkonatigitaj far komunaj amikoj dum iu vespermanĝo. Mi ĉiam sentis grandan admiron pri tiu viro, pro liaj literaturaj meritoj —kiuj igis lin gajni la Nobelpremion en 1982—, pro la bona bildo kiun li donas de nia lando en la mondo, kaj ankaŭ ĉar malgraŭ ke li loĝis en Meksiko ekde multaj jaroj antaŭe, li havas grandan pasion: la paco en Kolombio. Ĉi tio, lia natura inteligenteco kaj lia karismo klarigas kial García Márquez estis ankaŭ unika kaj tre utila mesaĝisto, kiu povas paroli kun homoj el ĉiaj devenoj kaj ideologiaj tendencoj.

García Márquez estis demandinta min, kelkajn monatojn antaŭe, ĉu mi havis iun intereson pri la starigo de dialogo kun la FARK. Mi respondis jes; ke mi estis interesita pri iu ajn speco de interparoloj kiuj povus konduki al la paco kaj ke se la kondiĉoj permesas tion, mi akceptus, en kunordigo kun la Nacia Registaro, paroli kun la FARK. Garcia Márquez tiam diris al mi, ke li estis pasigonta la Kristnaskon kaj la novjaran komenciĝon kun Castro en Havano, kaj ke poste li informos min. Kelkaj monatoj pasis sen novaĵoj, ĝis la tago kiam mi ricevis la telefonvokon kun la invito al Panamo.

La priakorditan tagon mi vojaĝis akompanita de la Sekretario de Registaro, Pedro Juan Moreno, kaj de la Komisiito pri Paco, Jaime Jaramillo Panesso. Ni pasigis kelkajn horojn kun Gabo¹ en hotela apartamento parolante, demandante, klopodante atingi pli vastan perspektivon. La ŝlosilo de la mesaĝo estis jena: Castro tenis regulan kontakton kun la altranga gvidantaro de la FARK, per ili li sciis ke ili deziris eniri en novan pacprocezon kun la kolombia registaro. Tamen —laŭ la mesaĝo—, Castro kredis ke la sola

1 NT Karesnomo en Kolombio por Gabriel García Márquez (kvazaŭ "Gaĉjo").

intereso de la FARK por intertrakti estis krei la kondiĉojn por batalhalto kiu permesus al ili pligi sekrete sian militan potencon.

—Mi pensis ke tio estas scienda de vi —finis García Márquez. Li parolis rekte kaj li ne juĝis mian sintenon nek la ilian. Kiel kutime, pri la signifo de tiu deklaro li estis lerta en sia verdikto:

—Venos malfacilaj jaroj —li diris, kun ekbrilo de malgajo en siaj okuloj.

Mi supozas ke en tiu tempo multaj kolombianoj —inter kiuj estis mi mem— esperis ian progreson survoje al la paco. Iuj el la plej malgrandaj armitaj grupoj estis protektiĝintaj sub amnestia interkonsento en la 1990-aj jaroj, kaj oni konjektis, ke la falo de la Berlina Muro kaj la okulfrapaj triumfoj de demokratio kaj kapitalismo eble estis instigontaj la grupon FARK sekvi ilian ekzemplon. Tamen, Castro tiam povis vidis tion kion tre malmultaj vidis: ke obseditaj far la fluo ĉiufoje pli granda de mono deveninta el trafiko de drogoj, la FARK havis neniun intereson pri fari la pacon; lia libro *La paz en Colombia*¹, skribita kelkan tempon poste, tion konfirmas. Ili celis firmigi siajn poziciojn, ne malmunti ilin.

La idealisma movado maldekstrisma, kiu iam altiris miajn kunulojn de universitato, estis malaperinta; alio okupis tiam ĝian lokon kaj havis, ironie, monprofitan celon. La transformiĝo komenciĝinta en la okdekaj jaroj estis preskaŭ kompleta.

"En la naŭdekaj jaroj, la agoj de la FARK koncernis pli la rabadon kaj mem-vivtenan militismon ol la postrestantajn sociajn plendojn", skribis Michael Reid, redaktoro pri Latinameriko de la gazeto *The Economist*, en sia libro *Forgotten Continent*². La informiĝaj agentejoj de Kolombio kaj Usono kredis ke almenaŭ du trionoj el la frontoj de la FARK okupiĝis al drogŝakrado. En la komenco, tiu kontraŭleĝa grupo estis enirinta en la negocon de narkotajtrafiko per la eltrudo de "impoto" el la kokainproduktantoj en areoj kie ĝi aktivis, tamen, fine de la naŭdekaj jaroj ĝi partoprenis en la tuta provizĉeno. Kiam Luis Fernando Da Costa, alinomita "Fernandinho", brazila drogŝakristo fifama pro tio, ke li interŝanĝis kokainon kontraŭ armiloj kun la FARK, estis detenita kaj arestita far kolombiaj aŭtoritatoj proksime de la limo inter Kolombio kaj Venezuelo, oni demandis lin, kiel li faris negocon kun

1 NT *Paco en Kolombio*.

2 NT *Forgesita Kontinento*.

la ĉefoj de FARK, Fernandinho respondis: "Ili ne havas ideologion. Ili estas tie pro la mono. Ili fariĝis kapitalistoj, kaj ili nur deziras la monon, la monon, la monon ...".

La "ideologio" estis vanuinta kaŭze de, iomgrade, la realaĵo. Multaj el la maljustaĵoj de Kolombio, pro kiuj iam la FARK kaj aliaj deklaris batali, montris provajn signojn de pliboniĝo. Inter 1970 kaj 1995, la ekstrema malriĉeco en Kolombio —difinita laŭ la nekapablo plenumi la bazajn bezonojn— falis el 70 procento ĝis 27 procento, danke al prudenta makroekonomia administrado kaj modernigaj reformoj; inter ili, tiuj kiuj ni estis apogintaj en la Senato. Ankaŭ la socia malegaleco malpliigis. La demokratio fariĝis pli aperta kaj kun pli disvolvigitaj institucioj. Ja, Kolombio estis ankoraŭ lando kun grandegaj mankojn rilate edukadon, sanon kaj laborpostenojn, inter aliaj aferoj, tamen, ĝi povus superi ilin kondiĉe ke ni povu atingi pli altajn nivelojn de paco kaj sekureco.

Malfeliĉe, la tuta mono pri kiu Fernandinho parolis ebligis la rearmitigon de la FARK kaj la kresko de ĝia membraro: en la malfruaj naŭdekaj jaroj, ĝi havis pli ol 18.000 gerilistoj, plus 12.000 urbaj bandanoj laŭkalkule. Ĝi plifirmigis ankaŭ siajn asociigojn kun fremdaj terorismaj grupoj kiel ETA —eŭska separisma grupo— kaj la Irlanda Respublika Armeo (IRA), kiu sendis kelkajn el siaj membroj al Kolombio por trejni anojn de la FARK pri la fabrikado de aŭto-bomboj kaj aliaj formoj de urba terorismo. Tamen, la FARK ne estis la solaj kiuj kreskis. Ankaŭ la NLA kaj la kvazaŭarmeo. Ĉi-lastaj pliigis senbride siajn murdojn kaj drogoj-rilatajn aktivecojn.

La historia manko de politika volo en Kolombio por alfronti la neleĝajn armitajn grupojn kaj la leviĝo de ĉi tiuj danke al la riĉeco generita per la drogo, troŝarĝis nin. En la naŭdekaj jaroj, la fluo de mono kiu eniris en Kolombion ŝuldite al drogoj estis taksata je inter 2,5 kaj 3 miliardoj da usonaj dolaroj ĉiujare, kio valoregalis al proksimume 3 procento de nia malneta enlanda produkto, dum la buĝeto por defendado estis nur 2,8 miliardoj —inkluzivante pensiajn kostojn—, kaj la kolombia armeo havis ĉirkaŭ 140.000 soldatojn —nur duonon de kiom estas necesaj laŭ iuj taksoj—, el kiuj proksimume 20.000 aŭ malpli estis en kondiĉoj por batali.

En 1998, la generalo Manuel José Bonett, komandanto de la Militaj Fortoj, asertis ke niaj Fortoj estis en "pozicio de malsupereco" rilate al la FARK. En tiu tempo lia opinio estis vaste akceptita sed ĝi ne kaŭzis perturbon. Tiutempe la estro de la Suda

Komanditaro de la Usona Armeo deklaris, en publika letero, ke la Armitaj Fortoj de Kolombio, la "plej minacata" lando en la Okcidenta Hemisfero, "ne estas je la nivelo por la tasko alfronti kaj disvenki " la grupon FARK. La fragmentiĝo de nia teritorio estis tia, ke la komisiito pri homaj rajtoj de UN priskribis Kolombion kvazaŭ "la Bosnio de Latinameriko". Tamen, eble la plej maltrankviliga afero estis raporto de 1997 de la Defenda Informiĝ-Agentejo de Usono, kiu konkludis ke la FARK povus venki la kolombian armeon en kvin jaroj se la Armitaj Fortoj ne ricevus eksterordinaran provizon de rimedoj. Unuafoje, la Nacia Registaro estis en reala danĝero.

Gabo pravis: malfacilaj tempoj atendis nin.

2

Tio estis nekutima sceno en kampara zono de Kolombio: proksimume ducent homoj kunamasiĝantaj en malgranda pavilono estis tuj ĉeestontaj seminarion havigita far unu universitato de la "Ivy League". Tamen, kiel mi jam diris, ankaŭ la tiamaj cirkonstancoj estis nekutimaj kaj mi timis ke la tempo por ke ni adresu al tiuj homoj estis elĉerpiganta.

Mi estis invitinta profesoron Roger Fisher —mia instruisto en Harvard kaj aŭtoro de *Getting to Yes*, mondfama libro pri la intertraktadoj— por gvidi seminarion pri kiel solvi konfliktojn pace. La loko estis Urabá, regiono en la kariba marbordo de Antjokio sinkanta en teritoria batalo kies normoj de krueleco superis eĉ tiujn de aliaj regionoj de Kolombio.

Pro ĝia agrokultura riĉeco —en Urabá estas preskaŭ 62 procento el la bananaj kultivaĵoj de la lando—, la kvazaŭarmeo kaj la armita maldekstrismo estis pretaj fari ion ajn, eĉ ajnan nehumanajn, por atingi la regon sur tiom avidita teritorio. Almenaŭ 700 homoj (multaj el ili laboristoj de bananaj entreprenoj) mortis en tiu ĉi regiono dum la unuaj naŭ monatoj de 1995: en nur unu semajnfino, iom da tempo antaŭ la seminario, tridek kvar homoj mortis. Kiam en tiu jaro la tiama prezidento de Kolombio deklaris staton de krizo —decido por kiu la okazaĵoj en Urabá ne estis malgranda kialo—, li rezignacie priskribis la landon, en parolado elsendita televide, kiel "la plej violenta en la mondo". Kaj la gazeto *The Economist* skribis: "Ĉu vi pensas ke bazaro en Sarajevo estas danĝera? Aŭ ĉu buso en Jerusalemo? Iru al la regiono Urabá en Kolombio".

Por iuj homoj eble ŝajnas senutile aŭ eĉ frivole, inviti eminentan profesoron de Harvard por paroli pri "intertraktadoj bazitaj sur sintenoj" kaj "kongruaj interesoj" meze de milito inter bandoj. Tamen, mi ĉiam kredis, ke se nia celo estas la paco, ni neniam povos atingi ĝin nur per militaj metodoj.

Kiel reganto de Antjokio kaj en la sekvintaj jaroj, kiam mi laboris kiel prezidento, multaj homoj asociis mian nomon al la sekurecaj gvidlinioj kiujn mi efektivigis. La vero estas ke mia devontigo kun la socialaj aferoj —en kiuj ludas gravan rolon la faktoroj responsaj pri la violento— havas la saman gravecon. Mi ne kredas ke malegaleco

estas la rekta kaŭzo de violento —multaj landoj havas pli grandajn malriĉecon kaj malegalecon ol Kolombio kaj tamen ili havas kompare multe pli malaltajn nivelojn de violento—, sed mi ja kredas ke iu ajn daŭra solvo en sekureco nepre implicas alfronti la sociajn malbonojn: ripari la dividojn kiujn kreas la malriĉeco, krei pli da ŝancoj por la popolo, ŝanĝi la kulturon de perforto kiu trempas nian historion, inter aliaj.

Kiel grava faktoro en la konstruado nia socia strukturo, la perforto fariĝis la "facila" rimedo, por multaj homoj je ĉiuj niveloj de la socio, por solvi siajn problemojn. Jardekoj da barbarajoj sensentigis la homojn, instruante ilin mortigi kaj perdi la respekton al la homa vivo. Por kontraŭbatali adekvate tian kontraŭkulturon, necesas civitana edukado en ĉiuj socitavoloj, kiu ebligu plibonigi la rilatojn inter gepatroj kaj gefiloj, edzoj kaj edzinoj, instruistoj kaj disĉiploj, dungantoj kaj dungitoj. Ni pensis ke donante al la homoj pli bonajn ilojn por solvi siajn problemojn, ĉu en la hejme aŭ en la strato, okazos signifa diferenco. Kaj ni povus redukti, ankaŭ, la probablon, ke la junuloj estus varbitaj de kontraŭleĝaj armitaj grupoj.

Tiuj estis la kialoj kiuj impulsis nin, el la registaro, por serĉi urĝe la aliron al la seminario por kiel eble plej multaj homoj. Ni trejnigis lernejarajn instruistojn kaj gvidantojn de la tuta Antjokio por ke ili povu instrui la kurson pri mastrumado de konfliktoj de Profesoro Fisher kaj disvastigi lian mesaĝon. Sandra Ceballos, samklasanino mia en Harvard, gvidis multajn el tiuj seminarioj. Je la fino de mia trijara regado kiel departementestro, pli ol 90.000 personoj estis ricevintaj lerno-atestilojn pri la principoj de la programo de Profesoro Fisher kaj estis distribuitaj miloj da etaj kartoj enhavantaj la bazajn postulatojn de konflikto-solvo. Tiujn kartojn mi portadis en la poŝoj de miaj vestoj kaj en miaj valizoj, kaj mi disdonis ilin al preskaŭ ĉiuj kun kiuj mi parolis. Samtempe, ni provis ĉion kion ni povus fari por havigi solvojn al la perforto en la mallonga kaj longa limtempoj.

Por atingi tion, ni devis esti kreivaj. Mi ofte diras ŝerce, ke Dio donis al mi grandegan administran kapablon, sed etan ĉekaron. Kiam mi ekestis departementestro, la financoj de Antjokio estis malfortikaj. Ĉi tio devigis nin serĉi solvoj kiuj ne postulu grandan kvanton de mono. Ni trovis kelkajn: ni pligrandigis programon de muzik-lernejoj por krei junularajn orkestrojn en ĉiuj municipoj de Antjokio, ĉar ni fidis ke infano kiu ludas muzikilon neniam

ekprenos pafarmilon. Ni sciis pri la tiame delonga malabundo de spaco en niaj lernejoj, do ni decidis apliki programon por ke la Ŝtato pagu al la Katolika Eklezio kaj al aliaj privataj servo-provizantoj neprofitcelaj la malfermon de novaj lerno-lokoj: 100.000 estis kreitaj dum tri jaroj, duoble ol ĉio kio estis kreita dum la antaŭa jardeko.

Por atingi pli da mono kaj pligrandigi la investadon en aliaj agrogramoj, ni rigardas internen. Post serioza studado pri kostoj kaj bezonoj, ni decidis redukti per pli ol 60 procentoj la dungitaron de la registaro de Antjokio. Tiu reduktado igis min akiri multajn malamikojn, tamen ĝi estis absolute esenca: nur tiel eblis financi la infrastrukturajn projektojn kaj sociajn agrogramojn kiuj favoris la malaltan kaj mezan sociklasojn. Ni ankaŭ aplikis la novan sistemon de socia sanasekuro por ŝtataj laboristoj, kiu reduktis la koston per 75 procento kaj plibonigis la kvaliton. Refoje ni ne lasis nin esti venkitaj far la protestoj de tiuj kiuj laŭte denunciis la "privatigon". La reformo al la socia sanasekuro, aprobita de la Kongreso en 1993 —post la bombado al la Hotelo Orquídea Real— permesis al ni havigi subvenciitan medicinan zorgon al pli ol unu miliono da homoj bezonantaj tion en nia departemento (kiu tiutempe havis loĝantaron de kvin milionoj). Ni kreis kooperativajn bankojn por pliiĝi la fontojn de etaj monpruntoj kaj aliaj formoj de kredito por homoj kun malaltaj enspezoj. Ni triobligis la kvanton de pavimitaj vojoj en la departemento, kaj finis kaj ekfunkciigis la metroon en Medegino, projekto kiun mi estis apoginta ekde ĝia komenco kiam mi estis urbestro.

Tiuj klopodoj estis rimarkitaj el eksterlando. Skizo pri nia laboro, publikigita en *The Wall Street Journal* en 1997, priskribis tiun periodon kiel "la rakonto pri socio en procezo de rekonstruado, kun la riskoj prenendaj, kaj unu leciono por la cetero de la lando".

Tamen, eĉ en niaj plej bonaj momentoj, la kerno de la neevitebla realaĵo de Kolombio ĉiam trovis manieron prezentiĝi.

Tio okazis dum la semajno dum kiu Profesoro Fisher estis en Urabá. Iun matenon mi leviĝis, kiel kutime, je la 4:30 por iomete gimnastiki. Minutojn poste mi ricevis la alvokon: dudek kvar laboristoj de bananaj entreprenoj estis elirigitaj el buso, devigitaj genui sur flanke de la vojo kaj senkapigitaj unu post unu.

Je la tagiĝo mi eliris el la sidejo de la seminario por viziti la scenejon de la krimo kaj kontroli la komencon de la enketo. El la fenestro de la aŭto en kiu mi veturis, mi kontemplanis la fekundecon

de tiu regiono kaj mi suferis la doloron kiu ĝin turmentis. Tiam mi komprenis, ke en mia koro reasertiĝis malnova konvinkiĝo: por solvi niajn problemojn ni bezonis pli ol bonajn socialajn gvidliniojn. Ni ankaŭ devas alfronti la krimulojn.

3

—Reganto, amiko! Bonvole helpu nin! La gerilistoj detruas la vilaĝon!

Estis la unua horo matene. Du semajnojn antaŭe mi estis enoficiĝinta kiel departementestro. La alvoko estis de mia amiko Jesŭs Arsecio Botero Botero, eksa urbestro de El Peñol, urbeto kiu situas nordoriente de Medeĝino. El Peñol estis bone konata de mi ekde kiam mi laboris en *Empresas Pŭblicas de Medellin*, kiam mi okupiĝis pri la malfacila tasko transloki la tutan vilaĝon por ke oni povu konstrui akvrezervujon. Kriante en paniko, Jesŭs Arsecio diris al mi telefone, ke la gerilistaro estis prenanta la vilaĝon.

Malfeliĉe, ni ne havis multajn ŝancojn por savi la vilaĝon El Peñol: malgraŭ la amplekso kaj karakterizaĵoj de la tero en nia departemento, ni en Antjokio ne havis militajn helikopterojn. Do, mi telefonis al la Ministerio pri Defendado en Bogoto por peti helpotrupojn. Fernando Botero Zea (kiu ne estis parenco de la urbestro) estis serioza kaj respondeca ministro, tamen, same kiel ni, li havis delongan malabundecon de rimedoj. Li pardonpetis kaj diris ke la sola disponebla rapida ilo por reagi estis helikoptero en Sankta Marta¹, je du aŭ tri horoj da flugo ĝis Medeĝino. Mi insistis, ke ni bezonis ion pli rapidan. Li tiam proponis sendi armean trupon surtere. Tio estis riska: tiutempe abundis teroristaj blokadoj sur la vojoj kaj aliaj obstakloj. Sed ni ne havis alternativon.

Eĉ ne sciante kiamaniere mi povus helpi, mi devis iri. En momento de krizo, oni devas esti en la loko de la okazajoj por havigi la necesan apogon. Mi eniĝis en la civilan helikopteron de la departementestra oficejo por ekiri al El Peñol. Kiam ni surteriĝis, la teroristoj kaj la Armeo interŝanĝis pafojn en la stratoj. Iom poste niaj fortoj superregis, kiel ili kutimis fari kiam ili povis alveni ĝustatempe. Mi kunvokis por improvizita kunveno en la urbodomo kaj mi certigis al la popolo de El Peñol ke la Ŝtato protektos ilin.

Kiam ambaŭ restis solaj, mi donis grandan brakumon al Jesŭs Arsecio kaj dankis lin.

1 NT Urbo situanta en la nordo de Kolombio, 996 km for de Bogoto.

—Ni rekuperis la regadon de El Peñol —mi diris al li—. Ni estas ĉi tie por apogi vin ĉiujn. La vilaĝo estas nun sekura.

Multe por mia bedaŭro, mi ne povis teni la devontigon. La teroristoj eltrovis ke la telefonajo de Jesús Arcesio provokis la militan respondon. Du semajnojn poste, ŝpruco de kugloj trafis lin, kiam li eliris el sia hejmo kun sia eskortisto. Ambaŭ viroj estis murditaj far sikarioj.

Mi faris ĉion kion mi povis fari por protekti la 125 urbestrojn de Antjokio, kaj por certigi, ke ili povu realigi sian laboron en normalaj kondiĉoj. Tamen, ni havis pli da volforto ol da rimedoj. Ni donis al ili polican protekton, kaj en tiuj urbetoj kie la teroristoj estis prenintaj la regadon, ni revenigis la urbestrojn eskortitaj per blenditaj kamionoj. Tiuj estis rustikaj veturiloj, simple taŭgigitaj, tamen, kapablaj vanigi la kuglojn kaj sendi potenca mesaĝon de fortikeco. Tamen, la FARK kaj la NLA obstinis en forpeli ĉiujn urbestrojn kaj ŝtatajn reprezentantojn demokratie elektitajn, por tiel certigi la rezulton de sia krima agado. Por nia konsterno, multaj urbestroj estis kidnapitaj kaj murditaj.

La agoj de la FARK havis unikan hipokritecon. Ĝis 1988, ĉiuj urbestroj en Kolombio estis nomumitaj far la departementaj regantoj. Tiu procedo estis denunciata far la FARK kiel pruvo de la neperfekteco de la kolombia demokratio; ili proponis la rektan elekton de urbestroj kiel ĉefa kondiĉo por sia eventuala malarmado. Por la jaro de la sturmo en El Peñol, la leĝo jam entekstigis la elekton de urbestroj per popola voĉdonado. Ĉu tiam la FARK decidis senarmiĝi? Tute male: ili pliiĝis la murdojn kaj sistemajn kidnapojn kontraŭ tiuj simboloj de tia demokratio kiun ili fanfaronis apogi.

Frustritaj kaj sen la rimedoj por alfronti la problemon en la trafa maniero, ni decidis provi ne tradician solvon: en tiuj municipoj, kie la teroristoj forrabas aŭ murdas urbestron, ni nomumos kiel lia anstataŭanto oficiron el la Armeo. Ĝuste kiel ni esperis, tiu ĉi strategio estis potenca deadmona faktoro. Kaj tion pro du kialoj: 1) Urbestro armeano signifas pli grandan ĉeeston de la Armeo en la areo kaj, sekve, pli grandan premon sur la teroristoj kaj iliaj agoj de kontrabando de drogoj, kaj 2) Ĝenerale, tiaj nomumoj estis malŝatataj de la vilaĝanoj, kiuj, prave, taksis valora sian rajton elekti siajn civilajn reprezentantojn; kaj do la ebla nomumo de militisto havis la efikon igi la teroristojn nepopularaj.

La murdado de urbestroj ĉesis, tamen baldaŭ ni trovis ke tiu solvo estis neplenumbla. La politika praktikado estis enfiltrita far misgvidita ideologio, far la mono deveninta el la drogoj kaj far nova filozofio kiu gajnis ĉiutage pliajn partianojn: la erara ideo ke trankviligante la teroristojn, ni konvinkos ilin ke ili lasu nin trankvilaj.

Iun matenon pluraj urbestroj venis al Medeĝino por fari bruan proteston kaj enmanigi al mi leteron en kiu ili postulis fini la praktikon enoficigi armeanojn kiel urbestrojn.

Kelkaj el la urbestroj petis privatan kunvenon en mia oficejo antaŭ ol liveri la lateron.

—Depatementestro, bonvole ne haltu! —diris unu el ili, dum la ceteraj kapjesis emfaze.

—Via strategio estas la ununura kiu savas nin —diris alia—. Bonvole komprenu ke ni devas transdoni al vi tiun ĉi leteron, ĉar alie la gerilistoj mortigos nin!

Ĉi tian situacion mi travivis kun senpacienca ofteco: private, la homoj diris al mi ke mi pravis, sed publike ili diris alie. Doubla parolo kun tuŝebla kosto. Baldaŭ poste, la tribunaloj preskribis ke la strategio pri urbestroj armeanoj estis kontraŭkonstitucia, kaj la murdado rekomenciĝis.

Spite la minacojn kaj la mankon de politika volo, mi ne enfermiĝis en la oficejo. Mi vojaĝis kun la registaro el unu municipo al alia, defiante la teroristojn per nia ĉeesto. Ne motivis nin bravismo aŭ narcisismo, sed la konvinkiĝo, ke la ekzemplo estis potenca ilo. Ni devis pruvi al la popolo de Antjokio, ke ne timiĝis nin la violentuloj, ke ni venkos ilin kaj ke la vivo ĉiam superregas.

Dum la vizitoj al la municipoj ni suferis senkompatan sinsekvon de atakoj. Estis pluraj la okazoj kiam la helikopteroj en kiuj veturis la generaloj revenis kun kuglotruoj; bomboj eksplodis, estis mortigitaj ĉefoj de la Polico kaj multaj bonfaraj homoj. Unu el la plej dolorigaj epizodoj okazis en Salgar, la malgranda urbeto proksime de la bieno kie mi kreskis, la sama loko kie mi kutimis rajdi kun Lilian Álvarez, mia lerneja instruistino. Ĉeestinte ceremonion, mia polica eskorto estis embuske atakita en la vilaĝo far la teroristoj. Multaj membroj de tiu taĉmento estis mortigitaj.

En alia vojaĝo al Vegachí, urbeto situanta en la nordoriento de Antjokio, mi alvenis iomete antaŭ la planita horo. Dum ni atendis la

duan helikopteron kun la cetero el mia teamo, ni komencis neformalan kunvenon. Kiam la helikoptero surteriĝis, tion ĝi faris sub ŝpruco de kugloj pafitaj far la NLA el proksima monto. Feliĉe, miaj kolegoj sukcesis gliti for. Poste, pluraj dekduoj da teroristoj eniris la vilaĝon pafante kontraŭ la urbodomo. Mi telefonis al Medeĝino serĉante helpotrupojn urĝe, tamen, oni respondis al mi ke neniu povus alveni ĝustatempe al Vegachí.

Kio savis nin? La Dia Providenco. Ni kuŝis sur la planko dum la interŝanĝo de pafoj daŭris. La plano de la teroristoj estis igi la soldatojn persekuti ilin kaj tiel, senprotektigita la urbodomo, enveni por murdi min. La eta armea unuo kiu estis kun ni sciis tion, kaj per granda disciplino kaj taktika lerteco sin defendis kontraŭ la sturmo sen forlasi la urbodomon, ĝis atingi ke la teroristoj retirigis al sia kaŝejo.

Kiam la pafado ĉesis, mi ekprenis megafonon kaj eliris al la ĉefa placo de Vegachí por fari diskurson kontraŭ la terorismo.

4

La kolombianoj *deziregis* sekurecon. Ilia petego por paco penetris ĉion kaj estis tiel sentebla en tiuj jaroj kiel la timo semita far la teroristoj. Kie ajn ni iris, la homoj kuraĝigis nin kaj diris ni estis farantaj la ĝustan agon. Epizodoj kiel tiu en Vegachí ne estis vanaj: Ni vidis kiamaniere, meze de minacoj, naskiĝis ia rezisto inter la loĝantaro de Antjokio. Tio estis la esprimo de espero: se anstataŭ fuĝi, ni alfrontus la teroristojn, ni povus venki. La lukto estis ĉies.

"Por iu ajn kiu vizitas la departementon Antjokion, eble la plej rimarkinda afero estas ne tiom la sinteno de la reganto, sed la fakto, ke la homoj ŝajnas esti ĝuste sur la sama paĝo", skribis raportisto por la gazeto *Semana*, viro kiu ŝajnis iom skeptika. "Ne estas klare ĉu Álvaro Uribe Vélez estas la interpreto de la kolektiva volo, aŭ ĉu lia gvidanteco enplantis ĝin. Tamen la fakto estas ke la popolo de Antjokio, konita pro sia puŝemo kaj efikeco, estas direktante tiujn virtojn al solvo por sia problemo de sekureco".

Je la sepa horo ĉiumatene ni havis kunvenon por diskuti la problemojn de sekureco de Antjokio. Tiuj kunvenoj en ilia komenca epoko estis preziditaj far la Generalo Jorge Enrique Mora Rangel, tre kapabla viro, ilin ĉeestis la altaj ĉefoj en Antjokio de la Armeo, la Polico kaj DAS¹, la regiona Prokuroro, la Komisiito pri Paco, la Prokuratoro² kaj la Sekretario de la Registaro Pedro Juan Moreno. Kvankam la rekta kontrolo sur la Armeo kaj la Polico estas responso de la nacia registaro kaj ne de la departementestroj, tamen, la fakto superrigardi kaj stimuli senĉese la laboron de la sekuriga agentaro estis sufiĉa por estigi grandan diferencon.

Por emfazi travideblecon kaj civitanan partoprenon, la pordoj estis malfermitaj al la publiko. Ĉeestis prokuroroj, advokatoj kaj ombudsmanoj, homoj sendependaj de la aŭtoritato de la departementestro, havantaj alian rigardon pri niaj plej urĝaj

1 NT Departamento Administra de Sekureco.

2 NT En Kolombio "Procurador", funkciulo kiu observigas la Konstitucion kaj la leĝon, prizorgas la protekton de fundamentaj civitanaj rajtoj kaj la respekton por la respondecas de civitanoj, protektas publikajn posedaĵojn, kontrolas la agojn de ŝtatoficistoj kontraŭ malobservo de reguloj kaj misuzo de stataj rimedoj. Esploras disciplinajn ofendojn de ŝtatoficistoj kaj povas ilin juĝi.

problemoj de sekureco. Ni ankaŭ serĉis konstantajn retrosciigojn kiuj permesu al ni respondi rapide al tujaj bezonoj. Tiel, ekzemple, se okazis ondo da ŝtelado de aŭtoj, tiam ni kunvenis kun la asekuraj kompanioj kaj la agenturistoj, ni aŭskultis iliajn sugestojn kaj starigis rektan ligan kun la Polico. Mi donis intervjuojn per radiostacioj por respondi la demandojn de la personoj kaj aŭskulti iliajn plendojn. Tiu ĉi travidebla strategio de administrado kaj konstanta engaĝiĝo en ĉiun detalon estis fruktodona: ni komencis gajni terenon kontraŭ la krimo.

Tio ne estis sufiĉa, tamen. Ni bezonis trovi aliajn eblojn kiuj permesu al ni lukti pli ĝisfunde kontraŭ la violento en la departemento. En 1994, unu jaron antaŭ mia elekto kiel departementestro, la Nacia Registaro kaj la Kongreso aprobis krei privatajn grupojn kiuj, sub la deproksima superrigardo far la Ŝtato, servu kiel apogo al la armeanoj en kelkaj agadoj. Tiu jaro okazis balotelekto, kaj la nova prezidento decidis krei tiujn grupojn, pligrandigi iliajn povojn kaj doni al ili nomon: "Convivir".

Kelkaj grupoj Convivir estis konstituitaj kiel retoj de informantoj —ne tro malsimilaj al la grupoj de "kvartala gardado" en la plej riĉaj landoj—: ili havis porteblajn sendricevilojn kaj informis pri la deliktaj agoj por ke la Armeo povu reagi. Estis permesite al aliaj havi armilojn, tamen iliaj agadoj estis deproksime kontrolataj far la aŭtoritatoj. La tiutempa ministro pri Enlandaj Aferoj asertis, ke la Registaro estis kreinta la grupoj Convivir "por ke la civitanoj povu kunlabori kun la Armitaj Fortoj, kun la celo doni pli altajn nivelojn de sekureco al la kolombianoj, precipe en kamparaj areoj".

La iniciato pri la grupoj Convivir estis apogita far du sinsekvaj prezidentaj administradoj kaj multaj kolombiaj politikistoj, krome, la leĝo kiu kreis tiun ĉi kategorion estis aprobita far la Konstitucia Tribunalo. Ĝi ankaŭ havis siajn riproĉantojn, kiuj vidis tiun iniciaton tra la prismo de la freŝa historio de Kolombio kaj timis ke ĝi povus konduki al nova generacio de kvazaŭarmeanoj. Ni pesis tiun ĉi riskon zorgeme kiam ni konsideris la eblon estigi la grupoj Convivir en Antjokio.

Mi decidis, fine, ke aldona helpo por kontraŭbatali la violenton estis urĝa. Multe por mia konsterno kaj daŭra frustrateco, la Armeo kaj la Polico de Kolombio ne havis armilojn nek personaron sufiĉan por kontraŭefiki la pliigitajn rimedojn —devenintaj el kokaino— de la dogŝakristoj teroristoj. Mi kiel departementestro vidis tiun malegalecon en la atakoj en Vegachí, Urabá kaj multaj aliaj lokoj: la

faktoj estis nerefuteblaj. Plie, estis ekster mia dependo asigni pli da rimedoj al la armeanoj, kaj la grupoj Convivir povus doni al ni kadron por ke la civilularo ludu aktivan rolon en la ĝenerala sekureco, per la provizado de informoj. Mi ĉiam kredis ke en lando kun la geografiaj kaj sociaj malfacilaĵoj de Kolombio, la sekureco ne estus ebla se ĝi estus responso ekskluzive de la Polico kaj la Armeo, kaj ke la civitanoj havas la devon helpi garantii la kontinuecon de la Laŭjura Ŝtato.

Alia faktoro estis grava en la decidado: la strikta superrigardo de la programo far la Ŝtato. Se iu el la grupoj Convivir farus misuzojn, ĝi devus esti malmuntita tuj. Tiu ĉi viglado estis kio diferencigis ilin disde la kvazaŭarmeoj, ĉar la celo ne estis helpi aŭ plifortigi ĉi-lastajn, sed tute male: reguligi kaj kontroli la helpaj sekurigaj grupoj, kaj tiel fari nenecesaj kaj malaktualaj la neleĝajn.

Dum la jaroj de nia departementa regado, pli ol 600 grupoj Convivir funkciis tra tuta Kolombio. En Antjokio, ilia nombro estis proksimume proporcia al la procento de ĝia loĝantaro kun respekto al la nacia loĝantaro: inter sesdek kaj sepdek. La kompetentaj aŭtoritatoj detektis misuzojn faritaj de du el ili kaj, kiel planite, ili ambaŭ estis malmuntitaj.

Do, Antjokio ne estis la sola departemento kiu realigis la grupojn Convivir; la procento de tiuj, kiuj havis problemojn estis malalta kaj la korektantaj agoj estis tujaj. Mi faris la eraron proponi ke al kelkaj el la grupoj Convivir estu permesite porti longajn armilojn, kiel fusiloj, por protekti sin kontraŭ la pafopovo ĉiufoje pli granda de la teroristoj. Tio estis malbona decido de mia flanko, kaj mi rezignis pri tiu ideo.

Pluraj el miaj politikaj misfamigantoj uzis miajn decidojn pri sekureco por akuzi min pri esti partnero kun la kvazaŭarmeanoj. Tio ne veras. Kvankam kelkaj el tiuj krimaj grupoj estis kreitaj pro kialoj de persona venĝo —kiel en la kazo de la fratoj Castaño Gil, post kiam la FARK murdis ilian patron—, tia ne estas mia kazo: mi ĉiam sciis ke la plej bona maniero honori la rememoron pri mia patro estas laborante por ke la novaj generacioj de kolombianoj ne estu devigataj suferi la samajn afliktojn pro la violento.

En la naŭdekaj jaroj, la pli tradiciaj kolombiaj politikistoj estis inklinaj al "dialogo" kun la neleĝaj armitaj grupoj, kiel solvo al la violento en nia lando. Multaj el tiuj politikistoj egalvalorigis, malprave laŭ mia opinio, la kvietigon kun la civilizo, kvazaŭ se la

sola funkcio de la Ŝtato konsistus en agi kiel peranto, anstataŭ esti garantianto de la sekureco kaj la teritoria regado. Tiu ĉi vidpunkto igis ke la defendantoj de forta sekuriga strategio estu markitaj kvazaŭ necivilizitaj ekstremistoj kaj, aŭtomate, akuzitaj pri apogo al la kvazaŭarmeo. La gvidantoj de la FARK kaj la NLA sciis kiamaniere utiligi tian preparitan terenon: en sia propagando kaj en aliaj publikaj deklaroj ili komencis nomi min "la departementestro kvazaŭarmeano"; tiel ili misfamigis nian sekurigan strategion, speciale kiam pli ni atingadis sukcesojn en nia batalo kontraŭ ili. Dum tiuj jaroj kaj la sekvintaj mi respondis pacience kaj en klara kaj plena maniero al ĉiuj akuzoj, same al la svagaj kiel al la specifaj. Sed mi ne permesis ke tiu propagando malhelpu min fari tion kion mi taksis ĝusta.

Fakte, danke al la senlaca laboro kaj al la sinofero de la kolombiaj Armitaj Fortoj kaj Polico kaj al la apogo de la grupoj Convivir, ni sukcesis fari palpeblajn pliboniĝojn en la sekureco de Antjokio: ni restarigis la regadon super la aŭtovojo Medeĝino-Bogoto, ni malpliigis 30-procente la kidnapojn en Antjokio kaj, okazis io tre grava: la homoj komencis kredi ke, alfrontante kun rezoluteco la violentulojn, siaj vivoj pliboniĝos. "Se la opinio inter la loĝantoj de Bogoto estas ke ilia urbo estas infero kun eta probable ŝanĝiĝi, la homoj de Antjokio pensas alie", atentigis tiutempe la gazeto *Semana*. "Ĉi tiu departemento fariĝis speco de provmodelo kaj la cetero de Kolombio rigardas ĝian eksperimenton kun granda intereso".

Por mia senluziigo, tamen, nia tiel nomita "eksperimento" ne estis daŭranta longan tempon.

Mi sciis ĝuste tion kio estis venonta, tamen mi estis senpova por haltigi ĝin —kaj tio doloris min—. Rilate sekurecon, granda parto el tio kion ni jam estis atingintaj, perdiĝis kun maltrankviliga rapido: nur du semajnojn post la fino de mia regado kiel departementestro, la teroristoj reakiris la regon de la aŭtovojo al Bogoto. Baldaŭ poste, la neleĝaj armitaj grupoj rekomencis sian teritorian ekspansion, kaj la drogŝakrado kaj kidnapoj pliigis denove al antaŭaj niveloj.

Pluraj kialoj povas ekspliki tiun dekadencan. Kelkaj estas logikaj, aliaj simple bizaraj. Iuj estas rilataj kun la kolombia realaĵo de la naŭdekaj jaroj, aliaj estas rilataj kun eventoj kaj tendencoj eksteraj al la lando. Aparte malnobla epizodo evidentigis la eksterordinarajn defiojn de la epoko.

5

Eble estas la tropika suno, eble ia romantika ideo de kelkaj homoj pri la "gerilo" kaj la milito en la ĝangalo, travivinte neniun el la du. Kial ajn, la vero estas ke, dum la pasado de la jaroj, iuj homoj subite troviĝis en la ĝangalo kaj agis en maniero kian ili neniam pensis ebla en la lando kiu vidis ilin naskiĝi. Kelkfoje ilin gvidas bonaj intencoj, kelkfoje ne. Ofte, ili vidas Kolombion kvazaŭ la loko kie ili povas realigi siajn plej profundajn fantaziojn, sen ke ili mem nek iu alia suferu la konsekvencojn. Mi konis plurajn el tiaj homoj dum la lastaj jaroj, tamen, malmultaj ekzemploj estas pli maltrankviligaj kaj instruaj ol tiu de germano nomita Werner Mauss.

Mi eksciis pri li la tagon kiam mi ricevis telefonvokon de la direktoro de Río Claro, cementprodukta kompanio. Li rakontis al mi ke kelkajn tagojn antaŭe grupo de eŭropaj asesoroj estis ostaĝigita far la NLA kaj ke per elaĉeta pago de du milionoj da usonaj dolaroj —farita en Eŭropo pere de unu germano— preskaŭ ĉiuj ostaĝoj estis elliberigitaj.

Tiutempe, la FARK, la NLA kaj la kvazaŭarmeoj faris kolosajn kapitalojn danke al la kidnapoj kaj moneltordoj, kaj pluraj multnaciaj entreprenoj estis viktimoj de ĉi tiu trudado. Meze de la naŭdekaj jaroj oni kalkulis ke ni la kolombianoj pagis 350 milionojn da usonaj dolaroj ĉiujare por elaĉetoj, kvanto egala al nia ĉiujara eksporto de bananoj, la tria el la agrokulturaj varoj plej gravaj de la lando. En multaj kazoj, la transnaciaj korporacioj faris regulajn pagojn per kontanta mono al kontraŭelegaj grupoj intersanĝe por "protektado". Aliaj pagis unuopajn elaĉetojn. La kvantoj estis tiel altaj, ke mi foje demandis min ĉu la kidnapo fariĝis industrio kapabla reproduktiĝi de ene, ĉu foje senskrupulaj maklerantoj profitis finance aŭ agis en koluzio kun la krimuloj en iuj etapoj de "proviza ĉeno".

Mi ne havis mankon de pravo, baldaŭ post la okazintaĵo en Río Claro, la NLA kidnapis siorinon Brigitte Schoene, edzino de la iama direktoro de unu germana kompanio. Tuj ni komencis labori kun la Polico por atingi ŝian elliberigon. Post kelkaj intertraktadoj, la Polico sukcesis redukti la financajn pretendojn de la teroristoj al dudek milionoj da pesoj por forliberigi ŝin. Ĉio ŝajnis iri kiel planite,

tamen, subite mi ricevis telefonvokon de generalo Alfredo Salgado Méndez:

—La interkonsento ruiniĝis —Salgado, furioza, informis min—. Nun la NLA petas 150 milionojn da pesoj por elliberigi ŝin.

—Kial?

—Ĉar tiu germano partoprenas en la intertraktadoj kaj la gerilistoj nun petas pli da mono.

Ni baldaŭ ekkonis aliajn detalojn: ke la nomo de la germano estis Werner Mauss, ke li estis dirinta al la edzo de Brigitte Schoene ke ŝiaj ostaĝigintoj estis kvazaŭarmeanoj, kaj ke li situis en la ĝangalo kun la NLA kiam li faris la vokon per satelita telefono. La pruvoj akumuligis kaj, tiam la oficejo de la ĝenerala prokuroro elsendis mandaton por lia aresto.

Kelkajn tagojn poste mi ricevis alian telefonvokon de generalo Salgado. Estis la kvina horo en la mateno. La Polico estis arestinta sinjoron Mauss en Medeĝino kiam li provis eniĝi en leĝeran aviadilon kun la ostaĝo Brigitte Schoene sub sia gardo. Oni eltrovis ke li posedis plurajn pasportojn kun diversaj nomoj kaj dokumentojn en kiuj ŝajnis esti listigitaj monsumoj kaj nomoj de ŝtataj funkciuloj, malkovro, kiu kondukis la aŭtoritatojn suspekti ke subaĉetoj estis pagitaj.

Tuj ekde kiam li estis arestita, ekvenis al la Polico lavango da telefonvokoj el la kolombia Ministerio pri Eksteraj Aferoj en Bogoto por postuli la tujan liberigon de Mauss.

—La premo estas tre forta —Salgado diris al mi— mi kredas ke ni estos devigataj ellasi lin.

—Ne liberigu lin —mi respondis—. Ĝuste nun mi ekiras tien.

Mi ekvestis min kaj, antaŭ ol eliri, mi prenis armilon por protekti min. Mi estis studinta la historion de Mauss pli profunde kaj mi sciis kiuj estis liaj amikoj. Mi ne volis preni riskojn.

6

"Ian Fleming estus fieri se li estus la kreinto de Werner Mauss" skribis la gazeto *Los Angeles Times* en profilo publikigita frontpaĝe en 1997, kaj ĝi sekve priskribis lin kvazaŭ iu germana "James Bond". Mi ne rememoras vidi ke iu eksterlanda amaskomunikilo laŭdis sammaniere teroristojn de aliaj lokoj en la mondo. Tamen tiu gazeto ne estas la sola kiu mirblindiĝis pro Mauss kaj lia nekutima historio. Li estis viro kiu dum jardekoj estis trompinte homojn.

Laŭ la eksterlanda gazetaro, Mauss komencis sian karieron en Germanio kiel vendisto de polvosuĉiloj kaj trejnisto —malsukcesa— de ĉevaloj, antaŭ ol labori kiel privata detektivo en la sesdekaj jaroj. Li baldaŭ montris nekutiman talenton por helpi riĉajn klientojn kaj asekurkompaniojn rekuperi luksaĵojn, kiel aŭtojn Porsche kaj ŝtelitajn juvelojn. Mauss speciala lerteco estis lia kapablo por establi altnivelajn kontaktojn kun policaj oficialuloj kaj deliktulaj retoj, rimarkigis *Times*. La negocoj prosperis en lia malgranda detektivagentejo kaj baldaŭ poste Mauss estis posedanto de aŭto Porsche, de leĝera aviadilo Cessna kaj eĉ de mezepoka kastelo.

Ĝis 1983, la aferoj iris mirinde bone. Sed tiujare, lia fotografajo kaj lia vera identeco estis malkaŝitaj en germana gazeto, igante lin nekapabla daŭrigi sian laboron en Eŭropo. Tiam li decidis serĉi ĉirkaŭ la mondo novan lokon por praktiki sian metion. Donitaj la cirkonstancoj de la mezo de la okdekaj jaroj, por li Kolombio devus ŝajni paradizo sur la Tero.

En Bogoto Mauss malkovris ke, kontraste kun Germanio, Kolombio estis lando kie li povis ne nur enfiltriĝi en la Registaron, sed esti super ĝi. Li trovis sian niĉon: helpi eŭropajn kompaniojn por negoci pri elaĉetoj kaj pagi al armitaj grupoj interŝanĝe por protektado. La sorto ŝajnis rideti por li. Lia ĉefa kliento estis germana kompanio kiu konstruis naftodukton en teritorio kie agadis la NLA, grupo priskribita far *Times* kiel "malgranda kaj nekonata grupo komandita far hispana renegata pastro". Ŝajnas ke kiam Mauss komencis sian laboron, la financa kapablo de la NLA pliiĝis ege, igante tiun grupon kapabla rekruti novajn membrojn kaj dissemi teruron tra la tuta Kolombio. Malmultajn jarojn bezonis la NLA por fariĝi la dua plej granda armita grupo en Kolombio, post la FARK.

La rolo de Mauss en la rapida kresko de la NLA estis "publika sekreto". Tiel rimarkigis la brita gazeto *The Guardian* en skizo pri tiu ĉi aventurulo publikigita en novembro de 1996: "Neniu en Kolombio dubas ke la kresko de riĉaĵo de la NLA (meze de la okdekaj jaroj) estis intime rilatita al germana mono". Li daŭrigis kun la *modus operandi* kiu dum jardekoj estis donita al li sukcesajn rezultojn: vasta nombro de diversaj kaj tre potencaj amikoj. Tiel asertis artikolo farita de *Dow Jones*: "[Mauss estis] germana privata detektivo kiu havis ligojn kun la germana informiĝfako, altrangaj membroj de la kolombia registaro kaj maldekstrismaj gerilistoj". Kiam li estis arestita, multaj el tiuj amikoj destinis rimedojn por influi favore al li: la germana konsulejo en Bogoto deklaris ke Mauss efektivigis "humanan" mision en la momento de la aresto, kaj petis ke li estu ellasata tuj, funkciuloj de tre alta nivelo en Bogoto telefonvokis la komandanton de la Polico en Antjokio por urĝi lin pri tiu elliberigo kiel eble plej baldaŭ.

Tamen, mi estis firme decidiĝinta ne permesi lian elliberigon antaŭ ol la kolombia jursistemo estis havinta okazon por taksi la pruvojn kiujn ni havis kontraŭ li. Prave tiam diris funkciulo de la prokurora oficejo: "Pro la fakto ke Mauss provis kontraŭleĝe eligi el la lando kidnapitan personon, li estas minaco al nia nacia sekureco". Mia kara amiko Gilberto Echeverri, iama reginto de Antjokio kaj kiu estis mortonta tragike, proksime de Urrao jarojn poste, telefonvokis min kaj diris ke kiam li vidis en televido sinjoron Mauss, li rekonis tiun vizaĝon, kaj ke tiu homo estis implikita en antaŭa koruptada skandalo, rilate la surteran metroon de Medegino. Kiam en la horoj post lia aresto (novembro 1996) mi iris al la policejo, mi havis unu celon: doni al nia jursistemo la politikan apogon kian ĝi bezonis por rezisti la premojn de la kolombia kaj germana registaroj.

Mi konservas dankoplene la memoron pri multaj eŭropanoj kaj usonanoj kiuj dum la lastaj jaroj faris valorajn kontribuojn al la lando. Kaj mi vidas kun hororo la manieron kiel iuj eksterlandanoj estis subfosantaj niajn klopodojn realigi la sekurecon kaj la superrego de la leĝo. La kazo de Mauss ilustras tian partoprenon perversan en la aferoj de Kolombio.

Kvankam tiaj eksterlandanoj foje estas solduloj mondvojaĝantaj kiujn allogas malfortaj aŭ fiaskintaj Ŝtatoj en kiuj ili povas fari rapide monprofitojn, la problemo ne estas limigita al malmultaj izolitaj kazoj. Dum jaroj, iuj Ne-Registara Organizo asociiĝadas

malkaŝe kun maldekstrismaj neleĝaj armitaj grupoj, havigante al ĉi tiuj financadon kaj aliaj loĝistikajn apogojn, dum samtempe tiuj organizoj denunciadis sisteme la laŭleĝajn operacojn de la kolombia Ŝtato, ofte sub la preteksto de la homaj rajtoj. Speciale, kelkaj eŭropaj politikistoj insistas trakti la grupojn FARK kaj NLA en la sama nivelo de egaleco kia nian registaron demokratie elektita.

Mi neniam povis kompreni tiun hipokritecon: tiuj samaj politikistoj neniam estus tolerantaj la kruelaĵojn faritaj de tiuj grupoj se tiuj teruraĵoj okazintus en siaj landoj. Eble ia nostalgio eksmodiĝinta pri la socialismaj ideoj kiujn ili sekvis dum sia junaĝo kondukas ilin al simpatio kun la armita maldekstrismo en Kolombio, aŭ eble ili ne scias, ke ekde multaj jaroj antaŭe tiuj grupoj iĝis karteloj de murdistoj drogŝakristoj.

Kio ajn estas la motivo kiu instigas tiujn organizojn, en la tempo de la aresto de Mauss mi estis decidiĝinta meti finon al iliaj agoj. Mi deklaris tiam, ke ĉi tiu okazo estis "ŝanco por labori en la malmuntado de la internacia reto" kiu apogadis la neleĝajn armitajn grupojn.

Komence, la publika denunco pri la agoj de Mauss sukcesis redukti la politikan premon kiu estis favora al lia liberigo. Li restis kelkajn monatojn en malliberejo ĝis kiam li estis ellasita libera. Por mia surprizo, iu juĝa oficisto de Antjokio lasis s-ron Mauss en libereco, por kio tiu funkciulo pledis ke lia aresto estis neleĝa. Mauss iris denove al Eŭropo sed tamen li ne malaperis el la kolombia politiko: en la postaj jaroj, superaj funkciuloj de la nacia registaro vojaĝis al Germanio por paroli kun li. La ŝajna intenco estis peti al Mauss intertrakti pri interkonsento por paco, nome de la NLA! Kiel esperinde, tiu "mediacio" produktis neniun pozitivan rezulton.

La lastan fojon en kiu mi aŭdis pri Mauss estis kiam mi studis en Oksfordo. Tiam ricevis mi koverton kiu ŝajnis veni el liaj advokatoj. Mi estis aŭdinta onidirojn ke li volis meti plendon kontraŭ mi pro misfamigo. Mi ne malfermis la koverton: mi skribis sur ĝi "revenigenda al la sendinto", kaj metis ĝin reen en la leterkeston.

7

Ju pli mia periodo kiel departementestro alproksimiĝis al sia fino, des pli la terorismaj grupoj rimarkis la manieron kiel la sperto de Antjokio montris al la kolombianoj ke per la plifortigo de la sekuriga agentaro kaj efika administrado, la regado per teroro de la krimuloj povas esti kontraŭbatalita kun efektiveco. La opinio de kelkaj homoj laŭ kiu per alfronti drogŝakristojn teroristojn nur produktus plian sangoverŝon, estis senvalorigita. Do, la armitaj grupoj sentis sin devigitaj kontraŭataki kaj fari publikan montron de potenco. Tiel ili faris, kaj tagojn antaŭ ol mi lasis mian postenon refoje ili montris sian absolutan malestimon por la kolombia demokratio: ili provis saboti la regionajn balotelektojn de 1997.

Komunikaĵo de la FARK ordonis al la kolombianoj bojkoti la voĉdonadon en Antjokio, ĝi nomaciis min "kvazaŭarmeano reganto" kaj diris ke la elektoj estus "manipulitaj kaj misformitaj far la oligarkoj kaj iliaj politikaj lakeoj". Siaflanke, la NLA deklaris "armitan strikon" por paralizi la survojan transporton dum la tago de la elektado. En la tuta lando, la neleĝaj armitaj grupoj lanĉis minacojn de mortigo kontraŭ kandidatoj al departementestredo, urbestredo, departementaj asembleoj kaj urbaj konsilantaroj. Ja, la timigada kampanjo estis nacia, sed Antjokio estis la ĉefa celo.

Dum la semajnoj antaŭ la voĉdonado, kvindek tri kandidatoj estis mortigitaj en la tuta lando, pli ol ducent estis kidnapitaj, kaj pli ol 1900 —el kiuj 1600 en Antjokio— demisiis pro minacoj. La spiralo de violento supreniris en tia maniero ke la prezidanto de la Senato ordonis la aĉeton de cent du kontraŭkuglaj veŝtoj, po unu por ĉiu senatano. Novaĵagentejo *Associated Press* priskribis la kampanjon por saboti la elektojn kiel "la plej grava defio al la kolombia demokratio en pli ol tridek jaroj".

Kiam la violento kaj la minacoj intensiĝis, la nacia registaro konsideris la eblon abortigi la elektojn en Antjokio. Kiel reganto mi kontestis forte tiun iniciaton, kaj faris ĉion kio estis sub mia povo por ne permesi ke la timigado far teroristoj sukcesu. Ni pasigis kelkajn el la lastaj tagoj de nia regado trairate komunumojn ene de Antjokio, kuraĝigante homojn por defii la minacojn kaj praktiki siajn demokratiajn rajtojn. Ni piediris tra la stratoj de la urboj kun

megafono: ni petis la loĝantojn ke ili ne timu kaj ni certigis ilin ke kunaj ni povus venki la minacojn.

La tagon antaŭ la balotelekto, sabate matene, ni iris al la flughaveno por eniĝi en la helikopterojn kaj porti nian mesaĝon al du municipoj oriente de Medeĝino. Mi estis akompanita de pluraj el miaj plej proksimaj kunlaborantoj, inter ili Andrés Uriel Gallego, Petro Johano Moreno, Any Vásquez¹ kaj generalo Carlos Alberto Ospina Ovalle, komandanto de la Kvara Brigado de la Armeo. En Argelia², la unua municipo kiun ni vizitis, ni vidis homojn teroritaj pro la violento, sed kiuj tamen venis renkonti nin. La urbestro faris same kiam niaj du helikopteroj surteriĝis, laŭ la kutima protokolo.

Ne okazis la samo en San Francisco³. Tiu urbeto restis sieĝita far la violento de kontraŭleĝaj grupoj ekde kelkaj jaroj antaŭe. Des plia kialo por doni al ĝi nian apogon. La armeanoj estis alvenintaj pli frue, la antaŭan merkredon, por garantii la elektojn kaj dum sia alveno ili estis submetitaj al intensa pafado far la teroristoj. Kiam ni surteriĝis sur monteto en la periferio de la urbo, mi surprizita kaj malserena rimarkis ke neniu atendis nin. Tio ne estis bona signo. Mi eliris el la helikoptero kaj ĉirkaŭrigardis, tiam mi gestis al miaj kunuloj por ke ni iru al la vilaĝo. Dum ni marŝis suben de la monteto ni vidis ke la urbestro venis renkonte al ni akompanita de pastro Antonio Bedoya —granda amiko kaj kolego—, la loka kunordiganto de unu el niaj plej bonaj iniciatoj en Antjokio: Gvidinstruista Lerno-Sistemo⁴, instrua sistemo por kamparaj komunumoj. Ili salutis nin trankvile kaj ni ĉiuj malsupreniris al la placo de San Francisco.

Pro pura intuicio mi decidis ne supreniri al la podio instalita en la placo de la urbo. Antaŭ ol alveni tie, mi haltis ĉe stratangulo kaj tie elparolis la vortojn, kiujn mi estis ripetinte tra tuta Antjokio: ke la antaŭaj generacioj baraktis por la rajto elekti lokajn oficialulojn en Kolombio kaj ke, tial, estis grave voĉdoni; ke ne gravas kiun ili favoras voĉdone, sed la praktiko de la demokratio kaj la valoro kiun la partopreno kunportis.

—Ni ne povas voĉdoni ĉar ili mortigos nin! —Kriis unu loĝanto.

1 NT Ana María Vásquez Pérez.

2 NT Ĝia centro situas 146 kilometrojn for de Medeĝino.

3 NT Municipo kies centro situas 96 kilometrojn for de Medeĝino.

4 NT Hispane: "Sistema de Aprendizaje Tutorial".

Mi kapjesis kaj diris:

—Jen estas malfacilaj tempoj kaj tio igas speciale grave, ke ni ĉiuj voĉdonu por montri nian forton.

La kunveno finiĝis kun sombra silento. La urbestro rigardis min kaj ridetis iom malkomforta.

Reganto, ĉu vi volas ion trinki antaŭ ol vi foriras?

Li aspektis kiel volanta diri al mi ion, kaj mi akceptis lian inviton. Ni supreniris al la dua etaĝo de la urbodomo. Mi estis surpriziĝis vidinte tie antaŭa kunulon de la Universitato de Antjokio, kiu nun servis kiel ombudsmano en San Francisco. Li rigardis min de kapo ĝis piedoj, li aspektis tiel surprizita kiel mi pro vidi min.

—Reganto —li diris—, vi estas tre *berrako* ĉar vi venis.

Tuj, tri aferoj perturbis min: 1) La nervozeco en lia voĉo kaj la uzo de la vorto *berrako*, kiu en Antjokio signifas pli-malpli "aŭdaca, kuraĝa". 2) Mi ekrememoris lian foreston en mia ĵusa renkontiĝo kun la komunumo, kio surprizis min, ĉar li, kiel ombudsmano, estis la oficialulo komisiita por protekti la demokratiajn rajtojn, kiujn ni venis por defendi. 3) Mi rememoris, ke kiam li estis universitata studento lia sinteno ne estis klara: kvankam li neniam estis apoginta malkaŝe la grupon FARK, li ankaŭ ne estis malakceptinta ĝin. Mi sentis pikan varmon en la kolo. Denove gvidita de intuicio, mi rapide adiaŭis, kunvenigis miajn akompanantojn kaj ni supreniris la monteton, kie la du helikopteroj komencis startigi siajn motorojn.

Mi adiaŭis la urbestron kaj pastron Antonio. Kiam mi turniĝis por supreniri al la helikoptero, mi aŭdi la unuajn eksplodojn de pafiloj. Mi rampis per la kubutoj al proksima fosaĝo dum mia vizaĝo kovriĝis per tero. La kugloj komencis alveni ŝpruce. Niaj soldatoj respondis al la pafado kaj la padeloj de la rotoro giris rapide. Mi decidis kuri, tute kliniĝinta, al la helikoptero kaj engrimpi tra la flanko pordo. Generala Ospina helpis min kaj fermis la pordon malantaŭ mi. La helikoptero komencis leviĝi de la tero.

La dua helikoptero ankoraŭ ne estis elteriĝinta. Mi vidis la manieron kiel tiuj kiuj estis en ĝi daŭris elmetitaj al la senlima pafado de la teroristoj. El flanko panelo en la helikoptero mi ekprenis la unuan pafilon kiun mi trovis —mitralon— kaj mi provis havigi kovran pafadon. Iom poste ĝi sukcesis elteriĝi.

Kiam ni estis ekster pafatingo, ni komunikiĝis per radioaparato kun la alia flugmaŝino. Mirakle neniu estis vundita. Tamen, nia korfaciliĝo estis efemera: antaŭ ol surteriĝi en Medeĝino ni estis informitaj ke la teroristoj estis trafintaj pafon en la kapon de pastro Antonio, mortiginte lin. Kiom da doloro! Kaj la tragedio ne finiĝis tiel ĉi. Tiun saman tagon, la teroristoj ostaĝigis kvar funkciulojn de la elektada organizo kaj dissaltigis elektrostacion en Buenaventura, lasinte sen energio trionon de la urbo.

La partopreno en la voĉdonado estis iomete malpli ol 50 procento en la lando kaj multe pli malalta en Antjokio. En San Francisco nur voĉdonis dudek naŭ el la ses mil kvincent homoj kiuj rajtis tion fari. En kelkaj municipoj neniu voĉdonis.

La murdo de pastro Antonio, kiu dediĉis sian vivon al Dio kaj por eduki la loĝantaron de Antjokio, makulis refoje per sango la manojn de la krimuloj de la NLA. Tamen, baldaŭ cirkulis onidiroj kulpantaj la Armeon pri lia morto. Malmultan tempon poste mi parolis en aviadilo kun Carlos Gaviria Díaz, kiu antaŭe estis unu el miaj instruistoj pri juro en la Universitato de Antjokio kaj tiame prezidanto de la Konstitucia Tribunalo de Kolombio.

—Mi aŭdis, ke la Armeo mortigis la pastron Antonio —li diris.

Mi ŝtoniĝis.

—Kiel vi povas diri tion? Mi ĉeestis tie! La NLA estis kiu mortigis lin!

—Vi ĉiam defendas la Armeon —ripostis Gaviria.

—Ho, mia Dio!, profesoro; mi estis tie! Mi vidis tion per miaj propraj okuloj!

Gaviria insistis pri sia lego de okazintaĵoj. Tamen Dio ĉiam rekompencas la veron. Semajnojn poste, pluraj membroj de la kolombia Registaro kaj de la internacia komunumo —inter kiuj troviĝis la Alta Komisararo pri Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj en Kolombio— vojaĝis al Antjokio. Ilia misio estis provi la liberigon de du funkciuloj de la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj (OAS) kiuj, pro mia peto, estis venintaj al Antjokio kiel inspektistoj de la elektado, kaj, kelkajn tagojn antaŭ la elektado, estis ostaĝigitaj far la NLA. En la publika evento kiu por tiu celo okazis, la ĉefoj de la NLA konfirmis, ke ili estis la responsuloj pri la sturmo en San Francisco kaj kr ili ne ĉesigos en siaj provoj mortigi min. La publiko restis silenta.

Kelkajn tagojn poste, Lina petis diskrete privatan renkontiĝon kun la Alta Komisaro de Unuiĝintaj Nacioj en Bogoto.

—La gerilistoj minacis mortigi la reganton de Antjokio —ŝi diris.

—Vi estis tie; vi sidis aŭskultante kaj ne diris eĉ unu vorton en protesto. Ĉu ne havas homajn rajtojn ankaŭ mia edzo ?

8

La unua de januaro de 1998, la lasta tago de mia mandato kiel departementestro, mi iris al kamparo de Antjokio por adiaŭi mian patrinon. Mi estis vojaĝonta al Anglio por partopreni, kiel *Senior Associate* ĉe la Universitato de Oksfordo, en St Antony's College. Mi ĉiam rifuzis utiligi por privataj celoj la helikopteron de la registaro —en iu ajn cirkonstanco—, kaj tiun tagon mi veturis en aŭto kun Tomás, Jerónimo kaj mia kuzo Jorge Vélez, por viziti ŝian domon apud la rivero Cauca.

Kelkajn tagojn antaŭ tio, al mia patrino estis diagnozita kancero en frua etapo, kaj tial la kuracistoj opiniis ebla ŝian resanigon. Ŝi estis 65-jara. Ŝi salutis min ĉe la pordo kun rideto, kvazaŭ en la mondo ne okazus io malbona. Ni parolis longe pri la situacio de Antjokio kaj ŝi esprimis maltrankvilon pro la minacoj kontraŭ mi. Ŝi konsideris trankviliga mian foriron el Kolombio. En la adiaŭo ŝi benis min kaj deziris al mi la plej bonan sorton en Anglio.

La sekvintan tagon, vendredon, mi vojaĝis al Oksfordo. Unu semajnon poste, mia patrino mortis. Mi volis reveni tuj al Kolombio por ŝia entombigo, tamen mia familio kontraŭstaris energie:

—Neniel —mia frato diris—. Ŝi sentis korfaciliĝon sciante ke vi estos sekura en Anglio. Do, mi petas, ne venu al ŝia entombigo. Estus tro danĝere.

Ĉiuj ni en la publika vivo faras oferojn. Ni pasigas multan tempon for de niaj familioj kaj ni perdas momentojn kiujn ne eblas anstataŭigi. Ni diras al ni mem, ke ni laboras por pli granda bono kaj ke tial valoras la ofero. Ja, mi diris tion al mi multajn fojojn en la vivo, tamen, ne ĉi-foje. Neniu devus esti for de sia patrino en la momento de ŝia morto; tamen se iu forestas pro motivoj preter sia volo, oni ne devus kaŭzi al tiu la suferon igi tiun foresti de ŝia sepulto pro timo riski ties amatojn. Tiutage mi estis en Oksfordo, 8.000 kilometrojn for de mia lando, sidante en malvarma kaj dezerta domo. Kaj mia animo ploris pro tio, ke mi ne akompanis mian patrinon en la momento de ŝia morto nek al ŝia lasta ripozejo.

9

Lina estis priskribonta, kelkajn jarojn poste, la dek du monatojn de nia restado en Oksfordo kiel la sola tempo, kiam ni havis "tradician" familion. Ni loĝis en komforta domo duetaĝa, prenita lue el profesoro de la universitato kiu tiam ĝuis sabatan jaron. Mi transportadis min per biciklo kaj semajnfine ni luadis aŭton por trairi la anglan kamparon dum pluraj horoj. Ni ŝatis admiri la manieron kiel la angloj organizis siajn ĝardenojn. Foje ni iris al restoracioj. Dum kelka tempo Tomás laboris en Burger King: li lavis telerojn en la nokta deĵoro por lukri iom da mono.

Tamen, ĉio igis min pensi pri mia lando. Laŭvorte ĉion. Ekzistis signo sur la perdo de nia domo kiu legigas: KVARTALA GARDADO. Mi skribis al kelkaj amikoj de Antjokio: *Ĉu vi rimarkas? Ankaŭ ĉi tie ili komprenas ke la sola maniero esti sekuraj estas ke la civitanoj kunlaboru kun la sekuriga agentaro.*

La situacio de mia lando, kvazaŭ vulturo, ronĝadis mian koron. Je la dua fojo en nur sep jaroj mi estis en ekzilo. Same kiel en 1991, kiam mi studis en la Universitato Harvard, ni estis devigitaj forlasi Kolombion sub ekstrema premo: la promeso de la armita maldekstrismo ne permesi al mi vivi plu.

Tuj post la ĵuro kiel departementestro far mia posteulo, mi iris kun mia familio al la flughaveno en blendita veturilo, posedata de Fabio Calle Rico, entreprenisto de Antjokio —Mi rifuzis uzi oficialan veturilon, ĉar mi jam ne estis oficialulo—; en Bogoto nin akceptis brita Ambasadoro en Kolombio, Arthur Leycester Scott Coltman, kiu pro motivoj de sekureco kondukis nin rekte al sia hejmo. Kelkajn horojn poste ni estis eskortitaj al la flughaveno kaj veturis al Londono.

Mi ne forgesis, tamen, ke malgraŭ la cirkonstancoj, mia familio estis bonsorta en multaj manieroj. La violento estis deviginta centmilojn da kolombianoj fuĝi el siaj hejmoj sen loko kien iri, kaj eĉ malpli la eblo de akademia nomumo en unu el la plej bonaj universitatoj de la mondo. Kun malavareco, ambasadoro Coltman estis doninta al mi la stipendion Simón Bolívar de la Brita Konsilio, kaj Malcolm Deas —renoma instruisto pri la kolombia historio— estis mirinda mentoro kaj patrono.

Mi ankaŭ sciis ke taktika retiriĝo ne estis hontinda, se onia celo estis vivi por batali dum alia plia tago. Tamen, por ke la sperto valoru, mi devontigis min reveni pli forta ol iam ajn al Kolombio.

Mi absorbiĝis en la akademia mondo. Mi studis temojn rilataj al la latinamerika historio de la dudeka jarcento. Mi legis aŭ relegis librojn pri ĉefeco —speciale, *Lincoln pri Ĉefeco* far Donald T. Phillips — kaj aliaj kiuj inspiris min kiel tiuj far John Kotter kaj Rosabeth Moss Kanter; la biografioj far Indalecio Liévano Aguirre pri Simón Bolívar kaj Rafael Nuñez; la verkoj de Jean-Jacques Rousseau, Thomas Hobbes kaj John Locke; kaj *Demokratio en Ameriko* far Alexis de Tocqueville. Mi amikiĝis kun kolombianoj kiu samtempe studis en Oksfordo, inter ili, kun Jaime Bermúdez Merizalde, brila kaj elokventa viro kiu estis fariĝonta poste unu el miaj ĉefaj kunlaborantoj kaj ministro pri Eksterlandaj Rilatoj. La strikta studado kaj la stimula socia medio estis terapio por mi.

Mi streĉis ĉiujn miajn fortojn, mi renkontis homojn kaj sentis min sanigita. Baldaŭ poste, mi komencis fiksi mian rigardon sur la sekvanta paŝo de nia vojaĝo.

10

En Oksfordo mi amikiĝis kun Joaquín Villalobos, eksa gerilisto komandanto en Salvadoro. Eble ŝajnas strange, sed por mi ĝi estis edifa amikeco.

Villalobos aliĝis la Popola Revolucia Armeo (PRA)¹ en 1971, dum li estis ankoraŭ adoleskanto. Li akiris reputacion kiel timata komandanto, tamen li evoluis tra la tempo kaj, en la naŭdekaj jaroj, li ludis gravan rolon en la pacinterkonsento de 1992 kiu finis la enlandan militon. En niaj interparoloj, li agnoskis, ke la PRA estis uzinta brutalajn taktikojn kiujn li poste bedaŭris. Ni ambaŭ estis preskaŭ samaĝaj kaj, kiel mi, li studis en Oksfordo danke al stipendio de la Brita Konsilio. En la komenco ni rigardis nin kun malfido, tamen baldaŭ mi sentis ke li estis homo kun demokratia spirito kiu kunhavis mian pasion por la paco kaj la sekureco.

Unu tagon mi faris al li demandon kiu, en 1998, estis la plej grava por la kolombianoj:

—Diru al mi du kialojn pro kiuj la gerilistaro en Salvadoro fine akceptis la interpacigajn diskutojn —mi diris.

Li pensis dum momento.

—Unue, ni estis ĉe senelirejo en militaj aferoj —li diris—. Krome, nia mono elĉerpiĝis. La finiĝo de la Malvarma Milito signifis la finon de la fondusoj venintaj el orienta Eŭropo kaj multaj Ne-Registaraj Organizaĵoj (NRO-oj) en Okcidenta Eŭropo ĉesis sendi monon al ni.

—Ĉu? —Mi demandis—. Ĉu kelkaj NRO-oj de okcidenta Eŭropo?

—Jes —li respondis.

Estis vero: same kiel en Kolombio, la salvadora gerilistaro estis havinta tutan subtenan reton en Eŭropo.

Tiam Villalobos retrofaris la demandon al mi:

—Bone, nun diru al mi du bonajn kialojn pro kiuj la kolombiaj gerilaj grupoj volus intertrakti pri pactraktato.

Mi ŝultrumis.

1 NT Hispane: Ejército Revolucionario del Pueblo (ERP).

—Sincere, mi ne kredas ke la gerilistaro havas iun intereson en aŭtentaj intertraktadoj.

Villalobos ridetis.

—Vi vidas; tio estas la problemo —li diris—. La kolombiaj gerilistoj ne bezonas la monon de la NRO-oj. Ili estas tre riĉaj danke al drografiko. Kaj kontraste al Salvadoro, la kolombiaj gerilistoj vere kredas ke ili povas atingi la militan venkon pro la manko de decido de la kolombia Ŝtato.

La tiamaj okazaĵoj pruvis la verecon de liaj vortoj. En 1998 Andrés Pastrana estis elektata prezidento promesinte komenci interpacigajn diskutojn kun la "gerilaj" grupoj. Antaŭ ol preni sur sin la prezidentecon, li eniris en la ĝangalon por kunveni kun la ĉefo de la FARK, la alinomita "Manuel Marulanda", kaj kun lia milita komandanto Jorge Briceño, alinomita "Mono Jojoy". En tiu ĉi kunveno, Pastrana akceptis unu el la plej polemikaj postuloj de la FARK: ke la Ŝtato estus retironta siajn trupojn el vasta areo de la nacia teritorio —proksimume ekvivalenta al la grandeco de Svislando —, por povi havi interpacigajn diskutojn sen timo pri esti atakataj (dum lia mandato, Pastrana ankaŭ sendis funkciulojn al Germanio por kunveni kun gvidantoj de la NLA).

Li agis bonafide kaj lia filozofio estis konsekvenca kun la populara pensado de tiuj jaroj en Kolombio. Elĉerpitaj far la violento de la okdekaj kaj naŭdekaj jaroj, multaj kolombianoj havis la konvinkon, ke dialogo estis la sola vojo al paco. La elmontroj de povo kiujn faris la violentaj grupoj en la tago de la balotelektoj kaj tiuj elmontroj kiuj akompanis mian foriron el la registaro, konvinkis la popolon pri ke la armita alfronto nur povus kaŭzi plian suferadon. La cirkonstancoj ŝajnis postuli dialogon. "Ĉi tiu procezo por paco estas la sola ŝanco kiun Kolombio nuntempe havas por eliri el sia historia tragedio ... Se ĝi fiaskas, nur atendos Kolombion brutala milito kiu post kelkaj jardekoj povus forviŝi ajnan eblon de prospero kaj civilizacio, kaj kies sekvonta fazo estos la ekapero de politika perforto en la urboj", skribis elstara kolombia eseisto. Li ne estis sola, por multaj kolombianoj la dilemo estis: aŭ interpacigajn diskutojn aŭ kataklismo.

Ili estis eraraj. Malpli ol unu jaro estis pasinta ekde kiam prezidanto Castro sendis al mi mesaĝon per Gabriel García Márquez rilate la realan intereson de la FARK dum iu intertraktado. Mi rememoris tiam unu el la marksismaj principoj el miaj universitataj

tagoj: kiam la klasmalamiko etendas la manon, la gerilistaro devas profiti de ties malforteco.

Kompreneble, mi ne eliminis la eblon ke, en certaj cirkonstancoj, la intertraktadoj povus esti ebla vojo al la paco en Kolombio. Dum la okdekaj kaj unuaj naŭdekaj jaroj, la kolombia Registaro estis intertraktinta la batalhalton kaj la malmobiliziĝon kun malgrandaj grupoj kontraŭleĝaj —inkluzive la PLA kaj la M-19— kiuj, pro diversaj kialoj estis malfortigitaj. La komencaj rezultoj de tiuj intertraktadoj estis miksaj: iuj membroj de la PLA dediĉis sin al drogŝakrado aŭ aliaj krimaj agoj —tiele, ekzemple, tiuj kiuj partoprenis en mia preskaŭa kidnapo en El Ubérrimo, en 1988, kiam ili reakiris liberon pro amnestio kaj forpardono de 1991, ili revenis al la bieno kaj ŝtelis plurajn dekduojn da brutoj, ŝajne kiel venĝa signalo—; aliuloj entiris sin sukcese en la civilan vivon kaj formis novan politikan partion nomata "EPL", akronimo kiu ĉi-kaze ne plu signifis Ejército Popular de Liberación¹, sed Espero, Paco kaj Libereco. Laŭlonge de mia politika kariero mi konis kaj laboris entuziasme apud pluraj homoj kiuj forlasis la armitan batalon: Darío Mejía, Mario Agudelo, Rosemberg Pabón, Evert Bustamante, inter aliaj.

Tamen, en 1998 la cirkonstancoj estis malsamaj. Unuflanke, la Ŝtato devintus intertrakti el pozicio de forteco por ke la interparoloj produktu rezultojn kiuj valoru la penon —kio, evidente, ne estis la kazo— kaj, aliflanke, la FARK kaj la NLA troviĝis fortigitaj kiel neniam antaŭe. Mi timis, do, ke se la lando komencus interpacigajn diskutojn el sia malforto, la violentaj grupoj nur utiligus la proponon de la Registaro por sia taktika kaj ekonomia profitoj, kiel Castro estis avertinta. Tio estas, ili utiligus la intertraktadojn por pliigi siajn armitojn, kreskigi la drografikon kaj daŭrigi semante teruron en la popolo.

Kaj, multe por mia bedaŭro, ĉi tio estis kio okazis. partopreninte en la intertraktadoj, ambaŭ neleĝaj armitaj grupoj faris koncedojn tiel bagatelaj ke, se ne estus pro la tragedio signifata, tiuj estus preskaŭ komikaj. La NLA promesis ne plu kidnapi "maljunulojn, gravedajn virinojn kaj infanojn", dume, la grupo teruris la popolon kaj detruis la infrastrukturon en sistema maniero. La kidnapoj kreskis laŭ geometria vico: pliiginte de 1.038 en 1996 al 3.572 en 2000. Tiujare, la ĉefa naftodukto de Kolombio estis dissaltigita aŭ atakita 170 fojojn. Siaflanke, la FARK faris el la "senarmeigita zono"

1 [NT Popola Liberiga Armeo \(PLA\)](#).

sian propran kvazaŭ-ŝtaton —kelkaj homoj nomis ĝin "FARKlando"—: ili altrudis "impostojn" kaj kontraŭleĝe nomumis siajn proprajn "urbestrojn".

Du jarojn post la komenco de la intertraktoj kun la FARK, ne estis eble difini la tagordon. Kaj kiam fine la du partioj ŝajnis esti ĉe unu paŝo antaŭ ol subskribi interkonsenton de paco, en la lasta momento la FARK ŝanĝadis la kondiĉojn aŭ lanĉis novan ondon de brutalaj atakoj kontraŭ soldatoj kaj civiluloj kolombiaj.

Esperitaĵoj tiom nerealismaj paralizadis la intertraktadon: la alinomita Alfonso Cano, unu el la ĉefaj gvidantoj de la FARK, deklaris, ke ili ne malmobiliziĝus interŝanĝe por "domoj, aŭtoj kaj stipendioj"¹ aŭ seĝoj en la Kongreso.

—Tiu ĉi lando estos savita kiam ni havos la ŝancon por direkti la Ŝtaton —li diris.

Marulanda rifuzis ĉeesti la instalon de la tablo de intertraktadoj. Kaj dum la televidaj kameraoj filmadis la prezidenton Pastrana sidanta sola sur scenejo pretigita tiucele, la gerilistara ĉefo lasis la neforviŝeblan bildon de vaka seĝo. Apologiistoj por la FARK diris ke la registaro kulpis: ke la Ŝtato ankoraŭ ne estis farinta sufiĉajn koncedojn kaj ke la sekureco de Marulanda estis en danĝero.

Kolombio, por sia misfortuno, devus travivi plian ciklon de espero kaj seniluziigoj antaŭ ol okaziĝos definitiva ŝanĝo.

1 [NT La esprimo "domo, aŭto kaj stipendio" estas speciale familiara frapfrazo por la kolombianoj ĉar grava kolombia banko, en siaj reklamoj dum la okdekaj jaroj, popularigis ĝin.](#)

11

Je la fino de mia jaro en Oksfordo, la Centro por Latinamerikaj Studoj ĉe la Universitato organizis seminarion kiu inkluzivis specialan invititon: la eksa armea paraŝutisto, 44-jaraĝa, kiu estis ĵus elektita prezidento de Venezuelo.

En tiu tempo, Hugo Chávez estis ankoraŭ enigmo. En 1992 li estis mallonge enprizonigita ĉar li estris provon de militista puĉo; elirinte el prizono, li diris al la venezuela popolo, ke li moderigis siajn vidpunktojn, kaj ke li fidis demokration. Li gajnis la balotelekton riproĉinte forte la politikistan klason de Venezuelo pro ties malŝparado de la vasta nafta riĉeco tiulanda dum la pasinta jarcento kaj pro ties utiligo de la koncesipagojn por plenigi la proprajn poŝojn kaj ne por la popola profito. Mi akordis pri kelkaj el liaj ideoj; ankaŭ mi pensis, ekzemple, ke Venezuelo devus trovi pli justan manieron distribui siajn naturajn riĉaĵojn. Tamen, Chávez havis du aferojn kiuj maltrankviligis min.

Dum la dudeka jarcento alvenis al sia finiĝo, en granda parto de Latinameriko fortiĝis reago kontraŭ la politikaj eraroj de la antaŭa jardeko. Post la fino de la Malvarma Milito, en la tuta mondo multaj registaroj reformis siajn ekonomiojn por speguli la novan mondan ordon en kiu kapitalismo estis absoluta mastro. Ĉi tiu transformo—kiuj ĝenerale entenis la privatigon de ŝtataj industrioj, la malreguligo de la negocoj kaj la redukto en la personaro de la publika sektoro, inter aliaj dispozicioj— estis stimilita far la Internacia Mona Fonduso kaj la Monda Banko. La ĝenerala celo de tiuj ŝanĝoj estis redukti la rolon de Ŝtato kaj doni pli grandajn povojn al la privata iniciato, procezoj kiuj dum la pasintaj kvindek jaroj estis riveligitaj kiel la plej bona ilo havebla por impulsi la ekonomian kreskon kaj la altigon de la popola vivnivelo.

En la naŭdekaj jaroj kelkaj latinamerikaj registaroj fortigis siajn ekonomiojn per la reformoj kiujn ili entreprenis; tamen aliaj efektivigis tiujn ŝanĝojn senzorge aŭ kun dogma fervoro, kio rezultigis la malmuntadon de granda parto el la sociala asekura reto kaj lasis tiujn ĉi landojn tute trafablaj far subitaj ŝanĝoj de kapitalfluoj. En ĉi-lasta kazo, kaj sub la erara kaj simplisma kredo ke registaro estas malbona ĉiam kaj ke la "merkato" scias pli, la Ŝtato fine rezignis siajn esencajn funkciojn.

Miaj studoj proponis al mi mezan vojon. Kvankam estis necese malfermi niajn ekonomiojn por la komerco, tio devas esti farata nur per duflankaj aŭ plurflankaj interkonsentoj zorgeme diskutitaj por garantii justajn regulojn kaj profitoj por ĉiuj partioj. Ni devus krei mekanismojn por altiri ĉiajn investojn el eksterlando kaj, samtempe, fortigi la financon regularon: tiamaniere ni certigus la respekton al la reguloj kaj la puno por tiuj kiuj malobservus ilin. Estis klare, ke ni bezonis forigi la troon el la nombro de Ŝtataj dungitoj kaj el la burokrataj elspezoj, tamen sen neglekti la devon apliki inteligentajn dispoziciojn por zorgi pri la medio, protekti la rajtojn de laboristoj, certigi egalajn ŝancojn por aliro al socialaj servoj kiel edukado kaj sanigo, inter aliaj gvidlinioj; funkcioj kiujn la privata sektoro ne estis en kondiĉoj por plenumi. Mallonge: la Ŝtato devus plene ekspluati la profitojn el kapitalismo, sen forigi, sed male fortigi, siajn kernajn devojn. Ĝi devus esti "Komunuma Ŝtato".

Ĉi tiu estis la unua afero el la prezentaĵo de Chávez dum la seminario kiu maltrankviligis min: kvankam li ne parolis detale pri la ekonomiaj dispozicioj kiujn li estis aplikonta dum sia regado, ni povis percepti ke, por li, la reago kontraŭ la "novliberalismaj" trooj de la naŭdekaj jaroj estis ataki la privatan sektoron kaj subfosi investadon. Li ŝajnis envultita far la nostalgio de la marksismaj revolucioj kiuj estis malsukcesintaj en Latinameriko, kaj sia frua kaj forta asociiĝo kun Fidel Castro —kiu ekde jardekoj antaŭe estis asertinte ke Latinameriko bezonis socialisman landon naftohavan— estis konfirmanta tion. Ekde tiam, ĉi tiuj du gvidantoj laboris por meti la bazon de nova bloko de maldekstrismaj ĉefoj en la regiono: ia "socialismo de la 21-a jarcento".

Tiun posttagmezon, alia afero, puŝis min aŭskulti la bildon kiun estis dononta Chávez pri sia venonta regado: lerni kiun estus la sorto de la fratecaj interligoj, kiuj de antaŭ tre longe kunigis Venezuelon kaj Kolombion. Ambaŭ nacioj kunhavas la saman liberiginton, Simón Bolívar, kaj iam ili formis unu solan landon. Cetere, post Usono, Venezuelo estis la dua plej granda komerca partnero de Kolombio, kio signifis ke iu daŭra periodo de ekonomia misfunkcio en la apuda lando havas rektan efikon ankaŭ sur nia lando. Aŭskultinte lian prezentaĵon, mi pensis ke li estis lasinta en ambigueco sian pozicion pri la apogo kiun li estis dononta al la kolombia registaro en ĝia lukto kontraŭ la neleĝaj armitaj grupoj.

Kiam la taŭga momento venis, mi levis mian manon kaj Chávez donis al mi la parolvicon.

—S-ro Prezidento elektita —mi diris— kio estas via konsidero pri la armitaj grupoj en Kolombio?

Chávez ridetis, tiam li diris, ke li sentis sin devigita resti "neŭtrala" en aferoj rilataj al Kolombio kaj la FARK.

Tia ne estis la respondo kian mi atendis. Ĉu estis kvazaŭ Jugoslavio —por doni ekzemplon— decidis resti neŭtrala inter la du grandaj potencoj de la Malvarma Milito? Ne; temis pri la prezidento de najbara demokratio, kun kiu Kolombio havis longan tradicion de fratecaj rilatoj. Kaj la respondo de Chávez ŝajnis anonci ke, kiel prezidento de Venezuelo, li ne estis faronta distingon inter la demokratie elektita Registaro de Kolombio kaj la teroristoj kiuj mortigadis niajn civitanojn kaj profitis el la komercado de kontraŭleĝaj narkotaĵoj. Tutsimple, mi ne povis komprenis lian respondon. Mi levis mian manon por paroli denove.

—Mi petas al vi rekonsideri tion —mi diris—, ĉar Venezuelo estas nia frata lando, kaj ni en Kolombio estas luktante kontraŭ tiuj teroristoj ŝakristoj. Venezuelo ne povas resti neŭtrala; kaj mi esperas ke vi helpu la kolombian Registaron.

Chávez ĝentile kapjesis, ridetis kaj tuj ŝanĝis la temon. Tiu interparolo estis devonta daŭrigi en alia okazo. Kelkajn semajnojn poste, mi prenis aviadilon revene al Kolombio.

12

—Vi perdos tiun elekton. Vi estos pravigita en la historio, same kiel Churchill, sed vi ne gajnos.

Mi estis ĵus reveninta al la lando kaj tagmanĝis kun unu el la plej respektitaj kolombiaj ŝtatestoj: Alfonso López Michelsen, kiu estis prezidento en la periodo 1974-1978. Generale, kaj kontraŭe al la usona tradicio, fininte siajn regadojn, la kolombiaj prezidentoj restas aktivaj en la publika vivo. Ili servas al la patrujo kiel ambasadoroj aŭ kiel ĉefoj de siaj partioj. Prezidento López Michelsen, respektata de multaj kolombianoj —inter kiuj mi estas— pro sia inteligenteco kaj siaj akademias scioj, restis ŝlosila figuro en la kolombia politiko. Li kaj sia edzino, Cecilia Caballero, estis invitintaj min al sia domo, kaj ni parolis pri la venonta prezidenta kampanjo de 2002.

Kelkrilate, eksprezidento López Michelsen pravis: mia ŝanco estis eta. En tiu tempo (fine de 1999), la opiniondoj kun nacia kovrado montris ke mia nomo estis rekonita far 50 procentoj el la kolombianoj, kompare kun 97 procentoj de miaj du ĉefaj kontraŭuloj, kiuj en antaŭaj balotelektoj estis kandidatoj. Kaj tiuj, kiuj konis min ne estis speciale interesitaj pri voĉdoni por mi: havis mi ĉirkaŭ 10 procentojn el la voĉdona intenco. Mi estis konvinkiginta ke Kolombio bezonis novan komencon en ĉiuj sencoj kaj mi decidis kandidatigi min ekster la strukturo de mia Liberala Partio. Tio estis riska: dum jardekoj neniu kandidato estis atinginta la prezidentecon de Kolombio ekster la tradicia dupartiismo. Fakte, la lastaj du elstaraj kandidatoj kiuj kandidatigis ekster siaj politikaj partioj estis Jorge Eliécer Gaitan kaj Luis Carlos Galán. Ili ne gajnis la elektojn, kaj, reaniĝinte al siaj partioj, kiam ili havis ĉian eblecon de sukceso, ili estis mortigitaj.

—Atendu momenton Alfonso —Cecilia diris kun rideto, kaj demandis al mi—: Kion precize estas tio, kion vi proponos?

—Demokratia Sekureco —mi diris, kaj mi faris koncizan resumon ĉi-rilate.

Sinjorino Cecilia aŭskultis kun granda intereso kaj poste rigardis sian edzon.

—Alfonso —ŝi diris— kun tiu propono, Álvaro gajnos tiun elekton.

La propono estis simpla: mi proponis etendi la sekurecon kaj la superregon de la leĝo tra tuta Kolombio kaj, samtempe, plifortigi nian demokration. Ĉi tiu ideo baza kaj facile komprenebla riveligis, pro la cirkonstancoj de la lando, noveca kaj, por multaj homoj, radikala.

Fakte, ekde la sesdekaj jaroj en Latinameriko la vorto "sekureco" estas asociita kun faŝismo. La vorto —eĉ la koncepto mem de obeigi la leĝon— elvokis bildojn pri sturmaj trupoj kun kontraŭtumultaj ekipaĵoj, nuboj el larmiga gaso, prezidentoj anoncantaj sieĝostaton kaj misuzoj faritaj de diktaturoj dekstrismaj en landoj kiel Ĉilio kaj Argentino. Kiel ne horori pro la kruelaĵoj kiuj estis faritaj je la nomo de batalado kontraŭ komunismo aŭ aliaj motivoj! Tiuj registaroj kiuj klopodis plibonigi la sekurecon malrespektante homajn rajtojn povus atingi pacigon kurta-tempe, sed ili neniam atingos longedaŭran repaciĝon, rezultante en la antipodon de tio, kion mi volis: atingi daŭran pacon.

Mia propono estis tute malsama: rekuperi la regadon sur la 100 procentoj el la kolombia teritorio, samtempe kiam ni respektos la homajn rajtojn kaj ni *etendos* la amplekson de la demokratio. Tiucele, ni estis sendontaj armeanojn, policanoj kaj aliajn ŝtatajn agentojn, ekzemple, instruistojn kaj kuracistojn, al lokoj kie ili ne ĉeestis dum multaj jaroj, se ili iam ĉeestis. Tio ne estas "milito", sed apliko de la leĝo. Tio estas la leĝa kaj necesa uzo de la potenco far elektita registaro. Ni estis ampleksigontaj la ordonon de la Ŝtato por ĉiuj civitanoj, sendepende de ilia ideologio aŭ sociekonomia statuso; laboristoj, sindikataj gvidantoj, entreprenistoj, ĵurnalistoj, kamparanoj ... ili ĉiuj estis ĝuontaj la profitojn pro la vivado en forta kaj sekura Kolombio. Por la milionoj da kolombianoj suferantaj la tiranan aŭtoritatismo de la violentaj grupoj, niaj strategioj signifas pli da demokratio, ne malpli. Ili povos fine ĝui la sekurecon kaj ceterajn profitojn el la demokratia registaro kiun ili estis elektontaj. Tial la nomo "Demokratia Sekureco".

En la praktiko tio signifis, interalie, gravan ekspansion de niaj sekurigaj agentaroj. Se la komuna karakterizaĵo dum la pluraj jardekoj da sangoverso en Kolombio estis la manko de decidiĝo kaj de rimedoj flanke de la centra Registaro, kiel la historio de nia lando kaj miaj propraj travivaĵoj tion konfirmis, la unua paŝo estis destini por tiuj agentaroj pliajn kaj pli bonajn rimedojn. Pluraj statistikoj

montris la zorgigecon de la situacio de niaj sekurigaj agentaroj: en tiu tempo, Kolombio havis entute 75.000 aktivajn policanojn, dum la Polica Departamento de la urbo Novjorko havis 42.000; la rekomendo de la Interamerika Banko por Disvolviĝo, por landoj kun modere alta krimeco, estis almenaŭ 4,2 policanoj por mil loĝantoj, ni havis ĉirkaŭ 1,73 policanojn por mil loĝantoj. Estis klare do, ke ni bezonis multe pli da policanoj.

Nia mesaĝo estis simpla, tamen ĝi ne havis tujan sukceson. Komence de mia kampanjo, la politika sagaco de S-ino Cecilia ŝajnis iri kontraŭdirekte de la plejmulto el la kolombianoj, kiuj esprimis siajn dubojn pri la Demokratia Sekureco: kelkaj homoj ankoraŭ restis alkroĉigitaj al la espero pri porpacaj intertraktadoj, kaj aliaj kredis ke kvankam mia plano povus ŝajni bona en teorio, ĝi pruviĝus nebla en praktiko aŭ ĝi kondukus al pli granda sangoverŝado. Cetere, la plimulto el la amaskomunikiloj rifuzis konsideri serioze mian kandidatecon. Naciaj ĵurnaloj traktis min kvazaŭ ia ekzota speco de serpento: interesa por rigardado, tamen danĝera por tuŝado. La entreprenista sektoro ankaŭ ne ŝajnis interesita: grupo de elstaraj industriistoj vizitis min ĉe mia hejmo en Rionegro¹, por diri ke mi devos atendi mian "vicon", almenaŭ ĝis 2006, ĉar ili vidis neniun ŝancon por 2002.

Ni antaŭeniris en la kampanjo kun la aŭstereco kaj dediĉiĝo kiel ĉiam. Unu el miaj karakterizaĵoj estas fari kampanjon ĉiame, ne nur dum tempo de elektado. Iam, oni demandis al Lina, ĉu mi jam estis komencinta la kampanjon, kaj ŝi respondis: "Álvaro neniam haltas fari kampanjon". Dum la unuaj monatoj, kaj dum mi vojaĝadis tra la tuta lando, mi foje dormis en la hejmoj de miaj amikoj. La kampanja teamo konsistis nur el Any Vásquez —konfidinda konsilistino ekde mia mandato kiel departementestro— kaj mi. Ni ne havis propran sidejon: Mia amiko Juan Rodrigo Hurtado posedis telefonvokocentron kaj pruntedonis al ni ĉeloficejon ekipita per telefono, faksilo kaj komputilo. Any organizis la tagordon dum mi estis for vojaĝante tra ĉiuj municipoj de la lando. Ni pasigis plurajn monatojn sen vidi unu la alian. Sed tiu estis la maniero ekzistanta je nia dispono: ni devis establi nian kredindecon kaj gajni la fidon de kolombianoj, voĉdonon post voĉdono.

1 NT Municipo siatuantá ≈ 47 km for de Medegino.

13

Tion mi ne rimarkis tiutempe, ke komenci ekde la fundo en la opinisondoj estis la plej bona afero, kiu povis okazi al mi.

Mi aŭskultis *la tutan popolon*. Foje, kiam la kampanjoj komenciĝas grandskale, la kandidatoj pensas nur pri tio kion ili diras kaj ili ne tute asimilas tion kion oni diras al ili. Ni travivis la kontraŭan sperton. Mi trairis la tutan landon, ekde Pasto¹ ĝis la marbordaj ebenajoj de Sankta Marta. Mi partoprenis en multnombraj radioprogramoj —kiuj foje daŭris ekde la deka horo nokte ĝis la sesa matene— ne gravis ke kelkaj havis nur malmultajn kilometrojn da kovrado en iu izolita loko, ĉar mi sciis, ke ĉi tiaj areoj estis, plej ofte, tiuj kiuj bezonis pli da helpo. Mi ricevis ĉiajn demandojn sen filtrilo kaj sen antaŭselektado; kelkfoje homoj vokis nur por insulti aŭ riproĉi min, tamen la granda plimulto estis seriozaj homoj kun realaj problemoj, revoj kaj atendoj. Multajn fojojn mi finis farante al ili pli da demandoj ol ili faris al mi.

Ĉi tiu formo de kampanjado estis ankaŭ nova en Kolombio. Kvankam ni estis spektintaj la spektaklon de dialogo inter politikistoj kaj krimuloj, malmulte aŭ neniom estis aŭskultita la reala komunumo. Por mi, la senpera dialogo kun la popolo estis fundamenta: kiel senatano kaj departementestro, kaj poste kiel prezidento, mi taskis al mi la mision paroli kun tiom da homoj el la "strato" kiel eble. Tio permesis al mi ricevi informojn rekte de la fonto kaj forigi la perantojn: la kunlaborantojn, la ĵurnalistojn, aŭ iu ajn alian homon kiu povus esti deziranta ŝanĝi realaĵon laŭ siaj bezonoj. La interparolado kun homoj el la komunumo estis, preskaŭ ĉiam, pli kompreniga ol la respondado al demandoj de raportistoj, kiuj ofte venis al la intervjuoj kun partiem, aŭ koncentriĝis pri la lasta politika klaĉo aŭ paroĥisma intrigo de grandaj urboj. La "realaj" homoj, kontraŭe, inklinis koncentriĝi pri siaj bezonoj, pri la gravaj kaj esencaj aferoj de la momento. Mi aŭskultadis historiojn pri kiel iliaj vivoj kaj iliaj entreprenoj estis tuŝitaj de perforto en Kolombio kaj, ankaŭ, pri kiel ili konservis la esperon por la generacio de siaj gefiloj. Mi aŭskultis iliajn zorgojn

1 NT Urbo situanta en la sudokcidento de Kolombio, 798 km for de Bogoto.

pri temoj kiel edukado, sano, ŝoseoj kaj loĝejoj. Mi lernis multajn aferojn.

Ni decidis antaŭenigi kaj instigi plu tian partoprenon: ni tiam okazigis oftajn komunumajn kunvenojn, kiujn ni nomis "demokratiaj ekzercadoj"¹. Tiu estis alia koncepto kiu datiĝis de mia posteno kiel reganto de Antjokio: ĝi estis la adopto de la strategia planado por konstrui regadan programon per dialogo kun la popolo. Ni kunvenis kun civitanoj en aŭditorio aŭ salono por interŝanĝi ideojn pri solvoj al la problemoj de Kolombio. Mi diris, ekzemple: "Ni prenu dek minutojn kaj skribu ni la kvin ĉefajn aspiraĵojn por Kolombio en la venontaj jaroj". Tiam ĉiuj partoprenantoj skribis siajn ideojn kaj mi aleatore elektis iun personon el ili por ke li aŭ ŝi parolu. Ni invitis personojn el malsamaj devenoj kaj politikaj partioj, kaj universitatajn profesorojn kiuj estis fakuloj pri certaj temoj. Iliaj ideoj informis kaj kompletigis la "Demokratian Manifeston", la cent punktoj de la regada platformo ke ni konstruis, por ke la kolombianoj sciu ĝuste al kio ni devontigis nin, kaj povu poste peti al ni kontojn pri tio. Ni okazigis centojn da tiaj kunvenoj dum la disvolviĝo de la kampanjo —sepdek el ili estis tuttagaj—, kaj ili fariĝis netaksebla ilo por interagi rekte kun la komunumo, kolekti novigajn politikajn ideojn kaj plifirmigi mian kredindecon kiel kandidato. Estis en unu el tiuj kunvenoj kie naskiĝis la oficiala devizo de nia kampanjo: "Firma mano, granda koro".

Laŭeble ni okazigis niajn kunvenojn kaj interparoladoj dum plena taglumo. Tiel ni defiis la timigon farita de la teroristoj kaj ilian provon senigi nin je niaj demokratiaj rajtoj. En tiuj tagoj, la simpla ago de fari kunsidon de kampanjo ŝajnis festado de la normaleco, kaj tio feliĉigis nin. Tamen, ni devis fari koncesiojn. Mi rememoras manifestacion en malgranda vilaĝo: la partoprenintoj fotadis per siaj ciferecaj fotiloj (ĵus venintaj al Kolombio); mi pozis feliĉe kun fiero ĉar mi sentis min ĉirkaŭita de la junaj familioj kun brilaj okuloj, kiuj estis venintaj por paroli kun ni. Jen subite, kiel inspirita, mi rimarkis la seriozecon de niaj agoj: multaj el la ĉeestantoj estis devontaj reveni al siaj hejmoj tra ŝoseoj kie la teroristoj faris blokadojn ofte, kaj tiuj kiuj havus foton pri mi en sia fotilo riskis suferi fortajn reprezaliojn. Kun malĝojo, mi invitis ĉiujn forviŝi la bildojn. Tio estis stranga koncesio, tamen necesa. Tia estis la lando en kiu ni vivis.

1 NT Hispanlingve "talleres democráticos".

Kiam mi vojaĝis eksterlanden mi reasertis al mila urĝecon de nia tasko. Mi faris du vojaĝojn de kampanjo al Miami kaj mi havis la oportunon paroli kun multaj membroj de la elmigrinta komunumo el Kolombio, kiu ĉiutage kreskadis multoble: laŭ tiutempa esploro farita de ANIF¹, inter 1996 kaj 2001 unu miliono da naciuloj foriris eksterlanden serĉante pli grandajn sekurecon kaj ekonomiajn ŝancojn. Post parolado ĉe universitato en Miami, okazis io neatendita kaj tute ne rilata kun la temoj pritraktitaj: unu samgentano alproksimiĝis al mi por esprimi sian subtenon ĉar, li diris, li konis la honorindecon de mia familio, pro tio, ke ni estis paginta financan devon ŝuldita de mia patro —iom antaŭ lia morto — al lia patro, sen atestanta dokumento: ĝi estis nur parola devontigo.

Mi decidis paroli rekte ankaŭ kun individuoj kaj grupoj, kiuj rigardis kun skeptikeco mian kampanjon. Mi parolis kun la sindikatoj, kun grupoj de homaj rajtoj kaj aliaj personoj, kaj mi certigis ilin ke la Demokratia Sekureco protektos ĉiujn kaj ne nur la membrojn de iu sociekonomia grupo aŭ de iu aparta politika ideologio. Mi respondis ĉiujn demandojn pri mia pasinteco kaj miaj jaroj kiel departementestro. Kelkaj el la plej fortaj kritikoj devenis el la publikaj universitatoj, inter ili mia *alma mater*, do mi iris ofte al ili kaj parolis kun multaj personoj de la radikala maldekstrismo. Mi diris al ili ke mi estis apogonta universitatan sistemon kiu ĝuu ĉiujn liberecojn; universitato kiu estu scienca, plurisma kaj kritika, sed neniam perforta.

Ofte mi finis miajn paroladojn dirante al la junuloj:

—Mi scias ke kelkaj el vi estas favoraj al mi kaj aliaj estas kontraŭaj. Sed permesu al mi fari demandon al vi: Kiom da vi konsideris iam la eblecon aĉeti flugbileton por foriri el Kolombio kaj neniam reveni?

La granda plimulto levis siajn manojn. Tio estis signo de la urĝeco kiun ni havis por konstrui konfidon en nia Patrujo.

—Do, nun vi vidas —mi pludiris— ĉu vi konsentas kun miaj ideojn aŭ ne, ni ĉiuj estas kunigitaj en la kredo ke Kolombio devas ŝanĝiĝi. La ununuraĵo kiun mi petas al vi estas ke vi donu al mi la

1 NT Centro de Ekonomikaj Esploroj, instituto kies siglo venas el ĝia origino kiel "Nacia Asocio de Financaj Institucioj", fondita en 1974.

ŝancon strebi maksimume por ke nia lando fariĝu loko, kie vi volas esti.

Trairinte la landon dum du jaroj kaj viziti la plej forajn lokojn, mi havis pli kompletan rigardon pri la kolombia realaĵo ol tia de multaj politikistoj kiuj restrikta siajn kampanjojn al la grandaj urboj. Mi estis ankaŭ konscia pri unu vero: mi sciis, longe antaŭ aliaj, ke la ekvilibro de la kampanjoj komencis kliniĝi.

14

Kiam alvenis la jaro 2002 —jaro de elektado— mi havis 27 procentoj da favoreco en la opinisondoj, ĉirkaŭ sep procentoj malantaŭ la plej favorita kandidato kaj kun tendenco al plialtigo. Nia internaj studoj montris, ke la mesaĝo pri la Demokratia Sekureco komencis havi eĥon en granda parto de la popolo kaj, buŝon post buŝo, ĝi fariĝis decida faktoro. Post la jarfinaj festoj —en kiuj la kolombianoj tradicie kolektiĝas kun siaj familioj por festi kaj paroli pri la plej gravaj aferoj de la tempo, inkludante politikon— mi atingis la unuan lokon en kelkaj opinisondoj. La kampanjo fariĝis pli organizita kiam ĝi ekhavis la valoran aliĝon de personoj kiel Jaime Bermúdez Merizalde, Fabio Echeverri Correa, José Roberto Arango Pava, Alicia Arango Olmos, Luis Guillermo Plata Páez, Mario Pacheco Cortés, Alberto Velásquez Echeverry kaj aliaj.

Dume, la pacprocezo estis en "intensa flegado". Post tri jaroj da interparoladoj oni ne estis atinginta konkretajn rezultojn. La FARK kaj NLA daŭrigis terurigante senkompate la popolon kaj la kvazaŭarmeanoj pliigis siajn krimajn agadojn kiel neniam antaŭe. En 2001 la perfortaj mortoj superis la nombron 28.000, ekzistis pli ol 3.000 ostaĝoj, kaj ĉirkaŭ 300.000 homoj estis devigitaj fuĝi el siaj hejmoj. Kiel tion estis avertinta prezidento Fidel Castro, la FARK uzis la senarmeigita zono por firmigi siajn poziciojn kaj pliigi la profitojn kiuj devenis el drografiko. En pluraj okazoj, Prezidento Andrés Pastrana estis interrompinta la intertraktadojn, tamen, pro novaj promesoj de la FARK, li rekomencis. Unu el tiuj okazoj estis en la lastaj tagoj de januaro de 2002: la interparoloj estis interrompitaj kaj, kiam ili rekomenciĝis, la precipaj kandidatoj al prezidenteco decidis vojaĝi al San Vicente del Caguán, loko de la intertraktadoj. Mi rifuzis iri kaj denove mi rimarkigis la mankon de interesiĝo flanke de la FARK en la intertraktoj.

Kelkajn tagojn poste ĉio disfalis; tio estis kiel la subita vidaĝo de kotlavango.

La 20 de februaro, kvar teroristoj de la FARK kaperis aviadilon de la flugkompanio Aires kiu estis fluganta al Bogoto. Ili devigis surterigi la aviadilon sur mallarĝa vojo apud la urbeto Hobo —en la najbarajoj de la senarmeigita zono— kie dekoj da "kompanoj" gerilistoj estis atendantaj ilin por kidnapi la plej eminentan

pasaĝeron de la flugo: senatanon Jorge Eduardo Géchem Turbay, prezidanto de la Paco-Komisiono de la kolombia Senato.

La simbola karaktero de tiu evento estis klara: Senatano Gechem, devenanta de la departemento Huila, kie la violento severe batadis, estis elstara homo kiu pledis por la paco. Lia kidnapo estis do nova mokado far la FARK. Definitive ĝi montris ke ili ne havis interesigon pri intertraktado. Plie, la kapero de komerca aviadilo nur kvin monatojn post la atencoj de la 11-a de septembro de 2001 en Usono, utilis por malkaŝi la veran identecon de la FARK: terorisma grupo alpara kun la plej malbonaj en la mondo. Géchem restis ostaĝigita en la ĝangalo dum ses jaroj.

Kelkajn horojn post la kidnapo, prezidento Pastrana parolis al la nacio. Li deklaris en sia parolo en televidelsendo ke la interpacigaj diskutoj kun la FARK estis definitive finitaj. "Ne eblas subskribi interkonsentojn unuflanke, dum, aliflanke, armiloj estas metitaj sur la kapojn de senkulpaĵ homoj", li diris, videble ĉagrenita. Meze de sia mesaĝo, li paŭzis por montri bildojn de la detruo kaŭzita de la FARK dum ŝajne ili intertraktis pri paco: pontoj detruitaj, la senviva korpo de infano, konstruaĵoj disfaligitaj per bomboj. Li montris fotojn, kaptitaj el la aero, pri surterigaj dromoj kaj aliaj infrastrukturoj konstruitaj far la FARK ene de la senarmeigita zono. Tiele, diris prezidento Pastrana, tiu ĉi grupo montris siajn intencojn unufoje por ĉiam: "Hodiaŭ, la gerilistaro estis senmaskigita kaj ĝi montris sian veran vizaĝon, la vizaĝo de la sensenca violento".

Dum Prezidento Pastrana estis parolante al la nacio, la civitanoj sonigis la hupojn de la aŭtoj por esprimi sian konsenton kun la decido fini la intertraktadon. Kiam li finis sian parolon, mi vokis lin tuj por esprimi mian plenan subtenon. Multaj aliaj faris la samon. Usono, la Eŭropa Komisiono kaj la Unuiĝintaj Nacioj elsendis deklarojn kaj la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Kofi Annan, kondamnis la grupon FARK ĉar ili faris "klarajn" perfortojn kontraŭ la homaj rajtoj kaj ĉar ili subfosis la pacprocezon.

Horojn post sia parolado, Prezidento Pastrana sendis al la antaŭa "senarmeigita zono" batalaviadilojn kaj 13.000 homojn, en penado por rekuperi la regadon tie. La FARK, Indignigitaj pro la perdo de sia altvalora operacejo, kaj eble sentante neinvertigeblan punkton de ŝanĝiĝo flanke de la publika opinio, respondis atakante per ondo de senprecedenca brutaleco. Ili aj agoj preparis la scenejon por la sekvontaj ok jaroj.

Tri tagojn post kiam estis agnoskita la fiasko de la interpacigaj diskutoj, la FARK ostaĝigis la kandidatinon al prezidenteco, Ingrid Betancourt. Ŝi ne estis alte en la opinisondoj, tamen ŝia kampanjo kontraŭ la koruptado kaj ŝia persona historio estis altirinta la atenton de multaj kolombianoj. Mi estis vidinta ŝin tre malofte, tamen mi konis ŝian karieron kiel civitanino de Francio kaj Kolombio, kaj kiel senatanino. Spite al avertoj el la kolombia armeo, ŝi decidis vojaĝi al San Vicente del Caguán— la "ĉefurbo" de la jam tiame malaperinta areo senarmeigita por la FARK— por esprimi sian solidarecon kun la urbestro de la municipo, apoganto ŝia. La FARK haltigis ŝian veturilon sur la vojo kiu kondukas el la apuda urbo Florencia al Caguán kaj kidnapis ŝin, fakto kiu tuj provokis kondamnon fare de la franca registaro, de Unuiĝintaj Nacioj kaj de aliaj registaroj kaj organizaĵoj. La longa kaj sinua vojo al liberigo de Batancourt estis fariĝonta unu el la ĉefaj celoj de mia administrado.

La kaoso kiu sekvis la finon de la interpacigaj diskutoj intensiĝis en tia grado, ke ĝi surprizis eĉ la plej harditajn kolombianojn. En la urbo Villavicencio, sude de Bogoto, la FARK eksplodigis dinamitan kartoĉon en homplena diskoteko, kaj kiam la kuriozuloj venis al la loko de la okazintaĵo la FARK eksplodigis alian pli fortan ŝargon: la rezulto estis dek du homoj mortigitaj kaj sepdek vunditaj. La FARK multobligis siajn atakojn kontraŭ la landa infrastrukturo: ili dissaltigis naftoduktojn, latis-mastojn de elektra distribuo kaj hidraŭlikajn konstruaĵojn. La senelektrigoj estis ĉiam pli oftaj en niaj urboj. En marto, du sikarioj mortigis monsinjoron Isaiás Duarte Cancino, ĉefepiskopo de la urbo Kalio kiam li eliris el geedziĝa ceremonio en malgranda preĝejo. Amita de multaj kolombianoj kiel la "apostolo de la paco", la ĉefepiskopo estis forta kritikanto de tiuj drogŝakristoj teroristoj kaj iliajn krimojn; en iu homilio li estis petinta al Dio helpi la membrojn de la neleĝaj armitaj grupoj "kompreni ke ilia milito ne estas justaĵo, sed simple ripeto de la sovaĝaj aktoj de la plej malfeliĉaj momentoj el la homa historio". Kiam mi estis departementestro kaj li episkopo en Urabá, ni laboris kune pri la disvolvo de edukaj agprogramoj el kiuj profitis multaj malriĉuloj. Mi ĉeestis lian funebraĵon konsternita pro la morto de kuraĝa viro, neriproĉebla kaj inspira; ankaŭ akompanis lin al lia tombo 20.000 personoj el Kolombio kaj eksterlando. Papo Johano Paŭlo la 2-a eldonis komunikajon lamentante la morton de monsinjoro Duarte kaj li alvokis ĉiujn kolombianojn por preni la vojon al paco.

La violentuloj ne aŭskultis. Kelkajn semajnojn poste, en aprilo, pluraj membroj de la FARK, maskovestitaj kvazaŭ membroj de kontraŭbomba brigado, sturmis la Departementan Asembleon de Valo de Kaŭko, en Kalio, trompis dek du deputitojn, eniris ilin en buson kaj forportis ilin kidnapitaj. Tiun saman monaton, dum batalo kontraŭ kvazaŭarmeanoj por regado de strategia zono por la drografiko, proksime de la urbeto Bojayá, la FARK jetis bombon — farita el gasbotelego— al la preĝejo kie civiluloj estis rifuĝantaj. La mortigitoj estis 117, inter ili kvardek ok geinfanoj; tio estis denunciata far grupoj defendantoj de homaj rajtoj kiel milita krimo.

La kolombia popolo estis saturita. Ne nur la rolon de la FARK en la pacprocezo estis farso; tiu ĉi procezo ankaŭ evidentigis la malfortecon de niaj institucioj. La dezirego por paco kaj sekureco estis nesatigebla. Fine de februaro —tagojn post kiam la aviadilo kie veturis senatano Géchem estis kaperita— mi havis unuafoje pli ol 50 procentojn el voĉdona intenco. La lando estis klamanta por granda ŝanĝo, por transformo, por tuta rompo disde nia pasinteco. La propono de Demokratia Sekureco prezentis klaran vojon sekvindan.

La lasta obstaklo kiun mi estis devonta venki se mi volis alveni al prezidenteco estis klara: resti viva.

15

En 2001 la FARK serĉis min almenaŭ trifoje. Unu el tiuj fojoj estis per viro kiu ŝajnis sin esti studento pri teologio kaj li gajnis la konfidon de miaj helpantoj de kampanjo. La nokton antaŭa al tiu kiam li devis eksplodigi bombon en mia kampanja sidejo, li pentis kaj donis sin al la Polico. Surbaze de lia konfeso, la Polico arestis aliajn aktivulojn de la FARK kaj konfiskis valizo-bombon kiu havis teknologion akirita el ETA kaj IRA laŭ posta dedukto de la aŭtoritatoj. En alia atako en kariba urbo Barranquilla, la FARK instalas eksplodaĵojn en ĉaro tirita de azeno, planite por eksplodi dum la paso de mia karavano. La bombo eksplodis, tamen la damaĝojn suferis taksio kaj ĝiaj pasaĝeroj. La incidento estis konita kiel la azeno-bombo.

Tamen, tiuj komencaj atakoj estis preskaŭ infanludoj. Ju pli alproksimiĝis la tago de la balotelekto kaj mi fariĝis la nediskutebla favorito, des pli malboniĝis la atakoj: la violentuloj sciis ĝuste la sorton, kiu atendis ilin se mi estus elektata prezidento. Ni ricevis konstantan torenton de informoj pri murdo-planoj forĝitaj far la FARK, la NLA, kaj aliaj grupoj; ĉiu grupo ŝajnis konkuranta kontraŭ la aliaj por vidi kiu mortigus min unue, kvazaŭ en sanga konkurado. Necesis ke pluraj dekduoj da korpogardistoj prizorgis min en ĉiu momento.

—Álvaro ne estas nur milita celo de la gerilistaro —diris mia amiko Andrés Uriel Gallego—. Li estas milita trofeo.

Mi decidis ne dediĉi tro da atento al la minacoj, kaj nekonsterneble mi daŭrigis la piediradon tra la stratoj kaj urboj de Kolombio. Kiel ĉiam, mi metis mian fidon en Dio kaj en la trejnita teamo responsa pri mia sekureco. Ni ricevis ankaŭ gravan apogon de la registaroj de Britio kaj Hispanio, kiuj malavare donacis aparatojn por ĵamado kontraŭ bomboj kaj aliajn teknikaĵojn destinitaj al nia integreco.

La atakoj el miaj politikaj kontraŭuloj estis pli mildaj kaj antaŭimageblaj: ili cirkuligis onidirojn pri iu foto pri mi kun Pablo Escobar Gaviria, foto kiun baldaŭ publikigis la ĵurnaloj; ondoj de falsaj akuzoj kontraŭ kelkaj membroj de mia familio pri supozita alianco kun drogo-karteloj kaj kvazaŭarmejaj grupoj. La plej stranga

akuzo estis, eble, tiu de unu libro eldonita en Eŭropo; en ĝi oni akuzis min pri esti ordoninta —en koluzio kun mia familio— murdojn en entrepreno de krud-sukeraj blokoj kiun ni estis donitaj al laboristoj en la jardeko de la sepdekaj jaroj. La strangaĵo estis ke la laboristoj "mortigitaj" menciitaj en la libro estis vivantaj!

Mi respondis al ĉiuj tiaj falsaj akuzoj kun kompleta honesteco kaj travidebleco: mi publikigis vastan financon deklaron kiu enhavis la nomon de la kolombia banko kie mi havis la monon ekde kiam mi estis 18-jaraĝa kaj la numeron de mia konto; mi donis al la gazetaro la nomojn de tiuj bankoj en kiuj mi estis malferminta provizorajn kontojn kiam mi estis en Oksfordo kaj Harvard, la solaj du kontojn kiujn mi havis en eksterlando. Kaj mi ripetis ke mia tasko, se mi atingus la prezidentecon, estis meti finon al ĉiuj drogŝakristoj teroristoj, senescepte, kun la nura celo alporti la pacon al ĉiuj kolombianoj.

Nu, kiam fariĝis pli emocia la kampanjo, kaj preskaŭ neeviteblaj la rezultoj, la FARK ludis sian lastan karton: la 15-an de aprilo, ses semajnojn antaŭ la balotelekto, bombo eksplodigita per teleregilo detonaciis apud strato multe traŭrita en Barranquilla ĉe la paso de mia karavano. La forto de la eksplodo krevigis la pneŭojn kaj rompis fenestron de la blendita aŭto; nia ŝoforo ekestis en ŝoko momente. Mi estis ĉe lia flanko (en la alia fronta sidloko): mi prenis la stirradon kaj premis la akcelilon per la maldekstra piedo por iri iomete antaŭen se okaze ekzistus alia bombo kaŝita. Poste mi rigardis la pasaĝerojn kiuj veturis en la malantaŭa sidloko: Alicia Arango, Julio Aldana kaj Senatano Dief Maloof. Dank' al Dio ni ĉiuj estis senvundaj. Ekster danĝero, mi rigardis tra nubo de fumo: ĉirkaŭis nin disŝiritaj korpoj kaj torditaj restaĵoj de motorcikloj. La bombo eksplodis dum paso de buso kaj inter piedirantoj. Mi eliris el la aŭto por provi helpi la postvivantojn. La rezulto estis tri mortigitoj kaj dudek du vunditoj, inkludante kvin policanojn kaj tri-jaraĝa infanino kiu perdis siajn krurojn.

Tiuj elmontroj de barbereco kaj de malrespekto al senkulpuloj, nur utilis por kreskigi la deziron de la kolombianoj por ŝanĝo. Post la atenco en Barranquilla ni decidis fari malpli da eventojn eksterporde, parte por konservi la integrecon de la civila loĝantaro. Kelkaj membroj de mia kampanja teamo estis devigataj vivi kaj labori en hotelo en Bogoto. Eĉ tiel, nia kampanjo ne haltis. En kunveno en Medegino, ĉirkaŭ 18.000 subtenantoj ĉeestis la torejon de la urbo: televidaj ekranoj estis instalitaj por ke mi alparolu la

homamason el nia sidejo en Bogoto. Tiam rememoris mi la kampanjon kiun, en 1991, mi estis farinta el telefonbudo en Harvard Square, tamen ĉi-foje la publiko ne estis nevidebla kaj ĝia respondo estis mirinda.

Spite la amason de minacoj far ĉiuj aktivaj terorismaj grupoj en la lando, la 26-an de majo de 2002 la kolombianoj iris al la urnoj. Pli ol 200.000 soldatoj kaj policanoj estis deplojitaj tra la lando por certigi pacan elektadon; ili atingis tion preskaŭ ĉie. La skrutinio donis al mi la venkon: 53 procentoj el la voĉdonoj, sufiĉaj por eviti duan raŭndon kaj dek naŭ procentoj super la plej proksima kandidato. La mandato por apliki la Demokratian Sekurecon estis nerebatebla.

Tiun saman nokton mi alparolis la nacion kun la koro plena de dankemo kaj espero. Retenante larmojn, mi dankis al la nacio pro la voĉdonoj kaj al mia familio, kaj mi devontigis min regadi por ĉiuj kolombianoj. Mi faris omaĝon al mia patrino kaj preĝis por ke ŝi "akompanu min el la ĉielo kun tiu amo por mia lando kiun ŝi ĉiam enplantis ĉe mi". Mi honoris la memoron de mia patro kaj rimarkigis ke li estis mortigita kiam li havis la aĝon kiun mi havis tiam. Mi parolis pri la prezidentaj kandidatoj mortigitaj en la pasinteco: Jorge Eliécer Gaitán kaj Luis Carlos Galán, kies vidvinon mi estis telefoninta iomete antaŭ mia parolado. Mi promesis revivigi la ekonomion kaj havigi al ĉiuj kolombianoj ŝancojn de laborado kaj edukado per rigoraj socialaj strategioj. Mi petis al niaj latinamerikaj najbaroj kaj al la cetero de la mondo helpon por solvi niajn problemojn, kaj al la violentaj grupoj demeti la armilojn, mi promesis "repaciĝon" al tiuj kiuj estis farontaj tiel.

—Mi petis al Dio klerigi min kaj doni al mi la talenton kaj energion por konduki bone kun Kolombio. Estas epoko de multaj responsoj —mi rimarkigis.

Komenciĝis la plej malfacila parto de nia vojaĝo.

KVARA PARTO

Konfido

"Kun publika sento, nenio povas malsukcesi; sen ĝi, nenio povas sukcesi. Do, tiu kiu modlas la publikan senton iras pli profunden ol tiu, kiu promulgas leĝojn aŭ prononcas decidojn".

ABRAHAM LINCOLN

1

Ni aŭdas la sonon minutojn post kiam mi ĵuris kiel prezidento.

Ŝajnis kvazaŭ malproksimaj artfajraĵoj, aŭ kvazaŭ la malforta sono el metalaj tamburoj. La vero estas ke mi apenaŭ rimarkis. Tiumomente mi estis piediranta kun Lina tra la koridoroj de la Kongresejo. Mi vidis la maltrankvilan rigardon en ŝiaj okuloj. Mi premis ŝian manon por trankviligi ŝin.

—Tio estis bomboj —ŝi flustris al mi—. Ili falis tre proksime, Álvaro.

Ŝiaj manoj tremis.

Mi kapjesis, strebante por ŝajnigi trankvilan esprimon. Mi estis la prezidento de la lando, kaj ĉiuj rigardoj estis sur min. Dum ni malsupreniris haste la ŝtuparon por forlasi la Kongresejon, Lina stumblis kaj preskaŭ falis. Mi kaptis ŝian brakon en la lasta momento.

Kapitano Rodolfo Amaya, kiu estis fariĝonta unu el miaj plej fidindaj kaj kuraĝaj konsilistoj, atendis nin malsupre.

—S-ro Prezidento, okazis kelkaj danĝeraj eksplodoj. Ni estas tre zorgigitaj.

Mi dankis lin kaj rigardis trans la placon al la Domo de Nariño, la prezidanta palaco. Prezidento Pastrana, lia teamo kaj membroj de la altranga armea komandantaro estis atendantaj nin ekster la ĉefa pordo. Rapide ni transiris la placon, mi koncentriĝis kun ĉiu paŝo kiun mi faris. Je mia alveno, mi manpremis kun la Prezidento Pastrana kaj dankis lin sincere por liaj kvar jaroj da servo al nia nacio. Tiam mi turnis min al la armeaj komandantoj.

Precize tie, ekster la ĉefa pordo de la prezidanta palaco, kaj dum la proksima fumo leviĝis kaj sirenoj eĥis tra la tuta ĉefurbo, ni konsistigis la unuan Sekurecan Konsilion de mia prezidenteco.

—Fortikecon —mi diris—. Por tio ni venis. Estas tial ke ni estas tie ĉi.

2

Dum semajnoj ni timis ke ekzistos problemoj. Ni sciis ke la FARK, malkontentaj pro mia balotelekto kaj pro la eksterordinara ŝanĝo en la publika opinio kiu ebligis tiun elekton, estis provontaj montri sian potencon. Ili celos timigi la kolombianojn kaj pruvi ke ili ne kapitulacas facile. Dum la alproksimiĝo de la tago de la enoficigo, ni ricevis kontinuajn, tamen malprecizaj, raportojn pri atakplanoj far la teroristoj. Kiel neniam antaŭe, fariĝis evidenta por mi la stato en kia troviĝis nia informiĝada servo: ni ne sciis tion kion planis la FARK eĉ en la ĉefurbo de la lando por tiom grava okazaĵo, por kiu la listo de difinitaj vizitantoj estis longa; dekoj da fremdaj eminentuloj el la regiono kaj el la mondo, inter kiuj estis la prezidanto de Venezuelo, Hugo Chávez, kaj Robert Zoellick, usona komerca reprezentanto kaj posta prezidanto de la Monda Banko.

Ĉi tiu neleĝa grupo estis decidinta fari simbolan atakon por atingi strategiajn rezultojn. Atakante la centron de la registara potenco kaj, eble, interrompi la ceremonion, dum la mondo estis rigardanta, la FARK volis sendi la mesaĝon, ke neniu estis ekster danĝero kaj ke ili trafus ajnan personon en ajna momento kaj en ajna loko (kvazaŭ prave, la eksterlandaj delegacioj povus senti sin alvenintaj al Kabulo kaj ne al Bogoto). La atako povus plifortigi la malnovan kaj kadukan teorion ke alfronta sinteno flanke de la kolombia registaro nur kondukus al pli granda violento. Ili eble kredis, ankaŭ, ke drama enrompo en mia unua tago donus al ili pli fortan pozicion por estontaj intertraktadoj.

La ekziginta registaro prenis la preventajn rimedojn por la tago de la prezidenta ŝanĝo: la aera spaco de Bogoto estis fermita por komercaj flugoj dum la ceremonio; armitaj helikopteroj kaj gvataviadilo P-3 —posedaĵo de la Usona Dogana Servo— flugis super la urbo; pli ol 20.000 soldatoj kaj policanoj estis deplojitaj tra la ĉefurbo.

La matenon de la enoficigo, dum mi estis okupita en kunvenoj de la formalajoj, reprezentantoj de la Centra Informiĝa Agentejo de Usono petis urĝan kunvenon kun Lina kaj kelkaj el miaj ĉefaj konsilantoj. Ĝis la Hotelo Tequendama, en la centro de Bogoto, kie ni estis, alvenis la reprezentantoj de la CIA kaj tuj ili diris ke ili havis raportojn el informiĝado laŭ kiuj la FARK ne "permesos" mian

enoficigon kaj ke estis eble ke la vojo inter la hotelo kaj la Ministrejo pri Eksteraj Aferoj estis minita kun eksplodaĵoj. Kvankam ili ne rekomendis eksplicite la abortigon aŭ modifon de la ceremonio, ili rimarkigis ke la alta nivelo de minacoj igis "ekstreme danĝeraj" niajn preparojn por tiu tago.

Mi estis decidita procedi kun la plej granda ebla normaleco kaj ne cedi al la terorisma minaco. La personoj responsaj pri mia sekureco, elektis solvon ne tre ortodoksan: ili sendis karavanon el kamionetoj kaj motorcikloj ekde la hotelo al la palaco. Ne okazis atakoj. La procedo estis ripetita: tri apartaj karavanoj en kiuj ŝajnis ke mi troviĝis, faris la trairon sen incidentoj. Dume, Lina kaj niaj filoj, vicprezidento Francisco Santos, lia edzino kaj gefiloj, Sandra Suárez, mia privata sekretariino Alicia Arango, mia gazetara komisiito Ricardo Galán kaj mi estis distribuitaj en malsamaj veturiloj. Ni direktis nin al la palaco eskortitaj de apenaŭ du motorciklistoj kaj traitante kontraŭdirekte la 10-an nordsudan straton, en la centro de Bogoto.

Dum jardekoj, la tago de siaj enoficigoj la kolombiaj prezidentoj estis piedirintaj el la Palaco de San Carlos —sidejo de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj— ĝis la Kongreso, por festi nian demokration kaj la disiĝo de povoj. Tiufoje, tamen, antaŭ la ceremonio, kelkaj membroj de la armeo informis ke tiu piedirado —nur du domblokojn longa!— estos flankenmetita pro eblaj minacoj. Mi devus fari la trairon, kun mia familio, en la blendita veturilo kiun ni uzis dum la kampanjo: kamioneto posedaĵo de S-ro Carlos Ardila Lülle, ekipita kun ĵamsignalo pruntedonita al ni far la registaro de la hispana ĉefministro José María Aznar.

Tia estis Kolombio la tago de mia enoficigo: la aera spaco de la ĉefurbo estis fermita, usona gvataviadilo superflugis, dekoj da miloj da soldatoj patrolis en la stratoj, nekalkulebla nombro da teroristoj kaŝe observis kaj la prezidento estis entenita en aliula kamioneto blendita kaj ekipita kun pruntita fremda teknologio.

Tio ne sufiĉis.

3

La 7-an de aŭgusto de 2002, la teroristoj de la FARK ĵetis almenaŭ 14 pafajojn de haŭbizo en la centro de Bogoto, en klopodo por difekti aŭ devigi la abortigon de la prezidenta ceremonio. Unu el la pafajoj surteriĝis en la areo de la Domo de Nariño kaj vundis kvar policianojn, la ceteraj maltrafis siajn celajojn. Ili falis en El Cartucho¹, malriĉa kvartalo kelkcent metrojn for de la prezidenta palaco. Unu elementa lernejo tiame malplena kaj pluraj proksimaj domoj estis ankaŭ trafitaj. La tuta rezulto estis dek naŭ mortigitoj, inter ili tri infanoj, kaj pli ol sesdek vunditoj.

Neniu el la vizitantaj altranguloj estis vundita. Tamen la perturbo kaj ĥaoso kaŭzita far la atako estis grandegaj. "Paniko reĝis dum la minutoj sekvintaj la eksplodojn", diris informo en la ĵurnalo *Los Angeles Times*. "Sangokovritaj soldatoj kuris tra la stratoj, kaj aviadiloj kaj helikopteroj de la Aerarmeo resonis en la aero. Korpoj kuŝis inter torditaj rubaĵoj ... Kelkaj konstruaĵoj estis plenaj de truoj".

La tragedio povintus esti pli malbona. La Polico rapide trovis la domon el kiu la pafajoj estis ĵetitaj, kaj ĝi trovis ĉirkaŭ okdek obusojn de 120 milimetroj kaj kelkaj pakojn kun eksplodaĵoj kaj detonaciigilojn el dratobobenoj. En alia areo de Bogoto, la Polico malkovris alian baterion kun ĉirkaŭ naŭdek haŭbizoj celantaj kontraŭ armea lernejo en la nordo de la urbo. La grandeco de la atako markis alian punkton en la krueleco de la metodoj uzitaj far la FARK: generalo Hector Dario Castro, direktoro la Polico en Bogoto, komparis ĝin kun tiu de la 11-a de septembro de 2001 en Novjorko, ĉar la vivoj de senkulpaj civiluloj estis ignoritaj kiel oni ne vidis antaŭe en nia lando.

—Ni sciis ke iu atako estis ebla —diris generalo Castro— sed ni ne povis detekti la metodon kiu estus uzata far la teroristoj.

La reagoj en nia lando kaj eksterlande estis fortaj. Prezidento George W. Bush denuncis la atakojn kiel provo "detruo la aspirojn de la kolombia popolo al libera, prospera kaj demokratia Ŝtato". Ankaŭ Unuiĝintaj Nacioj kondamnis tiujn atakojn.

1 [NT Prononcu "el kartUĉo"](#).

Ekzistis, tamen, kelkaj homoj kiuj antaŭdiris ke la atakoj markis la komencon de epoko kun pli da sangoverŝado kaj sufero por Kolombio. Iu supozita spertulo prognozis en CNN ke miaj strategioj kaŭzus 100.000 mortoj en Kolombio dum mia unua jaro kiel prezidento, kaj ke senlaboreco leviĝus al 40 procento. Alia analizisto de internaciaj rilatoj diris ke "la adopto far Uribe de militaj solvoj al persistaj sociaj problemoj povas kontribui al intensiĝonta senelirejo en la venontaj jaroj".

Mi ne lasis min esti timigita, kaj mi esperis ke nek Kolombio lasos sin. Tiuj malfacilaj momentoj ĉe la komenco de mia prezidenteco indikis ke la direkto de nia lukto estis jam komencinta ŝanĝi la procezojn unufoje por ĉiam. En tiuj malfacilaj momentoj mi memoris ion kion mi konkludis el miaj legadoj de Miguel de Unamuno: la fajro kiu fandas la buteron hardas la ŝtalon.

Alivorte, ni ne povas permesi ke la tiamaj cirkonstancoj, senrigarde kiom ajn tragikaj ili estis, ŝancelu nian volon; por atingi tion, ni devis rigardi, kien ni estis antaŭe kaj, eĉ plej grave, kien ni iras. Nia politika volo estis forta. La plejmulto el la civitanoj apogis nin. Ni havis klaran planon por la sukceso. En la profundon de la koro, mi sciis ke mia regado ne estos difinita laŭ tiuj abomenindaj agoj de terorismo, faritaj de malesperinta kaj marĝenigita minoritato. Ne, tio ne eblis. Tamen, la atakoj de tiu tago en aŭgusto estis nur ia enkonduko kaj, en la postaj monatoj, la teroristoj estis farontaj ĉion eblan por haltigi nian iradon al la sekureco kaj la paco.

4

Kio estis la unua paŝo kiu kondukis al progreso en la lukto kontraŭ la violento en Kolombio? Ĉu estis la laboro de informigado? Ĉu estis la helpo kiun ni ricevis el Usono? Ĉu estis la volonta partopreno de la komunumo? Mi ofte faris tiujn demandojn al mi mem. Kiamaniere ni pasis el la ĥaoso ekzistanta ĉe mia prezidenta enoficiĝo, kun kadavroj disjetitaj en la stratoj de Bogoto, al la grandaj sukcesoj, kiu venis poste? Kio estis la turnopunkto? Mi rifuzas simpligi tion kio okazis: estis ok jaroj da senlaca laboro kaj ne ekzistis magia sanigilo por la problemoj de nia lando. Tamen, kiam oni petas al mi rimarkigi unu elementon kiu klinis la baskulon en nia favoro, mi pensas pri interparolo kiun mi havis en marto 2002 kun Francisco Santos Calderón, kiam mi invitis lin aliĝi al la kampanjo por esti mia partnero vicprezidento.

"Pacho" ¹, kiel liaj amikoj nomas lin, estas rimarkinda ekzemplo de la integreco kaj la kuraĝo de kolombianoj. Ĵurnalisto laŭ kariero, li estis ostaĝigita en 1990 pro ordono de Pablo Escobar kaj la tiel nomita "kartelo de Medeĝino" por utiligi lin kiel rimedo de premo kontraŭ la registaro, volante devigi paralizi la ekstradicion de la estroj de tiu kartelo al Usono. Li eltenis ok longajn monatojn da kaptiteco kaj post sia liberigo li fariĝis pasia kaj nefleksebla ĉampiono kontraŭ la kidnapo: li denunciis ĝin kiel rimedo de la terorismo kaj li fondis neprofitcelan organizaĵon por apogi la ostaĝojn kaj iliajn familiojn. Lia voĉo estis klara kaj justa kaj, neeviteble, la violentuloj klopodis silentigi lin. Kiam mi invitis lin por esti mia partnero vicprezidento, li estis en ekzilo en Hispanio, kie li estis pasiginta la lastajn du jarojn post sennombraj minacoj kontraŭ sia vivo. La akcepto de mia propono ne nur signifus esti senĉese apud mi —kun ĉiuj riskoj ke ĉi tio implicis— sed ankaŭ reveni al lando kiu estis ekzilinta lin, same kiel ĝi ekzilis aliajn milionojn da kolombianoj.

Li kaj mi estis renkontiĝintaj, dek unu jarojn antaŭe, kiel studentoj ĉe Universitato Harvard kaj post tiuj jaroj ni intervidiĝis nur du fojojn. Mi neniam haltas serĉi ŝancon kun tiuj homoj pri kiuj mi kredas ke ili povas esti efikaj gvidantoj, tial kaj malgraŭ nia eta familiareco, mi serĉis mian konaton Pacho, kiun mi admiris

1 [NT Pronocata "Paĉo"](#), estas karesa nomo por viro nomita Francisco.

ekde pluraj jaroj antaŭe pro lia pasio kaj konvinkiĝo. Mi estis certa, ke li povus doni multajn el siaj kvalitoj al nia registaro, inkluzive klaran moralan voĉon pri aferoj de homaj rajtoj. Tamen, kiam mi faris al li la proponon, li komence rifuzis.

—Mi sentas min honorita —li diris—. Tamen mi devas diri al vi, ke mi scias nenion pri aferoj de regado.

—Vi plenumos bone —mi certigis al li—. Komence vi nur devas zorgi pri unu afero.

—Pri kio? —Li demandis surprizite.

—Pri la konfido.

Tio estis facile direbla, sed malfacile farebla. Tamen, dum pluraj jardekoj mi estis ellaborinta detalan planon en mia menso. Kaj je la kvara horo matene de mia unua tago kiel prezidento, ni eklaboris.

5

La 8-an de aŭgusto, antaŭ tagiĝo, ni ekveturis en la aviadilo FAC-001 al Valledupar, kiu estis unu el la urboj kun pli da violentaj agoj en Kolombio.

Valledupar estis speco de vojkruĉiĝo. Bone planita kaj arboplena urbo, situanta relative proksime de la Kariba Maro, de la kunfluo de du montoĉenoj kaj de la limo kun Venezuelo. Tiu strategia situo igis ĝian teritorion tre avidita fare de drogŝakristoj: la NLA, FARK kaj kvazaŭarmeanoj jam dum pluraj jaroj estis batalantaj por ĝia regado, kaj ili igis ĝin centro de kidnapoj kaj masakroj. Aliflanke, Valledupar estas konata pro ĝia kultura riĉeco kaj pro la Festivalo de Vallenato-Legend¹, evento kun internacia prestiĝo kaj kun la kapablo por kunvoki ĉiajn kolombianojn, sen distingo pro ekonomia klaso. La komponistoj kaj interpretistoj de vallenato, kiel Rafael Escalona, havas lokon de honoro en la koro de la Patrujo. Kiam mi estis farinta kampanjon en tiu ĉi urbo, mi aŭdis multajn homojn plendi pri politikistoj kiuj iris en sian urbon nur dum la festoj.

—Ni estas kovritaj de sango —viro diris al mi—, kaj ili venis tie ĉi nur por trinki viskion kaj aŭskulti nian muzikon.

Ĉi tiu estis la tipo de lokoj kiujn ni estis deciditaj transformi kaj mi estis promesinta al la popolo de Valledupar ke mi estos en ĝia urbo dum mia unua mateno kiel prezidento, antaŭ tagiĝo. Ĉi tio implicas prokrasti regulajn kunvenojn kun eksterlandaj altranguloj en Bogoto, tamen mi estis decidita piediri inter la popolo por akiri veran kaj aŭtentikan vidaĵon pri la defioj de la lando, same kiel mi estis farinta dum la porprezidenta kampanjo, kaj pasigi tiom da tempo for de la oficejo kiel estus eble. Tiel mi estis faronta ekde la unua tago.

Mi ne forgesos la surteriĝon tiumatenan en Valledupar: ni rapide malsupreniris el la aviadilo kaj tuj ni iris en eskortita karavano al la urbocentro: la armeaj kaŝpafistoj ŝajnis gvati en ĉiu tegmento kaj la soldatoj, kun streĉita mieno, staris garde, kelkajn metrojn unu post alia. Iuj membroj de mia teamo rigardis tra la fenestro kun okuloj larĝe malfermitaj, aŭ eble kun timo. Ŝajnis ke ni surteriĝis en zono

1 NT "Vallenato" estas Kolombia popolmuziko kiu precipe venas de la kariba regiono.

de milito. Kiam ni alvenis al la urbestrejo, estis evidente, ke civitanoj kaj funkciuloj estis tro timemaj paroli, kaj ili nur murmuris kaj aplaudis malforte.

Tiuj homoj bezonis ion kion ili povu kredi. Kaj tio devis okazi baldaŭ por eviti ke la violentaj grupoj efektive pliajn atakojn kaj detruu la delikatan esperon kiu akompanis mian balotelekton.

Mi vidis tiam, klare, ke unu el la plej gravaj strategioj komence de nia prezidenteco estis koncentriĝi pri "fruj venkoj" en rapidaj kaj palpeblaj signoj de venko super la violentuloj, por pruvi al la kolombianoj ke la gvidlinioj de nia registaro estis eblaj (tiu ĉi rimedo ne devus malutili al strategiaj iniciatoj pli gravaj, kiel la pligrandigo de la Sekuriga Agentaro kaj ĝia operaca kapablo, strategioj kiuj bezonis plurajn monatojn antaŭ ol montri konkretajn rezultojn). Ni bezonis ion palpeblan, ion kio la homoj povu vidi kaj tuŝi, preferinde ekde la unua tago. Ni ne havis multe da mono, kaj, tial, ajna plano devus esti malmultekosta, tamen kun evidentaj rezultoj: se ni ne atingus baldaŭ kreskigi la konfidon pri la registaro, la krizo kiun ni vivis povus malaperigi la fidon kiun la voĉdonintoj havis pri ĝi — iuj estis dirintaj ke ili voĉdonos por Uribe ĉar eble tio bonos, tamen ili sentis ĉion perdita— kaj ni ne havus la minimuman optimismon de la publika opinio, kio necesis por apliki la planojn por la meza kaj la longa limtempoj: por kredigi pri tiuj planoj estis necese transformi la skeptikismon en iuj komencaj esperoj.

Do, ni demandis nin: kio estos nia "frua venko" en Valledupar. La decido falis sur strategio profunde enradikiĝinta en la psiko kaj en la kolombia realaĵo de la lastaj jaroj: ni estis destinontaj niajn limigitajn rimedojn por rekapti la regon sur la eniraj kaj eliraj vojoj de la urbo.

Kelkaj armeaj komandantoj opiniis —kun respekto— ke tiu ideo estis frenezaĵo. Ili pensis, ke la malmultaj trupoj kiuj ni havis devus esti destinitaj al grandaj ofensivoj en la sudoriento kaj aliaj partoj de Kolombio kie la membroj de la FARK estis pli multnombraj. Ili rimarkigis, krome, ke se ni provus protekti longajn sekciojn da vojoj, plej verŝajne niaj trupoj kaj rimedoj malkreskus, kio lasus nian ariergardon elmetita sen proponi ajnan daŭran taktikan avantaĝon laŭ tradicia milita perspektivo; povus okazi eĉ, ke tiu strategio ne estus realigebla, ĉar la armitaj grupoj estis pli fortaj en la kamparaj areoj.

Mi dankis kaj respektis —kiel mi ĉiam faras— la opiniojn de la komandantoj. Mi ankaŭ komprenis iliajn vidpunktojn. Tamen, dum la lastaj tri jaroj mi estis vidinta la manieron kiel la anarkio en la vojoj havis ruinigan efikon sur la komerco kaj sur la spiritfortikeco de la kolombianoj. Fakte, la vojaĝo tra vojoj inter la grandaj urboj de la lando, kaj eĉ inter urbetoj, fariĝis tre danĝera: la armitaj grupoj starigis neleĝajn blokadojn, kiujn ili nomis "miraklaj fiŝkaptadoj", aludante tiun biblian rakonton laŭ kiu, konsilitaj far Kristo, liaj disĉiploj ĵetis retojn en la maron de Galileo atingante abundan fiŝkaptadon. En tiuj "fiŝkaptadoj" ili forrabis senkulpajn civitanojn, homoj de ĉiaj aĝoj kaj enspezniveloj, kiujn la teroristoj eltiris el iliaj veturiloj kaj ostaĝigis ĝis kiam ties familianoj pagas elaçeton. Por multaj loĝantoj de urboj, kie la perforto ĉiam estis pli malalta ol en la kampo, la timo al tiuj blokadoj estis la maniero kiel la terorismo pli rekte tuŝis iliajn vivojn (la manko de alia ebla opcio por vojaĝi inter urboj estas ankaŭ unu el la kaŭzoj kial la enlanda aviada industrio estis forta en Kolombio).

Tiuj neleĝaj blokadoj estis eble la plej granda simbolo de la senpoveco de la Ŝtato kaj tial, se ni reakirus la regon sur la vojoj, ni atingus plurajn celojn samtempe. Unue, ni pliiĝus la konfidon pri la registaro: la fakto povi iri tra kie ajn ili volas kaj kiam ajn ili volas, havus gravajn efikojn sur la spiritfortikeco de multaj milionoj da kolombianoj. Tio estis la libereco en la plej pura senco: la libereco cirkuli sen maltrankviliĝi pro ajna danĝero. Due, ni stimulus la ekonomion en ĉiuj ĉirkaŭaj areoj tra kiuj vojaĝadis aŭtoj kaj kamionoj —hoteloj, benzinstacioj kaj restoracioj— kaj normaligis la interurba komerco, kio havus tujan multiplikan efekton, pro tio, ke pli da mono cirkulus inter la kamparaj zonoj kaj la urbaj entreprenoj. Trie, ĉesigi la praktikon de miraklaj fiŝkaptadoj estus senigi la teroristojn je fonto de enspezoj kiu levigis al dekoj da milionoj da usonaj dolaroj ĉiujare, bato kiu, malfortiginte ilin, favorus niajn militajn operacojn.

Do, ni decidis apliki tiun strategion en multaj lokoj en la tuta lando, sub la kapabla gvidado de nia ministrino pri Defendado, Marta Lucía Ramírez, kaj de niaj armeaj kaj policaj komandantoj. Valledupar estis fariĝonta la ekiro-punkto simbola, kaj intence aŭdaca.

Ni komencis en tri sekcioj de la aŭtovojo: Valledupar-Riohacha-Maicao, Valledupar-Pailitas kaj Valledupar-Fundación-Sankta Marta. Tio estis iom pli ol 800 kilometroj da vojo, tamen, ne neces

kontroli ĉiun centimetron de la aŭtovojo, almenaŭ ne ekde la komenco. Ni estis komencontaj organizante eskortadojn: tiuj kiuj estis vojaĝontaj kunvenos en siaj aŭtoj kaj kamionoj je horo antaŭe difinita, kaj niaj armeanoj akompanos ilin sur la vojo kun sufiĉa potenco de pafado por forpeli ajnan atakon. Ni estis kreontaj ankaŭ retojn el ordinaraj homoj laŭlonge de la vojoj —ekzemple, en benzinstacioj kaj malgrandaj vendejoj— ekipitaj kun porteblaj sendriceviloj aŭ telefonoj por raporti iun ajn danĝeron aŭ minacon kiun ili detektos. Tiu ĉi koncepto de civitana kunlaboro —strategio kiu datiĝis de mia posteno kiel departementestro— kaŭzis, kiel estis antaŭvideble, lavangon de indigno, kaj la akuzoj laŭ kiuj ni estis kreantaj "novajn" kvazaŭarmeojn, ne prokrastiĝis.

Mi prezentis la argumentojn kiujn mi uzis kiam mi estis departementestro: ke sekureco ne povis esti responso ekskluzive de la ŝtata sekuragentaro, kaj ke la informoj kaj indikaĵoj havigitaj far la civila loĝantaro estos fundamentaj por nia sukceso. Kelkaj homrajtaj grupoj argumentis ke la civitanoj perdis sian "neŭtraleco", kaj tiam mi demandis, pri kia neŭtraleco ili parolis, ĉar ordinaraj civitanoj estis la plej multnombraj viktimoj de la terorismo dum la lastaj jaroj. Cetere, ekzistis nenio malbona rilate peti al ili apogon por la registaro kiun ili mem ĵus elektis; neniu estis devigita partopreni kaj tiuj kiuj tiel faros havos porteblajn sendricevilojn kaj ne pafilojn. En la fino, la respondo de la civila loĝantaro estis tre pozitiva: dum la daŭro de nia registaro, kvar milionoj da civiluloj iel kunlaboris kun la ĝenerala sekureco, kaj iliaj kontribuoj estis fundamentaj.

Tiel, do, tiun unuan tagon en la prezidenteco ni troviĝis ekster la urbestrejo de Valledupar, apud kelkaj el la armeaj veturiloj kiuj estis deplojotaj en la karavanoj. La popolo rigardis nin.

—Ni devas venki la timon —mi diris en mallonga parolado—. Tion ni faros kun ĉies partopreno ... Ni agos kun firmeco kaj volo por restarigi la pacon, kaj ni alvokas la kolombianojn por kunlabori kun la ŝtataj sekuragentoj por venki la violentajn minoritatojn.

Mi vidis esprimojn de skeptikeco kaj cinikeco. La manko de fido flanke de la loĝantoj de Valledupar estis komprenebla: se oni konsideris la lastan duonjarcenton de nia historio, estis tute nature atendi ke la violento daŭrigos. Ĝi estis la ununuraĵo kion konis multaj kolombianoj. Tamen, la rezultoj estis baldaŭ parolontaj per si mem.

6

Je la dek unua horo matene ni eliris el Valledupar kaj ni direktiĝis al Florencia, urbo en suda Kolombio, sur la rando de la eksa senarmeigita zono kiun la antaŭa registaro estis cedinta al la FARK. "Rekte al la buŝo de la lupoj", diris Ricardo Galán. Ankaŭ el tie ni volis sendi simbolan mesaĝon: ke eĉ en tiuj areoj kie la teroristoj narkotajo-ŝakristoj estis havintaj fortan ĉeeston, la kolombia Ŝtato revenis por resti. Ni ne iris, tamen, por desegni novan sekurecan iniciaton. Ni iris por paroli pri lernejoj.

Paco ne povas esti atingata per nur militaj agoj. Kiam mi estis departementestro, kaj dum mia porprezidenta kampanjo kaj poste kiel prezidento, ofte mi parolis pri tio, kion mi nomis la "Triangulo de Konfido": la demokratia sekureco, la konfido por investado kaj la socia kohereco, tri egale gravaj komponantoj, kiuj plifortigas unu la alian reciproke kaj kiujn oni devus fortikigi por ke Kolombio transiru la transformon kiun ni ĉiuj deziregas.

Nu, por atingi socian koherecon ni devas plibonigi la distribuon de la enspezoj inter la plej malriĉaj membroj de nia socio kaj, tiel, redukti la diferencojn kiuj tiom longe turmentis Kolombion. Inter la strategioj de nia regado ekzistis ampleksa gamo el agpogramoj kiuj inkluzivis sanon, edukadon, mikrokreditoj per la "bankismo de la oportunaĵoj" en kiu partoprenas publikaj kaj privataj bankoj, kaj specialigitaj fondaĵoj. Estis tre gravaj la porinfana nutrado, la porlabora trejnado aŭ ofica instruado, fondusoj de garantio kaj de riskokapitalo por la kompanioj de junuloj, forstumantaj familioj kaj sociaj programoj de vasta kovrado, kiel la kondiĉaj subvencioj por la plej malriĉaj familioj por certigi la enlernejigon de iliaj gefiloj. Ni estis kreontaj socion pli sanan, justan kaj edukitan; samtempe ni estis montrantaj al niaj samlandanoj ke akceptante la Ŝtaton ili plibonigos sian vivon. Ankaŭ ni estis reduktontaj la allogon kiun havis la perforto kiel respondo al la problemoj de la socio. Por fari tion ni kalkulis je la devontiĝo kaj sindediĉo de Juan Luis Londoño, nia kompetenta ministro pri Socia Protektado. Lia frua morto, en tragika aviadila akcidento en 2003, estis terura perdo por ĉiuj kolombianoj, tamen lia heredaĵo postvivis en niaj gvidlinioj.

Ni iris, do, al Florencia por paroli pri edukado. Ni pensis ke agi pri la edukado estis la plej certa maniero por atingi la redistribuon

de la enspezoj, la pliigon de la produktiveco kaj konkurenco de Kolombio tra la tempo. Ni estis anoncontaj programon kiun ni nomis "Eduka Revolucio". Per ĉi tiu iniciato —unu el la kolonoj de mia kampanjo—, ni celis modernigi la edukon sistemon, altigi ĝian kvaliton kaj plivastigi ĝian kovradon. Temis pri alia aro de "fruaj venkoj". Tiutage ni estis kunvenontaj kun la urbestroj de la departemento por diskuti la manieron apliki la planon kiel eble plej baldaŭ.

Tamen, same kiel okazis en Antjokio kvar jarojn antaŭe, ni baldaŭ eltrovis ke sen sekureco ne estis eble koncentriĝi pri aliaj aferoj. Pro la multaj minacoj kiujn ili estis ricevintaj en iliaj loĝlokoj, ĉiuj urbestroj de la apudaj vilaĝoj estis konsigniĝintaj en Florencia (tio ĉi estis komuna situacio en la lando: kiam mi ekestis prezidento, 400 al la 1.100 urbestroj de Kolombio ne povis plenumi la oficon pro premo de la drogŝakristoj teroristoj), kaj tiuvespere ili nur volis paroli pri la perforto kiun ili estis travivantaj, kaj peti al la registaro pli efikan protektadon.

—Ĉu vi povas helpi min atingi kontraŭkuglan veŝton? —diris unu el la urbestroj kun ruĝiĝanta vizaĝo—, tiel ke, se ili volas mortigi min, almenaŭ ili estu devigataj celumi al la kapo.

Alia urbestro petis blenditan aŭton, kaj ne mankis iu kiu postulis helikopteron. Alia demandis "almenaŭ radioaparaton" por peti helpotrupojn kiam la FARK alvenas por mortigi lin. Je ĉiu nova peto, la urbestroj aŭ murmuris aŭ aplaŭdis. Kelkaj el miaj konsilantoj komencis rigardi nervoze.

Mi baldaŭ komprenis tion kio estis okazanta: la urbestroj ne koleris. Ili havis *timon*. Kaj ankaŭ motivon por fari siajn postulojn: dum longa tempo la Ŝtato ne aplikis la rimedojn kiujn ili petis por protektado. Nia regado estis devonta fari pli efikan laboron por certigi ilian protektadon kaj la protektadon de ĉiuj kolombianoj, kiuj estis minacataj pro ilia profesio aŭ identeco.

Dum la jaroj kiam mi laboris kiel prezidento, duobligis la nombro de kolombianoj sub protektado de la Ŝtato: preskaŭ 10.000 homoj, inter kiuj estis urbestroj, juĝistoj, ĵurnalistoj, aktivuloj de homaj rajtoj kaj aliaj. Preskaŭ kvinono —ĉirkaŭ 2.000 personoj— estis sindikataj gvidantoj, pro tio, ke multaj el iliaj kamaradoj estis mortigitaj dum la antaŭaj jaroj. Ekde mia kampanjo ni devontigis nin por protekti la homajn rajtojn de ĉiuj membroj de la socio kaj speciale tiujn de la plej vundeblaj homoj.

Tamen, en tiu mia unua tago kiel prezidento mi ne povis garantii ion ajn. Mi diris al la urbestroj, ke ni estis strebontaj maksimume kaj, ke se eble, kaj se la situacio diktis tion, la armeanoj eskortos ilin por reveni al iliaj urboj kaj plenumi ilian oficon. Mi ne faris promesojn neplenumebajn. Mi sciis ke niaj rimedoj estis tre limigitaj kaj ke la armitaj grupoj estis intensigontaj siajn klopodojn por terurigi la loĝantaron, kun la espero detru i nian volforton antaŭ ol, neeviteble, ni estos en avantaĝa pozicio.

Tiel okazis, fakte, dum la unuaj kvin tagoj de nia regado, 125 personoj estis mortigitaj en atakoj far kontraŭleĝaj armitaj grupoj. Kaj la raportoj de informigado indikis ke dum la venontaj semajnoj kaj monatoj estis okazontaj pli da bombadoj, masakroj kaj atakoj en la tuta lando. Ni ne povis haltigi kelkajn el ili. Ni ankaŭ ricevis novaĵojn pri pluraj tujaj minacoj kontraŭ mi, kiuj celis timigi min.

Ili devus esti koninta min pli bone.

7

Du elementoj povas karakterizi mian manieron de agado kiel prezidento de Kolombio: 1) Ĉiuj miaj decidoj —la iniciato kiun ni devis favori, la ministro kiun ni devis nomumi, la terorisma bastiono kiu devis esti nia sekva celo— respondis al strategio planita anticipe. 2) En ĉiuj cirkonstancoj mi celis sendi, per mia konduto, signalon pri la valoroj kaj prioritatoj de nia regado. Tiu simbola aspekto —Same grava kiel la unua— devigis min kontroli persone ĉiujn detalojn: Mi volis ke ĉiuj miaj vortoj, vojaĝoj, oficejaj kunvenoj, dissendu al la kolombianoj optimismon pri la lando.

Kiam vizitantoj eniris al mia oficejo, en la Domo de Nariño, unu el la unuaj aĝoj kiujn ili vidis, estis pentraĵo kiu estis donacita al mi far Débora Arango, virino kiu revoluciis la kolombia pentrarta mondo, pioniro en la serĉo de egalrajteco por la virinoj kaj senlaca defendanto de la paco. Débora estis unu el miaj plej karaj amikinoj; ŝi ofte sendis al mi pentraĵojn kaj desegnaĵojn pri kolomboj, kaj mi ĉiam diris ŝerce al ŝi ke neniu kredus ke tiuj artaĵoj estis por mi. Iom da tempo antaŭ ŝia morto, 98 jaraĝa, mi demandis al Debora ĉu ŝi estus tiel afabla por fari al mi pentraĵon pri fusilo. Ŝi sentis sin iom malkomforta, tamen ŝi plenumis mian peton. Antaŭ ol pendigi ĝin en mia oficejo, mi instalis ŝildon sur ĝia kadro: LA SOLA NEOFICIALA FUSILO PERMESITA EN KOLOMBIO ESTAS TIU ĈI, KIU APARTENAS AL DÉBORA ARANGO. Mia temo estis, ke ni volis sekurecon kaj aŭtoritaton en Kolombio, tamen ankaŭ socion nearmitan kaj pacan. Sun Tzu skribis en *La Militarto*, ke la Ŝtato devas havi la monopolon de vivo kaj morto, kaj tio estis ĝuste kion ni provis reakiri.

En la tablo estis skatolo kun ŝraŭbiloj, martelo, kaj aliaj iloj. Ĝia signifo estis ke, por plenumi la mision kiun estis komisiita al ni, ni devis esti pretaj por kuspi niajn manikojn kaj labori forte sen forgesi eĉ la plej malgrandajn detalojn. En Kolombio ekzistis longa tradicio de homoj kun brilaj ideoj kaj grandiozaj tagordoj, tamen malproksimaj de la detala kontrolado pri la efektivigo de la projektitaj strategioj. Mi senĉese parolis al ministroj kaj aliaj funkciuloj pri la graveco realigi kaj spuri la programojn por certigi ties bonajn funkciadojn.

Mi ĉiam estis favore al kombino de la grandskala rigardo kun la partopreno en la detaloj de la efektivigo, tiamaniere oni motivigas

per la ekzemplo kaj certigas ke la celoj fariĝu realaĵo. Retrorigardante nian regadon, mi dirus ke tio kio misfunkciis malhavis nian partoprenon en la detaloj.

Ĉiu el la kvar muroj de mia oficejo havis pentraĵon pri fama generalo de la kolombia historio kaj ĉiu simbolis virton aŭ aron el valoroj. Generalo Antonio Nariño simbolis la homajn rajtojn en la servo de la virto, generalo Francisco de Paula Santander estis emblemo de la Laŭjura Ŝtato, generalo Rafael Uribe Uribe simbolis la gravecon de la egaleco kaj la persona honesteco, kaj generalo Simón Bolívar enkorpiĝis la aŭtoritaton en la servo de la virto. En la finaj jaroj mi elmetis, kun fiero, kopion de la *Diskurso apud Gettysburg* de Abraham Lincoln, donaco de usona ŝtatssekretariino Condoleezza Rice. Lia mesaĝo pri pacienco en malfacilaj tempoj instigis min parkeri ĝin kiam mi estis adoleskanto, kaj eĉ nun mi povus ĝin reciti. Ankaŭ estis kadrita *Memportreto* de Pablo Neruda, skribaĵo en kiu li priskribis sin kiel neperfekta kaj plurtalenta animo: "Pri mi, mi estas aŭ pensas ke mi estas fortika je la nazo ... malavara en la amo ... melankolia ĉe la kordilero ... nekapabla por maĥinacioj ... ". Tio estis rememorigilo por mi pri la necesa kaj malfacila humileco kiun ni la homoj bezonas por elteni niajn difektojn kaj malfortojn.

En miaj paroladoj kaj aliaj intervenoj Mi provis esti konsekvenca. Mi ripetis preskaŭ laŭvorte la samajn mesaĝojn plurfoje ĉiutage, kaj senĉese menciis la Triangulon de Konfido kaj ĝiajn tri elementojn. Multajn tagojn mi donis, je la sepa horo matene, intervjuojn kun radiostacio de iu loko en Kolombio, por daŭrigi mian tradicion paroli senpere al la popolo kaj ricevi ties opiniojn sen filtriloj. Mi provis esti optimisma kaj koncentriĝi pri la estonteco, same en miaj diskursoj kiel en privataj konversacioj. Mi provis esti malavara por miaj riproĉintoj kaj pacienca por ĉiuj kolombianoj. Ne ĉiam mi sukcesis tiurilate; foje mi estis viktimo de miaj temperamentaj reagoj, precipe rilate politikistojn aŭ ĵurnalistojn de alta rango, sed neniam rilate la popularan bazon de la Nacio.

Kiam dum la porprezidanta kampanjo ni leviĝis kaj malleviĝis en la opiniondoj kaj la ĵurnalistoj demandis mian reagon, la respondo estis: "labori, labori, labori" por plibonigi negativajn rezultojn aŭ por eviti ke la pozitivaj malboniĝu; tiu respondo iam fariĝis ia speco de slogano ĉe ĉiuj membroj de mia teamo. Ni konis la seriozecon de la problemoj de nia lando kaj ni sciis ke nur laborante senripoze ni estis povontaj sukcesi. Do, ni faris virton el tia seninterrompa

laboro: ni parolis publike pri forigi el nia vortostoko vortojn kiel "ferioj" kaj "festotagoj"; pri ke la laboro por la nacio bezonis dudek kvar horojn ĉiutage kaj sep tagojn semajne. La ministroj kaj ceteraj konsilantoj montris al siaj amikoj kaj familio tekstajn mesaĝojn kiujn mi sendis al ili iun mardon je la kvara horo kaj duono frumatene aŭ iun vendredon noktomeze. Tia laborvolo fariĝis fonto de fiero ĉe ĉiuj, kaj baldaŭ ĝi fariĝis infekta tra la tuta Kolombio. Kiam mi hazarde renkontis iun civitanon sur la strato kaj fari al tiu la kutiman demandon: "Kiel ĉe vi?", okazis ofte ke kun rideto la demandito respondis: "Laborante, laborante kaj laborante", Kaj multajn el la kompaniaj stabuloj kiu ial venis al la Domo de Nariño diris sen ambiguaĵoj ke, inspiritaj de nia kolektiva ekzemplo, nun ili laboris ankaŭ sabate.

Kaj al tiom da laborado ne mankis amuzo. Ĝoje mi ĉeestis tiujn eventojn kaj ceremoniojn kiuj laŭdis la novajn ŝancojn por kreskado prezentiĝintaj en la lando: mi sentis ke nia persisteco naskis siajn fruktojn kaj ke estis grave montri kiamaniere, spite de la malfacilaĵoj, la vivo en Kolombio antaŭeniris. Kiam grupo de entreprenistoj malfermis novan akvoparkon en la departemento Kaldas¹, mi ĝuis deglitante tra unu el la glitejoj, kaj en la kanjono Chicamocha, en la departemento Santandero, mi sidis en pendigita supra seĝeto kaj —vestita per jako kaj kravato— dufoje mi transiris pendante en la aero super profunda valo. Mi ludis futbalon kun knaboj de lernejo, mi rajdis sur ĉevalo publike kaj mi surportis preskaŭ ajnan ĉapelon aŭ vesto kiun oni proponis al mi. Mi servis kafon kun Juan Valdez, la fikciulo kiu ekde 1959 stimulas la diskonigon de la kolombia kafo en la mondo. Kiam temis pri fari propagandon pri nia lando, neniu ago estis neglektenda.

Tamen, la plej gravaj simbolaj agoj estis tiuj direktitaj al konsilantoj, ministroj, generaloj kaj aliaj kunlaborantoj. Mi sciis ke ni neniam povus transformi Kolombion sen la intensa laboro kaj la dediĉiĝo de granda kaj diversa teamo de personoj. Kaj kvankam multaj fojoj mi estis tre postulema pri ili, mi ankaŭ dankis —private kaj publike — iliaj kontribuoj. Nia registaro estis vera teamo, la sumo de la voloj de multaj miloj da homoj en Domo de Nariño, en la ministerioj, en la sekuriga agentaro, kaj tiel plu. Mi ĉiam estos danka al ili.

Ne mankis, kompreneble, tiuj kiuj pensis ke ĉi tiu ekzerco por doni al la agoj de regado simblan signifon estis troigo. Ili emfazis

1 [NT Hispanlingve: "Caldas"](#).

mian amon al la ripetado, kaj ili —precipe ene de la tradicia politika kaj ĵurnala elito— opiniis mian konduton pedanta: "La riproĉantoj diras ke lia stilo estas supera al lia substanco", rimarkis *The New York Times*. Eĉ hodiaŭ, tamen, mi kredas ke por multaj kolombianoj tiuj ĉi etaj homaj esprimoj havis pli da signifo ol la vortoj kaj helpis establi ligon kiam multaj civitanoj ne sentis kun ajna antaŭa registaro. Multaj politikistoj agis kvazaŭ ili estis sur la supro de la monto; ni piediris inter la popolo, konversaciante pri ties ĉiutagaj problemoj, parolante per lingvaĵo kiam ili povis kompreni.

8

La vojaĝo al Florencia, en mia unua tago kiel prezidento, havis kroman signifon: la flughaveno de tiu ĉi urbo estis la lasta loko kie Ĝngrid Betancourt estis vidita antaŭ ol esti ostaĝigita far la FARK.

Dum la unuaj tri jaroj de ostaĝeco, la FARK tenis sinjorinon Ĝngrid katenita la dudek kvar horojn de la tago. La fojojn kiam ili permesis al ŝi bani sin en riveroj, ŝi faris tion plene vestita por protekti kontraŭ la ostaĝigintoj, kiuj senĉese malrespektadis ŝin per la rigardoj. Ŝi devis porti ĉapelon dum la piediradoj por protekti sin kontraŭ ĉiuj bestetoj kiuj falis el la frondaro de la ĝangalo: formikoj, iksodoj, pedikoj kaj aliaj insektoj. "Tamen, la plej danĝeraj de ĉiuj estis la homoj", ŝi diris poste, "tiuj, kiuj estis malantaŭ mi kun siaj grandaj pafiloj".

Filino de kolombia diplomato, Ĝngrid pasigis sian junecon kaj multe de sia plenaĝa vivo en Parizo, ŝi vivis en lokoj tiel diversaj kaj malproksimaj kiel Sejŝeloj kaj Novjorko. Ŝi revenis en Kolombion, laŭ ŝi mem diras, kun unu misio: ĉesigi la koruptecon. Ŝi estis elektita kiel senatanino kaj interne de la Kongreso ŝi elstaris pro sia kuraĝo kaj kreemo. Por la balotelektoj de 2002 ŝi enskribigi sian kandidatecon al la prezidenteco de Kolombio kaj, kiel ni ĉiuj, ŝi ne havis iluziojn pri la riskoj kiujn ŝi surprenis. En intervjuo kun la programo *Today* de NBC, nur tri monatojn antaŭ ŝia kidnapo, ŝi diris ke al ŝi plaĉegis Kolombio kaj ke ŝi estis preta riski sian vivon por sia lando. Ŝi, finfine homa estaĵo, kiam la ostaĝiga realaĵo atingis ŝin, pensis pri siaj du gefiloj, kiuj vivis en Parizo —nur dek ses kaj dek tri jaraĝaj tiutempe— kaj ŝi sentis la malesperon kia estas propra de la ostaĝeco. Ŝi poste skribis, ke la depresio, la insektoj kaj la tropikaj malsanoj estis konstantaj malamikoj dum la ses jaroj kiujn ŝi pasigis ostaĝigita en la ĝangalo.

Ni ne ŝparis klopodojn en nia registaro por atingi la elliberigon de Ĝngrid Betancourt kaj de la aliaj ostaĝoj. La eblo de interkonsento por interŝanĝi prizonulojn kontraŭ ostaĝoj —la t.n. "humaneca interŝanĝo"— okupis grandan parton el mia administrado kiel prezidento. En mia parolado okaze de mia enoficigo, mi proponis pacon al la FARK kaj mi sciigis ke Kofi Annan, la tiama sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, estis akceptinta mian peton mediacii en la klopodoj por reveni al la tablo de intertraktadoj. La FARK ne nur

malakceptis mian proponon kaj malestimis la Unuiĝintajn Naciojn kiel ebla peranto, sed la grupo ripetis sian peton por nova senarmeigita zono kiel antaŭkondiĉo por ajna intertraktado. Pro la maniero kiel la FARK estis utiligintaj por milita plifortiĝo la zonon Caguán¹ sub la antaŭa registaro, estis evidente, ke ilia postulo ne estis efektivegebla: mi donos eĉ ne unu joton el kolombia teritorio kaj tutcerte la FARK sciis tion. Tamen, tiu ĉi fakto ne malhelpis ke en multaj sektoroj el la Kongreso kaj el la amaskomunikiloj kolombiaj kaj internaciaj mi estis riproĉita ĉar mi estis de "malmola linio", interesita nur pri "la milito".

Ekde la momento kiam mi estis elektita kiel prezidento, la FARK ŝajnis veti je tri strategioj: venki nin milite; iel reakiri sian perditan kredindecon ene de la kolombianoj; atendi ĝis la fino de mia prezidenteco. Ne ĉesis iliaj atakoj kontraŭ: la infrastrukturo de la lando, la armeaj patroloj kaj civilaj celaĵoj. En majo 2003, la FARK proponis en sia retejo krei novan "neleĝan registaron" el dek du "konataj homoj" kiuj "sugestos novan prezidenton de Kolombio". En junio de tiu jaro, ili proponis uzi la Rio-grupon —konsistanta el landoj en Latinameriko— kiel peranto en la intertraktoj, taktiko klare prokrastiga. Kelkajn monatojn poste, la alinomita Raúl Reyes, unu gvidanto de la FARK, en intervjuo kun brazila gazeto faris rivelantan deklaron:

—La serioza problemo de Uribe estas ke restas nur tri jaroj por li kaj la FARK havas la tutan tempon en la mondo post 39 jaroj da lukto —li diris—. Ni prenos la tutan tempon necesan por atingi niajn celojn.

Alfrontintaj rivalon kiu ne volis intertrakti, tamen decidiĝintaj elliberigi la ostaĝojn kiel eble plej baldaŭ, ni provis aliajn pli kreajn eblojn. Ni establis novan strategion: se iu membro de la FARK, aŭ de iu ajn alia neleĝa armita grupo, eskapus el la ĝangalo kun ostaĝo, liverus la ostaĝon kaj akceptus dizerti el la neleĝa grupo, ni donus al tiu dizertinto rekompencan kaj ni proponus ke la juĝistoj donu al li aŭ ŝi redukton en la kondamno kun ia kondiĉa libero. Poste, la kolombia Ŝtato pagus por ke li aŭ ŝi vivu eksterlande. En la sekvaj jaroj, multaj personoj diris al mi ke tiu iniciato kaŭzis enorman konfuzon inter la gvidantoj de la FARK, kiuj dum kelka tempo malpermesis la uzon de radioaparatoj en siaj tendaroj pro

1 [NT Kutima simpligita nomo por la senarmeigita zono ekzistinta ekde januaro de 1999 ĝis februaro de 2002, kiu, en siaj 42.000 kilometroj enhavis la municion San Vicente del Caguán plus aliajn.](#)

timo, ke senranguloj de tiu grupo ekscius pri tiu propono kaj malaperus dum la nokto kun la plej gravaj ostaĝoj. Kiel fakte okazis en 2008 kiam eksa kolombia kongresano Oscar Tulio Lizcano eskapis post ok jaroj en ostaĝeco, per la helpo de unu membro de la FARK kiu estis rapide transloĝigita al Francio kun nova identeco. Tamen, tiu strategio ne fruktodonis en la plejmulto el la kazoj. La "humana interkonsento" —ĉi tiel oni nomis la interŝanĝo de ostaĝoj retenitaj far la FARK kontraŭ malliberuloj en oficialaj prizonoj— restis stagnanta kaj la premo por trovi mekanismon kiu konduku al la elliberigo de la ostaĝoj estis senĉesa en kaj ekster Kolombio.

Parte pro tio, ke Ĝngrid havis rilatojn kun la franca politika mondumo kaj pro la elokventa kaj kortuŝa aktivismo de ŝiaj filoj, ŝia kaptiteco estis homamasa afero en Francio. Grandega afiŝo kun ŝia foto estis pendigita ĉe la fronto de la pariza urbestrejo, kaj la eŭropaj funkciuloj postulis ŝian liberigon en privataj kunvenoj kaj en publikaj deklaroj. Ni vidis kun plaĉo ilian altruismon kaj la premon kiun tiel ili tenis sur la FARK.

Kvankam tio estis nepopulara, mi devis meti la interesojn de la nacio super ĉiuj aliaj konsideroj. En julio de 2002, dum eŭropa vojaĝo kiel ĵuselektita prezidento por provi konstrui apogon por niaj gvidlinioj, mi renkontis en Parizo kun la franca prezidento Jacques Chirac, kiu akceptis min ĉe la Palaco Elizeo. Ekstere, grupo de manifestaciantoj ĵetis epitetojn kaj riproĉis mian supozitan malemon por intertrakti kun la FARK ke ili liberigu la ostaĝojn, inkluzive, kompreneble, sinjorinon Ĝngrid Betancourt.

Dum ni trairis la ŝtuparon de la palaco, prezidanto Chirac flustris en mian orelon:

—Mi komprenas vian sintenon, vere mi komprenas. Tamen tiu ĉi estas politika problemo —li diris kaj fingromontris la protestantojn —, kaj ni devas trankviligi tiujn homojn.

S-ro Prezidento —mi diris— se "trankviligi" signifas diri al ili tion kion ili volas aŭdi, kaj ŝanĝi mian sintenon, tiam mi bedaŭras ke mi ne povas fari tion. Ĉar eble ni povus certigi la liberigon de Ĝngrid farante cedojn, sed tiam la FARK forrabos pli da homoj, kiel jam okazis en la pasinteco. Kion ni provas fari estas ne nur elliberigi la ostaĝojn sed venki unufoje por ĉiam la kidnapado en Kolombio.

—Mi komprenas —diris prezidento Chirac—. Sed eble vi povus diri kelkajn vortojn al ili ĉe via eliro, por trankviligi ilin iomete.

Mi kapneis.

—Ĉi tie mi devas diri la samon kion mi diras en Bogoto. Mi ne povas ŝanĝi miajn paroladojn laŭ la publikoj. Mi devas esti konsekvenca publike kaj private.

Prezidento Chirac kapjesis, evidente seniluziiĝinta.

Li ankoraŭ ne sciis, ke la FARK povis ŝajni alloga fianĉo, kapabla trairi la tutan vojon ĝis la pordoj de la preĝejo, por, poste, lasi vin atendente ĉe la altaro. Li lernis tion unu jaron poste: en julio 2003, aviadilo C-130 Hercules de la franca armeo flugis al la brazila urbo Manaus, verŝajne kiel parto de sekreta misio por intertrakti pri la liberigo de Ingrid sen la scio de mia registaro nek de la brazilaj aŭtoritatoj. La raportoj el Agence France-Press kaj el aliaj amaskomunikiloj informis ke, en Manaus, la kvar francaj mesaĝistoj luis privatan aviadilon por vojaĝi al brazila vilaĝo apud la landlimo kun Kolombio, kie ili atendis la aperon de la FARK. Apero kiu neniam okazis. La francaj senditoj foriris perfiditaj kaj kun la manoj malplenaj. Ili ne estis la unuaj kiuj sentis sin tiel.

Ne. Elliberigi sinjorinon Ingrid ne estos tiel facile kiel flugi al la ĝangalo kaj fari ian suspektindan intertraktado. Ŝia elliberigo estis postulonta la plenan disvolviĝon de niaj lertecoj militaj, de informiĝado kaj diplomaciaj. Ni neniam ripozis de niaj penoj por elliberigi ŝin, tamen, retrospekte, estas certe ke en tiuj fruaj tagoj ni ankoraŭ ne estis pretaj. Ni estis devontaj elspezi multe pli da tempo, penoj kaj oferoj antaŭ ol igi ĝin ebla.

9

Kiam la FARK ne atingas kion ili volas, ili elverŝas sian furiozon per sendistingaj atakoj. Iliaj makabraj procedoj estas konataj. Ili faras peton, ili atendas ĝis kiam ĝi estas malakceptita kaj, tiam ili lanĉas ruinigan atakon kiel mesaĝo al ĉiuj kolombianoj, kies signifo estas: ni ne permesos ke oni malakceptu nin. Kiam en februaro 2003 la gvidantoj de la FARK eldonis komunikajon per kiu ili denove postulis la kreon de senarmeigita zono simila al tiu kiun ili ĝuis sub la antaŭa registaro, ni sciis kio estis venonta. Ni daŭre okupiĝis pri la aferoj de la nacio, tamen, ni alarmis la sekurigan agentaron tra la tuta lando kaj ni preparis nin por la pleja malbonaĵo.

La listo de la herooj, kiuj donis sian vivon por rompi ĉi malvirtan cirklon, tiel ke la kolombianoj povu ekde iu tago ĝui pacon, plenigus tutan libron. Eĉ hodiaŭ kortuŝas min la penso pri iliaj kuraĝo kaj persisto. Se mi povus, mi honorus ilin per iliaj nomoj tie ĉi. Policanoj, soldatoj, entreprenistoj, laboristoj, ĵurnalistoj, instruistoj, membroj de neprofitcelaj organizaĵoj kaj religiaj komunumoj ... Tiom da viroj kaj virinoj kiuj kontribuis kun firmeco kaj honesteco al la sekureco de Kolombio. Ne malpli grava estis la laboro de prokuroroj kaj juĝistoj: kuraĝaj animoj, kiuj alvenis ĝis lokoj kie justeco ne estis aplikita dum multaj jaroj kaj kiuj riskis siajn vivojn por restarigi la superregon far la leĝo. Ili malkovris kruelaĵojn kaj krimajn retojn pri kiuj ni estis neniam konontaj se ne estis danke al ili. Kaj en multaj kazoj ili pagis la plej altan prezon pro ilia virteco.

Ĉiam mi konservos, kun grandega dankemo, la rememoron pri Cecilia Giraldo Saavedra, mirinda prokurorino en la suda departemento Huila, kiun kelkaj ĵurnaloj nomis "la Margaret Thatcher de Kolombio". En la fruaj tagoj de mia regado, la FARK estis tre aktivaj en tiu departemento, tamen Giraldo rifuzis esti timigita, ŝi prenis sur si la plej malfacilajn kazojn —kidnapoj, terorismo, murdĉantaĝoj— kaj ŝi dediĉis sian vivon por persekuti la drogŝakristojn teroristojn. En la tria monato de mia regperiodo, ŝi kunordigis aŭdacan agadon, per kiu la aŭtoritatoj kaptis dudek kvar teroristojn: tio estis granda triumfo. Kiel atendende, la klopodoj de Giraldo faris ŝin celaĵo de la violentaj grupoj: Unu monaton poste la FARK sendis al ŝi bombon ene de libro. La aparateto eksplodis en la Palaco de Justeco antaŭ ol ŝi ricevis ĝin;

tiam ŝi devis akcepti por sia protektado grupon de korpogardistoj kaj ŝi iris antaŭen kun sia laboro, ofte restinte en la oficejo ĝis post noktomezo. Ŝi estis komisiita, ankaŭ, por gvidi la kriminalan esploron pri la kidnapo de Jorge Eduardo Géchem, farita de la FARK en aprilo de 2002, kaj kiu finigis la pacprocezon de la antaŭa registaro.

Kelkajn tagojn post la komunikaĵo de la FARK en kiuj ili faris la peton pri senarmeigita zono, mi devis vojaĝi al Neiva, la ĉefurbo de Huila, por nia ĉiusabata Registara-Komunuma Kunsido¹. Kiam la aŭtoritatoj ricevis iun indikon pri iu terorisma plano koincidonta kun mia alveno en ĉi tiun urbon, Cecilia Giraldo ne hezitis: ŝi ekprenis sur si la esploron kaj klopodadis por certigi la sekurecon de nia tuta teamo kaj de la ĝenerala publiko. En tiu okazo, la spuroj indikis suspektindajn agojn en grupo de domoj tre proksime al la flughaveno de Neiva, ĝuste sub la vojlinio de la prezidenta aviadilo. Unu tagon antaŭ mia vojaĝo, Giraldo akompanis la Policon por realigi razion en la sektoro. Frumatene ili eniris en unu el tiuj domoj: la tuta strukturo eksplodis en giganta fumofungo kaj detruitaj haŭbizoj. La eksplodo faris krateron kiu estis dek metrojn profunda kie momenton antaŭe la domo estis, kaj ĝi damaĝis aŭ detruis sesdek najbaraj loĝejoj. La fina rezulto estis dek sep mortigitoj —inter kiuj estis Cecilia Giraldo, naŭ policianoj kaj unu knabino 14-jaraĝa kiu atendis la lernejan buson— kaj 37 vunditoj.

La esploro konfirmis la intencojn de la FARK: ili preparis atakon kontraŭ la prezidenta aviadilo kaj ili konsideris du eblojn: ĵeti pafajon —per la haŭbizoj trovitaj en la loko—, aŭ eksplodigi la domon por faligi la aviadilon kiam ĝi flugu proksime. Cecilia Giraldo kaj la policianoj, kiuj akompanis ŝin eble savis mian vivon tiutage. Mia dankemo estos eterna. Kaj por honori ilian memoron —kaj tiu de sennombraj soldatoj kaj policianoj, prokuroroj kaj ceteraj kolombianoj mortigitaj dum la plenumo de iliaj devoj— ni sekvas ilian ekzemplon kaj avancas senhezite, kun amo kaj decidiĝo en niaj koroj.

1 NT La “Registara-Komunuma Kunsido” (hispanlingve “Consejo Comunal”) estis plurhora kunsido, iniciatita far la prezidento Uribe, okazigita preskaŭ ĉiusemajne (305 dum 8 jaroj), plejofte sabate, en kiu la prezidento mem kaj aliaj funkciuloj de la registaro kunvenis kun la popolo por pritrakti lokajn aŭ fakajn problemojn, projektojn, k.t.p. kaj la rilatajn agadojn de la registaro. Tiuj okazis en diversaj lokoj tra la tuta Kolombio. La lasta okazis la 24-an de Julio de 2010.

10

Kelkaj homoj diras, ke la prezidenta posteno estas soleca. Al mi ĝi neniam ŝajnis tia.

En tempoj de grandaj naciaj tragedioj —kiel la atako en Neiva— mi sentis mian koron disrompita, kvazaŭ mi estis perdinta iun amaton. Dum la ok jaroj de nia regado, mi neniam malproksimiĝis emocie de la doloro kaŭzita pro la morto aŭ la nenecesa sufero; ĉiu masakro, ĉiu murdo, ĉiu kidnapo en Kolombio batis min forte en la spirito. Mi sciis tre bone kion signifis por familio perdi iun amaton. Mi sciis, ankaŭ, ke mia responso kiel prezidento estis finigi tiajn kruelaĵojn kaj kiam ni ne sukcesis, tio doloris min.

Kiam tio okazis, mia plej granda konsolo estis paroli kun la kolombia popolo. Ne malaperi, preni plenan responson pri niaj agoj, esplori la faktojn kaj malkaŝi ilin publike, tiuj agoj produktis en mi profundan terapian efikon. La travidebleco estis kvazaŭ brila kaj varma lumo, kaj mi serĉis ĝin kiel eble plej rapide en niaj plej mallumaj momentoj. Mi povis vidi, kiamaniere la civitanoj reagis, senti ilian subtenon al niaj agoj kaj la profundan sopiron al paco kiun ni ĉiuj kunhavis. Ĉu sola? Ne, mi neniam estis sola kiam mi estis prezidento.

Lina suferis en silento, sed ŝia ŝajna trankvileco kaj stoikeco estis valorega helpo en tempoj de krizo. Kaj miaj plej proksimaj kunlaborantoj —inter kiuj troviĝis Jaime Bermudez, Alicia Arango, Bernardo Moreno, Ricardo Galán, Cesar Mauricio Velásquez, Jorge Mario Eastman, José Obdulio Gaviria, Alberto Velásquez kaj Paola Holguín— tenere diris al mi ke nia bona fido transcendos ajnan fiaskon.

En la malmultaj momentoj de soleco mi tiris fortikecon el mia kredo. Mi preĝis. La ekzercado faris al mi multan bonon: la biciklo aŭ la elipsa trejnilo. Kuracistoj spiritemaj kiel Elisa Lucía Arango kaj Santiago Rojas proponis al mi valoran asistadon. La Nidra Jogo —ekzerco kies praktikadon mi komencis en 1986— estigis en mi staton de dormo sen malkonekti min el la reala mondo, ĝi permesis al mi mensan reorganizon, kritikan ekzamenon pri miaj agadoj, meditadon pri malfacilaĵoj, fiksadon de la kondutaj parametroj kiuj devus gvidi min, ĉio ĉi en ia horizonto de reveno al sereneco.

Sed ofte tio ne sufiĉis. Ne ekzistis maniero por klarigi aŭ raciigi la perdon de homoj kiel Cecilia Giraldo kaj tiuj de ĉiuj herooj kiuj oferis sin por nia celo. En tiuj malfacilaj tempoj, mi sciis ke mi ne povis subfali pro mia doloro. Ni devis konduki la vojiron antaŭen kaj ni sentis ke la granda plimulto el la kolombia popolo akompanis nin, ke ni marŝis kune.

11

Ne estis surprize, ke la FARK deklaris kiel celaĵo iun el niaj Registara-Komunumaj Kunsidoj. Unu el la plej efikaj iloj en la unuaj tagoj de nia registaro por konstrui konfidon, tiuj kunsidoj fariĝis nia karakteriza metodo por havi veran dialogon kun la kolombia popolo. Post la atako en Neiva, ni lernis ke, malgraŭ nia doloro, ni devis sendi signalon al la kolombianoj. Ni decidis procedi kiel estis planite kaj realigi la Registara-Komunuman Kunsidon, kiel publika manifestado de nia persisto. La ununura demando estis kiel fari tion sen fali en troan riskon? Nia informiĝfako sugestis la eblan ekziston de alia domo plena de eksplodaĵoj ie en Neiva.

Ataki la Registara-Komunumajn Kunsidojn estis ataki la partoprenan demokration kiun ili enkorpigis. Dum ok jaroj mi vojaĝis preskaŭ ĉiujn sabatojn, kun tiom da funkciuloj kiel estis eble, al malsama urbo aŭ vilaĝo —ni alvenis ĝis komunumoj kien la centraj aŭtoritatoj ne estis venintaj dum longa tempo—, por havi publikan kunvenon en placoj, teatroj, grandegaj tendoj, kelkfoje antaŭ la maro, rivero, arbaro aŭ monto —kelkfoje kun temperaturoj sufokaj, malsekaj, proksimaj al 40 celsiaj grado—, aŭ kie ajn ni povis trovi spacon.

Tiuj kunsidoj estis ĉeestitaj de centoj da homoj el ĉiaj sociaj tavoloj kaj kutime estis elsenditaj televide. Iu ajn el la ĉeestantoj povis fari demandojn, kaj ni ankaŭ ricevis telefonvokojn. Neniu temo estis konsiderita malgrava; kun partopreniga entuziasmo ni pritraktis temojn rilataj al edukado, sano, domaj publikaj servoj, vojoj, infrastrukturo, agrikulturo, dungado, inter aliaj. Ankaŭ estis kunvokitaj tiaj kunsidoj por ekskluzivaj temoj: ekzemple, la tutan tagon por pridiskuti la instruado en la respektiva regiono aŭ en la lando. Plej ofte ĉiu Registara-Komunuma Kunsido daŭris ok horojn sinsekvajn aŭ eĉ pli. La temoj rilataj al sekureco estis pritraktitaj aparte, dimanĉe kaj lunde, en kunvenoj ankaŭ malfermitaj al la publiko. Kun plenaj teamoj de ministroj kaj naciaj kaj lokaj responsuloj ni serĉis solvojn por la problemoj prezentitaj far la ĉeestantoj de la Registara-Komunuma Kunsido. Tiuj kunsidoj estis ŝlosila faktoro en la evoluo de nia koncepto de komunuma Ŝtato — Same kiel ni estis farintaj en la registaro de Antjokio— kiu engaĝigas ĉiujn kolombianojn en aferoj de publika politiko.

Sed ne ĉiuj konsentis kun la stilo de tiuj kunvenoj. Kelkaj kritikintoj akuzis min pri mikroadministri kaj tiel subfosi la kredindecon de la ŝtataj institucioj, kreinte la impreson, ke nur la prezidento aŭ la Plenuma Povo kapablas solvi eĉ la plej lokajn problemojn. Iuj diris ke ni falis en popolismon kaj ke ni promesis tro. Aliuloj esprimis dubojn pri la fizika kaj mensa fortikecoj necesaj por subteni nian kadencan tra la tempo.

Mi kredas pri la necesa rilato inter la reprezento kaj la partopreno. En la Kolombio de nia tempo tiu partopreno fariĝis multe pli necesa por plifortigi la velkintan kredindecon de la centra Registaro. Nia ĉeesto kaj sinteno estis la unusenca signalo pri la devontiĝo kiu kuraĝigis nin por serĉi kun la komunumo respondojn al ties esperoj kaj malfacilaĵoj.

La konstanta ĉeesto antaŭ la civitanaro igis la registaron malpli ama al promesoj kaj pli engaĝita en la serĉado de ebloj. Tiu sinteno estis ŝlosila por la kredindeco, la ununuraĵo kiun ni ne povus perdi. Ni neniam hezitis por respondi argumentitan "ne" al nerealigeblaj petoj. Tamen ni estis ĉiam pretaj por serĉi eblojn, kiuj ofte estis trovitaj danke al sugestoj el la komunumo mem.

En la Registara-Komunumaj Kunsidoj pri sekureco, kredito kaj ekonomia kresko, en kunvenoj kun entreprenistoj kaj kun laboristoj, ni ĉiam finis kun skribita akto pri konkludoj al kiu oficejo de la prezidentejo faris detalan realigo-kontrolon. Kun la helpo de la Interamerika Banko por Disvolviĝo kaj de la brita kaj finna registaroj ni funkciigis efikan mekanismon por pritakso kaj kontrolo.

La Registara-Komunumaj Kunsidoj influis pozitive la decidadon kaj kontrolis la progreson kaj travideblecon de la realigado. Ofte mi ripetis ke PowerPoint ne sufiĉis, ĉar ni la registaroj emas projekcii per ĝi ĉiujn bonaĵojn kaj ni preterlasas la malbonaĵojn aŭ tion kio necesas kaj kion la komunumo, la "PowerPeople", realisme rimarkigas.

Komence de nia regperiodo, la civitanoj venis iom ĉagrenitaj al Registara-Komunumaj Kunsidoj por prezenti siajn postulojn. Fine de la ok jaroj la civitanoj daŭre veni kun postuloj: la lando ne estis fariĝinta paradizo, tamen la plimulto el la ĉeestantoj estis transformintaj sian koleron en konfidon. Ĉi tiu estis la plej granda ŝanĝo: el demokratio nefidinda kaj kun kolero, al demokratio kun konfido kaj kun relative klara estonteco.

Post la atako en Neiva, mi estis firme decidiĝinta al ne permesi ke la teroristoj senigu ĉi tiun urbon je la demokratia rajto kiun havis ties loĝantoj por paroli kun siaj elektitaj reprezentantoj. La saman tagon de la domo-bombo, dek du horojn antaŭ la planita momento kaj sen informi al la flughaveno de Neiva, nek al iu loka aŭtoritato, ni flugis sekrete el Medeĝino. Noktiĝis kaj estis necese fari aranĝojn por ke kelkaj aŭtoj lumigu la avian dromon per siaj lampoj en la ĝusta momento. Tuj post nia alveno, ni iris al la funebra domo kie la familianoj de la viktimoj priploris siajn amatojn, Ni parolis kaj preĝi kun ili. Tiam ni vizitis la vunditojn kiuj estis en la hospitalo.

La sekvintan matenon kaj sub torenta pluvo, ni instalis la Registara-Komunuman Kunsidon kun minuto da silento omaĝe al la viktimoj. Tiam mi kuraĝigis ĉiujn por daŭrigi antaŭen.

—Tiu estis ago de plena malkuraĝo —mi diris—. Ili ne kapablas rigardi vizaĝ-al-vizaĝe la Ŝtaton kaj tial ili daŭrigas sian kovardan terorisman.

En la sinsekvaj monatoj kaj jaroj ni daŭre vojaĝis al ĉiuj anguloj de Kolombio, ofte ni pasigis kvar aŭ kvin tagojn el la semajno ekster la Domo de Nariño: en tiuj okazoj mi uzis malgrandan ĉambron en la flughaveno de Bogoto por havi rapidajn dormetojn, praktiki Jagon kaj preĝi. Kiam ni ricevis minacojn, ni aplikis rimedojn —flugi kun la lampoj elŝaltitaj, ŝanĝi la avian dromon en la lasta minuto, inter aliaj aranĝoj— por certigi, ĝis kie estis en nia kapablo, la sekurecon. Pri ĝi estis komisiita teamo gvidita far: generalo Flavio Buitrago, Admiralo Rodolfo Amaya kaj Kolonelo Eduardo Ramírez. Dank' al Dio kaj al ilia profesieco ĉiam ni sukcesis alveni sekure al nia destino.

Bedaŭrinde, aliaj homoj ne estis tiom bonŝancaj.

12

—S-ro Prezidento, ni perdis la spuron de usona aviadilo.

Mi ricevis la informon en la sama semajno de la atako en Neiva, kaj ĝi signis la komencon de unu el la plej seriozaj kaj daŭraj defioj por nia registaro. Malgranda Cessna aviadilo, kun kvar usonanoj kaj unu kolombia soldato ene, malaperis sude de Bogoto. La piloto de la aviadilo sendis helpopetan signalon per radio kaj poste sia frekvenco silentiĝis. Ni sendis tuj helikopterojn en misio, kiun ni supozis normala, de serĉado kaj savo. La aviadilo estis trovita en malgranda senarbejo en la ĝangalo: ĝi estis preskaŭ sen damaĝo, tamen la pasaĝeroj estis malaperintaj. En tiu momento ni ne imagis la malfortunon, kiu estis trafinta ilin.

La usonanoj laboris por Northrop Grumman, kiu laŭ kontrakto realigis kontraŭnarkotajn flugojn en la tuta Kolombio. Tiu ĉi partikulara misio celis ataki drogajn laboratoriojn kiuj estis kontrolitaj kaj funkciigitaj far la FARK. Ĝi estis flugo kiel ajna alia, ĝis kiam la ununura motoro de la aviadilo subite paneis. La piloto, veterano en Vjetnamio nomita Tommy Janis, manovris kun escepta kapableco kaj surterigis la aviadilon en malgrandan senarbejon en la ĝangalo. Janis estis abunde sanganta kaj la ceteraj pasaĝeroj suferis frakturojn de ripoj kaj kontuzojn. Tamen ili supervivis kontraŭ ĉiuj eblaj prognozoj; ili kredis ke tio estis miraklo.

Ĝi estis miraklo. Tamen en la sama momento, kiam la kvin postvivintoj eliris ŝanceliĝantaj el la rompita fuzelaĝo, ili estis alpaŝitaj de supre far taĉmento el inter kvindek kaj sesdek anoj de la FARK kiuj patrolis en la areo. "Mi ne povis kredi tion", poste skribis unu el la usonanoj. "Ni estis travivintaj la akcidenton, nur por trovi nin en situacio kiu estis sendube pli malbona".

Superitaj laŭ nombro kaj laŭ armiloj, la pasaĝeroj ĵetis flanken siajn armilojn kaj kapitulacis. Kiam la FARK malsupreniris de la montoj, la usonanoj estis ŝokitaj vidinte, ke la plimulto el siaj kaptintoj estis adoleskantoj, "Ili ŝajnis grupo de infanoj vestitaj por Halloween pli ol batalantoj", rimarkigis unu el ili. La FARK forprenis iliajn horloĝojn kaj la monon kiun ili havis en monuoj, poste la gerilstoj disigis sinjoron Janis kaj kolombian Serĝenton Luis Alcides Cruz disde la grupo. Iliaj du mortpafitaj korpoj estis

eltrovitaj poste; ni neniam scios precize kial la FARK decidis murdi ilin.

En tiuj unuaj ŝlosilaj horoj ni preskaŭ rekuperis la tri ceterajn usonanojn. Helikoptero alvenis ĝis la okazintejo, la helikopteroj vidis la kaptitojn kaj komencis pafi al la perimetro de la FARK, esperante reteni la gerilistojn enfermitaj dum helpo-trupoj alvenis. Tamen la FARK konis la areon kvazaŭ la dorson de sia mano. Ili portis la ostaĝojn al proksima kabano, ili eniĝis en kafo-kultivaĵojn kie ili sukcesis eviti la helikopteron kaj malaperi en la ĝangalon.

Malgraŭ siaj vundoj —Keith Stansell havis plurajn rompitaĵojn ripojn pro la akcidento, Tom Howes suferis komocion kaj Marc Gonsalves havis grandan doloron en la dorso kaj kokso— la ostaĝoj pasigis la dudek kvar sekvintaj horojn piedirante tra montoj kaj travadante riverojn. Tiu unua piedirado estis vera torturo.

Mi pasigis kelkajn tagojn kaj noktojn sen dormo, mi konstante komuniĝis kun niaj komandantoj en provo por kunordigi operacon kun pli ol 2.500 kolombiaj soldatoj. Nia espero estis ĉirkaŭi la areon kaj trovi la usonanojn antaŭ ol ili estu tute malaperigitaj. Ni ne sukcesis. Kelkaj el niaj komandantoj diris tiam, ke la manko de transportaj helikopteroj kaj aliaj ekipaĵoj en sudo de Kolombio malhelpis al ni realigi kun lerteco rekuperan operacon. Ni alfrontis denove unu el la plej seriozaj problemoj en la historio de Kolombio: la manko de ŝtataj rimedoj. Se ni volis malhelpi estontajn katastrofojn, estis tempo por fari ion tiurilate.

13

Fine de aŭgusto de 2002, nur tri semajnojn post kiam mi estis farita prezidento, la ministro pri Financoj, Roberto Junguito, petis al mi kunvenon. Li eniris en mian oficejon kun stako de dosierujoj kaj serioza mieno, li ŝajnis funebrajisto pli ol ekonomikisto. Li sidiĝis, krucis la brakojn kaj diris:

—Ni ruiniĝis, ni ne havas monon por pagi al la soldatoj post oktobro.

Liaj vortoj prenis mian spiron for. Kiam mi ekis kiel prezidento, mi sciis ke niaj financoj estis malfortikaj: la kolombia ekonomio estis spertinta en 1999 la plej malbonan recesion en sep jardekoj kaj ĝia releviĝo estis, laŭ la plej indulgema takso, manka; la fiskaj kontoj estis severe misekvilibrantaj kaj la malneta publika ŝuldo supreniris al 41 miliardoj da usonaj dolaroj —ses jarojn pli antaŭe ĝi estis nur 10 miliardoj—. Tamen, surprizis min lerni ke ni havis tiom malmulte da kontanta mono ke nur ses semajnojn poste ni ne povus pagi la salajraron.

Ĉiuj taskoj kiujn mi intencis realigi pasis antaŭ miaj okuloj. Kio okazus al la esperita kresko de niaj trupoj kaj nia Polico? Kio okazus al la ekspansio de nia sociaj programoj por sano kaj edukado? Ne gravis kiu iniciato, ili ĉiuj dependis de tio, ke ni havu pli da disponeblaj rimedoj, ne malpli, kaj se ni ne solvus rapide niajn problemojn de solventeco, ni riskis sperti eĉ pli grandan krizon.

Fine de 2002 la financaj merkatoj rigardadis atente ĉiujn landojn de Latinameriko, serĉante la unuan signon de problemoj. Nur ok monatoj estis pasintaj ekde la plena enfalo de la ekonomio en Argentino, lando kiu spertis la nepagon de pli ol unu miliardo de usonaj dolaroj en ŝtatsuldo kaj devalutis sian moneron 80 procente; kaj la brazila ekonomio estis ankaŭ sub forta premo: Luiz Inácio Lula da Silva, maldekstrisma iama sindikata gvidanto, pretiĝis por preni sur sin la prezidentecon de sia lando. Tiel, do, je la minimuma signo de malfortikeco, Kolombio povus esti la sekva lando viktimo de spekula atako kaj tiam neniu el niaj revoj por la sekvaj kvar jaroj estus ebla.

Kontraste kun multaj latinamerikaj landoj, Kolombio neniam ĉesis pagi sian ŝuldon nek spertis superinflacion. Tamen, kelkaj funkciuloj de multflankaj institucioj, kiel la Monda Banko, avertis min ke nia situacio estis senespera kaj ke mi devus fari tre malfacilajn decidojn; ke Kolombio estis ĉe la rando por fariĝi "fiaska ŝtato".

La saman vesperon kiam ministro Junguito informis min pri la problemoj kiujn ni havis, mi pasigis plurajn horojn kun li kaj kun miaj ĉefaj kunlaborantoj strebante por trovi solvon al la problemo de solventeco. Ni bezonis ian kreivan financon inĝenieradon kaj mi devis uzi ĉiun eron el mia pli ol dudek-jara konado pri la kolombia Ŝtato. La Konsilio de Ministroj decidis frostigi grandan procenton el niaj kurantaj elspezoj kaj transloki kelkajn fondusojn de la ĝenerala bilanco de la Ŝtato. Meze de oktobro, danke al la senlaca penado de ministro Junguito kaj al la konfido de niaj amikoj en eksterlando, ni akiris naŭ miliardojn da usonaj dolaroj en financado el multflankaj institucioj kiel la Anda Korporacio de Disvolvado¹, la Monda Banko kaj la Interamerika Banko de Disvolviĝo. Ni sciis, tamen, ke tiuj estis kurta-tempaj solvoj kaj ke ni bezonis iom pli ol provizoraj rebonigiloj.

La popolo sciis ke ni havis problemojn, sed mi decidis ne malkaŝi la grandon de niaj financaj malfacilaĵoj al la kolombia publiko. Laŭ mi diris en mia parolado okaze de mia enoficigo: "Ni ne venis por plendi, sed por labori". Mi ne havis intereson pri uzi mian prezidentan mandaton por kulpigi pri niaj problemoj la heredajon kiun mi ricevis el miaj antaŭuloj. Mi volis ke la kolombianoj okupiĝu pri la estonteco kaj ne pri la estinteco. Okupi nin pri akuzoj nur prokrastus nian renormaliĝon. La optimismo kaj la laboro rezoluta, aplomba, estis niaj plej bonaj partneroj. Nu, tiuj emocioj devis esti radikintaj en la realaĵo kaj tial ni devis trovi solvojn rapidajn, aŭdacajn kaj konkretajn.

Kelkajn tagojn post la vizito de ministro Junguito al mia oficejo, ni decidis apliki "imposton por sekureco", kio estis fariĝonta grava solvo al nia problemo. Ĉi tiu imposto estis kolektita nur el tiuj individuoj havantaj altajn enspezojn, kaj ĝi egaligis al 1,2 procento el la likidaj valoraĵoj. Ĝia destino estis ekskluzive por la ekspansio de niaj Armeo kaj Polico. Mi estis singarda pri la eventuala damaĝo kiun nova imposto povus kaŭzi sur la negoca sektoro en Kolombio, tamen mi decidis ke la avantaĝoj superis larĝe la kostojn:

1 NT Hispane: "Corporación Andina de Fomento".

unuflanke, ni estus atingontaj kreditojn destinataj al la plibonigo de nia sekureco, sen ke ni devu preni monon el aliaj gravaj fakoj kiel sano kaj edukado; aliflanke, ni estus montrontaj al la kolombianoj ke la civitanoj kun plej granda ekonomia kapablo estas pretaj pagi por fari la landon pli sekura. Tiu ĉi estus ankaŭ grava mesaĝo al la mondo: kiam mi vojaĝis eksterlanden, kelkaj homoj demandis al mi kial ili devus havigi militan aŭ ekonomian helpon al Kolombio se ties civitanoj ne oferis sufiĉe. Ĉi tiu iniciato donis al ni respondon, nekompletan, tamen konvinkan.

Ni utiligis plurajn rimedojn por certigi, ke la imposto kompensu la riskojn. La ministrino pri Defendado, Marta Lucía Ramírez, la ministro pri Financoj kaj mi, parolis ofte kun reprezentantoj de la kolombia negoca sektoro, por klarigi detale al ili niajn celojn; ni donis al ili, krome, la kapablecon kontroli la manieron kiel ni elspezis la monon kiun ni ricevis el ili. Ankaŭ la publika opinio estis grava: ni klarigis al ĉiuj kolombianoj, ke la kolektado de la imposto estos el "la riĉuloj" kiuj volis helpi Kolombion en ĝia lukto kontraŭ la violentuloj. Fine, kaj plej grave: fine de 2002 kaj en sekvaj jaroj, ni aplikis reformojn por stimuli la investadon —kiel faciligoj rilate impostojn kaj kontraktoj pri stabileco en la regularoj—. Tiel, do, ni impostis la riĉecon por financi la sekurecon, kaj, samtempe, ni plivigligis la investojn por pligrandigi la ekonomion kaj krei laborpostenojn. José Roberto Arango, konfidinda konsilanto, havis gravan rolon por elpensi kaj aprobi ĉi tiun strategion.

Nu, tiuj reformoj ne estis sufiĉaj por solvi la problemojn de nia ekonomio; en la sekvintaj monatoj ni estis aplikontaj aliajn, tre gravajn, en la Konstitucio, en la leĝo kaj en la administrado. Kelkajn de struktura karaktero pri pensioj, dungado, profesia trejnado, kaj transpagoj al la regionoj. Ni forigis la ĝeneralan kaj malproportcian subvencion de la benzino kaj fortigis la subvenciojn de publikaj servoj por la malriĉuloj. Ni reformis pli ol 460 ŝtataj institucioj por fari ilin efikaj kaj aŭsteraj. El la prezidenta oficejo ni klopodis naski gravajn signalojn de aŭstereco.

Tamen, la "imposto por sekureco" estis la unua paŝo kaj ĝi starigis la modelon por la sekvaj ok jaroj pro tio, ke ĝi pruvis la neceson de la civitana solidareco por havi sekuran landon. Iom da tempo poste, kelkaj homoj diris al mi, ke ili devis pruntepreni monon por povi pagi la imposton, kaj ke tamen ili faris tion plene konvinkitaj, ke havigi al nia registaro la necesan monon estus en sia plej bona intereso longtempe. Fakte, ĝi estis preskaŭ kiel

investo: pli sekura lando kondukis al pli rapida ekonomia kresko, kio siavice ebligis pligrandigi la entreprenajn agadojn en la mezlonga tempo kaj, samtempe, pligrandigi la socialan kovradon. Tial mi ne estis surprizita kiam, en 2006, mi ricevis telefonvokon fare de unu el la plej riĉaj homoj en Kolombio, Carlos Ardila Lülle, por demandi min ĉu ni povus apliki tiun imposton por dua fojo.

Mi ne estis surprizita ĉar por tiu jaro 2006 ni estis atingintaj konkretajn rezultojn en nia sekureca strategio; Nu, mi devas sciigi, ke eĉ en la ombraj kaj necertaj tagoj de la fino de 2002 mi neniam ricevis eĉ unu plendon pri tiu imposto; plia pruvo de la patriota kaj solidara spirito de miaj samlandanoj. La "imposto por sekureco" kolektis ĉirkaŭ 800 milionojn da dolaroj, sumo kiu ebligis multajn el la sukcesoj kiujn ni atingis.

14

Unue mi vidis la bildojn en televido: karavanoj de inter cent kaj ducent aŭtoj cirkulis tra la kolombiaj vojoj kun la tuta fiero kaj pompo de kristnaska defilado. Kelkaj vojaĝantoj svingis feliĉe la brakojn tra la fenestroj kaj kriis: "Kolombio! Kolombio!". Aliaj svingis kolombiajn flagojn kaj kantis la nacian himnon. Ni vidis homojn elirintaj el siaj aŭtoj por foti sin kun la soldatoj kiuj eskortis ilin, ili brakumis la soldatojn kun rideto farante pacosignojn. Multaj haltis por tagmanĝi ĉe vojflanko, plenaj de feliĉo kaj malkredemaj pri tio kio okazis.

Estis vero: Kolombio rekuperis regon de siaj vojoj.

Dum tiuj unuaj monatoj, ni vizitis sektion de ŝoseo proksime al San Jacinto, vilaĝo proksima al Kartageno kun multaj problemoj. Virino venis kurante, brakumis min kaj diris:

—Prezidento, dankon por redoni mian vendejon!

Mi rigardis ĉirkaŭe, kaj vidis nenion.

Kie estas via vendejo? —Mi demandis konfuzita.

—Ĝi estas la vojo —ŝi respondis, ridetante.

Ŝi klarigis ke por vivteno ŝi vendis hamakojn kaj aliajn metiaĵojn ĉe la flanko de la vojo, sed pro la violento, dum pluraj jaroj la fluo de veturiloj estis reduktiĝinta al minimumo. "Estis tempo de granda malriĉeco", ŝi diris. Nun multaj homoj pasis alian fojon kaj ŝi denove instalas sian "vendejon".

Tiaj kazoj ripetigis tra la lando, kaj alportis ĝojon al multaj kolombiaj familioj kiuj denove povis ĝui niajn pejzaĝojn kaj turismajn lokojn sen timo. Ankaŭ reaktiviĝis la malgrandaj lokaj ekonomioj: benzinstacioj, butikoj de metiaĵoj, malgrandaj restoracioj ĉe vojflankoj, hotelaj instalaĵoj en la kamparo, inter aliaj.

Ni estis decidiĝintaj ne permesi ke tiu ĉi provizora progreso blindigu nin. La sekureco estas kiel la skalo de kontentigo de bazaj bezonoj: post iu progreso oni ne emas rigardi malantaŭen, sed postuli la sekvan paŝon. Estis eble, ke la armitaj grupoj ataku ĉi tiujn naskiĝantajn espero-simbolojn en iu provo por renversi nian progreson kaj pruvi sian potencon. En la t.n. "pontoj" —semajnfino

etendita per festotago—, kiam la fluo de vojaĝantoj estis pli alta, multfoje mi restis maldorma ĝis la tagiĝo: Mi parolis senĉese kun niaj armeaj kaj policaj komandantoj por kontroli kaj kunordigi la respondon al potencialaj minacoj sur la vojoj. Mi ankaŭ ricevis, en ajna tempo de la nokto aŭ la tago, alvokojn en mia poŝtelefono — kies numero estis ĉiam publika— el vojaĝantoj kiuj avertis min pri la ekzisto de obstrukco farita de la FARK aŭ pri egaj disfendoj en la ŝoseo, pri trafikŝtopiĝo ĉe vojimposta pagejo kaj eĉ pri la damaĝo de pneŭo de aŭtomobilo. Sendepende de la horo, aŭ de kiom malgranda estis la plendo, ĉiam kiam mi povis, mi respondis la telefonon. Mi ankaŭ faris kontrolon pri la plendo: ekzemple, mi vokis la Ministron pri Transporto kaj sugestis li esploru la eblecon vendi la vojimpostajn biletojn anticipe aŭ instali pliajn pagejojn. Tamen mi respektis la proporciojn: mi neniam iris por ŝanĝi pneŭojn.

Reakiri la regadon sur la vojoj estis kiel liberigi homamason el grupa kidnapo. Kaj ĝi havis multiplikantan efikon kiu superis niajn plej optimismajn atendojn. La agprogramo de karavanoj nomiĝis: *Travivu Kolombion, vojaĝu tra ĝi*¹. La kolombianoj rakontis kun fiero unu al aliaj pri siaj vojaĝoj kaj miris pro kiom multe la lando ŝanĝiĝis. La ekonomio komencis montri signojn de reboniĝo danke al la rekomenco de la trafiko de kamionoj kaj de la komerco inter la urboj. La kolombiaj soldatoj kaj policanoj, kiuj delonge sentis sin malakceptitaj far iuj sektoroj de la socio, komencis senti sin pli estimitaj. Kaj ni ĉiuj komencis iri kun la kapo iom pli levita, aŭdacante esperi ke la sorto de nia lando ŝanĝiĝos.

Tio estis "komenca sukceso", tia, kian ni estis esperinte: delikata, facile renversebla, tamen ĝi estis io kion la popolo povis vidi per siaj okuloj kaj senti en siaj koroj. Ĉi tio, siavice, malfermis unu pardonon.

1 NT Hispanlingve: "*Vive Colombia, viaja por ella*".

15

Eble la plej grava aspekto de la reakiro de rego sur niaj vojoj estis ke la civitanoj sentis sin pli proksimaj al Kolombio kaj al sia Ŝtato. Post tiom da jaroj sentinte sin ekskluditaj aŭ disigitaj el la Registaro, nun la kolombianoj havis personan intereson pri niaj aferoj ĝenerale kaj pri nia sekureco speciale. Krei ĉi tiun tipon de rilato estis fundamenta celo ekde kiam mi estis departementestro: la sekureco devas esti strebado de la tuta komunumo, kaj ne nur laboro por la membroj de la sekuriga agentaro. Tial, kiam ni celis etendi la ĝisatingon de la paco per aliaj novecaj manieroj kiuj ne damaĝu nian limigitan buĝeton, ni ĉiam memoris tiun ĉi lecionon.

Unu el tiuj iniciatoj ne multekostaj —kies lerta efektivigo estis farita de la ministrino Ramírez kaj la alta armea komandantaro— estis la t.n. "Soldatoj de mia Vilaĝo"¹. Ĝi estis varbi homojn en la tuta Kolombio por servi en la Armeo en ilia urbo aŭ vilaĝo de loĝado. Dum longa tempo, tiu tipo de servo havis malbonan reputacion ĉe la militista klaso ĉar kelkaj komandantoj kredis ke la soldatoj ne laborus tiel forte —aŭ povus esti atakitaj far armitaj grupoj— se ili estus tre proksimaj al siaj hejmoj. Ni kredis ĝuste la malon: ke la soldatoj povus doni al ni valorajn informojn danke al iliaj sociaj kaj familiaj rilatoj, kaj fari ke la vilaĝanoj havu pli profundan emocian rilaton kun nia Armeo. "Tiuj homoj ne nur gardas la landon", diris Armea serĝento en Pacho², laŭ citite de la internacia gazetaro. "Ili ankaŭ estas prizorgantaj siajn familiojn". Tiu ĉi strategio havis grandan sukceson: meze de 2005 ekzistis pli ol 27.000 Soldatoj de mia Vilaĝo en dudek ok el niaj tridek du departementoj, responsaj pri certigi la sekurecon en multaj areoj kiuj antaŭe estis tute nesekuraj.

Eĉ kun tio, ni volis la partoprenon de pli da civiluloj. Ni aplikis tiam alian gravan iniciaton: "Lundoj de Rekompenco" nomo sufiĉe eksplicita. Ĉiun lundon, en la vilaĝoj kaj urboj ni pagis per kontanta mono malgrandajn rekompencojn al civitanoj, interŝanĝe de valoraj informoj pri la moviĝoj de teroristoj, malgrandaj deliktoj aŭ ajna alia utila informo. Aliaj similaj iniciatoj donis rekompencojn kaj kelkfoje malgranda monatan sumon, al tiuj kiuj helpis nin per

1 NT Hispanlingve: "Soldados de mi Pueblo".

2 NT Municipio en la departemento Kundinamarco (hispane: "Cundinamarca").

informoj kiu permesis al ni protekti lokojn aŭ instalaĵojn —kiel naftoduktojn kaj elektrodistribujajn mastojn— kiujn la teroristoj ofte atakadis. Fine de mia prezidentperiodo, pli ol kvar milionoj da homoj tra la tuta lando —t.e. proksimume unu el ĉiu deko da kolombianoj— provizis ajnan informon al la Ŝtato. Kaj kvankam, bedaŭrinde, ekzistis kazoj en kiuj la banditoj eltrovis kaj murdis informantojn, ĝenerale ni donis bonan protekton al informantoj. Ni prenis serioze ilian sekurecon: en ĉiu urbo aŭ municipo estis altranga funkciulo taskita certigi la efikecon de la sekursistemo kaj kontroli la aliron al la listo de informantoj por malhelpi ke ĝi falu en malbonajn manojn.

Tiu ĉi laboro de informiĝado, apogita per homaj fontoj, estis tre valora kaj donis al nia Armeo pli grandan perspektivon. Fakte, en la pasintaj tempoj iuj armeaj komandantoj estis privilegiintaj la teknologion —tiu de subaŭskultaj aparatoj kaj similaĵoj— kaj subtaksantaj la tradiciajn kaj efikajn homajn fontojn (kiuj, finfine, estis portontaj nin ĝis la ostaĝoj kaj ebligontaj malmunti la gvidantaron de la armitaj grupoj, inter aliaj necesaj avancoj). Ni impulsis la kombino de informiĝado per teknikaĵoj kun informiĝado el homoj, ni distribuis pli bone la ekzistantan homresurson kaj pliigis la haveblecon de soldatoj kaj policanoj. Ni rimarkis hontindan kazon de malbona asigno de homresurso en Kartageno: kelkaj mararmejaj oficiroj estis ŝirmiĝintaj en la koro de la urbo, dum la kvazaŭarmeanoj, la NLA kaj la FARK kaŭzis detruadon en la antaŭurbo. Ni petis, do, ke la Mararmeo transloku sian komandeton al la municipoj El Carmen kaj San Jacinto. La rezultoj venis rapide: San Jacinto estas la sama loko kie la virino antaŭe menciita denove havis siajn "vendejon".

Ni aplikis tiun ĉi strategion ĉie. Mi diris al la generaloj, ke mi volis vidi ilin en militira uniformo kiel eble plej ofte, tio estas, ke mi volis ilin en la fronta linio inter iliaj homoj kaj ne en parada uniformo en iliaj sidejoj. Ni eĉ forigis la honorigan gvardion kiu, tradicie, ricevis la prezidenton kiam lia aviadilo surterigis en iu kolombia urbo. En unu el niaj unuaj vojaĝoj, dum ni malsupreniris el la FAC-001 kaj ni vidis la grandan nombron da soldatoj kiuj nin atendis kun flagoj, Lina diris:

—Konsiderante la realon de la lando, tiu ĉi pompo estas ridinda.

Mi konsentis kaj diris al Kapitano Rodolfo Amaya kaj al Alicia Arango:

—Tiu ĉi registaro vojaĝos tiom multe tra la lando, ke se vi metus honorigan gvardion ĉe ĉiu alveno kaj eliro, ne restus soldato aŭ policano disponebla.

La soldatoj estis senditaj al la kampo.

Mi pasigis tiom multe da tempo kiel mi povis kun la trupoj. Same kiel mi estis farinta kiel departementestro kaj kiel kandidato por prezidento, mi vizitis en ĉiu Kristnasko kaj jarfino soldatojn kaj policanojn postenigitajn en areoj de malriĉaj komunumoj. Ni kunhavis manĝadojn de Natilla kaj Buñuelos³, kaj mi invitis tiun personaron tosti kun la plej bonaj deziroj por la tiame venonta jaro. Mi ĉeestis ĉiujn ceremoniojn de oficiala plirangigo, gradigon en militistaj lernejoj kaj inaŭgurojn de kazernoj. En multaj okazoj mi tranoktis en armeaj kaj policaj instalaĵoj: ĉe tagiĝo mi trotis kun la personaro kaj mi naĝis apud multaj el ili en niaj maroj kaj riveroj. Ĉiu rivero, ĉiu peco da maro de Kolombio, estas spektaklo. Forlasi tiun akvon, post bona bano, estas rezigni grandegan plezuron de la naturo. La tago, kiam leganto konos la riveron Vaupés, kiun mi transiris naĝante, aŭ la riveron Guatapurí, li aŭ ŝi rememoros tiun ĉi libron. Ĉiam impresis min la integriĝo de Abraham Lincoln kun la armeo kiu antaŭgardis la usonan unuecon, lia konstanta komuniko kun la generaloj kaj soldatoj kaj liaj restadoj kun ili en iliaj tendoj. La koro tiris min iri al hospitaloj por viziti la vunditojn.

La leĝa mandato de la kolombia demokratia Ŝtato etendiĝis egale al iu strato kaj al la frondaro de iu ĝangalo. Ni okupis areojn kiel la 13-a suburbo de Medegino, kiu estis longe kontrolita far la FARK, la NLA, kvazaŭarmeanoj kaj aliaj droĝsakristoj. Nu, la unua jaro de nia prezidenteco estis kvazaŭ boksada matĉo: ni ĵetis du batojn kaj la *droĝsakristoj teroristoj* respondis per alia. Estis klare, ke se ni volis antaŭeniri, ni bezonis pli da materiala helpo.

3 NT *Natilla* (speco de flaŭno) kaj *Buñuelos* (frititaj buletoj precipe el maizfaruno, fromaĝo kaj ovoj) estas la manĝaĵoj plej karakterizaj ĉirkaŭ la kristnaska tempo, kaj plej ofte ili estas manĝitaj en kombino.

16

Estis multaj la landoj kiuj esprimis siajn kondolencojn al Kolombio dum la tragikaj jaroj de nia violento. Sed nur unu lando paŝis antaŭen por proponi al ni realan kaj palpeblan militan helpon por helpi nin solvi niajn problemojn. La kolombia popolo estos ĉiam dankema al Usono, kaj al ĝiaj prezidentoj Bill Clinton, George W. Bush kaj Barack Obama, ĉar ili havigis al ni multajn el la rimedoj necesaj por venki la terorismon kaj etendi la kovradon de la demokratia Ŝtato. Mi atingis multajn amikojn kaj helpantojn en Vaŝingtono dum mia prezidenta tempo kaj mi havis bonajn rilatojn kun Respublikanoj kaj Demokratoj egale. Tial ne estas facile forgesi, post tiom da jaroj, kiamaniere komenciĝis ĉio: kun malbona aŭguro, indulge dirite. Fakte, mia unua vojaĝo al la Usona ĉefurbo, post mia elekto, estis kvazaŭ alproksimiĝi al disko-segilo.

Mi alvenis al Vaŝingtono kiel prezidento-elektito, kaj kun tre malmultaj rilatoj kun la supraj tavoloj de potenco en junio 2002. Mi sentis min iom netipa. Kvankam mi prizorgas mian anglan gramatikon kaj vortprovizon kaj poluras ĝin dum mi parolas, mia prononco havas la fortan akĉenton el mia regiono Antjokio. Mi konservas ĉemane vortarojn de la angla kaj la hispana. Kun disciplino mi preparas la akademias kaj politikajn paroladojn en la angla, sed ĉe koktelkunvenoj mi sentas min torporigita. La solaj grandaj amikoj kiujn mi havis en Usono estis Luis Alberto Moreno —la talenta kaj dediĉiginta ambasadoro de Kolombio en Vaŝingtono —, profesoro Roger Fisher de Harvard, Sandra Ceballos, Francisco Sánchez kaj malmultaj personoj pli. Kialoj por senti min stranga en Vaŝingtono.

En la monatoj antaŭ mia elekto, daŭra torento de kolombianoj iris al la oficejoj de la usonaj Kongreso kaj de la Ministrejo por Eksterlandaj Aferoj¹ por disvastigi la kutimajn senbazajn akuzojn pri mi: ke mi apogis la kvazaŭarmeanojn, ke ne zorgigis min la homaj rajtoj kaj aliaj de la sama tendencaro. Multaj el tiuj mensogoj estis ripetitaj en pluraj lokoj. Ekzemple, la unua fojo en kiu mia nomo aperis en *Washington Post* estis en decembro 2000, kiam artikolo diris, sen pliaj klarigoj, ke "la kolombiaj amaskomunikiloj

1 [NT Angle: "Department of State"](#).

estis ligintaj sinjoron Uribe kun la kvazaŭarmeanoj". Tio estis ĉio. Ne aperis sendependa informo, specifaj akuzoj, neniu provo serĉi reagon de mi, nur atako al mia reputacio surbaze de svagaj fontoj, kaj ripetita kvazaŭ se ĝi estus pruvita fakto. Tri monatojn poste, mi estis denove menciita en tiu ĵurnalo: "Uribe, kiu estas konsiderata kiel la prezidenta kandidato plej favorita de la kvazaŭarmeaj grupoj kaj de iliaj apogantoj".

La saman tagon de junio 2002, kiam mi alvenis al Vaŝingtono kiel prezidento-elektito de Kolombio, la usona registaro publikigis ekstradicio-peton pri kolombiaj ĉefoj de la kvazaŭarmeo. La funkciuloj de la Ambasadato diris eĉ ne unu vorton, sed la ektimo estis videbla en iliaj vizaĝoj. Por respondi al la sieĝo far ĵurnalistoj kiuj demandis min ĉu mi ekstradicios ilin, mia sola respondo estis "Kolombio estas lando de leĝoj".

Du jarojn pli frue, estis ekfunkciigita la Plano Kolombio far la prezidantoj Clinton kaj Pastrana. En Usono ĝi havis definitivajn apogojn, kiujn ni ĉiam dankos, kiel tiu far la prezidanto de la Ĉambro de Reprezentantoj, Denny Hastert. Ĝi estis la agnosko pri la kunresponso kiun devas preni sur si la industriigitaj landoj kreantoj de alta mendado de narkotaĵoj. Malgraŭ miaj diferencoj pri la interpaciga plano de Prezidento Pastrana, mi ne hezitis pri apogi la Planon Kolombion. Mi rememoras ke antaŭ mia elekto mi vojaĝis al Ekvadoro kaj trovis tie brulajn protestojn kontraŭ tiu Plano: mi vidis ke ŝajne la FARK kaŭzis delokadojn de kolombianoj al la fratlanda teritorio kun la preteksto de la fumizadoj, ĉio por ŝanceli la Planon Kolombion. Kaj mi ne ŝparis penojn por klarigi al la ekvadoraj amaskomunikiloj la bonojn de la Plano.

Mi pensis ke la efikeco de la Plano postulis turniĝon en la sekuriga strategio de Kolombio. Usono, kun Prezidento Bush ĉe la direktado, konsentis ke batali kontraŭ la drogtrafiko sen alfronti la kartelojn kiel la FARK, la NLA kaj la kvazaŭarmeo estus vane. U helpis nin per informiĝlaboro kaj loĝistiko, sed neniam estis usonaj trupoj en operacoj en Kolombio, la tuta penado falis sur niajn soldatojn kaj policanojn.

La unua vizito al Vaŝingtono estis por konstruado de konfido: Mi diris strikte la samon kion mi diris al miaj kolombiaj samnacionoj dum la kampanjo kiu kondukis min al la venko. Pro tio, ke mi ankoraŭ ne estis prezidento en funkcioj, tiu ĉi vojaĝo ne inkluzivis kunvenon kun Prezidento Bush, sed ja kun pluraj membroj de lia kabineto, inter ili la Sekretario pri Defendado Donald Rumsfeld, la

Ŝtatssekretario Colin Powell kaj Condoleezza Rice, Konsilistino pri Nacia Sekureco. Mi estis en la oficejo de Rice en la Blanka Domo kiam prezidento Bush decidis viziti nin.

Li manpremis mian manon kaj ridetis afable. Ni interŝanĝis ŝercojn dum momento, sed neniu el ni du estis inklinaj al banalaj konversacioj. Tiam, fidela al sia stilo, Bush rigardis min kaj iris rekte al la punkto:

—S-ro Prezidento, kiamaniere vi alfrontos la grupon FARK?

—Kio estas via rekomendo? —Mi respondis.

Dum momento, la prezidanto Bush aspektis surprizita. Eble li kredis ke mi intencis eviti sian demandon. Ne estis tiel: nur ke mi avidis aŭskulti liajn opiniojn. Tiutempe estis pasinta malpli ol unu jaro ekde la atakoj de la 11-a de septembro de 2001, kaj mi admiris prezidenton Bush kiel gvidanto kaj pro la maniero kiel li efektivigis siajn strategiojn. En tiu momento de la historio, eble neniu en la mondo komprenis la lukton kontraŭ la terorismo tiel bone kiel li.

La surprizo, se ĝi ekzistis, daŭris nur kelkajn sekundojn, post kiuj prezidento Bush klarigis, ke post tiu 11-a de septembro la mondo estis ŝanĝita kaj ke la terorismo estis la precipa minaco al la sekureco de ĉiuj landoj. Li aldonis ke la antaŭaj kolombiaj registaroj efektivigis strategion de cedismo rilate la armitajn grupojn koncedinte teritorion al la FARK kaj per aliaj agoj, kio favoris ilian kreskon. Fine, li diris ke laŭ sia opinio tian sintenon ni devus ŝanĝi.

—S-ro Prezidento —mi diris tiam— tio estas ĝuste kion ni faros.

Kaj poste mi parolis pri la principoj de la Demokratia Sekureco kaj kiamaniere ni estis alfrontontaj la teroristojn en nia lando.

En tiu unua konversacio estis metitaj la bazoj por tio kio ekde tiam estis produktiva kaj konfidplena rilato kun prezidento Bush. Estis multaj renkontiĝoj kun li: en la Blanka Domo, en regionaj forumoj, dum ni trairis lian bienon en Teksaso en lia kamioneto kaj eĉ en la du okazoj kiam li vizitis Kolombion.

Preskaŭ ĉe la fino de unu el niaj unuaj konversacioj, dum mi klarigis al li niajn intencojn, ŝajnis ke Prezidento Bush estis iom malkomforta, kvazaŭ iu penso, kiun li ne aŭdacis esprimi, maltrankviligis lin. Nur poste mi sciis, kion li estis pensinta.

Prezidanto Bush, forlasinte la kunvenon, telefonis al sia ambasadorino en Bogoto, Anne Patterson, granda amikino de Kolombio.

—Ni devas helpi Kolombion —li diris—. Nu, por fari tion ni devas tokupigi pri alia misio: helpi konservi vivanta prezidenton Uribe.

17

—S-ro Prezidento, zorgu! Ekzistas unu krimulo en Caucasia¹ tiom potenca kiel Pablo Escobar. Lia alinomo estas "Makako" kaj li diras al la popolo ke li mortigos vin ĉar vi iras tre forte, ĉar vi kaŭzas tro da problemoj.

Mi estis en mia oficejo kun kelkaj kunlaborantoj, dum unu fonto donis al ni tiun informon tra la telefona laŭtparolilo. Mi surforkigis la aŭdparolilon kaj kuntiris la brovojn. Al nia Alta Komisiito pri Paco, Luis Carlos Restrepo, mi demandis:

—Kiu estas tiu "Makako"?

Kiam mi enposteniĝis kiel prezidento, neniu sciis la veran atingopovon kiun havis la tentakloj de krimo en nia lando. Vastaj areoj de Kolombio estis sub la plena rego de la drogŝakristoj teroristoj. Tial, ju pli ni ampleksigis la atingopovon de la Ŝtato kaj laŭ ni translokiĝis al areoj de la lando, kiun la Registaro ne estis reginte dum pluraj jardekoj —se iam li regis— des pli mi estis surprizita pro la grandeco de la kvazaŭarmeanoj. En 2002, ilia taksita nombro estis inter 10.000 kaj 14.000. Ili estis multaj pli: en sia unua konversacio kun la komisiito Restrepo, la kvazaŭarmea ĉefo Carlos Castaño diris ke li sola havis 14.000 sub sia rego.

En pluraj lokoj de la lando, la kvazaŭarmeanoj regis, aŭ ili penetris partojn de niaj institucioj —tribunaloj, lokaj registaroj— kaj enŝteligis iujn individuojn en nian sekurigan agentaron. La kvazaŭarmeoj sekvis la saman vojon de la armita maldekstrismo, kiu ankaŭ provis enfiltriĝi en la Ŝtaton kiel parto el sia doktrino de la "kombino de diversaj lukto-rimedoj". Salvatore Mancuso, alia kvazaŭarmea ĉefo, eĉ asertis ke 30 procentoj el la Kongreso de Kolombio havis ian lignon kun la kvazaŭarmeoj. Tiu deklaro ŝokis nian socion kaj la ligoj inter politikistoj kaj kvazaŭarmeaj ĉefoj estas konata kiel la skandalo de la "para-politiko"². Kvankam la kolombianoj sciis pri kelkaj el tiuj kvazaŭarmeaj ĉefoj —kiel Mancuso kaj Carlos Castaño—, novaj nomoj baldaŭ aperis: Rodrigo

1 NT Pronuncata "KaŭkAsja", ĝi estas urbo situanta nordoriente en la departemento Antjokio.

2 NT El "para-" kiel apokopo de "paramilitar" (kvazaŭarmea, kvazaŭarmeano).

Tovar Pupo, alinomita "Georgo 40", Julian Bolívar kaj Carlos Mario Jiménez, alinomita "Makako". Tiujn ĉi lastajn mi aŭdis menciitaj unuafloje kiam mi eklaboris kiel prezidento.

Unu el organizajtoj kiujn la kvazaŭarmeanoj estis sukcesintaj penetri antaŭ nia prezidenta periodo estis la Departemento Administra de Sekureco (DAS), la ŝtata agentejo de informigado. Mi, konscia pri la gravaj problemoj kiujn alfrontis tiu institucio kaj pri la malbona reputacio kiun ili kaŭzis al ĝi —malgraŭ la klopodoj por solvi ilin far tre bonaj agentejoj—, mi pensis ke ĝi devus esti fermita kaj ke unu nova informigagentejo devus komenci ekde nulo. Nek ene nek ekster la Registaro mi ricevis apogon por fermi ĝin, nur por reformi ĝin. La reformoj estis nesufiĉaj. Retrospektive, mi kredas ke mi eraris kiam mi ne sekvis mian unuan instinkton. Laŭlonge de nia regado, la DAS estis akuzita pri neleĝaj aŭ misaj agoj. Tial, je la fino de mia prezidenta mandato ni decidis prezenti la leĝaron kiu permesis fermi ĝin. Tiu leĝaro estis aprobita baldaŭ post kiam finiĝis mia posteno.

Ne nur mi, ankaŭ la Armeo kaj la Polico, la analizistoj, la civitanoj, ne konis la grandon de la terorismaj organizajtoj nek la amplekson de ilia penetrado en nia demokratio. En unu triono de Kolombio avancis la reĝo far kvazaŭarmeanoj, en la dua far la gerilistoj, kaj la tria estis en danĝero. Malgraŭ la atako okazinta la tagon de mia enpostenigo, la lokaj aŭtoritatoj de Bogoto neis la ekziston en la urbo de tiuj grupoj, kiuj kiel la gerilistoj de la FARK kaj du kvazaŭarmeaj organizajtoj faris enormajn damaĝojn en la urbo.

Ni persekutis la ĉefojn de kvazaŭarmeoj kun la sama vigleco kun kiu ni persekutis la ĉefajn estrojn de la FARK kaj la NLA. Jen mi diris tre klare en ĉiu parolado, en ĉiu intervjuo kaj en ĉiu privata konversacio: nia registaro ne faras distingojn inter kriminalaj grupoj, ĉiuj estis egale submetebaj al aresto kaj juĝado, kaj iliaj aktivecoj ne estas tolerataj. La kolombia Ŝtato estis devonta reakiri la regadon sur la lando. Aliflanke, ni neniam konsideris la eblon kunordigi kun la kvazaŭarmeoj operacojn kontraŭ la FARK aŭ aliaj neleĝaj armitaj grupoj, kaj tio por unu kialo: ni ne volis kaŭzi la grandajn damaĝojn kiujn suferus niaj demokratiaj institucioj interŝanĝe kontraŭ rapida —kaj tre dubinda— milita progreso. Ĉiuj krimaj grupoj estas same korodaj por la Laŭjura Ŝtato.

Tial, kiam mi eksciis pri la ekzisto de "Makako", mi ordonis persekuti lin kaj alkonduku lin al la justico kiel eble plej baldaŭ.

Private, mi petis al malgranda rondo de sekurecaj funkciuloj ke ili provus atingi arest-ordonon. Kelkajn tagojn poste, advokatoj de "Makako" iris al la oficejo de Luis Carlos Restrepo kaj demandis:

—Kial la prezidanto ordonis la areston de "Makako" se li pretas intertrakti?

Tiu epizodo estis unu el la unuaj okazoj en kiuj mi rimarkis kiom multe la kontraŭleĝaj grupoj estis penetrintaj iujn segmentojn de niaj institucioj. Baldaŭ poste, kiam ni konfiskis posedajon kiuj estis akiritaj kontraŭleĝe per drografiko, ni lernis ke la riĉega bieno kiun "Makako" havis en Caucasia estis tre proksima al armea instalaĵo. La leĝo devigis nin konfiski lian bienon, kaj tion ni faris. Ne estis ĝis nia regado ke, danke al nediskriminacia kaj unuanima gvidlinio por reakiri la ekskluzivan monopolon de la potenco, la "makakoj" de Kolombio komencis senti intensan kaj daŭran premon.

Ili estis multaj, kaj tio kreis dilemon. Krom la kvazaŭarmeanoj, la FARK havis proksimume 18.000 membrojn, la NLA 6.000 membrojn, kaj ambaŭ grupoj plurajn milojn da urbaj milicianoj. Ni estis decidiĝintaj bloki ĉiujn tiujn krimulojn kaj precipe iliajn gvidantojn. Samtempe, ni sciis ke ia tradicia "milita venko" super tiom granda, difuza kaj potenca nombro de krimuloj ne estis ebla, eĉ se ni triobligus aŭ kvarobligus la grandon de nia Armeo (io kion ni ne povus fari). Ni decidis, do, ke nia plej bona eblo estis sekvi plurfrontan strategion: deploji niajn trupojn por reakiri la teritorion nome de la kolombia demokratio, kaj serĉi la manieron konvinki kiel eble plej multajn senrangajn membrojn por ke ili demetu siajn armilojn. Alivorte: ni persekutos la neleĝajn armitajn grupojn kaj iliajn ĉefojn kun tuta nia decido, tamen ni estus malavaraj por tiuj kiuj pretus reveni al la civila socio.

Nia propono estas etendita al *ĉiuj* neleĝaj armitaj grupoj: ni proponis vojon al la paco kondiĉe, ke ili forlasu siajn krimajn agojn. La FARK malakceptis la proponon tuj. La ELN, siaflanke, tenis serion de intertraktoj —komencitaj sub la antaŭa registaro— kiuj okazis en Kubo.

Tamen, la strategiojn de nia registaro rilate sekurecon montris signojn de progreso ekde la unuaj monatoj de mia mandato kaj aferoj komencis ŝanĝiĝi. La krimuloj rimarkis ke ni estis seriozaj kaj ke la kondiĉoj ŝanĝiĝis draste: ni persekutos ilin ĉiujn sendepende de ilia ideologio aŭ aneco. Ili komprenis tiam ke siaj solaj ebloj estis aŭ elspezi la reston de sia vivo kurante kaj konstante alfrontante la

tujan eblecon esti arestitaj aŭ mortigitaj, aŭ paroli kun ni, kaj eble intertrakti pri ia meza vojo. Ju pli la realeco de tiu elekto fariĝis evidenta, des pli okazis ke kelkaj grupoj —la kvazaŭarmeanoj kaj, ankaŭ, gravaj gerilistoj— komencis elekti la malmobiliziĝon.

Estis evidente ke ni kaptis ilian atenton. Tamen, trovi ian solvon kiu konvinkus tiujn krimulojn pri formeti propravole la armilojn kaj rezigni siajn profitojn el drogŝakrado —kiuj en multaj kazoj sumiĝis je pluraj milionoj da dolaroj ĉiujare— starigis konsiderindan defion. Jarojn antaŭe interkonsentoj tiaj, en Kolombio kaj en aliaj landoj, koncedis amnestiojn kaj forpardonojn al tiuj kiuj devontigis sin al malmobiliziĝo. Tamen, la mondo jam estis ŝanĝiginta kaj, plej ofte, tio jam ne estis ebla: tio estis eksplicite malpermesita far la Konstitucio de Kolombio kaj la tiurilata kompletiga leĝaron, kaj ankaŭ far la internaciaj traktatoj (speciale en rilato kun hororaj krimoj kaj krimoj kontraŭ la homeco). Ni estis devontaj diskuti aliajn solvojn.

Kiamaniere ekvilibrigi la bezonojn de la justico kaj de la paco en lando kiel la nia? Mi meditis profunde pri tiuj aferoj, tutajn noktojn pasigis diskutante kun Restrepo kaj kun membroj de la kolombia Kongreso, kiuj estis devontaj aprobi ajnan interkonsenton. Mi helpis min per la persona sperto kaj mi konsultis multajn librojn pri historio.

En la fino, ni decidis apliki plurajn strategiojn. Dum mia restado en Oksfordo, en aprilo de 1998, mi rimarkis kun granda intereso la subskribon de la Interkonsento de Granda Vendredo¹, historia paŝo en la longa porpaca procezo en Norda Irlando. Laŭ tiu interkonsento, al responsuloj pri seriozaj krimoj oni donis specon de libereco sub kondiĉoj, sed ne forpardonon. La distingo, ŝajne nur teknika, estas tre grava: ĝi signifis ke la krimuloj reatingis sian liberecon, tamen ili estis daŭre suferontaj la konsekvencoj de la puno, tiel fronte al la okuloj de la socio kiel en praktikaj aferoj. En la kazo de Kolombio, tiu strategio de akordiĝo signifis ke la persono neniam povos okupi oficon per popola voĉdonelekto kaj ke se li aŭ ŝi iam faros alian krimon, la persono estus arestita denove kaj akuzita pro eĉ pli gravaj krimoj.

Por la gvidantoj de neleĝaj grupoj —por la "Makakoj" de Kolombio — la kondiĉoj estis pli pezaj. Ili devis konfesi siajn krimojn, malmunti siajn organizaĵojn kaj transdoni siajn personajn riĉaĵojn

1 NT Anglalingve: "Good Friday Agreement".

por kompensi al siaj viktimoj. Ili ankaŭ devus kunlabori plene kun la ŝtataj enketoj. Se ili plenumus ĉiujn tiujn ĉi kondiĉojn, la puno en malliberejo estus pli mallonga ol tiu kiun ili havus sen ĉi tiu interkonsento. Alie, ili alfrontus pli rigorajn punojn kaj, eble, la punon kiu pleje timigis ilin: ekstradicion al Usono.

Kelkaj homoj opiniis ke tiuj klaŭzoj estis tro indulgaj, donite la amplekso de la masakroj faritaj de la drogŝakristoj teroristoj en la lastaj jaroj. Mi metis mian tutan koron en la debato kaj pasigis multajn sendormajn noktojn pesante la diversajn argumentojn. Finfine, mi sciis, ke mia plej granda responso estis meti Kolombion survoje al sekureco kaj paco daŭrigeblaj. Por tio mi alvenis al la prezidenta posteno.

En 2005, la Kongreso aprobis la leĝaron kiu kodigis la klaŭzojn por la malmobiliziĝo, konata kiel la Leĝo de Justeco, Paco kaj Riparado. Kolombio havis multajn leĝojn de paco, sed ĉi tiu estis la unua kiu postulis justecon, malhelpis senpunecon kaj traktis pri la protekto kaj kompenso por viktimoj kiuj antaŭe ne depostulis pro timo aŭ ĉar ili trovis tiun agon senutila. Granda nombro de kolombianoj profitis tiun leĝon, kaj la ceremonioj de malmobiliziĝo de centoj aŭ miloj da personoj estis relative oftaj eventoj. En 2006, fine de nia unua prezidentperiodo, pli ol 43.000 membroj de neleĝaj armitaj grupoj estis malmobiliziĝintaj.

Dume, la estroj de tiuj neleĝaj grupoj komencis sian longan procezon de kapitulaco. Por povi sukcese partopreni en nia proponon, ili devus plene kunlabori kun niaj enketoj kaj ĉesigi ĉiujn krimajn agadojn. La tento por reveni al siaj vivoj de riĉeco kaj senpuneco —al la grandiozeco de siaj bienoj ekster armeaj kazernoj — estis ĉiam ekzistanta. Kaj por kelkaj el ili, la tento estos tro malfacile eltenebla.

18

Je la fino de la unua jaro de nia regado, ni havis palpeblajn signojn de progreso: la kidnapoj malkreskis per triono kaj en la tuta lando la murdoj falis per 21 procentojn. La plej grandaj progresoj okazis en areoj regitaj tute far niaj trupoj; tia estis, ekzemple, la kazo de la metropola areo de Medegino. Ni pliiĝis la sekurigan agentaron per pli ol 25.000 soldatoj kaj realigis gravajn operacojn kontraŭ armitaj grupoj en areoj kiel la departemento Kundinamarko, la metropola areo de Kartageno kaj la montoj situantaj ĉirkaŭ Bogoto. Ju pli la sekureco pliboniĝis, des pli la investado revenis al Kolombio kaj nia ekonomio montris novajn signojn de vivo: dum la unua jarkvarono de 2003, la Malneta Enlanda Produkto kreskis 3,8 procentojn. Plie, nia registaro havis popolaprobos pli granda ol 70 procentoj: atesto pri la konfido kiun la kolombianoj sentis pri nia politiko.

"La agprogramoj de Uribe donis por la unua fojo radion de espero al la kvardek-du milionoj da loĝantoj de tiu lando", informis *New York Times* baldaŭ post mia unua datreveno kiel prezidento. La opinisondoj montris, ke 60 procentoj el la kolombianoj pensis ke mi estis plenuminta miajn promesojn de kampanjo. Aliaj homoj atentigis, prave, ke ni estis nur komencintaj solvi niajn problemojn. "La plej bona afero kiun la prezidento faris estas rememorigi nin, ke ja ni povas savi la Titanic per teama laboro kaj multe da sinoferoj", diris ĉefartikolo en la kolombia ĵurnalo *El Tiempo*. "Ĉi tiuj estas tagoj de intensa plugado, malfacila plantado, pacienca rikoltado kaj dolora stucado".

Malgraŭ ĉiuj niaj progresoj kaj la politika volo kiu animis nin, la kapablo de la armitaj grupoj por semi teruron estis ankoraŭ enorma. La FARK malakceptis nian proponon pri interparoloj kaj daŭrigis buĉante soldatojn kaj senkulpajn civilulojn kun la sama dozo de krueleco. Entute, pli ol 11.000 personoj estis mortigitaj en Kolombio en la unua jarduono de 2003, inter ili Guillermo Gaviria Correa, Gilberto Echeverri Mejía kaj la naŭ soldatoj proksime de Urrao. La plago de kidnapo ankoraŭ estis terura: la nombro de ostaĝoj estis pli ol mil en la sama jarduono. Raporto eldonita far la *World Market Research Center*, meze de 2003, montris Kolombion kiel la lando, el la tuta mondo, kun la pleja probablo suferi terorisman atakon. Ne; ni ne estis atinginte tian Kolombion kian ni ĉiuj revis. Eĉ ni ne estis proksime.

Ni sciis, ke multaj el la plej malbonaj atakoj fare de la FARK estis kunordigitaj rekte far komitato el sep personoj, la t.n. "sekretariato". Tamen, malgraŭ la intensa laboro de nia sekuriga agentaro kaj de nia reto de informantoj, ni havis malmultajn valorajn indicojn pri la troviĝejo de homoj kiel la alinomitaj "Manuel Marulanda" kaj "Raúl Reyes", kiuj daŭre ordonis atakojn senpune kaj kun kreskanta malestimo pri la vivo de civiluloj.

Unu vendredon nokte, en februaro 2003, mi estis en kunveno kun altrangaj armeanoj. Subite alvenis novaĵo: "El Nogal", bone konita socia klubo en la nordo de Bogoto, estis la celobjekto de atako. Mi iris tuj al la okazintejo kun la ministrino pri Defendado Ramírez kaj pluraj komandantoj de la sekuriga agentaro. Tio kion ni vidis superis niajn plej malbonajn antaŭvidaĵojn.

La FARK eksplodigis aŭto-bombon je kvarono post oka nokte, kiam, ili sciis, El Nogal estis pli homplena. En la momento de la eksplodo, estis okazantaj: geedziĝa festo, klaso pri baletoj kaj festo por infanoj. La eksploda ŝargaĵo —miksaĵo el amonia nitrato, brulema oleo kaj TNT— pezis pli ol 175 kg. La eksplodo estis tiel surdiga ke iuj homoj en la najbaraĵo pensis ke aviadilo frakasiĝis. La derompajoj estis disjetitaj tra la strato kaj falis sur la tegmentoj de la pasantaj veturiloj. Oni trovis pecojn el la aŭto-bombo kvin domblokojn for. Fajrobrigadanoj okupiĝis dum du horoj por kontroli la fajron. Ŝajnis, kvazaŭ la fasado de la konstruaĵo estis fandita, kaj iuj fremdaj amaskomunikiloj komparis tiun atakon kun la bombado de la federacia konstruaĵo en la urbo Oklahomaurbo, Usono, okazinta jardekon antaŭe. La fina rezulto estis tridek ses mortigitoj, inter ili ses infanoj, kaj pli ol cent sesdek vunditoj. Kelkaj amaskomunikiloj nomis ĝin la plej malbona atenco en iu kolombia urbo ekde la tagoj de Pablo Escobar.

La simbola signifo de tiu atako ne povis esti pli klara. El Nogal estis preferata kunvenejo de pluraj ministroj kaj kunlaborantoj de nia registaro kaj de la entreprenistara komunumo de Bogoto. "La mesaĝo por S-ro Uribe" skribis *Wall Street Journal* kelkajn tagojn poste, "estas ke se la gerilistaro ne povas moviĝi libere en la kamparo de Kolombio kaj terori la kamparanojn, ili atakos la gvidantojn de la lando". Prezidanto Bush publikigis deklaron en kiu li priskribis la atakon kiel "barbara ago de la terorismo". La centramerikaj landoj kunvenis en Panamo, denunciis la atakon kaj konsideris la grupon FARK kiel terorisma grupo. Ankaŭ Kofi Annan,

Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, kondamnis "tiun kruelan atakon".

Alveninte tiun nokton al la okazintejo, la unua aĵo, kiun ni vidis estis la sango-makulita trotuaro kaj familioj krientaj, brakumantaj inter ili meze de la doloro. Ni parolis kun ili por proponi niajn solidarecon kaj kondolencon. Dum la savistoj fosis tra la derompaĵoj, kelkaj ĵurnalistoj kaj aliaj personoj urĝis nin forlasi niajn strategiojn, argumentante ke la terorismaj agoj estis tro kruelaj por elteni.

Iomete post noktomezo mi faris paroladon kiu estis elsendita televide el la scenejo de la atako: en la parolado mi konfesis nian doloron kaj suferadon, tamen refoje mi urĝis la nacion por ne rezigni en nia lukto kontraŭ terorismo. "Mi scias ke la violentuloj faras ĉion kion ili povas por cedi la volon de la kolombia popolo", mi diris. "Malgraŭ la tuta doloro kiun ni sentas, mi petas ĉiujn niajn samlandanojn, ne cedi antaŭ la terorismo kaj ke ni alvenu al unu decido: venki la violentuloj kaj aresti ilin ĉiujn".

La sekvan tagon miloj da manifestaciintoj en la tuta urbo eliris al la stratoj. La slogano estis: "Bogoto ploras, sed ne kapitulacas". La frazo estis eldirita far nia ministro pri Enlandaj Aferoj, Fernando Londoño Hoyos, kaj ripetita far multaj aliaj kolombianoj —inkluzive mi— post la terorisma aŭto-bombo kontraŭ El Nogal. Lina partoprenis en la marŝo; akompanita far nia Vicprezidento Francisco Santos. La manifestacio estis klara signo, ke la kolombiaj homoj ne estos deadmonataj en sia serĉado por la sekureco. Ne, Bogoto ne kapitulacis, Kolombio ankaŭ ne.

Tiun nokton de la atako kontraŭ El Nogal, mi faris alian peton kiu ricevis malpli da atento en la amaskomunikiloj, tamen ĝi estis same grava. Mi petis emfaze, ke "la demokratia mondo helpu nin venki la terorismon". Mi diris ke ekzistas landoj kiuj "ricevas monon el teroristoj ... kiuj toleras drogojn kaj la monlavadon ... kiuj agnoskas teroristojn kiel legitimaj interparolantoj kaj instigas ilin por fari abomenindajn krimojn kontraŭ la popolo de Kolombio". Finis mi la paroladon per klara alvoko al agado: "Bonvolu", mi diris, "ne pli da tolero aŭ komplikeco".

La efektivigo de tiu ĉi peto estis riveligonta malfacila kaj polemika. Tamen ni estis lacaj de tragedioj. Ni ne povis plu ignori la realaĵojn. Estis tempo por agi kaj agi kun kuraĝo.

KVINA PARTO

Responso

“Ĉio kion la homo faras kiel simpla individuo, en la socio, por konservi sin eĉ je ties kosto, estas malbona, kaj estas bona tio kion la homo faras kiel socia persono, por la socio en kiu li aŭ ŝi inkludiĝas, por permanentiĝi en ĝi kaj permanentigi ĝin”.

MIGUE DE UNAMUNO, *Pri la Tragika Sento de la Vivo*

1

Unu nokton, post kunveno proksime al Medeĝino, mi invitis la ĉeestantojn al proksima ĉevalstalo por vidi kelkajn ĉevalojn. Mi memoras ke tie estis stalono kiu mirigis min ĉar ĝi havis la elegantecon kaj la mildan paŝon postulitaj al la ekspoziciindaj kolombiaj ĉevaloj. Mi sentis min inspirita, mi turnis min al la grupo kaj diris:

—Mi rajdos ĉirkaŭ la vojeto dum mi tenas tason da kafo, kaj mi verŝos eĉ ne unu guton!

La prezidento de Venezuelo, Hugo Chávez, ridetis.

—Ĉu vi vere povas fari tion, Uribe?

—Vetu ni kelkajn barelojn da petrolo kaj ni vidu —mi diris kun rideto.

Prezidento Chávez ridegis kaj akceptis mian proponon. La ĉeestantoj murmuris.

Ni alvokis la rajdanton kaj li alportis la ĉevalon ĉe ni. Dum mi supreniris al la ĉevalo, mi petis al mia eskorto alporti al mi tason da kafo. Ĝi estis plena ĝis la rando.

—Knaboj, kiel vi povas fari al mi ĉi tion? —Mi flustris— aŭ ĉu vi estas en la opozicio!

Mi trinkis sorbajeton por permesi al mi nur etan erarmargenon kaj mi komencis rajdi ĉirkaŭ la vojeto. Post du rondiroj Mi finis sen esti verŝinta guton kiel anoncite.

Kun ampleksa rideto, prezidento Chávez aplaŭdis.

—Uribe! —Li kriis— Vi ... estas kiel centaŭro!

Ni ridis multe. Li ankoraŭ ŝuldas al mi la barelojn da petrolo.

Dum la ok jaroj de miaj mandatoj, la rilatoj kun la prezidento Chávez estis preskaŭ ĉiam koraj, spontaneaj kaj varmaj. Eĉ en la okazoj kiam ni malakordis. Mi ĉiam pensis ke niaj disputoj ne estis de persona naturo: ni ambaŭ estis prezidentoj kaj interagis inter Ŝtatoj. Kaj mi neniam pretervidis ke plursence, niaj landoj estis kiel familio. Se iu problemo ekestis kun la venezuela Registaro, mi ĉiam

faris grandan penadon por reliefigi la interligojn de frateco inter niaj nacioj, kiujn neniam povus esti kompromititaj.

Mi ankaŭ provis helpi la prezidenton Chávez kaj la venezuelan popolon en multaj okazoj. Dum mia unua mandato ni kunvenis ok fojojn. En iuj kazoj, kiam la prezidento Chávez intensigis sian kritikon al Vaŝingtono —gis preskaŭ neelteneblaj niveloj— li petis al mi paroli en lia nomo kun la prezidento Bush por helpi kvietigi la streĉitecon, kaj tiel mi faris. Dum la venezuela ekonomia krizo de 2003, ni helpis niajn najbarojn per manĝaĵoj, fabrikitaj varoj kaj, nekredeble, per kolombia benzino post la malabundeco de brulaĵo en Venezuelo kaŭzita de amasaj strikoj. Simile, kiam en 2007 kaj 2008 tutmonda manĝaĵokrizo eksplodis, kelkaj kolombiaj entreprenistoj petis al mi halti aŭ almenaŭ malpliigi la eksportojn de manĝaĵoj al Venezuelo, ili zorgas pri la eblo de alta inflacio en tiu lando. Mi rifuzis. Tion mi esprimis publike kaj mi diris al prezidento Chávez: Se en Kolombio malmankus litro da lakto, ni donacus ĝin al Venezuelo. Mi ĉiam pensis ke la internacia komerco ne povas esti nur utilisma interŝanĝo: devas ankaŭ ekzisti ero de solidareco kaj frateco.

Tamen mia plej granda responso kiel prezidento estis atingi sekurecon, prosperon kaj la superregado far la leĝo por la kolombia popolo, kaj mi volis la plenan kunlaboron de niaj najbaroj por atingi tiujn celojn. Minimume, ni bezonis ke ili sin detenu de gastigi teroristojn kaj aliajn krimulojn responsaj pri multaj el la plej mortigaj atakoj faritaj en la kolombia teritorio. Maltrankviligis min ke ĉiuj niaj iniciatoj por sekureco fariĝus vanaj se la drogŝakristoj teroristoj povus transiri la landlimon kaj trovi sekuran rifuĝejon en Venezuelo, el kie ili daŭrigus planante kaj efektivigante atakojn kontraŭ Kolombio tute senpune.

Alpreninte la prezidentecon, mi rememoris la deklaron pri "neŭtraleco" inter Kolombio kaj la FARK, farita de prezidento Chávez en Oksfordo en 1998. Min zorgigis, ankaŭ, kelkaj signoj kiuj indikis ke lia retoriko havis realajn konsekvencojn: en februaro de 2002 —ses monatojn antaŭ mia enoficigo—, la estro de la kontraŭinsurekcia agentaro de prezidento Chávez demisiis deklarante ke "la venezuela Registaro protektas la kolombian gerilistaron"; tiujare, el la venezuela flanko de la rivero Arauca, nia sekuriga taĉmento postenigita proksime de la landlimo estis atakita per dudek metifaritaj pafaĵoj el haŭbizo —gasbotelegoj plenaj de ŝraŭboj, najloj, vitro-rompitaĵoj kaj homaj ekskrementoj—. Tamen,

tiu ne estis la unua atako nek ĝi estos la lasta: ofte la teroristoj de la FARK kaj la NLA uzis la teritorion de la najbara lando por frustri la persekutadojn faritaj de niaj trupoj. En marto 2003, nur ses semajnoj post la atako kontraŭ El Nogal, la teroristoj venis el Venezuelo, ili eksplodigis aŭto-bombon ĉe homplena komerca centro en la landlima urbo Cúcuta, kaj ili fuĝis reen trans la landlimo. Sep homoj estis mortigitaj kaj dekoj estis vunditaj.

En tiuj jaroj, kiam oni demandis la prezidenton Chávez pri la kolombiaj teroristoj kiuj operacis en Venezuelo, li ĉiam respondis, ke, eksciinte pri ilia ĉesto, sia registaro prenis la taŭgan agadon, kaj, aliflanke, ke Venezuelo ne povis kontroli ĉiun angulon de siaj 2.200 kilometroj da landlimo kun Kolombio. Kelkfoje li ankaŭ nin kulpigis pri ke ni ne faras plu por malhelpi ke la violento transiĝu en lian landon. Post la terorisma atako en Cúcuta, mi rimarkigis ke la NLA kaj la FARK estis "trompintaj la popolon kaj la registaron de Venezuelo" per "kaŝiĝi trans la landlimo kaj ... maski sin kvazaŭ bonaj civitanoj".

Ni havis dubojn. Pluraj raportoĵoj el informiĝlaboro indikis la ekziston de tendaroj por trejnado de teroristoj en relative malfermaj lokoj en Venezuelo. Pluraj membroj de FARK malmobiliziĝintaj aŭ arestitaj, diris, ke ili ricevis trejnadon pri eksplodaĵoj kaj militaj taktikoj far soldatoj de la apuda lando. Kun granda diplomateco, mi ekstraktis tiujn temojn en miaj unuaj renkontiĝoj kun prezidento Chávez, mi invitis lin fini sian "neŭtralecon" kaj apogi eksplicite la novan demokratie elektitan Registaron de Kolombio.

En unu el miaj unuaj vizitoj kiel oficanta prezidento al Venezuelo, Prezidento Chávez atendis min ĉe la flughaveno por la etiketa ricevo. Post la kutimaj salutoj, mi diris al li:

—Prezidento, bonvole akceptu mian ponĉon kiel donacaĵo. Ĝi estas multe pli bona ol la mantuko de Marulanda!

Mi pritemis, kompreneble, la ĉefon de la FARK, kaj lian konatan ruĝan mantukon kiun ĉiam li portis surŝultre. Prezidento Chávez ridis: ni ambaŭ sciis ke la donaco havas profundan signifon.

En novembro 2004, dum ĵurnalistara intervjuo post iu kunveno, la raportistoj demandis rekte al prezidento Chávez, ĉu li aŭ iu ajn membro de sia registaro apogis la grupon FARK. Lia respondo estis senduba:

—Tio estas granda mensogo! —Li ekkriis—. Ni ne apogas la grupon FARK.

Unu monaton poste ni ricevis nedubeblan informon el informiĝlaboro pri la troviĝejo de unu el la supraj estroj de la FARK: Ricardo González, alinomita "Rodrigo Granda". Li vivis en komforta duetaĝa domo kun naĝbaseno, en eleganta sektoro, proksimume du horojn for de Karakaso ĉe la sudoriento. La *New York Times* rimarkigis ke pluraj generaloj de la venezuela armeo ankaŭ loĝis en tiu sektoro.

2

"Rodrigo Granda" estis malofta figuro en la FARK. Li ne kutimis surporti militiran veston kaj li ne estis konata kiel partopreninto en gerilaj operacoj. Li proklamis sin kiel la "ministro pri eksteraj rilatoj" de tiu grupo, kaj li vojaĝis tra la mondo kun civila vesto. Laŭ raportoj, ekde 1994 "Granda"¹ estis vojaĝinta al almenaŭ dek ses landoj, inkluzive la Libion de Muamar Kadafi, serĉinte financan kaj materiala subteno por la FARK. Li estis la vizaĝo, ŝajne civilizita, de la grupo en eksterlando: ŝlosila rolo de la terorisma organizaĵo por trompi kaj serĉi politikan apogon.

Tamen li ne estis ia "diplomato", sed krimulo el karno kaj ostoj. Laŭ la kolombia Polico, "Granda" helpis aranĝi plurajn kidnapojn dum la lastaj jaroj kaj li estis ŝlosila ĉenero en la ŝakrado de narkotaĵoj de la FARK. Li aranĝis kunvenojn inter tiu grupo kaj aliaj krimaj organizaĵoj kiel la kartelo de Tijuana en Meksiko. Li estis profunde implikita en kontrabando de armiloj, kaj li partoprenis en mejloŝtona negoco, farita en 1999, per kiu la FARK akiris 10.000 sturmajn fusilojn tra Peruo. Li ankaŭ partoprenis en klopodoj por eksporti la teruron de la FARK al aliaj landoj. "Granda" estis akuzita far la Paragvajaj aŭtoritatoj pri havigi la konsilojn kaj loĝistikan apogon kiu en 2004 ebligis la kidnapon kaj postan murdon de Cecilia Cubas, filino de eksa prezidento de tiu lando. Alivorte, "Granda" estis ŝlosila homo en la havigo de armiloj kaj en la financado de unu el la plej konataj terorismaj grupoj en la mondo. Dum pluraj jaroj ni serĉadis lin.

La kolombia informiĝfako eklernis ke "Granda" estis troviĝonta en Karakaso por ĉeesti du kunvenojn de konataj maldekstrismaj organizaĵoj. Tiuj kunvenoj, okazontaj en decembro 2004, estis: la Unua Monda Kunveno de Intelektuloj kaj Artistoj en defendo de la Homaro kaj la Dua Kongreso de la Bolivaranaĵoj Popoloj —kongreso patronita far la registaro de prezidento Chávez—. Por ni, konkreta informo de tia naturo havis tre malmultajn precedencojn: malofte ni sciis anticipe la lokon kie troveblis la altrangaj ĉefoj de la FARK. Kaj ĝis tiu momento neniu granda ĉefo de tiu organizaĵo estis kaptita.

1 [NT Mi skribas tiun nomon inter citiloj por klare diferencigi ĝin disde la same skribata adjektivo esperantlingva.](#)

La alternativoj kiujn ni havis ne estis facilaj. Post du jaroj kiel registaro, ni sciis ke informi la Armeon aŭ la Policon de Venezuelo tra la tradiciaj kanaloj estis riske, ĉar eĉ se la prezidento Chávez ne estis informita pri la rifuĝo al la FARK en sia lando —kiel li certigis al ni— ni havis fidindan informon pri ke iuj individuoj de lia sekuriga agentaro ja sciis pri tio; tial "Granda" povus esti avertata kaj li malaperus denove en kaŝitecon. Cetere, ekde pli ol unu jaro antaŭe ni estis elsendinta internacian arest-ordonon kontraŭ li, tute senrezulte, kaj diversaj raportoj de amaskomunikiloj indikis ke "Granda" ĝuis la privilegiojn de la venezuela civitaneco kaj eĉ voĉdonis en loka balotado tiame ĵuspasinta. Ne aperis laŭleĝa institucio por atingi la kapton de "Granda" en Venezuelo. Ni devas trovi manieron por aresti lin.

Tra niaj informiĝretoj ni sciigis pri la troviĝejo de "Granda" kelkajn membrojn el la venezuela sekuriga agentaro kiuj simpatiis kun nia lukto kontraŭ la teroristoj. Baldaŭ poste, Venezuelaj funkciuloj kontaktis niajn aŭtoritatojn en Bogoto kaj esprimis ke ili akceptis nian anoncitan rekomencon por kapti la alinomitan "Granda".

La propono estis zorge konsiderata. Mi sciis, ke tia procedo povus ĉagreni la venezuelajn aŭtoritatojn kaj kaŭzi diplomatajn problemojn. Mi estis laborinta multe por disvolvi bonajn rilatojn kun ĉiuj niaj najbaroj kaj aliaj landoj en Latinameriko, konvinkita pri la graveco de tiuj landoj por nia ekonomia sekureco kaj prospero en la longa tempo. Tamen mi spektis kun granda maltrankvilo kiamaniere oni permesis al konata teroristo agadi malkaŝe kaj ĉeesti politikajn kunvenojn —kiuj en ĉi tiu kazo estis patronitaj far la Registaro mem— en la ĉefurbo de unu najbara lando, kontraŭe al pluraj rezolucioj de Unuiĝintaj Nacioj —inkluzive la numero 1373, adoptita en septembro de 2001— kiuj malpermesas gastigi terorismajn organizaĵojn. Cetere, la uzo de monaj rekompencoj por kapti teroristojn estis kongrua kun la internaciaj praktiko kaj juro (Usono proponis, tiutempe, ĝis 25 milionojn da dolaroj rekompence por informoj kiuj ebligus kapti la teroriston Osama Bin Laden), kaj ni troviĝis fronte al ŝanco unika, eĉ historifara, ĉar, kiel mi diris, estis la unua fojo en kiu ni havis specifajn informojn pri la loko kie troviĝis grava ĉefo de la FARK, por tiel fari lian areston.

Mi travivis multajn jarojn vidante kiel la FARK realigis masakrojn de civiluloj, kiel tiuj ĉe El Nogal kaj Cúcuta. Mi estis plorinta kun la familioj de la viktimoj, mi vidis la verŝitan sangon dum ĝi estis

ankoraŭ freŝa. Kaj mi sciis, ke por povi fari la sekvanta signifan paŝon cele al plibonigi la sekurecon en Kolombio, ni devus renversi la gvidantaron de la FARK. Se "Granda" estus arestita, ni pruvus al ĉiuj ĉefoj ke sendepende de la loko kie ili troviĝas, ili devos respondi por siaj krimoj. Farinte finan bilancon pri la situacio, mi decidis: mi prenos sur min la ŝtormon kiu eble estos kreita en la mondo de la diplomatio kaj la protestojn de tiuj, kiuj sentos sin ofenditaj. La paŝo farota estis laŭleĝa kaj kontribuos signife al nia celo krei pli sekuran Kolombion. Mi povis toleri kelkajn tagojn da sensaciaj gazetaj titotoj, sed ne unu plian entombigon.

Antaŭ la procedo, la ministro pri Defendado, Jorge Alberto Uribe Echavarría —kun kiu mi ne havas parencecon— vokis min por esprimi la diplomaciajn maltrankvilojn kiujn ni devus pesi, mi respondis: "Ministro, mi surprenos plenan responson".

Ĉeestinte unu el la planitaj renkontiĝoj en Karakaso, "Granda" parolis kun ĵurnalisto en proksima kafejo. Estis vespere, la 13-an de decembro. Subite lia poŝtelefono sonis. "Granda" petis permeson kaj eliris al la trotuaro por ricevi la alvokon. Kelkajn minutojn poste li estis en aŭto, mankatenuita, survoje al la kolombia landlimo kaj al malliberejo de alta sekureco en nia lando.

3

Dum tri semajnoj estis malmulta la komunikado kun Karakaso. Ni elsendis komunikajon por sciigi publike pri la aresto de "Granda", kaj en Venezuelo preskaŭ neniu protestis. Tagojn poste, post konfidenca kunveno kun altrangaj ĵurnalistoj en Bogoto, unu el ili malobeis la interkonsenton pri konfidenco kaj publikigis grandan parton el tio private traktita. Eĉ tiam ni aŭdas nenion el Karakaso. Fine, la antaŭtagon de novjaro, mi telefonis prezidenton Chávez por esprimi miajn bondezirojn por la venonta jaro: li estis trankvila — kvankam, mi certas, li jam konis ĉiujn detalojn de la kazo—.

Uribe, mi aŭdis kelkajn onidirojn ie tie —estis la plej rekta aserto kiun li faris.

La 3-an de januaro, subite ĉio ŝanĝiĝis.

Altrangaj ĉefoj de la FARK publikigis deklaron kiu ĉagrenis multe la prezidenton Chávez kaj samtempe respondis, senvole, al multaj el niaj demandoj pri la rilatoj de Venezuelo kun la FARK. En ĝi ili plendis pri la aresto de "Granda" kaj kritikis la venezuelan registaron ĉar ĝi estis permesinta lian areston. Sen ironio kaj sen honto, la FARK asertis ke "Granda" estis en Venezuelo "kun la aprobo far la registaraj aŭtoritatoj", kaj ili petis al la registaro de Chávez "difini ĝian sintenon" pri la ebloj de la FARK por agi en tiu lando. La deklaro finiĝis per la peto de garantioj pri sekureco por la FARK en estontaj kunvenoj en Venezuelo.

Suferinte, fronte al la internacia maldekstrismo, tian publikan proteston, prezidento Chávez respondis bruske kaj ekigis veran krizon: li revokis por konsultoj la venezuelan ambasadoron en Bogoto; li translokis trupojn ĝis la landlimo kun Kolombio; en liaj paroladoj li juĝis la kapton de "Granda" kiel "malobservo de la [venezuela] suvereneco"; pri la okazintaĵo, la "imperisman" politikon de Usono li kulpigis, konduto kiu estis kutima en li. Fine, decidinte, almenaŭ laŭŝajne, ignori la enhavon de la deklaro de la FARK, Chávez neis ke sia registaro estis iam doninta rifuĝon al "Granda" aŭ al iu ajn alia terorisma ĉefo.

En parolado elsendita televide li postulis pardonpeton fare de nia registaro.

—Alie, sinjoro Prezidento, amiko mia, ĉi tio nur fariĝis la leĝo de la ĝangalo —li diris li sugeste.

Mi ne estis petonta pardonon pro leĝa ago de Kolombio, tamen mi ankaŭ ne volis kaŭzi nenecesan damaĝon al niaj rilatoj kun la Registaro de Venezuelo kaj ĝia popolo. Mi rifuzis partopreni en vorta milito: en la publikaj deklaroj mi nur faris koncizan raporton pri niaj agoj, kaj esprimis miajn esperojn por rapida kaj definitiva solvo.

—La problemo pri "Granda" ne estas kun Venezuelo, sed kun la FARK —mi diris—. Nia intereso kun Venezuelo estas havi rilaton konstruan kaj pozitivan.

En nova deklaro, la FARK "denuncis" la kapton de "Granda" kvazaŭ "kidnapo" kaj "serioza malobservo de la internacia leĝaro". Malgraŭ tio, ke mi estis kutimigita al la propagando de la FARK, ĉi-foje mi ne povis ne miri pri ilia hipokriteco: tia deklaro venis el organizaĵo kiu jaron post jaro kidnapis milojn da homoj, masakris civilulojn, ŝakris per narkotaĵoj, kaj evidente per multaj manieroj ĉiutage malobservis la leĝojn de Kolombio.

Dum ni serĉis vojon por mildigi la krizon, kelkaj personoj sugestis denove la tipan solvon: ke, kiel simbola gesto, mi petu la demision de la komandanto de la Nacia Polico kiu faris la procedon. Kaj ekzistis eĉ iu kiu diris ke la estroj de la Polico estis kiel la "fandajoj": kiam ili fandiĝas, estas la responso de la prezidento ŝanĝi ilin. Mi rifuzis fari tion, kaj mi asertis ke rimedo kiel tiu proponita subfosus la konfidon de nia sekuriga agentaro. Mi prenis la kontraŭan vojon: mi surprenis la tutan responson, mi gratulis la Policon, mi dankis la direktoron de la Institucio kaj serĉis alternativojn por normaligi la rilatojn. Mi ankaŭ telefonis gvidantojn en la regiono —inter ili la prezidentojn Luiz Inácio Lula da Silva el Brazilo kaj Alejandro Toledo el Peruo— por klarigi al ili la logikon de niaj agoj kaj peti ilian helpon por moderigi la alfronton.

Tamen prezidento Chávez daŭre pligravigis la krizon. Li ordonis la partan fermon de la landlimo, kio havis tujan kaj adversan efikon sur duflanka komerco. Tio estis forta bato por nia lando: Venezuelo estis nia dua plej granda komerca partnero, kaj niaj eksportoj estas riĉaj en homlaboro. La krizo en Venezuelo estis pli malgranda: ĝiaj eksportoj konsistis plejparte el krudmaterialoj kaj brulaĵoj devenintaj el nafto, kiuj povas esti venditaj al aliaj landoj kun relativa facileco. Iom da tempo poste mi lernis ke prezidento Chávez

deklaris ke li "genuigos prezidenton Uribe" per la restriko de la komerco. Mi tenis min firma: ni ne vendos kontraŭ mono niajn naciajn interesojn. Pluraj entreprenistaj grupoj esprimis sian apogon al nia registaro: ili sciis ke nia estonteca ekonomia prospero estis rekte rilata al nia kapablo venki la terorismon kaj ke decidi alion povus havigi ekonomian profiton kurta-tempe, tamen tio estos tre multekosta tra la tempopaso.

La 23-an de januaro, preskaŭ du monatojn post la kapto de "Granda", prezidento Chávez alvokis al manifestacio de dekoj da miloj da subtenantoj en Karakaso. Li aperis triumfanta meze de trumpetaj veksinaloj kaj diris ke la okazintaĵo de "Granda" estis "novaj imperiisma atako de Usono", ke ĝi "venis de Vaŝingtono kaj ne de Bogoto"; laŭ gazetaraj raportoj, li insultis eĉ la Usonan ŝtatsekretariinon Condoleezza Rice, nomante ŝin "analfabeto".

—Oni diris al mi, ke ŝi revas pri mi —Chávez diris al la homamaso.

Tiam, iuj komencis kanti:

—Chávez havas fianĉinon! Chávez havas fianĉinon!

—Ĉu mi devas proponi geedziĝon al ŝi? —Li demandis al la amaso ŝerce.

Neeeeee! —estis la respondo.

Por multaj politikaj analizistoj estis klare kial prezidento Chávez agis tiamaniere. La alfrontoj —kun Usono, kun mi aŭ kun aliaj landoj kaj mondaj gvidantoj— estis politika teatraĵo por kunvenigi lian bazon de apogantoj en Venezuelo kaj eksterlande. Mi komprenis tion, sed mi ne povis ignori la fundan problemon: la apogo al teroristoj estis ekstreme serioza. Ni ambaŭ estis prezidentoj kaj ekzistis multaj vivoj en risko.

La kazo "Ganda" plimalboniĝis dum la tempopaso kaj mi ne estis trovinta kiel solvi ĝin. Ĝis kiam unu nokto, post noktomezo, mia telefono sonis neatendite.

4

—Uribe?

—Ja.

—Aaaah! Mi sciis ke vi estas nedormanta. Vi estas nokta birdo kiel mi!

Estis la voĉo de Fidel Castro.

Prezidento Castro kaj mi rilatiĝis tre bone —kio surprizis kelkajn homojn—, kaj dum la lastaj jaroj ni estis parolintaj plurfoje. Malgraŭ niaj ideologiaj diferencoj, mi ĉiam traktis lin respektoplene kaj mi havas dankemon pro la sincereco de la mesaĝo kiun li sendis al mi per Gabriel García Márquez, en 1997, pri la veraj intencoj de la FARK dum la t.n. pacprocezo. Kelkajn jarojn antaŭe, dum nia unua renkontiĝo ni eltrovis ke ni kunhavis komunan pasion pri la plej intimaj detaloj de la naciĝado: kvankam ni alproksimiĝis al la temoj el malsamaj perspektivoj, ni ambaŭ estis studentoj pasiaj pri ĉio rilata al la politiko. En la jaro 2003, okaze de la ceremonio por enoficigo de la prezidanto Nicanor Duarte de Paragvajo, ni estis ĉe la sama tablo dum la tagmanĝo, kaj dum pluraj horoj ni entuziasme interŝanĝis ideojn pri temoj kiel kooperativoj de laktaĵo-produktantoj kaj la enorma potencialo de Kolombio por generi elektron. Tempon poste, la princo de Hispanio —kiu estis sidinta inter ni en tiu lunĉon— rememoris tiun interparolon kun perpleksa rideto:

—Gratulon —li diris—. La du homoj en la mondo kiuj havas pli da informo akumulita en siaj kapoj estas Fidel Castro kaj vi.

Tiun nokton de 2005, prezidanto Castro telefonis en karaktero de paciganto. Aŭdinte lian voĉon mi komprenis la gravecon de lia telefonaĵo: prezidento Chávez havis en li modelon imitindan, kaj lia influo en Venezuelo estis enorma.

Sed unue, Prezidanto Castro volis paroli pri historio. Li esprimis sian dumvivan intereson pri Kolombio —ne estis la unua fojo— kaj pri kiamaniere ĝi evoluis dum multaj jardekoj. Pro tiuj strangaj turniĝoj de la destino, Fidel Castro, kiam 21-jara junulo, ĉeestis en Bogoto en konferenco de latinamerikaj studentoj la tagon en kiu Jorge Eliécer Gaitán estis mortigita (1948), evento kiu deĉenigis la

fifaman ekleviĝon de "La Violento". Dek jarojn poste, kiam la nomo de Castro fariĝis diskonigata, tiu koincido nutris konspiro-teoriojn pri internacia komunisma komploto sed Kolombio ne estis komunisma en 1948 kaj, fine la historiistoj konkludis ke li ne havis partoprenon en tiu okazintaĵo. Tamen, tiu sperto markis lin, same kiel tion ofte faras la plej gravaj eventoj dum la junaĝo, kaj estis evidente, ke li ŝatis paroli kun iu kiu ne nur konis Kolombion, sed kiu ankaŭ studis detale grandan parton de lia verko.

—Prezidento Uribe —li diris— mi scias, ke en via junaĝo vi legis tion, kion mi skribis. Sed nun mi estas multe pli bona persono ol mi estis en tiu tempo!

Li ellasis unu el siaj elkoraj ridoj kaj parolis plue.

Sur la lito mi estis aŭskultanta lin dum Lina dormis apud mi. Li parolis dum pli ol tridek minutojn, haltante nur por demandi:

—Ĉu vi ankoraŭ estas tie, Uribe?

Ĝuste antaŭ tagiĝo li ekstraktis la motivon de lia telefonvoko. Li havis ideon por solvi la situacion: ni, ambaŭ partioj, devus koncentriĝi ne pri kio okazis, sed pri la estonteco, Venezuelo devontigu sin plibonigi la patroladon de siaj landlimoj, kaj Kolombio deklaru sian intencon ne plenumi alian procedon kiel tiu pri "Granda".

Mi havis kelkajn dubojn: ni ne devus nuligi niajn eblojn por la kazo ke ni eltrovos alian terorisman ĉefon kaŝita en iu ajn lando. Tamen mi pensis, ke post tiu okazaĵo, eble niaj najbaroj ne estus tre inklinaj al havigi rifuĝejon al la FARK.

En la fino, la propono de la prezidanto Castro malfermis la vojon al portempa solvo. Kelkajn tagojn post nia konversacio, Lina kaj mi ricevis en nia domo en Rionegro, sekretan viziton de du funkciuloj de la Registaro de Kubo: la Vicministro pri Eksteraj Rilatoj kaj la ambasadoro en Bogoto. Ili alportis leteron de prezidanto Castro, en kiu —per senmanka redakto— li priskribis detale la kadron por mildigi la krizon. Mi donis mian opinion al la kubanoj kaj la sekvintan tagon ili vojaĝis al Karakaso kun la respondo.

La 16-an de februaro, du monatojn post la aresto de "Granda", mi iris al Karakaso por renkontiĝo kun prezidento Chávez en la prezidenta palaco Miraflores. La celo estis montri al la mondo, ke la situacio inter niaj landoj revenis al normaleco. La venezuela ambasadoro revenis al Bogoto kaj la duflanka komerco

rekomenciĝis. En sia deklaro al la gazetaro, la venezuela prezidento diris ke ni "decidis turni la paĝon, por purigi la aferojn". Kaj plejparte li pravis.

Kun granda afableco prezidento Chávez montris al ni la prezidantan palacon kaj poste ni tagmanĝis en lia malgranda oficejo, akompanitaj far la venezuela vicprezidento José Vicente Rangel kaj Carolina Barco, la talenta ministrino pri Eksteraj Rilatoj de Kolombio. Mi ĉiam konsideris fundamenta la ĉeston de atestantoj ĉe konversacioj pri zorgindaj aferoj, tamen en tiu ĉi okazo la konversacio estis kiel babilado inter amikoj: la prezidento de la venezuelanoj parolis longe pri sia pasio por Simón Bolívar, kaj petis al mi helpon por konstrui pli bonan rilaton inter Venezuelo kaj la administracio de prezidento Bush. Ni parolis dum pli ol ses horoj. Kiam la konversacio ektemis pri la kazo "Granda", Chávez diris, preskaŭ pravigante sin:

—Mi ne protektas la grupon FARK. Tamen iuj el miaj sekvantoj simpatias kun ili, kaj mi ne povas fari ion pri tio. Bonvole komprenu Prezidento. Ne estas mia kulpo!

Tiun tagon mi eliris el Karakaso kun korfaciliĝo ĉar tiu tuta epizodo estis finita. Samtempe mi antaŭsentis ke ni estis baldaŭ traktontaj denove tiujn samajn problemojn. Mi pravis!

5

Proksime de la fino de mia unua mandato, la transformo de Kolombio estis nediskutebla: inter 2002 kaj 2006 la kidnapoj estis reduktiĝis per preskaŭ 80 procento —povas esti pli se ni konsideras neraportitajn kazojn— kaj la murdoj per 40 procento, krome, la ekonomio kreskis je sana ritmo. Tiam inter kolombianoj venis la demando, kiamaniere daŭri sur la vojo kiun ni malfermis. Post kvar jaroj mia prezidenteco estis alvenanta al sia finiĝo, kaj kvankam en la pasinteco la prezidenta reelektio estis permesita, la Konstitucio de 1991 malpermesis ĝin pro kurta-tempaj politikaj konsideroj.

La publika opinio pri la ebleco de reelektio estis evidenta: la opiniondoj montris ke la aprob-indico por mia prezidenteco estis supera al 70 procento, kaj ke preskaŭ du trionoj el la kolombia popolo estis favorantaj fari en la Konstitucio amendon kiu permesu mian kandidatecon por dua mandato. Alia kialo ludis rolon: ekde 1991 pluraj reformo-projektoj estis proponintaj la eblecon de prezidenta reelektio.

Mi estis konscia pri la danĝeroj kunportitaj de la koncentriĝo de potenco en unu sola homo kaj, samtempe, mi pensis ke necesis pli da tempo por firmigi la transformojn de niaj strategioj ekonomiaj kaj sekurecaj. Mi timis ke, same kiel okazis post miaj tri jaroj kiel reganto de Antjokio, ĉio atingita malaperos. Meze de miaj pripensoj, mi rememoris komenton de la alinomita Raúl Reyes en 2003: "La serioza problemo de Uribe estas ke restas nur tri jaroj por li kaj la FARK havas la tutan tempon en la mondo". Mi estis decidiĝinta ne permesi ke la FARK kaj ceteraj drogŝakristoj teroristoj haltigu siajn agojn ĝis kiam mia regado finiĝos, kaj tiam kontraŭataku kun renovigita vigleco. Mi kredis ke daŭrigi miajn strategiojn dum kvar jaroj pli estos katastrofo por ili.

Fine, la Kongreso aprobis la amendon kiu permesas la prezidantan reelekton, kaj la Konstitucia Tribunalo deklaris ĝin konforma al la Konstitucio. Estis enkondukita rigora Garantia Leĝaro, pri justa konkurenco, kun pluraj obligacioj kiuj devas esti obeataj far prezidento kiu kandidatiĝas por nova elekto. En 2006 mi kandidatiĝis denove por prezidento, kaj mi estis reelektita per pli ol 62 procento el la voĉdonoj, kvardek procentaj punktoj super mia plej proksima rivalo, Carlos Gaviria Díaz, mia antaŭa profesoro. La

granda diferenco estis sufiĉa por atingi alian superfortan venkon en la unua voĉdona raŭndo.

Jaroj poste, kiam oni demandis al Ingrid Betancourt pri kiam estis la plej malfacila momento por la FARK, ŝi diris, ke kiam la Kongreso kaj la Konstitucia Tribunalo decidis permesi la reelekton. Ili ne plu atendis, ke ni finos nian regadon: la nova kaj severa realaĵo estis pasonta kun granda rapido por la FARK.

6

Kun la tempo, la aresto de Rodrigo Granda montriĝis grava evento por Kolombio: la konitajoj de informiĝado kiujn ni atingis estis tre utilaj, kaj la ĉefoj de la FARK ne estos trankvilaj. Tamen la sekva granda progreso en nia lukto kontraŭ la drogŝakristoj teroristoj estis tiu kiu, retrospektive konsiderata, komencis la ĉenon de okazajoj kiuj estis ŝanĝontaj nian nacion por ĉiam. Ĝi estis ankaŭ multe pli kontentiga, parte pro la formo kaj loko kie ĝi okazis.

La Montoj de María, malalta montoĉeno kiu komenciĝas proksime de la kariba marbordo sude de Kartageno kaj etendiĝas proksimume 150 kilometrojn formante paralelon kun la marbordo, ĝi estas unu el la plej unikaj areoj de Kolombio. Tiu superriĉa loko, kun multaj avokadarboj kaj fekundaj kampoj, tra la tempo estis kultura kaj geografia kruciĝejo: rifuĝo por fuĝantaj sklavo dum la koloniaj tempoj; scenejo por la klopodoj de pluraj registaroj fari agraran reformon; fandujo por la artoj kiu estis produktinta elstaruloj kiel la kara kolombia muzikisto kaj komponisto Lucho Bermúdez.

Bedaŭrinde, la samaj trajtoj kiuj faris la Montojn de María riĉa kaj malavara, ankaŭ faris ilin surtera paradizo por la grupoj de drogŝakristoj teroristoj. Ekde la 1970-aj jaroj, ĉi tiu areo fariĝis koridoro por drogtrafiko inter la montoj proksimaj al Medeĝino kaj la Golfo Morrosquillo —kie freŝe procezita kokaino estis enŝipigata en rapidaj boatoj por alporto al Centrameriko, Karibiaj insuloj kaj aliaj malproksimaj destinejoj—. La marĉoj, veprejoj kaj ĝangaloj faris el tiu ĉi areo perfektan lokon por instali sekretajn tendarojn kie la teroristoj povis resti plurajn jarojn for de la "civilizacio". Kiam mi ekprenis la prezidentecon, la povo en la Montoj de María estis dividita egale inter kvazaŭarmeaj grupoj en la nordo, kaj la FARK kaj la NLA en la sudo. Riĉigitaj per drogtrafiko, ili puŝis la vastan plimulton de la tieaj malnovaj loĝantoj en mizeron malgraŭ la grandega fekundecon de la zono, la terkultura produktado kolapsis dum la agado de la armitaj grupoj estis kidnapi, ĉantaĝi, bloki vojojn kaj eldeveni milojn da sendefendaj kamparanoj forlasi siajn terenojn. Dume, la kolombia ŝtato apenaŭ kuraĝis eniri la Montojn de María. La sekureco, la vojoj, la lernejoj kaj la sanitara servo en la areo estis preskaŭ neekzistantaj.

Ni tiam eklaboris. Unu el miaj unuaj gravaj iniciatoj, efektivigita en septembro de 2002, estis krei "zonon de rehabilito kaj plifirmigo" en dek kvin municipoj de la Montoj de María. La Mararmea Infanterio kaj la Polico posteniĝis, amase, en la regiono. Ĉiun tagon, senmanke, mi telefonis al la komandantoj de la areo por lerni pri nia progreso. Mi petis al ili atenti pri la lastaj informoj rilate kidnapojn, mortigojn kaj aliajn krimojn en la areo, kaj mi aŭskultis iliajn komentojn kaj ĝeneralajn petojn. Mi ankaŭ regule telefonis al koloneloj, leŭtenantoj kaj ajna alia persono en la komando-ĉeno de por demandi siajn opiniojn pri la kondiĉoj de la loko. Ĉi tio kaŭzis iom da malkomforto en kelkaj armeaj ĉefoj, sed demandante la opiniojn de niaj viroj kaj virinoj en la tranĉeoj, mi klopodis akiri precizan bildon pri la atingita progreso kaj sendi klaran mesaĝon: neniu nivelo en la hierarkio estis sendevigota de rigora raporto pri siaj agoj.

La progreso okazis iom post iom, kun interrompoj kaj kun grandega homa kosto. En la unuaj jaroj, ni perdis en la Montoj de María kuraĝajn membrojn de nia sekuriga agentaro, kaj multaj estis viktimoj de la kontraŭhomaj minoj kiujn la FARK estis semintaj tra la tuta regiono. Tamen, la persisto donis fruktojn, kaj por la fino de 2004 nia armeo estis rekuperinta konsiderindan parton de la teritorio kaj regis preskaŭ ĉiujn vojojn, inkluzive la ĉefan vojon kiu kondukas al Kartageno. La teroristoj, kiuj dum jaroj cirkulis en luksaj kamionetoj ĉe plena taglumo, estis devigitaj enprofundiĝi en la ĝangalo kaj forkuri senĉese.

Samtempe ni iris antaŭen per aliaj "pli molaj" formoj de potenco. Per agrogramoj de infana nutrado, apogo al "komunumaj patrinoj" (iniciato komencita en la regperiodo de prezidento de Virgilio Barco), ĉiumonata salajro al patrinoj de junaj infanoj kaj la plifortigo de la ĉeesto de la kolombia Instituto por Familia Bonstato¹, ni pruvis al la civitanoj de la Montoj de María ke la kolombia Ŝtato revenis por resti. La investado komencis reveni al la regiono kaj, kiel signo de la devontiĝo de nia tuta registaro, ni faris tie plurajn el la ĉiusabataj Registara-Komunumaj Kunsidoj kaj kunvenoj de la sekureca konsilantaro malfermitaj al la publiko.

Kiam la loĝantoj sentis ke ili povis konfidi al ni kaj paroli kun la Polico sen riski esti mortigitaj, ili komencis raporti tre valorajn konitaĵojn por nia informiĝfako. Samtempe, la konstanta persekuto

1 NT "Instituto Colombiano de Bienestar Familiar" (ICBF).

far la sekuriga agentaro kaj nia Agprogramo por Malmobiliziĝo kaŭzis amasajn dizertojn el la neleĝaj grupoj, kaj kelkaj el la eksmembroj de tiuj organizaĵoj fariĝis informantoj por la Registaro. En 2005, la kvazaŭarmea unuo konita per la nomo "Herooj de la Montoj de Maria" demetis siajn armilojn, kaj du jarojn poste malintegriĝis la PRA¹, frakcio de la NLA responsa pri multaj kidnapoj en la regiono.

Montoj de Maria estis, en multaj sencoj, mikrokosmo de tio kion ni provis fari en la tuta lando. Kaj nia penado havis justan rekompencan: ni bonvenigis centmilojn da kolombianoj per la varma brakumo de la Ŝtato.

Ni ne sciis tiam ke alia nova venko estis proksima.

1 NT Popola Revolucia Armeo, hispane: "Ejército Revolucionario del Pueblo" (ERP).

7

Ĉiu kidnapo estas kruela, kaj tiu de Fernando Araújo —ĉarma politikisto kaj civila inĝeniero laŭ kariero— ne estis escepto.

Mallonge post li estis demisiinta kiel ministro pri Disvolvado de la Registaro de prezidento Andrés Pastrana, Fernando Araújo estis forrabita, la 4an de decembro de 2000, dum li trotis en Kartageno, sia hejmurbo. Li tuj fariĝis la "trofeo" plej valora de la FARK. Dum la unuaj sep monatoj de kaptiteco Araújo estis katenita al arbo kiel reprezalio —laŭ kion diris liaj kaptintoj— ĉar li provis rezistis al kidnapo. Kiam finfine ili demetis de li la katenojn, li estis submetita al kvin jaroj da izolado. Io plene malhumana. Ne estis aliaj ostaĝoj en la tendaro, kie li estis retenita, kaj estis malpermesite al li paroli al liaj provosoj —li povis alparoli al ili nur por peti permeson iri al la necesejo—. Tiu kondamno de soleca malliberigo daŭris 2.224 tagojn, periodo kiu, konsiderinte la cirkonstancojn, estas neimagebla.

Tamen, la FARK baldaŭ malkovris ke Araújo estis nevenkebla. Kiel ruza kaj eltrovema homo, li ne malhardiĝis iam ajn, kaj eble tio estis la kialo, mi suspektas, por ke la FARK trudis buŝostopilon al li: ili suspektis iel ke se li estis permesita paroli, liaj vortoj donus al li pasporton al la libereco. Kaj iusence, ili pravis.

Ekde la unuaj tagoj de sia kaptiteco, Araújo petis al la FARK permesi lin fari fojfoje videaĵojn kiel "pruvaĵoj pri supervivo", por informi sian familion, ke li ankoraŭ vivas kaj ke sia sano estis relative bona. Dum pluraj jaroj liaj kaptintoj rifuzis tion, tamen dum niaj militaj kampanjoj pliigis la premon sur la armitaj grupoj, ili ŝanĝis sian opinion.

Malfortigitaj kaj fuĝantaj, la FARK komencis taksi novajn manierojn por utiligi la plej valorajn "havaĵojn" kiuj restis al ili: Araújo, Ingrid Betancourt, tri usonaj kontraktintoj kaj dekoj da membroj de la kolombiaj Polico kaj Armeo. Per la livero de videaĵoj montrantaj la cirkonstancojn de la ostaĝoj, la FARK intencis manipuli la publikan opinion por pliigi premon sur nia registaro pro ke ni konsentus intertrakti pri interŝanĝo de ostaĝoj kontraŭ

malliberuloj en niaj prizonoj, kaj donu al ili la statuson de "militrajta¹ grupo".

Fine de 2005, la ostaĝigintoj diris al Araŭjo ke li verku skripton por lia unua pruvo pri supervivo post pluraj jaroj. La malneto estis submetota por aprobo far la "sekretariato" de la FARK, la grupo de sep personoj, kiuj gvidis tiun organizaĵon. Araŭjo taŭge redaktis sian skripton kaj baldaŭ poste ĝi estis aprobita. La 11-an de decembro, precize unu semajno post sia kvina datreveno en kaptiteco (kaj, hazarde, du tagojn antaŭ la kapto de "Granda" en Karakaso), Araŭjo povis fine paroli.

En la videajo li aspektis tre maldika tamen sana, li aperis vestita per blanka kaj pura ĉemizo pruntedonita far la FARK: en la pruvoj pri supervivo ili ĉiam intencis ke siaj ostaĝoj aspektu kiel eble plej puraj. Li sidis en seĝo sub verda flago de la FARK, dum tri teroristoj en uniformoj kaj kun sturmaj fusiloj staris malantaŭe kun severa mieno. Li havis verdan papagon sur sia ŝultro. Parolante malrapide sed forte, li instigis nian registaron por "montri la tutan necesan volon" por alveni al interkonsento pri interŝanĝo de malliberuloj kun la FARK. Ankaŭ, li certigis sian familion, ke li estis bone. "Al paĉjo kaj panjo, ke mi estas bone, ke mi tre amas ilin", li diris. Mi neniam vidis tiajn videajojn ĉar ili kaŭzis en mi grandan indignon, tamen, niaj informigaj agentejoj analizis detale ĉiun el liaj vortoj. Multe por mia bedaŭro, ili trovis tro malmultajn vortojn, kiuj estis interesaj. Kaj tial ni ĉiuj surpriziĝis kiam la familio Araŭjo kontaktis nin kaj diris ke en la videajo, la eksa ministro estis malkaŝinta la lokon, kie li estis.

Ili klarigis al ni ke Fernando kaj lia frato estis studentaj en la universitato kun viro el Ovejas —malgranda urbeto en la Montoj de Maria— kiu parolis per karakteriza maniero: li inklinitis preterlasi la posedajn pronomojn, kutimo kiun Fernando Araŭjo kaj aliaj tenere mokis. Dirinte "paĉjo kaj panjo" anstataŭ "mia patro kaj mia patrino" en la videajo, Araŭjo imitis la lingvaĵon de sia malnova kunulo kaj per tiu inĝenia maniero —kiun nur sia frato povus deĉifri— li komunikis lian situon.

Fernando Araŭjo estis en la Montoj de Maria.

1 NT Per "Militrajteco" mi nomas la statuson agnoskebla far la jura leĝaro, kiu en angla lingvo korespondas al "Belligerency" kaj en la hispana: "Beligerancia".

En la sekvaj monatoj ni signife pliigis nian militajn kaj vigladajn kampanjojn en tiu regiono. La t.n. fronto 37-a de la FARK, kiu havis sinjoron Araújo retenita, moviĝis senĉese por eviti la aeratakojn kaj raziojn far niaj trupoj. Siaflanke, Araújo faris ĉion eblan por aŭskulti iun ajn mesaĝon kiu estu sendita al li. Liaj kaptintoj permesis al li teni radioricevilon —lia sola reala kontakto kun la mondo— interŝanĝe kontraŭ ke li skribu resumojn de la novaĵoj por ke la regulaj membroj de la FARK povu pridiskuti gravajn temojn de la tago.

—Al ili plaĉegis ĉiuj novaĵoj pri terorismaj atakoj kontraŭ okcidentaj landoj —Araújo raportis post sia elliberiĝo— kaj ĉio kio rilatis al Hugo Chávez.

Unu nokton en septembro 2006, dum vi aŭskultis unu el la radioprogramoj en kiuj kolombiaj familioj parolas al siaj amatoj forrabitaj, Araújo aŭdis la mesaĝon kiun li estis atendinta:

—Paĉjo kaj Panjo tre bone —diris lia frato, kvazaŭ farante signon al li tra la radioondo— La gekuzoj Alfonso, María José, Guillermo kaj Ana María atendas pliajn novaĵojn el vi.

Ana María, la kuzino, estis la edzino de admiralo Guillermo Barrera, komandanto de la Nacia Mararmeo de Kolombio. Araújo sciis, do, ke sia mesaĝo estis komprenita kaj disemita far sia frato, kaj ke nia Armeo sciis kie li estis.

La signifo estis klara: ni estis irontaj por elliberigi lin.

8

Eltrovi la situon de Fernando Araŭjo ne estis la sola neatendita profito kiun ni akiris rekaptinte la regadon sur la Montoj de María.

Malmultaj urboj en la mondo estas tiel fascinaj kaj belaj kiel Kartageno: haveno fondita far hispanaj maristoj en 1533 kiu estis, dum jarcentoj, grava bastiono de la hispana imperio transmare. Lia kolonia centro, deklarita Monda Heredaĵo de UNESKO, estas karakterizita de siaj ŝtonpavimitaj stratoj, siaj balkonoj ornamitaj per bugenviloj ruĝaj kaj rozkoloraj, kaj de siaj imponaj preĝejoj kaj muzeoj el kiuj videblas la Kariba Maro. La malnova urboparto estas ĉirkaŭita de muregoj el ŝtono dek du kilometrojn longaj. Ĝia arkitekturo estas dokumento pri kiel estis la vivo en la hispanaj kolonioj dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj. Poste, la enmigrado de italoj, judoj, francoj kaj libananoj donis al ĝi kosmopolitan karakteron, farinte ĝin multe pli vibra kaj unika.

Tamen, ekde la 1990-aj jaroj, estis malmultaj la eksterlandanoj kaj kolombianoj kiuj vizitis Kartagenon. Kaj kvankam ĝi havis la reputacion esti unu el la plej sekuraj urboj de Kolombio, al la responsuloj pri turismo-stimulado ĝi ne ŝajnis sufiĉe sekura. Efektive, dum la 1990-aj jaroj kaj komence de 2000, okazis pluraj terorismaj atakoj ene de la urbo kiuj kaptis la atenton de la amaskomunikiloj: unu frustrita atako far la FARK per bombo antaŭ la vizito de la usona prezidento Bill Clinton kaj la kidnapo de Fernando Araŭjo en ĝiaj stratoj (ambaŭ en la jaro 2000); en aŭgusto de 2002 —nur du tagojn antaŭ mia enoficigo—, la sidejo de la departementestro estis atakita per eksplodadoj.

La problemaro de Kartageno estis la simbolo de nacia problemo: dum multaj jaroj la eksterlandaj vizitantoj estis evitinte Kolombion en siaj turismaj kaj negocaj vojaĝoj, Kelkaj internaciaj asekuraj kompanioj rifuzis kovri la riskojn de vojaĝo al nia lando; la plej gravaj eldonejoj de gvidilibroj por vojaĝantoj —kiel Fodor's kaj Frommer's— ne temis pri ĝi en siaj eldonaĵoj.

Ni estis decidiĝintaj venigi eksterlandanojn al Kolombio por ke ili ĝuu ĝian belecon, kaj investu. Tiu estis unu el miaj obsedoj, do ni decidis fiksi kelkajn specifajn kaj aŭdacajn celojn. Mi entreprenis

personan mision por konvinki la grandajn kompaniojn de turismaj krozadoj kiel Royal Caribbean reveni al Kartageno.

La krozadoj estas formo de turismo aparte lukra. Kvankam, kutime, la pasaĝeroj de la ŝipoj ne restas tranokte en la urbo, centoj aŭ eĉ miloj da turistoj restas en ĝi dum la tago, ili iras al restoracioj, ili aĉetas memorigaĵojn kaj elspezas sian monon per aliaj manieroj. Niaj datumoj montris, ke ĉiu pasaĝero de krozado povas elspezi inter 100 kaj 150 dolarojn ĉiutage dum ili estas en Kartageno. La pasaĝeroj de krozadoj estis ankaŭ, ĝenerale, pli konservativaj por elekti turismajn destinejojn ol multaj aliaj turistoj, kaj siaj risk-toleremoj estis malaltaj.

Komence de nia regado ni sciis ke ni ne povis atingi tiun celon, ĉar la situacio rilate sekurecon ne permesis tion. Je 2004, tamen, ni estis farintaj signifan progreson en Kartageno, inter aliaj kialoj, ĉar ni reakiris la regadon en la Montoj de María, sude de la urbo. Multaj el la deliktuloj kiuj terurigis Kartagenon dum la antaŭa jardeko venis el tiuj montoj por delikti kaj reiris tien farinte siajn fiaĵojn, for de la atingopovo de la aŭtoritatoj. Kiam ni atingis la regadon sur la vojoj kiuj eliras kaj alvenas al ĉi tiu areo, la deliktoj plejparte ĉesis. Tio estis alia ekzemplo de la multiplikanta efiko de nia sekurecaj strategioj.

Luis Alberto Moreno, nia ambasadoro en Usono, aranĝis kunvenon kun altaj oficistoj de la industrio de turismaj krozadoj. Mi vojaĝis al Miamo kaj rakontis nian historion. Ili diris, ke nia progreso ŝajnis impona. Baldaŭ poste, reprezentantino de la industrio de turismaj krozadoj —Michelle Paige, Ĉefa Afergvida Oficistino de la Asocio Florida Caribbean Cruise— venis por rigardi la novan Kolombion.

Nia registaro pretis fari ĉion necesan por krei la kondiĉojn kiuj permesu altiri novajn investantojn por, tiele, krei laborpostenojn kaj levi la vivnivelon de la kolombianoj. Tiom grava estis la redistribuo de riĉeco kiom ĝia kreado; per la stimuloj estis kreita plia riĉeco kiu ŝargita per novaj impostoj permesis pli da sekureco kaj da socialaj agprogramoj. Kaj ne nur turismo havis grandegan kresko-kapablon, ankaŭ aliaj sektoroj kiel: la produktado de komputila programaro, la biobrulaĵoj, la kuraco-cela turismo, la fabrikado de medikamentoj kaj kosmetikaĵoj kaj la subkontraktado de entreprenaj procezoj, inter aliaj, estus ŝlosilaj por la estonteco de Kolombio se ni povus konstrui la konfidon kaj trovi la taŭgajn investantojn.

Mi establis regulon kun Alicia Arango —privata sekretariino de la prezidenta oficejo, inteligenta, lojala kaj tre diligenta—: ĉiuj fremdaj investantoj kiuj alvenis al Bogoto devas kunveni kun mi ĉe la Prezidenta Palaco. Samtempe, ni kreis datumbazon pri la investantoj por spuri iliajn aktivecojn tra la tempo kaj resti en kontakto kun ili antaŭ kaj post kiam ili faras siajn investojn. Same kiel veras pri aliaj aferoj, spurado estas absolute ŝlosila.

En la plimultaj kazoj, la progresoj pri sekureco estis la gvidmotivo kiu alportis investantojn reen al Kolombio. Tamen ni sciis ke tio ne estis sufiĉa: kvankam la sekureco ekvilibrigis la regulojn de konkurenco kun aliaj sojlojlandoj, ĝi sola faris nenion por krei konkurajn avantaĝojn. Sub la direktado de la tri sinsekvaj ministroj pri Financoj —Roberto Junguito, Alberto Carrasquilla kaj Óscar Iván Zuluaga— kaj kun la apogo de gvidantoj kiel Jorge Humberto Botero kaj Luis Guillermo Plata —niaj sinsekvaj ministroj pri Komerco, Industrio kaj Turismo—, ni faris aŭdacajn paŝojn por ke nia ekonomio estu pli alloga por investantoj. Ekde la unua jaro de nia registaro ni enkondukis, por investoj en produktivaj aktivoj, ĝeneralajn kaj sektorajn stimulojn rilate al impostoj. En la lando, en procezo de integriĝo en la mondan ekonomion, la investado en teknologio kiu kapabligas por konkurado estas esenca por generi laborpostenojn bonkvalitajn kaj kun apartenigo al sanasekuro.

Cele plifortigi la konfidon por investado, estis aprobita leĝo kiu permesas al la registaro subskribi kun investantoj paktojn pri dudek-jara stabileco.

Ni laboris por la sekureco, la investado kaj la sociala politiko. Tamen, necesis aŭstera Ŝtato, tio estas: malpli multekosta, malpli burokrata, pli engaĝiginta kun la civitanoj kaj pli efika. Tial ni reformis pli ol 460 ŝtatajn organizaĵojn.

Mi neniam pensis ke kun la erara radikala maldekstrismo kiel obstaklo, ni estis irontaj el lando kondamnita produkti malpli ol 250.000 barelojn da nafto ĉiutage, al la aplaŭdita Kolombio kiu direktiĝas al du milionoj da bareloj. Estis fundamente reformi la nafto-kompanion Ecopetrol —danke al la kuraĝo de la ministroj kaj la prezidantoj de la kompanio kiel Isaac Yanovich—. Ĝia labora kaj pensia strukturo estis modifita. Ĝi estis malfermita por privata kapitaligo de 20 procentoj, kio per demokratia kaj ĝojiga procezo, permesis al preskaŭ duona miliono da kolombianoj aĉeti akciojn.

La risiko de nepopulareco ne kondukis nin al rifuzi iun necesan reformon. Nur mankis tiuj reformoj, por kiuj ni ne havis sufiĉan tempon. Ni aplikis nian maksimumon pri ne fari demagogion, sed ja subteni permanentan pedagogian dialogon kun la civitanoj, kio permesis enkonduki reformojn sen granda populara malakcepto.

Tamen tiuj reformoj, kun rezultoj en la longa limtempo, ne deturnis nin de nia tuja celo. Kiam Michelle Paige venis al Kolombio, la ministro Luis Guillermo Plata renkontiĝis kun ŝi en Kartageno. La sekvan tagon mi aliĝis al ili kaj ni vojaĝis en la prezidenta aviadilo al Sankta Andreo, en la bela kolombia karibia insularo kaj potenciala destinejo de turismaj kruzadoj. La ministro Plata informis al mi ke sinjorino Paige ne montris interesiĝon pri Kolombio sed ke dum vespermanĝo, la ĵus pasintan nokton, ŝi parolis emocie pri ĉevaloj, kaj pri sia identiĝo kun mi rilate la amon al tiuj bestoj. Dumfluge mi faris komenton pri ĉevaloj kaj la sinjorino ŝanĝis sian seriozan mienon en emociion. Mi diris al ŝi, ke la ĉevaloj ne akceptas molestadon aŭ kaĵoladon, ke ili, same al la politikisto, postulas plenan ekvilibron. Post la irado tra la ĉefa insulo Sankta Andreo, denove en la aviadilo, mi reprenis a temon de ĉevaloj kaj ŝi esprimis al mi sian deziron koni unu kolombian kreolan ĉevalon.

Por la Patrujo neniu penado estas tro granda, mi pensis. Mi petis al la pilotoj ke antaŭ ol alveni al Bogoto, ni surteriĝu en Rionegro. Mi havis la reflekseblan regulon ne uzi la prezidantan aviadilon por personaj aŭ distraĵ celoj, sed tiu ĉi afero ekzistis intereso por la lando.

La aviadilo surteriĝis en Rionegro kaj ni direktis nin al la hejmo de nia familio; la hejmo estis fermita. Ni sukcesis akiri iujn tipajn manĝaĵojn en najbaraj restoracioj. Mi proponis al vizitantoj grivojn kaj maizpanojn, kaj mi servis al ili trinkaĵon el brando. Mi timas trinki likvoron, sed mi ne estas malbona aĉetanto nek malbona gastiganto. Mi tiris el la stalo la ĉevalon Juguete¹, malgranda ĉevalo malhelkolora de delikata paso. Mi rajdis ĝin sensele kaj tiel mi elmontris ĝin.

Poste ni ree pritraktis la turismajn kruzadojn kaj mi devontigis min kunordigi persone la sekurecon por la surteriĝo de la turistoj de kruzadoj en Kartageno, Sankta Andreo kaj Sankta Marta.

1 NT Nomo kiu hispanlingve signifas "ludilo".

Mi ricevis la impreson, ke la animstato de S-ino Paige jam ekestis favora por inkludi Kolombion kiel haltejo de turismaj krozadoj.

Poste tio, sinjorino Paige invitis nin al insulo St. Kitts por kunveni kun pluraj altaj kadruloj de la industrio de turismaj krozadoj. Unu el ili estis Richard Fein, Ĉefa Afergvida Oficisto de Royal Caribbean Cruises. Fine de la kunveno ni sukcesis atingi ke Royal Caribbean revenu al Kartageno. Aliaj kompanioj baldaŭ sekvis tiun ekzemplon. La palpeblaj atingoj en nia strategio pri sekureco, la emfazo kiun ni metis pri la graveco kiun havis ilia negoco por ni, kaj la pruvo —senpera— pri la klopodoj faritaj de nia registaro por ricevi pli da investantoj, estis definitivaj.

Je la fino de nia prezidenteco, kaj dum la sekureco montris signifan pliboniĝon, ni lanĉis novan reklamadan kampanjon por turismo al Kolombio: "La sola risiko estas voli resti". La nombro de fremdaj vizitantoj —turistoj kaj entreprenistoj— leviĝis de 1,1 milionoj en 2002 al 1,9 milionoj en 2006, kaj al preskaŭ 2,8 milionoj en 2010, pliiĝo de 154 procento. Ni starigis la celon plibonigi la pozicion de Kolombio en *Doing Business*, la ĉiujara enketo de la Monda Banko kiu rangigas la landojn laŭ diversaj faktoroj: el la simpleco de ties imposta sistemo al ties komerca malfermeco. Ĉe la fino de nia regado, Kolombio estis la unua latinamerika lando en la listo kaj ni okupis la tridek sepan lokon inter 183 landoj, antaŭe de Hispanio, Portugalio kaj Tajvano. La senpera investado el eksterlando pliiĝis el mezumo de preskaŭ du miliardoj da dolaroj ĉiujare antaŭ nia prezidenteco, al pli ol ok miliardoj en la lastaj jaroj de nia registaro. Eĉ pli grave: la enlanda investado kreskis el dek miliardoj en 2002 al proksimume kvindek sep miliardoj en 2010.

Mi plenumis mian promeson al sinjorino Paige: mi fariĝis responsa pri la sekureco de turistoj kiuj revenis al Kartageno kaj al aliaj turismindaj lokoj kiel la montaro Sierra Nevada, la Pacifika Marbordo kaj Medeĝino. Kiam Kartageno gastigis la Jaran Kongreson de la Monda Organizaĵo pri Turismo, en 2007, mi faris la ĉefteman paroladon kaj sciigis la numeron de mia poŝtelefono al la 2.000 kongresanoj, invitante ilin telefoni min se ili havus problemon. La solaj telefonvokoj kiuj alvenis estis de delegitoj kiuj volis esprimi sian dankemon.

En decembro de 2009, tri turismaj krozoŝipoj alvenis la saman tagon al Kartageno kun pli ol 10.000 vizitantoj, plejparte eksterlandanoj. Ekde la kvara horo frumatena mi komencis

telefonvoki la direktoron de la Polico kaj la tiean urbestron kaj petis ilin sendi al mi periode ĝisdatigitajn informojn pri la sekureco. Kiam noktigis, kaj la plimulto el la pasaĝeroj estis denove en siaj ŝipoj, ni ricevis plendon el paro da germaninoj ĉagrenitaj ĉar ili estis trude devigitaj pagi 50 dolarojn por havi siajn hararojn plektitaj. La Polico enketis la plendon. Tamen estis evidente, ke ni travivis situacion tre malsama al tiu de nur naŭ jarojn antaŭe, kiam la homoj estis forrabitaj en la stratoj de Kartageno kaj portitaj al la ĝangalo, kie ili estis restigitaj dum multaj jaroj.

9

Mi urĝis senĉese la Militfortojn fari ĉion kion ili povis por elliberigi sinjoron Fernando Araŭjo kaj ĉiujn ostaĝojn. En miaj ĉiutagaj konversacioj kun la komandantoj, mi ĉiam demandis pri Araŭjo kaj ĉu ili sciis ion pli pri la loko kie li estis. Tamen por kialoj kiuj ne estis tute klaraj tiutempe, la serĉado de Araŭjo estis aparte problema. En la unuaj jaroj de lia ostaĝeco ni lanĉis plurajn operacojn por elliberigi lin, kaj kiam ni alvenis, la FARK estis jam foririntaj aŭ atendintaj por embuski kontraŭ niaj trupoj. Ŝajne, ili sciis ĝuste la momenton kiam ni estis alvenontaj kaj per kiu rimedo.

Dume, ni ne fermis la pordojn al solvo atingita en interkonsento por la liberigo de la ostaĝoj. La 14-an de decembro de 2005 —tri tagojn antaŭ ol la FARK liveris la pruvojn pri supervivo de Araŭjo — ni formale akceptis proponon por interparoloj, prezentita far perantoj el Francio, Hispanio kaj Svislando. La internacia delegitaro proponis ke ni senarmeigu 180 kvadratajn kilometrojn ĉirkaŭ El Retiro, vilaĝo en sudorienta Kolombio, por loĝigi formalajn intertraktadojn. La deklarita celo estis atingi interkonsenton laŭ kiu la FARK liberigus S-ron Araŭjo, S-inon Ingrid Betancourt kaj aliajn kvindek ostaĝojn, kaj nia registaro konsiderus liberigi proksimume 500 membrojn de la FARK kiuj estis en niaj malliberejoj, kondiĉe nur ke ĉi tiuj forlasu la grupon kaj ke ili aŭ iru loĝi en alia lando aŭ akceptu partopreni en unu el niaj agprogramoj de resocianigo.

La eblo de ĉi tiu interkonsento surprizis tiujn kiuj konsideris nian registaron kiel de "malmola linio", maltre aŭ neniom inklina intertrakti. Ne estis tiel: ni ĉiam deklaris nian volon paroli kun la FARK sub certaj kondiĉoj; tio kion ni ne povis iuokaze toleri estis senarmeigita zono simila al tia ekzistinta en Caguán dum la antaŭa registaro kaj kiu utilis al tiu grupo por rekonstrui ties militan kapablon dum ili ŝajnis esti interesiĝintaj pri la paco.

Ĉi nova propono inkludis la retiriĝon de la armitaj fortoj kaj de la aktivuloj de FARK el relative malgranda kaj maldense popolita areo. Kaj kvankam ni pensis ke la kolombia Ŝtato devas senĉese pligrandigi sian kovradon anstataŭ redukti ĝin, ni pretis provi: ni metis niajn objektojn flanken kaj donis prioritaton al la vivoj de la

ostaĝoj. La internaciaj perantoj certigis al ni ke sia propono havis bonan ŝancon de sukceso.

—Mi konfesas ke tio ĉi estas koncedo fare de nia registaro —mi diris ĉe ĵurnalistara intervjuo la 14-an de decembro—. Sed ni faras tion ĉar ni komprenas la angoron, la doloron kaj la suferon de tiom multaj kolombianoj kies parencoj estas ostaĝigitaj.

Nia konsento havis tujan kaj entuziasman aprobon de multaj familioj de la ostaĝoj. La patrino de Ingrid Betancourt diris:

—[Uribe] prenis gravan paŝon, kaj ni esperas, ke la ribeluloj faru la samon.

Kiam la momento de realiĝo alvenis, la FARK montris, refoje, siajn verajn intencojn. Por la seniluziigo de la internacia delegitaro kaj de ni, dum du tagoj la FARK silentis, sed la 16-an de decembro ili respondis kiel ili kutimis: ili lanĉis gravan ofensivon en la nordoriento de la lando, proksime de la landlimo kun Venezuelo. Rezulto el tio estis la kidnapo de tri civiluloj en la ĉirkaŭaĵo de la municipo Sardinata, la bruligo de busoj kaj kamionoj sur la vojo kondukanta al la municipo Durania, kaj la dissaltigo de elektrodistribujaj latis-mastoj kio lasis pli ol 300.000 personoj sen elektro. Tamen, ilia respondo tiame ne estis finiĝinta: la 17-an de decembro ili atakis armean postenon proksime de la landlimo kun Panamo: tiel ili mortigis ok policanojn kaj forrabis aliajn dudek naŭ; Reuters priskribis la atakon kiel "unu el la plej grandaj batoj kontraŭ la sekurigaj fortoj en pluraj jaroj". Dek tagojn poste, en la Nacia Natura Parko La Macarena¹ —situanta en la departemento Metao², 200 kilometrojn sude de Bogoto—, ĉirkaŭ 300 gerilistoj de la FARK embuskis kontraŭ armea taĉmento kiu estis elradikiginta la ununuraĵon kio interesis ilin: iliaj kultivaĵoj de kokao; dudek naŭ soldatoj estis mortigitaj kaj Reuters denove konsideris tiun atakon kiel "la plej malmola bato kontraŭ la armeanoj en pluraj jaroj". Ni vojaĝis tuj al la scenejo de la tragedio kaj ni promesis reveni post kelkaj semajnoj por kontroli la manan elradikigon de la kultivaĵoj de kokao, devontigo plenumita.

Finfine, la 30-an de decembro de 2005 la FARK oficiale konfirmis tion, kio estis jam klara: ili ne havis intereson pri la interparoloj. Mensoge, ili deklaris ke ili neniam ricevis la proponon de la internaciaj perantoj kaj la alinomita Raúl Reyes, la dua en komando

1 NT Elparolu: [makarEna](#).

2 NT Hispanlingve "[Meta](#)".

sur tiu grupo, diris ke ili neniam akceptos interŝanĝon de ostaĝoj dum mi estas prezidento. Tio estis provo klara, cinika kaj senutila por influi la elektojn de la sekvinta jaro.

Spite tiujn malsukcesojn, ni ne kapitulacis. Dek monatojn poste ni akceptis alian provon por komenci interparolojn.

En oktobro de 2006, baldaŭ post mia prezidenta reelekto, denove ni proponis retiri niajn trupojn el la areo ĉirkaŭ Florida kaj Pradera, du municipoj en sudorienta Kolombio, kun la celo krei "koridoron" por ke la FARK liberigu la ostaĝojn. Ankaŭ tiu ĉi propono estis farita de la Eŭropaj intertraktantoj, kiuj certigis al ni ke la FARK estis konsentintaj liberigi almenaŭ unu ostaĝon. Ni malfermis la koridoron, tamen neniu alvenis, kaj kelkajn tagojn poste unu teroristo de la FARK vestita kvazaŭ oficiro de la Mararmeo eksplodigis kamionon kontraŭ armea lernejo en la nordo de Bogoto. La bombo vundis dek personojn kaj devigis la evakuadon de pli ol 2.000 studentoj.

Ni estis indignoplenaj. Fojon post fojo la FARK trouzis nian bonan fidon. Ili montris, ankaŭ, ke ajnan proponon de kompromiso ili interpretos kiel signo de malforteco kaj, sekve, ili utiligos ĝin por fortigi sian kriman potencon. Estis evidente, do, ke ili ne havis veran interesiĝon pri la intertraktadoj. La tagon post la atako kontraŭ la armea lernejo, ni deklaris la neebulon malfermi intertraktadojn kun la FARK por ebla interŝanĝo de ostaĝoj por prizonuloj.

—Ni ne povas daŭrigi la farson —mi deklaris.

Iom poste ni antaŭeniris kun nova plano por la milita elliberigo de Fernando Araújo.

10

Ricevinte lian inĝenian pruvajon pri supervivo, ni serĉis S-ron Araŭjo en la veprejoj kaj en la marĉoj de la Montoj de Maria dum proksimume unu jaro. Ni instalis kaŝitajn mikrofonojn kaj aliajn altteknikajn ekipaĵojn por spuri la movadojn de la 37-a fronto de la FARK. Tamen, kiel ofte okazas, la perhoma informiĝado estis fine kio permesis al ni nin lokalizi lian troviĝejon: unu informanto diris al ni ke Araujo estis en la areo nomita Aromeras¹ Norda, en tendaro sub la gardado de proksimume 200 viroj. Ni devus agi tre rapide, ĉar ni sciis ke kiam la FARK estis sub granda premo, ili ne restis longe en la sama tendaro.

Estis tempo por telefoni S-ron Alberto Araŭjo Merlano, patro de la eksa ministro, por informi lin, ke ni estis baldaŭ entreprenontaj militan elliberigon.

Ni preparis la operacon por la Novjara Tago de 2007. Dum ni estis precizigantaj la detalojn, la ombro de la masakro en Urrao, en la jaro 2003, ŝvebis super ni. Ni faris ĉion en nia povo cele ne ripeti tian tragedion kaj superi la grupon FARK per nombro de trupoj kaj deplojo de fortoj: ĉirkaŭ 1.800 membroj de la Nacia Mararmeo, la Aera Forto, la Armeo kaj la kolombia Polico estis partoprenontaj en tiu ĉi misio. Dudek-kvar-oble da viroj ol tiuj, kiuj estis deplojitaj en Urrao, ili estis apogotaj far pluraj helikopteroj Black Hawk, far unu komanditaro el la Mararmeo kaj far pluraj aviadiloj. Kiel antaŭzorga rimedo, ni planis pliigi la oftecon de helikopteraj flugoj en la areo dum kelkaj tagoj antaŭ la operaco, tiel ke la FARK kutimiĝu al ilia ĉesto kaj, tiamaniere, eviti la konfuzon kiu kondukis al la murdo de Gaviria, Echeverri kaj aliaj ostaĝoj. Ni pretigis ankaŭ specialan teamon de longdistancaj kaŝpafistoj, kiu celis alproksimiĝi al la tendaro kaj malaktivigi la gardistojn de Araŭjo en la komenca fazo de la rekupero.

Unu tagon antaŭ la rekupera operaco, mi estis en la flughaveno en Rionegro, ni estis vojaĝontaj por pasigi la 31—an de decembro en Bojayá, la malgranda vilaĝo kies preĝejo estis detruita far la FARK en 2002, mortigante 119 civilulojn, inkluzive multajn infanojn. Post la atako, la vilaĝo restis detruita kaj ni estis farinta prioritaton el ĝia

1 NT Loknomo kiu devenas de arbusto tiea nomata “aromo”.

rekonstruo, kiel parto de nia devontigo favore al la plej agresitaj areoj de Kolombio. Ni estis atendantaj ke la malbona vetero finiĝu por eniri en la helikopteron kiam Juan Manuel Santos, la nova ministro pri Defendado, diris ke li devis paroli kun mi urĝe. Ekaperis komplikajo: per raportoj el informiĝado ni eksciis ke la taĉmento de la FARK kiu estis reteninta S-ron Araŭjo estis pretiĝanta por iri aliloken, probable tiun saman vesperon, kaj se ni ne komencus la rekuperan operacon dudek kvar horojn antaŭ ol la planita momento, ni estus elmetonta nin —kiel avertis la Generalo Freddy Padilla— al la risko de malsukceso. Aliflanke, Santos pludiris, kelkaj el la lastminutaj preparoj —inkluzive de la alveno de la speciala teamo de kaŝpafistoj— ankoraŭ ne estis kompletigita.

Mi kunvenigis aliajn altajn oficistojn kaj mi petis iliajn opiniojn pri kiel ni devus procedi. La plimulto rekomendis haltigi la provon de rekupero. Estis nedubinde, ke la fantomoj de Urrao ĉeestis en iliaj memoroj. Tamen, mi estis sekvinta deproksime la progreson de niaj Armitaj Fortoj dum la lastaj kvar jaroj, kaj mi bone sciis la grandajn progresojn kiuj ili estis farintaj en temoj kiel preparado, pafpovo kaj specialaj operacoj. Samtempe mi pensis pri la kvin jaroj kiujn ni malfruiĝis por atingi konkretajn spurojn pri la situo de Araŭjo, kaj pri la fiaskaj provoj por diskuti intertraktan bazon kun la FARK, fiaskaj provoj kiuj montris ke tiu ĉi grupo neniam propravole liberigos la ostaĝojn kiuj laŭ sia opinio estis altvaloraj. Mi ne hezitis por fari la decidon. Mi turnis min kaj rigardis la Generalon Padilla:

—Procedu —mi diris—. Procedu sub mia responso.

11

Matene, iomete post la deka horo, mi telefonis S-ron Alberto Araújo Merlano por informi lin, ke nia provo por elliberigi sian filon estis tiumomente okazigata, unu tagon pli frue ol planite.

—La helikopteroj estis jam dudek minutojn en la aero —mi diris al li—. Ni ĉiuj estas preĝante por atingi bonan rezulton.

Mi sentis la doloron de S-ro Alberto tra la telefono, lian konflikton inter stoika patrioto kaj afliktita patro. Li dankis min per mallongaj kaj prudentaj vortoj, kaj li diris ke li atendos la rezulton de la operaco.

Dum granda parto de la mateno ni ne sciis multe pri la okazaĵoj: pro la difektiĝema ĉela telefonservo en Bojayá, nia sola komunikilo estis satelita telefono. Tamen, antaŭ la matenfiniĝo ni ricevis novaĵojn: la helikopteroj lanĉis raketon por perturbi la teroristojn kaj sekundojn poste la soldatoj sturmis la tendaron. Poste ni ricevis la raporton pri viktimoj kaj, fine, la raporton el la komandantoj en la loko:

La tendaro estis sekurigita, tamen Araújo estis nenie.

12

Pluraj el la posedaĵoj de Araŭjo estis trovitaj en la tendaro: pruvo pri lia tiea ĉeesto en la momento de la sturmo. Sed ni ne sciis certe kio okazis: Ĉu li eskapis meze de la konfuzo dum la operaco?, ĉu la FARK sukcesis eskapi kun li?, ĉu lin ili murdis kaj kaŝis lian korpon? Ni ne havis kialon por forjeti iun el tiuj ebloj. Estis malaperinta ankaŭ Gustavo Rueda Díaz, alinomita "Martín Caballero"¹, ĉefo de la roto de la FARK, kies posedojn kaj la senviva korpo de sia partnerino konfirmis ke ankaŭ li estis en la tendaro en la momento de la armea sturmo. Ĉu li forkuris en la ĝangalon kune kun sia valora ostaĝo?

Ni faris la ununuraĵon kiun ni povis fari: entrepreni amasan serĉadon. Per miloj da soldatoj ni ĉirkaŭbaris la areon najbara de la tendaro. Poste ni provis streĉi la sieĝon kun la espero trovi S-ron Araŭjo. Ni sciis ke tio estis kuro kontraŭ la tempo: se li estis eskapinta, la FARK persekutos lin tiel urĝe kiel ni.

Pasis unu tago, poste du, tri, kaj kvar. Ni ne perdis la esperon, tamen la homa ofero de la operaco pliiĝis: Tayron Almanza Martínez, unu el niaj kuraĝaj infanterianoj de la Mararmeo, estis mortigita kaj du soldatoj estis vunditaj.

Plurfoje ĉiutage mi telefonis la patron de Araŭjo por certigi lin ke ni estis farante ĉion en nia povo por trovi lian filon. Tiuj telefonvokoj rompis mian koron. Nur li sciis pri la procedoj kiujn ni faris. Gardinte la sekreton pri la operaco, ni fidis, ke la FARK kredis ke la afero koncernis unu plian rastadon far la Armeo. Danke al la disciplino de la Armitaj Fortoj kaj de la intima rondo ĉirkaŭ mi, ni sukcesis eviti ke la gazetaro eksci.

Tra la komandantoj, kiuj estis en la areo, mi sekvadis la movojn de la trupoj tage kaj nokte. Mi volis esti certa, ke neniuj breĉoj ekzistis en la gardistara ringo de nia sekuriga agentaro. Mi esprimis mian plenan konfidon en iliaj kapabloj, kaj mi petis al ili informi min tuj kiam ili havos iun novaĵon, ĉu bonan ĉu malbonan.

1 [NT Elparolu: martin kabaĝero.](#)

Dum kvin tagoj mi preĝis por ke tiu bona homo, tiu simbolo de ĉio kio estis bona kaj fortika de Kolombio, havu la ruzecon kaj la rimedojn por trovi sian vojon al la libereco.

13

Dum la jaroj de kaptiteco Fernando Araújo disvolvis planon por eskapo. Li estis certa ke en iu momento li devus fuĝi el siaj kidnapintoj aŭ esti mortigita far ili. Li sciis per la radio kaj laŭ la parolado inter siaj kaptintoj ke la FARK ekzekutas siajn ostaĝojn antaŭ ol toleri ke iu elliberigus ilin. Li sciis la detalojn de la masakro en Urrao, kaj ankaŭ la kazon de la S-ino Consuelo Araújo Noguera (kun kiu li havis neniun parencecon), eksa ministrino pri Kulturo forrabita far la FARK en 2001 kaj mortigita per du kugloj en la kapo kiam ŝi ne povis sekvi la piediradon de siaj murdontoj. Tial, aŭdinte per radioaparato la koditan mesaĝon de sia frato, Fernando Araújo komprenis ke sia rekupero eblis kaj li intensigis sian fizikan kaj mensan preparadon: li sciis, ke neniua ostaĝo iam sukcesis eskapi el la FARK, tamen li sciis ankaŭ ke li ne havis alian rimedon krom provi.

Araújo estis bonega atleto kaj dum sia kaptiteco li faris ĉion kio estis ebla por teni sin en bona fizika stato. Por indulgigi la gerilistojn de la FARK, li plenumis ĉiujn ordonojn kaj kondukis obeeme por, tiele, trankviligi siajn kaptintojn kaj eviti ke ili katenu lin denove, kio malhelpus rapidan eskapon en la unua ŝanco. Li prepariĝis ankaŭ por la pleja malbono. Li skribis en sia taglibro: "Mi komprenas kion la familio faras pri mi". Ĝi estis lia maniero diri ke li konsentis kun nia decido efektiviĝi militan rekuperon, kvankam li povus pereji en la operaco.

Araújo aŭdis la helikopterojn kiam ni komencis la rekuperan operacon. Tamen pro tio, ke dum kelkaj tagoj li estis aŭdinta ilin — kiel ni planis— nek li nek la FARK atentis tion multe. Estis dimanĉo kaj li daŭrigis sian aŭskultadon de radioprogramo, sed subite li perceptis ion nekutiman en la sono de la helikopteroj. Li suprenrigardis al la ĉielo tra la frondara densaĵo de la ĝangalo, kaj sekrete, por ke la du teroristoj de la FARK kiuj gardis lin per sturmaj fusiloj el proksimume dek metrojn for ne rimarku, li pakis sian taglibron kaj ŝiajn malmultajn posedaĵojn.

Ni komencis la sturmon kun fajrobulo kaj ekbrilo de oranĝkolora lumo. Araújo tuj faligis sin sur la tero kaj komencis rampi per la manoj kaj genuoj dum la kugloj sonis ĉirkaŭe. Li sciis ke se li stariĝus kaj kurus, li ricevus hajlon de kugloj en la dorson. Li

rigardis okulangule kaj li vidis, kiel unu el liaj gardistoj pafis supren, krianta kaj montranta fingre la kuglingojn kiuj falis al la tero. Li rampis plu kelkcent metrojn, haltante nur unufoje por rekuperi la radioaparaton, sia estimita posedaĵo kaj sola fenestro al la mondo dum siaj ses jaroj en kaptiteco.

Araŭjo estis rimarkinta ke kiam la roto de la FARK alvenis al nova kampadejo, la unua tasko kiun la grupanoj faris estis serĉi savelirejon; la vojo por eskapi kiun ili prenis se ili estus atakita far la Armeo. En tiu ĉi kazo, la vojo elektita far la FARK kondukis suden, do li planis forkuri —se la okazo prezentigus— en la kontraŭan direkton.

Ĉiam rampante, li sukcesis alveni preter la latrinoj, malfermitaj ĉe la rando de la tendaro. Surprizita ke li estis ankoraŭ viva, li ekstaris kaj direktis sin norden, esperante alveni ĝis la proksima urbeto nomita El Guamo¹. Dum la sekvinta horoj Araujo piediris tiel rapide kiel li povis sed ne kurante por, tiele, percepti la ĉirkaŭaĵon. Pli ol unufoje li ekvidis la helikopterojn tra la ĝangala foliaro, tiam li saltis kaj svingis siajn brakojn furioze por atingi atenton, tamen li ne havis fortunon, pro la dikeco de la vegetaĵaro. Ĉe la noktiĝo li marŝis plu kun la espero iri norden, tamen li komprenis ke la itinero estus tro longa.

Dum kvin tagoj Araŭjo trairis marĉojn kun la ŝlimo ĝis la ŝultroj, li sekvis aprojn kun la espero trovi nutraĵojn kaj li supervivis danke al akvo el la kakttoj. Li estis devigita forlasi sian marŝadon norden kiam li renkontis vepraron el dornoj tiel vasta ke ne estis maniero transiri aŭ ĉirkaŭiri ĝin. En la kvina tago li renkontis viron, kiu rajdis sur azeno. Maltrankviligis lin la dubo ĉu la viro estus membro de la FARK, tamen pro sia laceco kaj malsato li decidis provi sian sorton. Kun afableco, la viro kondukis lin al Sankta Aŭgusteno, apuda vilaĝo.

Unue la vilaĝanoj montriĝis malemaj helpi tiun fremdulon sunbrunigitan, barbohavan kaj kun malsaneca aspekto kiu venis el la montoj. Ĝis kiam fine iu fingromontris al li straton kie du soldatoj estis farantaj patroladon, sen antaŭsento ke la ĉefpremio en kvar jardekoj da lukto kontraŭ la FARK estis falonta, laŭvorte, en siajn brakojn. Araŭjo kuris —por la unua fojo en ses jaroj— kriante sian nomon, kaj dum la soldatoj donis per radioaparato la

1 [NT En la departemento Bolivaro. \(ekzistas alia samnoma en la departemento Tolimo\)](#)

grandan novaĵon al siaj superuloj, li ne povis ĉesi rigardi super sia ŝultro, timema, ke la FARK aperos en iu momento kaj prenos lin denove.

Li rigardis la arbaron dum longa momento ne kredante tion kio okazis. Dum sia kaptiteco li havis ripetigantajn songojn en kiuj li estis libera, sed tiam li vekigis detruita trovinte ke li estis ankoraŭ ostaĝo. Kvazaŭ diveninte liajn pensojn, unu el la soldatoj metis sian manon sur lian ŝultron, ridetis kaj diris afable:

—Ne maltrankviliĝu D-ro Araŭjo. Neniu forrabos vin denove.

14

Kiam, tagojn poste, Araujo iris al la Domo de Nariño, li manpremis mian manon, ridetis kaj diris:

—S-ro Prezidento, mi volas ke vi sciu, ke mi neniam estis kidnapita.

Mi estis surpriziĝis kaj demandis:

—Kion vi volas diri?

—Mi enfiltriĝis en la FARK —respondis kun palpebrumo—. Mia tasko estis lerni ĉion, kion mi povis.

Li ŝercis, tamen lia sento por humuro anoncis io tre grava: vivinte dum pli ol ses jaroj ene de la FARK li estis akirinta valoregan informon. Tiu ĉi brila viro estis observinte deproksime ĉiun taktikon, ĉiun moviĝon, ĉiun aspekton de la doktrino de la FARK kaj de ties ĉiutagaj procedoj. Li parolis al mi pri multaj aferoj dum la sekvintaj tagoj kaj semajnoj. Mi tiam kunvokis la altrangajn armeajn ordonantojn kaj mi petis al Araujo ripeti la ĉefajn punktojn de siaj rimarkoj:

1) Ekde la komenco de nia registaro, la vivo estis ŝanĝita por la FARK. En la fruaj tempoj de sia kaptiteco (inter la jaroj 2000 kaj 2001), en plena taglumo la ĉefoj de la FARK cirkulis en luksaj Toyota kamionetoj sur la vojoj de la Montoj de María, en multaj okazoj portante lin en la malantaŭa benko. Kiam niaj Armitaj Fortoj alvenis al la areo, la FARK ĉesis moviĝi veturile kaj forkuris senĉese.

2) La FARK estis enfiltriĝinta kelkajn sektorojn de la Armitaj Fortoj. Kvankam mi ankoraŭ havis plenan konfidon en la entuta integreco de nia sekuriga agentaro kaj ĝiaj komandantoj. Araujo konfirmis ion kion iuj jam suspektis: ke la teroristoj sciis bone anticipi kiam ni estis entreprenontaj surterajn kaj aerajn operacojn en la Montoj de María. Li raportis al ni ke plurajn horojn, aŭ eĉ tagojn, antaŭ niaj aeraj atakoj, la FARK translokis sian tendaron —kelkfoje apenaŭ 500 metrojn for de la originala loko— kaj poste revenis kiam la aerbombado estis finita.

3) La FARK profitis el la daŭro de kelkaj el niaj militaj ofensivoj. Tio signifas: la militistoj deplojis siajn rimedojn en nova areo kun difinita kalendaro, ni supozu du monatojn. La FARK, kiu sciis perfekte kiom estis daŭranta la ofensivo, atingis provizajojn por tiuj du monatoj kaj moviĝis en rondo el unu tendaro al alia; tiam unu taĉmento forviŝis la spurojn kaj instalas kontraŭhomajn minojn por mortigi aŭ kripligi la kolombiajn trupojn kiuj persekutis ilin. Post la du monatoj, la vivo de la FARK revenis al sia normaleco.

4) Entute, la strategio de la aeraj atakoj ne ŝajnis esti efika. Araŭjo raportis ke, inter la multaj aerbombadoj kiujn li vidis aŭ priaŭdis dum siaj ses jaroj en ostaĝeco, neniu el ili estis atinginta ĝian celon. Kvankam ĉi tiuj atakoj forkurigas la gerilistojn de la FARK kaj, foje, timigis ilin, li asertis ke neniam li vidis teroriston de la FARK vundita, des malpli mortigita, kiel rezulto de unu el ĉi tiuj atakoj. Ni estis devontaj fari certan ŝanĝon.

Dum ni parolis, mi komprenis plene kaj por la unua fojo la grandan progreson kiam signifis la elliberiĝo de Araŭjo. Niaj Armitaj Fortoj jam konis kelkajn el tiuj detaloj. Tamen, aŭskulti ilin en klarmensa kaj aŭtoritata maniero el la buŝo de viro kiu jam elspezis la lastajn ses jarojn vivinte kaj spirante la ĉiutagan vivon de la FARK, estis io tute nova. Tiumomente ni ankoraŭ ne sciis, ke la kontribuoj de Araŭjo estis fariĝontaj esencaj en la ĉeno el resonantaj venkoj kiujn ni estis baldaŭ atingontaj.

Dum la unuaj du jaroj de nia registaro ni faris multajn malsukcesajn provojn por savi S-ron Fernando Araŭjo. Pasis longa kaj angoriga tempo kiam ni ne havas informojn. Fine ni reakiris la gvidan fadenon kaj danke al la fera volo de Araŭjo, al la helpo de lia familio, al la sindediĉo de niaj komandantoj kaj al la konfido de la civiluloj kiuj nin informis, ni kreis la kondiĉojn por lia elliberiĝo. Tiom da jaroj de malĝojo fariĝis feliĉo kiam la ministro Juan Manuel Santos aperis en la televidaj ekranoj kun Araŭjo, elĉerpita sed libera.

15

Kelkajn semajnojn antaŭ la elektado de 2006, miaj konsilantoj diris al mi:

—Ni havas seriozan dilemon.

Dum la antaŭaj du jaroj ni estis intertraktante pri Interkonsenton por Libera Komerco (ILK) kun Usono, esperante fortigi nian iniciaton por krei altkvalitajn laborpostenojn en Kolombio. Kvankam la administracioj de prezidentoj Clinton kaj Bush estis iam revintaj pri unu granda zono de libera komerco kiu kovrus la plimulton de la okcidenta hemisfero, koncernis min helpi por konvinki prezidenton Bush ke, donita la rezisto de landoj kiel Venezuelo kaj Brazilo, la plej bona maniero por la regiona integriĝo en la tuja estonteco estos per duflankaj interkonsentoj.

Do, ni estis preparantaj nin por la Interkonsento por Libera Komerco inter Usono kaj Kolombio —ni estis poste farontaj same kun aliaj landoj kaj komercaj blokoj en la tuta mondo, inkluzive de la Eŭropa Unio kaj Kanado—, kaj multaj personoj pene laboris en la intertraktado, inter ili: Luis Guillermo Plata, Jorge Humberto Botero, Luis Alberto Moreno, Carolina Barco, Diego Palacio, Andrés Felipe Arias, María Consuelo Araŭjo kaj Hernando José Gómez.

La dilemo kiun havis miaj konsilantoj en 2006 estis la jena: la elektado proksimiĝis kaj mi estis kandidato por dua prezidenta periodo, sed la opinisondoj montris ke la Interkonsento pri Libera Komerco ne estis populara en Kolombio: unuflanke, ekzistis en iuj personoj profundan malfidon pri Usono; aliflanke, certaj ekonomiaj kaj politikaj sektoroj havis rezervojn pri la kondiĉoj de la interkonsento. En tiuj cirkonstancoj, eble estus prudente atendi ĝis post la elektado por antaŭeniri en la intertraktado kun Usono, ĉar —kelkaj el miaj politikaj konsilantoj sugestis— eble la Interkonsento pri Libera Komerco estus uzita far miaj kontraŭuloj por gajni popularecon.

Mia respondo estis nedubiga: ni iros antaŭen kun la intertraktado, kaj ni konformiĝos al la planita agendo, kies tuja paŝo estis la fina fermo de la traktato.

Mi neniam volis meti mian voĉdonajn aŭ politikajn konsiderojn super la plej bonaj intereso de la lando. La komerca interkonsento

kun Usono estis bona por Kolombio, sendepende ĉu ĝi povus esti malbona por mi en la tuja tempo. Mi pensis ankaŭ ke se ni volis ke la interkonsento estu sukcesa dum longa tempo, ĝi devis esti pritraktita kiel eble plej travideble, kaŝante nenion al la kolombia popolo. Do, la elektado estos ŝanco por ke la voĉdonantoj konsideru ĉiujn temojn, kaj voĉdonu laŭe.

Anstataŭ prokrasti la interkonsenton aŭ ĝin maski, ni decidis alie. Ja, estis necese komprenigi pli la traktaton kaj gajni subtenon de popolopinio per nova eduka penado. Miaj konsilantoj demandis la televidkanalojn ĉu ili havis interesigon pri telesendi debaton pri tiu temo, en kiu ĉe unu flanko estus la prezidento kaj la ministroj kaj ĉe la alia flanko ĉiuj civitanoj kiuj volus altelefoni, sen revizio. RCN Televido¹ akceptis sed en tempoj de malmulta televidantaro: la devontigoj de la televidkanalo ne permesis interrompi la regulan programaron. Ni demandis kiu tempo ne estis *unuvaranga tempo* kaj ili respondis ke inter la deka horo ptm kaj la sesa horo atm. Tamen por ni ĝi estas tia kaj do ni konsentis.

RCN decidis nomi la spektaklon "La maratono de la ILK: Uribe respondas". Ni disponigis senpagan telefonnumeron kaj retadreson por ke la kolombianoj faru demandojn kaj ni donis striktajn ordonojn por ne kontroli nek nuligi la venontajn telefonaĵojn pro ilia enhavo. Mi estis akompanita de granda parto de mia kabineto kaj la intertraktanto de la ILK.

La granda plimulto el la demandoj estis sufiĉe adekvataj. Ni respondis civitanajn zorgojn pri la efiko de la interkonsento sur nia produktado de maizo, ĉu ekzistos specialaj dogantarifaj reĝimoj por la agrikulturo, ĉu Kolombio povos komenci eksporti lignopulpon kiel faris Ĉilio, kaj tiel plu. Iu demandis al mi per retroŝto: se vi estus kolombia negocisto, kiu tipo de negoco vi farus se la traktato kun Usono estus aprobita? Mi respondis ke mi eksportus biobruilaĵojn el sukerkano, jukao aŭ oleopalmo el Kolombio. Mi ankaŭ sciigis honeste miajn dubojn pri la interkonsento; ekzemple, mi konfesis ke mi estis maltrankvila pro la ebla efiko kiun ĝi havus sur la produktado de rizo kaj kortobirdoj. Kiel atendende, kelkaj politikaj gvidantoj telefonis min por fari malamikemajn demandojn kaj unu al miaj kontraŭuloj en la prezidentaj elektoj defiis min submeti la komercan traktaton al popola referendumo. Mi respondis, ke la Konstitucio, kiun li mem helpis skribi en 1991, donis al la

1 [NT Unu el la ĉefaj privataj televidaj kompanioj en Kolombio.](#)

prezidento klaran jurisdikcion sur aferoj de eksterlanda politiko, kiu faris la referendumon nenecesa.

Je la dua horo frumatene, RCN faris mallongan paŭzon por komercaj reklamoj dum ni manĝis iom da rizo kun kokidajo. Tuj poste ni daŭrigis la debaton.

Komence de nia prezidenteco, la komerco de Kolombio estis tre limigita. Kvankam la antaŭaj registaroj, estis malfermintaj nian merkaton unuflanke, kaj la lando ĝuis komercajn preferojn —de limigita daŭro— kun Usono kaj Eŭropo, la solaj formalaj komercaj interkonsentoj kiujn ni havis estis kun la Anda Komunumo (integrita de Kolombio, Venezuelo, Peruo, Ekvadoro kaj Bolivio) kaj kun la G-3 (Kolombio, Venezuelo kaj Meksiko). Je la fino de nia prezidenteco, ni estis atingintaj interkonsentojn de libera komerco kun kvardek kvin landoj, inkluzive de la Eŭropa Unio, Ĉilio, pluraj landoj en Centra Ameriko kaj Merkosudo —la sudamerika komerca bloko, el kiu Brazilo estas la plej granda membro—, Svislando kaj ĝiaj aliancanoj. Kun Ĉinio kaj Barato ni intertraktis pri konsentoj por protektado de investoj. Kun Japanio ni rekomencis la viglecon de komercaj rilatoj kiuj estis malfortigitaj pro kidnapoj. Intertraktadojn kun Sud-Koreio, Panamo kaj aliaj, ni restigis komencitaj. La interkonsento kun Honduro, Salvadoro kaj Gvatemalo estis subskribita en Medeĝino. Ni ne povis antaŭeniri kun Kostariko, ĉar la urĝa celo de tiu frata lando estis sukcesigi referendumon por ratifi ĝian interkonsenton kun Usono. Ni renkontiĝis kun ŝtatestroj de la landoj de la Azia-Pacifika Ekonomia Kunlaborado por peti ilin ĉesigi la moratorion pri novaj aniĝoj kaj allasi Kolombion. Nia ministro pri Eksterlandaj Aferoj, Bermudez, malfermis la pordojn al la Arko de la Pacifika Latinameriko kun Meksiko, Peruo kaj Ĉilio. Mi iris al multaj el tiuj landoj por trakti ĉiujn temojn en detala kaj travidebla maniero, same kiel mi faris en la kolombia televido tiun nokton en 2006. En 2009 mi vojaĝis al Kanado kaj mi iris al ĝia parlamento, kie pluraj leĝfaristoj atendis min kun kelkaj dornaj demandoj: ili volis esti certaj antaŭ ol aprobi la Interkonsento pri Libera Komerco kun nia lando. Kelkajn monatojn poste ili aprobis ĝin.

La Interkonsento pri Libera Komerco inter Kolombio kaj Usono estis aprobita far la registaro de Bush en 2006, sed sia aprobo en la Kongreso estis ankoraŭ prokrastita dum kelkaj jaroj.

Mi havis pozitivan rilaton kun multaj membroj de la Demokrata Partio en Vaŝingtono —inkluzive de la tiama senatanino Hillary

Clinton kaj senatano Christopher Dodd—, tamen, kiam en 2006 tiu ĉi partio prenis regon sur ambaŭ ĉambroj de la Usona Kongreso la fina aprobo de la komerca interkonsento kun Kolombio prokrastiĝis (la saman sorton havis la komercaj interkonsentoj kun Panamo kaj Sud-Koreio). Laŭ la opinio de multaj usonaj analizistoj, tiu malfruigo okazis pro la opono de la demokratoj kontraŭ pluraj el la iniciatoj de Prezidento Bush. Tamen, kelkaj membroj de tiu partio pravigis sian opozicion al la traktato kun Kolombio per la argumento de la violento kontraŭ sindikataj gvidantoj. Sed tiu ĉi argumento estis perdinta grandan parton de sia forto.

Ekde la kampanjo por mia unua prezidenta periodo, mi substrekis ke la Demokratia Sekureco estis sinonimo de sekureco por ĉiuj, kaj ĉi tiu "ĉiuj" inkluzivis, evidente, la kontraŭulojn de nia registaro kaj la plej sendefendajn membrojn de la socio. Kaj ni ne nur estis progresintaj en sekureco, ni ankaŭ tion faris en aliaj aferoj: ni kreis novajn unuaĵojn de la leĝa sistemo dediĉitaj al la enketado pri malrespekto al la homaj rajtoj, kaj danke al la ĉefeco de vicprezidento Francisco Santos, ni faris esencajn progresojn en diversaj kampoj. La sekureco de instruistoj, urbestroj, kaj magistratanoj pliboniĝis rimarkinde: la ĉiujara nombro de homoj delokitaj malpliĝis kaj el dek jurnalistoj mortigitaj en 2002 ni pasis al unu en 2010.

Ni ankaŭ faris signifan progreson kun rilate al sindikataj gvidantoj. Dum multaj jaroj en Kolombio la gvidantoj de la organizita laborista movado estis persekutitaj, ofte fare de kvazaŭarmeanoj. Fakte, en la 1970-aj jaroj, la marksismaj gerilistaroj enkondukis la "kombinon de diversaj lukto-rimedoj". Ili murdadis, kidnapadis kaj penetris sektorojn de la socio kiel studentojn kaj laboristajn organizaĵojn. La kvazaŭarmeanoj komencis mortigi laboristojn akuzinte ilin kiel kunlaborantojn de la gerilistaro, kaj la gerilistoj faris la samajn krimojn venĝe, nomante perfiduloj siajn viktimojn. Dum nia regado, la nombro de mortigitaj sindikatanoj malpliĝis el ducent en 2002 (la jaro en kiu mi estis farita prezidento), al ĉirkaŭ dudek en 2010. Ni progresis, ankaŭ, por venki la senpunecon: ni iris el unu persono kondamnita en tribunalo pro la murdo de laboristoj, al pli ol ducent. La nombro de mortintoj estis ankoraŭ alta, sed ni faris nian eblajn klopodojn por certigi ke neniu estu murdita. Tiuj progresoj estis agnoskitaj far la Internacia Labor-Oficejo: ĝuste antaŭ la fino de nia regado, kaj por la unua fojo en pli ol dudek jaroj, Kolombio malaperis el ĝia listo de kondamnitaj landoj.

Mallonge: ni havis multajn defiojn en la kampo de homaj rajtoj kaj en multaj partoj de nia sekureco, sed Ni faris nian eblon por superi tiujn defiojn. Pravis do Condoleezza Rice, usona ŝtatestretariino, kiam ŝi skribis en sia memorlibro: "Ja, Kolombio havis historion de perforto kontraŭ la laboristoj, sed la nivelo de perforto kiun alfrontas la sindikatistoj jam estas malpli ol tiu de la ĝenerala loĝantaro, parte pro la speciala protektado al la sindikataj gvidantoj. La fakto estas ke la opozicio al la Interkonsento pri Libera Komerco inter Usono kaj Kolombio estis protektismo subtile maskita".

Finfine, la usona Kongreso aprobis la komercan interkonsenton kun Kolombio —kune kun tiuj de Sud-Koreio kaj de Panamo— en 2011, kiam la prezidento Bush kaj mi estis jam finintaj niajn regadojn.

Ne ĉiuj estis kontentigitaj pri la traktato, tamen respondinte tiun nokton kun pacienco, zorgo kaj bona fido, ni sukcesis dispeli la dubojn de multaj civitanoj. Kaj, plej grave, ni montris al la kolombianoj ke ni estis absolute travideblaj pri la riskoj kaj profitoj de iu traktato. Ili povis esti certaj, ke ni agis response kaj en sia propra intereso: kio estas la esenco mem de demokratio.

Je la sesa horo kaj du minutoj mi komencis repreni la notojn kiujn mi estis alportinta. Dum mi faris tion, la parolistoj demandis min ĉu mi estis laca.

—Ĉu vi ne sentas vin entuziasmigitaj? —mi respondis—. Ĉi tio estas grava. Ne, ne; necesas forigi la vorton "laca" el la vortaro de Kolombio, kiam temas pri oportunoj kiel tiu ĉi.

La televido montris bildokaptaĵon de la ĉefurbo.

—Tiu estas bildo de Bogoto —diris unu el la parolistoj.

—Ho, jam la suno eliris —diris alia parolisto—. Ni ne rimarkis.

Kaj tiam ni decidis daŭrigi la debaton dum unu horon plu. Ĉiam necesas fari kroman strebadon.

16

Proksimume naŭ monatoj pasis antaŭ ol la sugestoj de Fernando Araŭjo donis bonajn rezultojn. Komence de la dua prezidenta periodo, nia kreskanta rilato kun Usono komencis doni fruktojn: la Kongreso de tiu lando plilongigis la validecon de la Plano Kolombio, kiu konsideris tiam la grupon FARK kaj ĉiujn grupojn de drogŝakristoj, kaj ni kalkulis je la kunlaborado de la administracio de prezidento Bush kaj membroj de la Demokrata kaj Respublikana partioj por pligrandigi la kunlaboron inter niaj du armeoj en diversaj aferoj.

Kelkaj versioj de la historio troigas aŭ distordas la rolon de la Plano Kolombio en la transformo de nia lando. Dum la ok jaroj de nia mandato, la buĝeto elspezita far Kolombio por defendado estis tre supera al la milita helpo ricevita el Usono. Multaj kolombiaj policanoj kaj soldatoj oferis siajn vivojn —la lando konservas eternan dankemon al ili kaj iliaj familioj—, kaj la laboro de la ministroj pri Defendado —Marta Lucía Ramírez, Jorge Alberto Uribe, Camilo Ospina, Gabriel Silva kaj Juan Manuel Santos— estis fundamenta. Resume: la transformon de la lando ni ŝuldas ĉefe al la sango kaj mono de Kolombio.

Tamen, estas vero, ke la kontribuoj de Usono en ŝlosilaj areoj kiel la informokolektado por analizo, milita trejnado kaj rimedojn por plibonigi nian Aeran Forton havis egan gravecon. Unu ŝlosila rimedo estis la reaktivigo de la agprogramo de dumfluga interveno¹ nomata Nead de Aera Ponto², haltigita ekde la tempo antaŭ nia prezidanteco far Prezidanto Bush post tragedio en Peruo. Tiu agprogramo, kiu permesis al usonaj aŭtoritatoj spuri aviadilojn kiuj estis suspektindaj transporti narkotajojn kaj, post detektita, alarmi pri ties ĉeesto la kolombiajn armeanojn, komencis funkcii denove en Kolombio en 2003, kaj por 2007 la flugoj suspektindaj portante drogojn en la kolombia aerspaco estis falintaj 86 procenton —laŭ datumoj de la usona registaro—. En satelitaj bildoj ni vidis la "antaŭon" kaj la "poston" de la agprogramo kaj tiel ni povis rimarki

1 NT Hispane: "interdicción aérea"; angle: "air interdiction".

2 NT Angle: "Air Bridge Denial".

la malpliigon de la aertrafiko de narkotajoj en nia ĉielo kaj ĝian pliigon en tiu de Venezuelo.

Sed verŝajne la plej grava kunlaborado —kiu signis turnopunkton en nia lukto kontraŭ la teroristoj— estis la rajtigo far la registaro de Bush por vendi al Kolombio municiojn de preciza stirado. La municioj stiritaj per Tergloba Pozicia Sistemo kaj aliaj avanaj sistemoj de spurado kapabligis nin por ege plibonigi la precizecon de niaj atakoj, kaj ili provis esti la plej bona rimedo por trakti la rimarkon de Araŭjo laŭ kiu la FARK ne estis difektitaj far niaj aeraj atakoj, plejparte ĉar al tiuj atakoj mankis precizeco.

La unua fojo kiam ni uzis tiujn t.n. inteligentajn armilojn estis en unu sukcesa aeratako de septembro de 2007 kontraŭ Tomás Medina Caracas, alinomita "La Negro Acacio", estro de la 16-a Fronto de la FARK kaj kiu ludis ĉefan rolon en la aktivecoj de ŝakrado de narkotajoj. Niaj misiloj trafis la celon kaj Medina estis senvivigita. Proksimume ok semajnojn poste, danke al tuŝo de bona sorto, ni havis la ŝancon uzi ilin duafoje kaj faligi la ĉefan kidnapinton de Araŭjo.

Mi ĉiam pensis ke oni ne devas personigi tro la terorismajn minacojn kiujn alfrontas Kolombio. Demonigante individuojn oni atingas tre malmulte kaj tio povas esti kontraŭefika, ĉar ili atingas pli altan famon ambaŭ en la vivo kaj en la morto. Tamen, estas ĝuste diri ke en la dudek kvin jaroj dum kiuj li apartenis la FARK, Gustavo Rueda Díaz, alinomita "Martin Caballero", faris sennombrajn krimojn: aldone al plani la kidnapon de Araŭjo kaj persone kontroli la cirkonstancojn de lia ostaĝeco, sendistinge plantis kontraŭhomajn minojn kaj kiam iu policano aŭ soldato mortis paŝinte sur unu el ĉi tiuj minoj, laŭ diris al ni Araŭjo, Caballero eltrancis la nomon el ties uniformo kaj alkudrigis ĝin sur sia vizierĉapo. Laŭ niaj Armitaj Fortoj, la bandoj de la kariba marbordo, sub la rekta ordono de Caballero, estis responsaj pri la mortigoj de 420 civiluloj kaj 218 policanoj kaj soldatoj, pri la dissaltigo de proksimume kvindek elektrodistribujaj latis-mastoj kaj pri multnombraj atakoj kontraŭ la naftodukto Caño Limón-Coveñas. Oni suspektas ankaŭ, ke Caballero estis la aŭtoro de la fifama atako en Barranquilla dum nia kampanjo de 2002, kiu mortigis kvar personojn. Araŭjo priskribis tiun ĉi ulon kiel "fortika, disciplinema, studema tamen cinikulo kaj psikopatiulo".

Kun granda lerteco, Caballero sukcesis eskapi el la tendaro de la FARK dum la operaco por rekupero de Araŭjo; ne tiel lia kunulino

kaj sia plej aĝa filo, kiuj mortis. Dum la sekvintaj monatoj ni kaptis lian kuzon, liajn du ceterajn filojn kaj lian nevinon, ĉiuj varbitaj far tiu krimulo por grandigi la vicojn de la FARK. Estis evidente, ke ni estis devigintaj lin fuĝi.

En oktobro de 2007 —dek monatojn post la eskapo de Araŭjo— unu informanto (al kiu ni pagis la ekvivalenton de 850.000 usonaj dolaroj) liveris al ni la situon de Caballero. Ni devis preni multajn antaŭzorgojn: danke al Araŭjo ni sciis ke tiu krimulo ŝajnis ĉiam esti sciigita pri la aeraj atakoj kiujn ni estis farontaj kaj tiel eskapi en la lasta minuto. Tamen ni fidis, ke la konstanta premo kiun ni faris super li, ekde nia sturmo la antaŭtagon de Nova Jaro, estis malpliiginta lian kapablon komunikiĝi, kaj ke danke al novaj teknologioj, la aferoj estus malsamaj. Sed ni ne havis manieron scii tion certece.

La 24-an de oktobro, Caballero estis en tendaro en areo nomata Aromeras Suda, en la najbaraĵo de la urbo Carmen de Bolívar. Ni faris aeran atakon kun inteligentaj armiloj, kiuj ekstermis la tendaron: mortis Caballero kaj aliaj dek naŭ teroristoj.

Kiam niaj trupoj alvenis al la loko, ili trovis la korpon de Caballero kaj lian poŝtelefonon maŝaltitan. La ministro pri Defendado, Juan Manuel Santos, raportis poste ke ekzameninte la enhavon de la poŝtelefono, oni trovis novan tekstan mesaĝon: "Atentu, ke ili falos sur vin". Se la mesaĝon li ricevintus kelkajn minutojn antaŭe, la rezulto de la operaco povus esti malsama.

La leciono estis klara: Malgraŭ la atingita progreso, ni ankoraŭ havos multe da laboro farenda. Se nia celo estis malmunti la restintan gvidantaron de la FARK kaj elliberigi la ceterajn ostaĝojn, ni ankoraŭ devos plibonigi la kvaliton de niaj institucioj kaj alporti al la justico tiujn, kiuj kunlaboris kun la krimuloj, ne gravas kie ili troviĝis.

17

Unu nokton, la ministro pri Defendado, Juan Manuel Santos, kaj generalo Freddy Padilla venis al mia oficejo kun kelkaj el la plej malbonaj novaĵoj en nia prezidenteco: ili havis provojn pri kolombiaj soldatoj krimuloj kiuj kidnapis senkulpajn civilulojn, murdis ilin kaj poste prezentis ilin ŝajnigitaj kvazaŭ membroj de neleĝaj armitaj grupoj.

En kelkaj kazoj, tiuj soldatoj vestis la kadavrojn per uniformoj de la FARK kaj translokis la korpajn al areoj kie tiu grupo aktivis. La eŭfemismo por ĉi tiu abomeninda praktiko konatiĝis kiel “falsaj pozitivajoj”. Kelkaj homoj diris ke la soldatoj implikitaj en tiu praktiko faris tion por ŝveligi la "nombrado de korpaj" de siaj armeunuoj, kaj tiel pruvi antaŭeniron pri sekureco. Kvankam ekzistis raportoj pri falsaj pozitivajoj ekde la 1980-aj jaroj —kaj aliaj raportoj pri miskondutoj de la armeanoj—, la kazoj prezentitaj far Santos kaj Padilla sugestis ke tia praktiko eble estis pli disvastigita en niaj Armitaj Fortoj ol kiom ni kredis.

Sciigita pri tiuj denuncoj, mi sentis min korpe malsana. La murdoj estis malobservo de ĉiuj principoj kiuj apogis nian registaron kaj de ĉiuj ordonoj kiujn mi estis doninta al la Armitaj Fortoj. Ekde la unua tago en la prezidenta posteno, mi donis eksplikitajn instruojn: ni ne toleros malobservojn de la homaj rajtoj aŭ de la demokratiaj principoj. Nia mesaĝo estis ĉiam la sama, en publike kaj private: neniam ni permesos kontraŭleĝajn praktikojn, kaj des malpli ni ignoros ajnan miskonduton. Kiam oni montris al mi pruvajn de kriminala konduto en ajna registara institucio, mi ĉiam agis kun decidiĝo kaj travidebleco por ke la responsuloj raportu pri siaj agoj. La demokratioj ne toleras miskondutojn kontraŭ siaj civitanoj kaj ĉi tiu okazintaĵo ne devos esti escepto.

En la pasinteco ni estis havintaj kelkajn kazojn de suspektata krimeco de nia sekuriga agentaro. Kaj ekde la unua momento ni estigis klaran precedencon: ni agos tuje kaj sen konsideroj pri politiko aŭ pri nia publika bildo. En 2006, nur kelkajn tagojn antaŭ la prezidentelekto, ni ekkonis aparte abomenan epizodon okazinta en Jamundí: grupo de soldatoj estis akuzita pri mortigi plurajn kolombiajn policanojn kiuj estis persekutitaj drogŝakristojn, kiu ŝajne estis sub la protekto de tiuj samaj soldatoj. Hororinta, mi

decidis, kun Camilo Ospina —nia tiama ministro pri Defendado—, peti ke la okazintaĵo estu enketitaj far la ordinara kriminala justico kaj ne far militistaj tribunaloj. Ni reagis en la sama rapida maniero post la suspektitaj kruelaĵoj faritaj en Guaitarilla, Cajamarca kaj en aliaj lokoj.

Ankaŭ, ekde la komenco de nia registaro estis aprobita unu regulo laŭ kiu ĉiufoje kiam unu milita misio senvivigas suspektitan teroriston, malpermesis ke niaj soldatoj movu la korpon ĝis kiam iu prokuroro aŭ funkciulo de la civila juĝa sistemo alvenas al la loko de la okazintaĵo. La celo de ĉi tiu regulo estis, ambaŭe, protekti homajn rajtojn kaj fortigi la reputacion de la Armitaj Fortoj, donante plenan travideblecon al iliaj agadoj. Paradokse, la rimedoj kiujn ni prenis ekde 2003 ne estis rimarkigitaj far nia riproĉantoj pri Homaj Rajtoj, tamen tiuj rimedoj ja utilis por havi troigojn de juĝado far la ordinara tribunaloj, kio plendigis la militistan institucion pri la forigo de ĝia militista jurisdikcio.

Tiun nokton, kun la ministro Santos kaj la generalo Padilla, ĉeestis la kunvenon kelkaj juĝistoj kaj la konsilanto pri homaj rajtoj. Noktomeze, post la analizo de la ŝlosilaj punktoj de la pruvajoj, ni decidis forpeli tiujn membrojn de la sekuriga agentaro kiuj ne estis strikte sekvintaj la protokolojn starigitaj por eviti tiajn abomenaĵojn. Je la sepa horo la sekvintan tagon, mi parolis en la televido: mi klarigis la rezultojn de la esploro al ŝokita kaj afliktita nacio, kaj ni komunikis nian decidon forpeli el la armeo la responsulojn. Estis dudek sep tujaj forigoj en la tuta de komandoĉeno, kaj ili inkluzivis tri generalojn. La decido estis doloriga —ĝi iris kontraŭ la amo kaj respekto kiujn mi ĉiam sentis por la armeanoj—, sed necesa. La ĵurnalo *El Tiempo* nomis ĝin "la plej granda militista elpurigo en la historio de la lando".

—La esploro trovigis ke iuj membroj de la Armitaj Fortoj povas esti implikitaj en murdoj, kaj ke okazis misoj en la proceduroj, en la protokoloj kaj en la viglado —mi diris—. Ĉi tiuj rezultoj devigas nin fari severajn decidojn. Ni ne povas permesi ajnan malrespekton al la homaj rajtoj ... Por ni, la vero kaj la travideblo estas tiel gravaj kiel la entuta efikeco por la sukceso de la Demokratia Sekureco.

Puni la kulpulojn ne estis sufiĉe. Ni devis preni rimedojn por certigi ke tiaj krimoj neniam estos ripetataj. Denove, ni petis al nia civila jursistemo enketi ĉiujn denuncojn pri falsaj pozitivajoj; ni ankaŭ invitis la armeajn komandantojn ĉeesti la publikajn aŭdiencojn kiujn ni okazigis —elsenditaj televide— por respondi al

ĉiuj plendoj kiujn la komunumo faris pri malrespektoj al homaj rajtoj.

Mi renkontiĝis kun multaj patrinoj de la viktimoj por proponi mian plej profundan pardonpeton kaj por ekkoni pliajn detalojn pri la krimoj. Mi aŭdis korŝirajn historiojn: ties filoj estis trompe altiritaj per promesoj de dungado, kaj iliaj korpoj estis trovitaj, tagojn poste, centojn da kilometroj for de iliaj hejmoj. Kelkaj el ĉi tiuj kazoj inkluzivis unu senhejmulon, unu junan epilepsiulon kaj iuj kolportistoj. Laŭ amaskomunikilaj informoj, unu el la viktimoj estis veterano kiu eliris el la Armeo post la amputado de sia maldekstra brako, kaj li estis mortigita far membroj de la sama institucio, en kiu li estis kaj kiun li honoris. Mi esprimis miajn kondolencojn kaj mian hororon pro la krimoj, kaj mi promesis alporti al la Justico la responsulojn.

Pluraj patrinoj diris ke siaj filoj estis implikitaj en la trafiko de drogoj. Tio estis aldonita al aliaj informoj, kiuj rilatis tiujn murdojn al agoj ligantaj drogŝakristojn kun iuj membroj de la Armitaj Fortoj. Ni estis sciintaj pri kelkaj kazoj: komence de nia regado, en Guaitarrilla iuj membroj de niaj Armitaj Fortoj estis verŝajne agintaj pro la mono ricevita el grupoj de drogŝakristoj; kaj ankaŭ el drogŝakristoj kiuj pagis al kolombiaj soldatoj por mortigi siajn rivalojn kaj ŝajnigi ilin kvazaŭ membroj de la FARK aŭ alia grupo. Unu raporto (malsekretigita) de la usona agentejo CIA, de la jaro 1994, menciis ke tiu praktiko okazis en Kolombio ekde almenaŭ la 1980-aj jaroj. Mi intervjuis atestanton ĉe la sidejo de UN en Bogoto, kiu diris ke la ĉefa celo de tiuj murdoj estis ke la soldatoj povu raporti progresojn faritaj kontraŭ drogŝakristoj dum efektive ili protektis la realajn ĉefojn. Mi konkludis, ke la narkotaĵtrafiko estis ludinta gravan rolon en la falsaj pozitivaĵoj: alia terura sekvo de trafiko de drogoj.

Ekde la komenco de la skandalo de falsaj pozitivaĵoj, oni min demandis, ĉu mi kredas ke niaj strategioj kontribuis iel al la murdoj. Mi firme malakceptas tiun eblon. Unue, la demando estas la produkto de misinformado: la opinio kiu tenas ke la soldatoj ricevis aldonan pagon aŭ aliajn financajn instigojn interŝanĝe de pli alta "nombro de korpoj", estas plene falsa. Aliflanke, la argumento ke preminte forte la armeajn komandantojn mi kreis kulturon en kiu tiuj miskondutoj povus okazi, iras kontraŭ ĉiuj pruvoj — anekdotaj kaj alitipaj— atingitaj dum nia regado kiuj elmontras kiel la militistoj estis malpli inklinaj miskondukti en ĉirkaŭo kie la

memfido estis alta kaj sia institucio estis decide apogita far la kolombia Registaro. Fine, iuj sugestas ke nia senindulga persekutado al armitaj grupoj kredigis la sekurigan agentaron ke ĝi povos agadi senpune: ĉi tio estas tute falsa, kaj tiel pruvas ĉiuj niaj paroladoj en militlernejoj, ceremonioj por promocii oficiojn kaj diskursoj al la nacio, en kiuj aldone al fari postulojn pri efikeco ni donis senhezitajn instrukciojn pri travidebleco kaj respekto al la homaj rajtoj, sub la averto ke neniu krima konduto —en aŭ ekster la armeo— estos tolerata.

Kiel estis nia devo, ni reagis al la kazoj de falsaj pozitivajoj: por la civila loĝantaro ni faciligis la denuncadon pri tiuj krimoj, kaj ni efektivigis sekurigojn por forigi la miskondutojn de la Armitaj Fortoj kaj alporti la krimulojn al la justico. Niaj datumoj montras, ke la nombro de falsaj pozitivajoj pliiĝis en la 1990-aj jaroj, atingis sian apogeon en la jaroj tuj antaŭ nia prezidenteco, kaj poste ili malpliiĝis. Nuntempe, aliaj kazoj estas procesitaj far la kolombia jursistemo kaj pluraj el la akuzoj riveligis esti mensogaj (en multaj kazoj pluraj jaroj post la fakto). Unu el ĉi tiuj implikis membrojn de la Kvara Armea Brigado bazita en Medegino: tiuj implikitoj estis malkondamnitaj ok jaroj post kiam la akuzo estis alportita. Tamen, multe por mia bedaŭro, multaj aliaj kazoj estis realaj kaj nenegeblaj.

Mallonge antaŭ la fino de nia regado, la delegito de la Alta Komisiito de Unuiĝintaj Nacioj por Homaj Rajtoj vizitis min kaj diris ke li havis bonan novaĵon: ke en la lastaj dek ok monatoj ili ricevis nur kvar plendojn kaj nur unu ŝajnis esti kredinda. Mi respondis: "Tio ne estas bona novaĵo, ni bezonas nulon da kazoj, la plua restado de la Demokratia Sekureco dependas de ĝia kredindeco, kio siavice estas bazita sur la efikeco kaj la travideblo".

18

La fuĝo de Fernando Araujo detruis la ideon pri nevundeble kiu ĉirkaŭis la grupon FARK kaj ĝiajn tendarojn kun ostaĝoj. Nur kvar monatojn poste, Jhon Frank Pinchao, kolombia policano kiu travivis preskaŭ naŭ jarojn retenita far la FARK en la ĝangalo, sukcesis eskapi dum siaj kaptintoj malatentis, meze de torenta pluvego. Pinchao ellaboris viv-savan flosilon el plasta ujo, kaj dum pluraj tagoj li floris tra riveroj plenaj de ŝlimo. Li postvivis manĝinte palmomedolojn kaj ovojn de birdoj trovitaj sur la tero. Nokte li enmetis foliojn en siajn vestojn por eviti pikojn de insektoj, kaj dum ŝtormoj li movis siajn brakojn kaj krurojn por eviti hipotermion.

Kelkajn tagojn poste, la Polico kaŝkaptis radiokomunikaĵojn el la FARK en kiu ili diris ke unu el iliaj ostaĝoj estis eskapinta ie en la departementoj Gŭavjaro aŭ Vaŭpeso. Ili ne diris ĝuste kie la fuĝo okazis, sed ili supozis ke la ostaĝinto provus eskapi tra la rivero. Ni entreprenis penigan kuron kontraŭ la FARK por provi lokalizi lin unue. Ni ekspedis helikopterojn kaj policanojn al la areo, kaj ni metis en maksimuma viglado ĉiujn niajn funkciulojn de informiĝado. Dek sep tagojn post lia suferiga traŭro, kaj preskaŭ mirakle, skipo de policanoj trovis policanon Pinchao: li estis maldika, malsata kaj kun pusa infekto en sia maldekstra mano, ĉe la bordo de la rivero Apaporis, en la koro de la Amazonio.

La fuĝo de Pinchao levis la memfidon de nia sekuriga agentaro kaj de la tuta Kolombio. Ĝi estis la unua fojo en kiu soldato aŭ policano eskapis el la FARK. Kelkajn horojn post kiam li estis trovita, Pinchao estis en Bogoto donante grandan brakumon al sia ok-jara filo, kiun li ne estis koninta, sceno kiu plorigis ĉiujn kolombianojn. Lia eskapo havis aldonan signifon: li estis en la sama tendaro de la FARK en kiu estis Ingrid Betancourt, la tri usonaj kontraktintoj kaj aliaj ostaĝoj. Kiam ni kunsidis kun li, Pinchao riveligis esti, samkiel Araŭjo, netakseble valora trezoro por nia informiĝfako.

Surprizis nin la persisteco de Pinchao kaj lia lojaleco al la Polico kaj al la Armitaj Fortoj; li diris ke, eĉ en la plej malfacilaj momentoj de sia ostaĝeco, li neniam perdis la esperon atingi sian liberon. Kaj kvankam li povis doni al ni nur ian ĝeneralan situon de la tendaro —kiu verŝajne estis forlasita post kiam li eskapis, tri semajnoj

antaŭe—, li sciigis novajn detalojn pri vivo kun la FARK kaj li konfirmis kelkajn el niaj suspektoj. Li rakontis al ni pri la fartoj kaj psikologiaj statoj de la usonanoj (kiuj estis tre bonaj) kaj de Ingrid (kiu estis multe malpli esperiga), pri la ĉiutaga rutino de la ostaĝoj, kaj li faris desegnaĵon kun la instalaĵoj de la tendaro. Fine, Pinchao konfirmis zorgigan suspekton kiun ni havis el informiĝlaboro: unu el la ostaĝigitaj virinoj estis naskinta en mallibereco.

Clara Rojas, selektita kiel ŝia vicprezidentino far Ingrid Betancourt por la elektado de 2002, estis akompaninta ŝin al la teritorio mastrita far la FARK kaj ankaŭ estis forrabita samtempe. Ŝi estis 38-jara kaj ne estis patrino. Clara ekestis graveda, kaj la FARK, kiu malpermesas al siaj senranguloj ekhavi filojn kaj ofte devigas la virinojn aborti, faris pri ŝi escepton.

Kiam alproksimiĝis la tempo de akuŝo, la FARK devintus agi humane kaj liberigi, aŭ almenaŭ alporti ŝin al hospitalo aŭ kliniko. Ili ne faris tion: ili daŭre retenis ŝin ostaĝigita en tendaro en la ĝangalo. En la momento de nasko, la estro de la tendaro rimarkis ke la vivoj de la patrino kaj la infano estis en danĝero. Li decidis ke cezara sekco devas esti farata, tamen la kirurgio ne iris bone kaj la "doktoro" faris pli grandan incizon kaj eltiris la bebon perforte, kaŭzinte frakturon en la maldekstra brako de la naskato. Clara Rojas devis pasigi kvardek tagojn en lito antaŭ ol ŝi povis marŝi denove. Pinchao rakontis al ni, ke la infano estis nomata Emmanuel kaj neniam resaniĝis el la traŭmato suferita en la maldekstra brako. La infano ĉiam ŝajnis dolorita kaj li trafis de malsanoj oftaj en la ĝangalo kiel lejšmaniozo.

Kiam, en ĵurnalistara intervjuo, Pinchao malkaŝis la situacion de Emmanuel al la kolombia publika opinio, la ĝenerala indigno superis ĉion kion ni vidis antaŭe. La fiagoj de la FARK estis kaŭzintaj la indignon de multaj kolombianoj, tamen la bildo de malsana bebo ostaĝigita estis por indignigi eĉ la plej cinikajn kaj senhontaj apologiistoj de la FARK en nia socio.

Du aliaj tragikaj eventoj, okazintaj en tiu sama jaro, grandigis ankoraŭ pli la publikan premon sur la FARK. La unua estis rilata al la dek du asembleanoj de la departemento Valo de Kaŭko forrabitaj far la FARK en Kalio dum la ondo de violento iom antaŭ nia regado. En junio de 2007, la teroristoj kiuj retenis tiujn ostaĝojn kontaktis alian grupon de la FARK kaj, pensinte ke tiuj estis membroj de la NLA, atakis ilin. Kiam la batalado intensiĝis, la ĉefo ordonis mortigi la ostaĝojn; same kiel estis farite kun Gaviria, Echeverri kaj la

soldatoj en Urrao. Kaj tiel, estinte suferantaj kvin jarojn da kaptiteco en la pleja profundaĵo de la ĝangalo, dek unu el la dek du deputitoj estis murditaj. En cinika artifiko por kovri sian krimon, la FARK kulpigis la kolombian Armeon pri la konfuzo, kaj prokrastis dum okdek tagoj la liveron de la korpoj al la Ruĝa Kruco. Tamen, ilia trompo estis malkaŝita: jurmedicina esploro pruvis ke la dek unu deputitoj estis ricevintaj naŭdek kvin pafojn, la plimulto el tiuj en la dorson. Kun doloro kaj kolero, la kolombia socio malakceptis tiun novan masakron kontraŭ senkulpaj civiluloj.

Kiam la FARK sciigis la novaĵon pri la murdo de la deputitoj, ili asertis, en paĝo de Interreto el Eŭropo, ke la fakto okazis pro konfrontiĝo kun la Armeo. Antaŭ ol alparoli al la nacio, mi atendis dek unu horojn por konfirmi ke la Armitaj Fortoj ne interbatalis kun gerilistoj en la koncerna areo dum tiuj tagoj. Malkaŝinte la veron nia bona fido estis rekompencita.

La dua evento okazis je la fino de la jaro: la Polico interkaptis videaĵon kun mesaĝoj de la ostaĝoj al iliaj familioj kaj kelkajn leterojn kiuj Ingrid estis skribinta al sia patrino. En la videajo, ĉiuj ostaĝoj montris spurojn de la suferegoj al kiuj ili estis submetitaj, tamen la grandega difekto de fizika kondiĉo de Ingrid kaŭzis ŝokon. Ŝiaj leteroj, aldone, malkaŝis ŝian suferadon: "Estas tre malfacila por mi atendi plu", ŝi skribis, kaj aldonis ke la suferado de ŝiaj gefiloj pro ŝia kidnapo, "igas la morton ŝajni kiel dolĉa opcio ... Tie ĉi ni vivas mortintoj".

Eĉ por la FARK, kiu tiam havis en la opinisondoj aprobon de malpli ol 2 procento, tiuj rivelaĵoj antaŭ la kolombia socio estis tre malfacile eltenablaj. Ili vidis sin bezonantaj fari ian geston por kovri la veron sub ŝajno kaj bonigi sin al la okuloj de siaj subtenantoj eksterlande. Ni esperis ke ili estis farontaj ion signifoplenan. Kaj ni ne estis tre surprizitaj kiam ili konatigis sian preferatan porparolanton.

19

La helikoptero estis preta por ekflugi el parko en kanjono Chicamocha, en la departemento Santandero, kiam mia telefono sonoris.

—Uribe?

—Ja.

—Prezidento, mi telefonas vin ĉar mi volas helpi vin.

Prezidento Chávez estis telefonante min el Karakaso; akompanis lin Piedad Córdoba, maldekstrisma kolombia senatanino kun kiu Chávez havis bonajn rilatojn. Mi estis ĵus rajtiginta la senataninon Córdoba por agi kiel faciliganto por provi, refoje, interkonsenton kun la FARK cele al la liberigo de la ostaĝoj. Ŝi estis vojaĝinta al la venezuela ĉefurbo por renkontiĝi kun prezidento Chávez, kiu estis montrita signojn de volo por partopreni en la intertraktadoj.

—Mi povas helpi vin alveni al akordo —diris prezidento Chávez. Mia unua penso estis: "Se mi rajtigus, ĉi tio estos politika risko. Kaj se mi ne rajtigus, estos homa risko".

Je tiu tempo en nia prezidenteco, ni jam sciis, ke prezidento Chávez ne ĉiam pensis pri la plej bonaj interesoj de Kolombio. Miaflanke, mi havis multajn demandojn pri la sekvoj de sia rolo en la intertraktado: Ĉu tio estis provo far prezidento Chávez projekcii sin kiel paciganto en la tutmonda scenejo, post lia malvenko en grava referendumo en lia lando?, ĉu tio estis taktiko por malfortigi nian registaron kaj doni novan ĉefrolecon al intertraktadoj, pri kiuj la FARK ŝajnis ne havi sinceran interesiĝon? Samtempe, mi komprenis, ke prezidento Chávez estis en privilegia pozicio: li estis la sola ŝtatestro en la mondo kiu ankoraŭ havis iun influon sur la estroj de la FARK. Kelka tempo antaŭe, la Prezidanto Castro estis dirinta al mi: "Nun la FARK eĉ ne aŭskultas min", kaj se pro la premo farita de la popola opinio kaj de la militistaro tiu grupo serĉus manieron relative decan por la intertraktado, prezidento Chávez povus doni la altan influecon kian ili bezonis.

Nia registaro estis pruvinta sian volon fari grandajn penadojn kaj konsideri ĉiajn eblojn kiuj kondukus al la elliberigo de la ostaĝoj.

Komence de 2007, kaj kiel ago de bona volo, liberiginte el prizono kelkajn membrojn de la FARK, d-ro Luis Carlos Restrepo, nia Porpaca Komisiito, deklaris ke ni estis kompletigonta aron de 150. Prezidento Sarkozy, tiame ĵus enpostenigita, telefonis min demandante ĉu estis vere, ke mi liberigos ilin. Mi respondis ke jes. Poste li ripetis la telefonadon, kaj refaris la saman demandon, mi ripetis, ke mi plenumos mian vorton. Li diris, ĉu li povus peti al mi ion plian. Mi jesis kaj li proponis la liberigon de la alinomita Rodrigo Granda, la "ekstera ministro" de la FARK, kies aresto estis provokinta la krizon kun Venezuelo. Mi konsentis, kun la averto ke tion mi faros kondiĉe, ke la leĝo permesus al mi. Mi ne pridemandis la prezidenton, sed mi supozis ke li havis ian interkonsenton kun la FARK. Mi preferis fidi al li, anstataŭ esprimi mian scivolemon. Liberigita, Rodrigo Granda revenis al liaj krimaj agadoj kun la FARK. La lastaj fotoj kiujn ni vidis pri li, montris lin en Venezuelo vestita per kamufluniformo kaj en delikta sinteno. Neniu el la ostaĝoj estis liberigitaj, do: aŭ ne ekzistis interkonsento, aŭ ili ne plenumis ĝin al Sarkozy.

Tamen, ĉi tiuj travivaĵoj ne haltigis nin: la vivo de la ostaĝoj estis en risko, kaj ajna bonvola penado por ilin liberigi povus, eble, konduki al la solvo kiun dum multaj jaroj alsopiris la kolombianoj. Do, mi spiris profunde dum prezidento Chávez atendis la respondon al sia propono. Mi rememoris la saĝan konsilon de eksa kolombia prezidanto Julio César Turbay Ayala, kiun mi profunde admiras kaj kiu iam estis mia ĉefo: "Oni ne devas reagi sub la impulso de la unuaj impresoj". Kaj malgraŭ miaj rezervoj, mi diris ke mi konsentis lian partoprenon kaj ke la detalojn ni diskutos kelkajn tagojn poste, en la regiona pintkunveno kiu estis okazonta en Santiago de Ĉilio. Kiam ni estis tie, mi dankis lin denove pro lia propono kaj diris al li ke mi volis peti al li nur unu aferon: ke li faru la faciligon kun la plej granda diskreteco kaj privateco. Li ridetis kaj konsentis.

Konsiderata retrospektive, tio estis kvazaŭ peti al kato ne persekuti birdojn.

Tio kio sekvis estis vera cirko. Dum la paso de pluraj semajnoj, prezidento Chávez raportis en pluraj okazoj —en sia ĉiusemajna parolado elsendita televide al la nacio— la staton de la intertraktadoj kun la FARK. Li kunvenis en Karakaso kun la alinomita "Ivan Márquez"¹, ĉefo de tiu grupo, kaj kune ili parolis en

1 NT Kies vera nomo estas: Luciano Marín Arango.

ĵurnalistara intervjuo ĉe la ŝtuparo de la prezidenta palaco Miraflores: Tio estis la unua fojo en kiu unu ĉefo de la FARK aperis publike kun eksterlanda ŝtatestro. Dum unu el liaj tramondaj rondiroj, Chávez diris al prezidento Sarkozy, ke mi estis preta kunsidi tuj kun la alinomita Manuel Marulanda —supera ĉefo de la FARK—: ĝi estis distordo de tio, kion mi diris persone al prezidento Chávez. Malgraŭ ĉio, mi restis pacienca, eble neracie. Tamen, kiam oni sciigis min ke prezidanto Chávez estis provinta plurajn fojojn telefoni al unu el niaj altrangaj armeaj ĉefoj kaj ke, per senatanino Piedad Córdoba, fine li sukcesis komunikigi kun la komandanto de nia Armeo —en danĝera kaj neakceptebla malobservo de la formalajoj—, mi decidis ke jam sufiĉis. La sekvintan tagon mi elsendis deklaron metante finon al la rolo de prezidanto Chávez kiel peranto. Ĉi tio produktis koleran respondon el Karakaso, kaj la konsterniĝon kaj seniluziĝon ĉe la familioj de la ostaĝoj.

Meze de decembro 2007, la FARK ŝajnis cedi sub la plendado de la kolombia popolo. Ili anoncis planojn por liberigi propravole tri el iliaj plej valorajn ostaĝojn: Clara Rojas, ŝia fileto Emmanuel kaj Consuelo González de Perdomo, eksa deputito ostaĝigita ekde 2001. La FARK metis la solan kondiĉon ke ili nur transdonos la ostaĝojn al la venezuela Registaro.

Malgraŭ ĉio kio estis okazinta, ni ne hezitis kaj tuj akceptis la proponon de la FARK. Ni eĉ rajtigis la eniron de venezuelaj helikopteroj al Kolombio por enpreni la ostaĝojn. La FARK anoncis ke la elliberigo estis farota la 28-an de decembro. Al la kolombia urbo Villavicencio, kie oni faris la necesajn loĝistikajn agojn, vojaĝis la delegitaro komisiita por ricevi la ostaĝojn, gvidata far la venezuela ministro pri Eksterlandaj Aferoj Nicolás Maduro, kun partopreno de kameraistoj, la argentina eksprezidanto Néstor Kirchner, la usona reĝisoro Oliver Stone, amiko de prezidento Chávez, kaj reprezentantoj de landoj kiel Bolivio, Brazilo, Kubo, Ekvatoro, Francio kaj Svislando.

Ĉio ŝajnis preta por funkcii.

20

Sub la tropika varmo de Villavicencio, la eksterlandaj vizitantoj kaj dekoj da ĵurnalistoj atendis avide instrukciojn el la FARK: en iu momento ili estus ricevontaj tra radioaparato la koordinatojn de la loko kie la ostaĝoj estus liberigitaj. La venezuelaj helikopteroj pripentritaj kun simboloj de la Ruĝa Kruco, kiel interkonsentite, estis pretaj por ekflugi. La minutoj fariĝis horoj, kaj la tago finiĝis sen novaĵoj el la teroristoj. Fine la prezidento Chávez ricevis leteron el la FARK en kiu ili kulpigis pri la malfruo de la procedo la malbonan veteron kaj malbonan intrakomunikadon. Neniu sciis ĉu tio estis vero.

Alia tago pasis, kaj poste plia. Ni daŭris sen novaĵoj. La membroj de la delegitaro estis ĉiufoje pli nervozaj. Finfine, la kvaran tagon, antaŭtago de Nova Jaro, la FARK publikigis deklaron kulpigante pri la malfruo ilian preferatan *propekan kapron*: min. Laŭ la grupo, la liberigo de la ostaĝoj estis sabotita far "intensaj militaj operacoj en la areo", do la livero sub tiaj cirkonstancoj metus la vivojn de ĉiuj en "gravan danĝeron". "Tuj kiam ni trovos sekuran lokon", ili finis, "ni ebligis la revenon de Clara, Emmanuel kaj Consuelo".

La membroj de la delegitaro kaj la plej ampleksa internacia komunumo forte kondamnis tiun faron de la FARK. Tamen, kelkaj eksterlandaj amaskomunikiloj plendis: Álvaro Uribe, la malcedema militemulo, estis trudinta sian volon denove. Kaj prezidento Chávez estis kolera, li akuzis min pri "bombi" sian planon de liberigo, kaj li asertis ke la interrompo de la intrakomunikoj de la FARK estis plej probable pro radia ĵamado faritaj de usonaj fortoj agantaj kaŝe en Kolombio.

Nenio el tio estis vera. Niaj Armitaj Fortoj estis haltigintaj la precipajn militajn operacojn en la areoj kie ni kredis ke la FARK estis retenantaj la ostaĝojn, kaj pro tio, ni suspektis, devis ekzisti alia kialo kiu malhelpis ilin liveri la du virinojn kaj la infanon al la internacia delegitaro, kiel promesite.

Je ĉiu minuto kiu estis pasanta, nia informiĝfako estis atinganta pli grandan certecon pri la kialo de la prokrasto.

La situacio atingis tian proporcion, ke mi estis devigita interveni. Nia Alta Komisiito pri Paco, Luis Carlos Restrepo, laborema kaj

honesto homo, telefonis min el Villavicencio por demandi ĉu mi povus iri urĝe kaj refuti la akuzojn kiuj estis faritaj kontraŭ ni. Mi nuligis mian kutiman vojaĝon, en kiuj mi pasigis la 31-an de decembro kun la soldatoj —ironie, tiujare mi planis iri al la Montoj de Maria— kaj mi flugis al Villavicencio kun la ministro pri Defendado Juan Manuel Santos, kaj la generalo Mario Montoya. Kiam ni alvenis, ni estis persekutitaj far reprezentantoj de la amaskomunikiloj kun indignaj demandojn pri kial ni "sabotis" la liberigon.

Ni renkontiĝis kun la internacia delegitaro en malgranda ĉambro sen la ĉeesto de ĵurnalistoj. Unue, la generalo Montoya certigis la ĉeestantojn, ke la Armeo ne estis realiginta ajnan operacon kiu estus frustrinta la liberigon. Poste mi parolis, kaj eksplikis al la delegitaro nian teorion pri kio vere estis okazinta.

—Ni kredas ke la FARK ne liberigis la ostaĝojn —mi diris—, simple ĉar ili nun ne havas sub sia gardo la infanon Emmanuel.

Ekestis silento, kaj poste la eksprezidento Kirchner esprimis tion kion multaj estis pensantaj:

—Se tio estas tiel, ni restas kiel stultuloj!

21

Ekde la momento en kiu li naskiĝis, Emmanuel estis problemo por la FARK. Pro la traŭmatoj suferitaj dum la brutalaj cirkonstancoj de lia naskiĝo, la infano malsaniĝis ofte. Li ploris kaj plendis senĉese, kaj la teroristoj kovris lian buŝon aŭ igis lin ingesti sedativon kiam ili marŝadis dum kelkaj horoj por malhelpi ke iu ajn armea patrolo, kiu povus esti en la areo, aŭdi la kriojn. La brako de Emmanuel, frakasita dum la malbona cezara operacio, neniam saniĝis tute. Kaj kiam la infano aĝis ok monatojn kaj li estis trafita de severa leŝmaniozo, la FARK tediĝis de tia situacio.

Spite la kriojn de la infano kaj la malĝojon kaj koleron de Clara Rojas, komence de 2005 la FARK prenis la infanon Emmanuel kaj transdonis lin al kamparana familio en El Retorno, vilaĝo sude de la lando. Ili diris al la tiuhejma patro ke iun tagon ili revenos por repreni la infanon kaj ke, en la intertempo, la patro devus ŝajnigi la infanon kvazaŭ sia nevo. Tiam la infano fariĝis konata per la nomo Juan David Gómez Tapiero.

Emmanuel tiam ne plu estis en la ĝangalo, tamen lia sano ne pliboniĝis, malmultaj monatoj poste, la "onklo" portis lin al proksima kliniko, el kie li estis sendita al hospitalo en la urbo San José del Guaviare¹. La kuracistoj estis tiom indignintaj pro la progresinta subnutrado de la infano, pro la ulceroj sur lia vizaĝo kaj pro la vundoj en lia brako, ke ili transdonis lin al flegado far la Ŝtato. Estigante la hororon de la "onklo", al kiu la FARK estis ordonintaj zorgi la infanon eĉ koste de la propra vivo, Emmanuel estis sendita al unu hejmo de la Kolombia Instituto por Familia Bonstato (ICBF) en Bogoto. Neniu el la lastaj koncernitoj —la kamparana familio, la kuracistoj, la ICBF— konis la veran identecon de la infano, aŭ ke la tuta lando estis serĉanta lin.

Aldone al la informoj de Jhon Frank Pinchao, nia sekuriga agentaro jam delonge suspektis ke unu el la ostaĝigitaj virinoj estis naskinta. Pluraj jaroj antaŭe, unu armea patrolo estis malkovrinta tendaron de ostaĝoj kiu havis infanlilon. Crikulis ebloj pri kiu povus esti la patrino, ĝis kiam ni kaŝaŭskultis radiomesaĝojn de la FARK en kiu unu interparolanto diris ke Clara Rojas fariĝis

1 NT Ĉefurbo de la departemento Gŭavjaro.

"nestabila" post kiam ŝi estis apartigita disde sia filo. Ĉi tio donis al ni du ŝlosilajn pecojn de informo: la veran identecon de la patrino de la infano kaj la eblo ke Emmanuel ne plu estis sub reteno far la FARK.

Niaj informiĝ-agentoj estis plibonigintaj rimarkinde siajn atingivon kaj rafinitecon en la jaroj pasintaj ekde kiam mi estis prezidentigata, kaj danke al ilia senlaca laboro, meze de 2007 ni akiris ege gravan informon: la ĉesto, en unu hejmo de ICBF en Bogoto, de infano kun problemoj en lia maldekstra brako, kies priskribo ŝajnis egala al tio kion ni havis pri Emmanuel. Du el niaj agentoj, ŝajnigante sin kiel juna paro, luis domon fronte al la hejmo por observi la infanon. Tamen ni ankoraŭ ne estis tute certaj pri lia identeco: unuflanke, en videajo diskonigita far la FARK tiutempe kiel pruvaĵo pri supervivo, unu el la ostaĝoj asertis ke Emmanuel estis portita sur siaj ŝultroj dum la longaj piediradoj (poste ni konkludis ke tiu aserto estis strategio de la FARK); aliflanke, unu esenca demando ankoraŭ ne havis respondon: kial la FARK estis proponinta liberigi la infanon Emmanuel se ili ne havis lin en sia posedo?

La ministro Juan Manuel Santos diris en sia libro *Ŝakon al la Teroro*, ke tiu ĉi okazintaĵo estis nediskutebla pruvo pri la perdo de "komando kaj kontrolo" flanke de la gvidantaro de la FARK. Tio veras: niaj militaj ofensivoj kaj la kaŝkaptaj per informiĝlaboro metis la grupon FARK sub konstanta premo kaj interrompis ĝian kapablon intrakomunikiĝi. Tiamaniere klariĝas kial la estroj ne sciis, ke Emmanuel ne plu estis en sia posedo aŭ ke ili ne plu havis aliron al li. Ankaŭ eblas ke, anoncinte lian liberigon, la FARK fidis pri sia kapablo por rekuperi la infanon negrave kie li troviĝis. Kial ajn, dum la eksterlandaj observantoj komencis alveni al Villavicencio, ni eksciis ke la "onklo" el la malgranda vilaĝo El Retorno estis senespere serĉante en la adoptaj hejmoj en Bogoto, en kiuj li diris ke FARK estus mortigonta lin, se li ne trovus la infanon tuj. Ni ankaŭ povis detekti en la urbo la ĉeston de membroj de la FARK kun la sama misio.

Jam tiam ne plu povis ekzisti ajna dubo: "Juan David" estis Emmanuel.

Post mia kunsido kun la fremda delegitaro, mi eliris, kaj malkaŝis kion mi sciis al la ĵurnalistaro:

—La teroristoj ne kuraĝis plenumi siajn promesojn ĉar ili ne havas la infanon —mi diris al la mirigitaj ĵurnalistoj—. La terorisma grupo FARK havas neniun ekskuzon. Ili estis trompintaj Kolombion kaj nun ili volas trompi la internacian komunumon.

La farso estis elmontrita. La eksa prezidento Kirchner kaj pluraj observantoj revenis al siaj landoj tiun saman tagon. Ekzistis, tamen, tiu kiu, dum li eniĝis en la aviadilon por reveni, ankoraŭ serĉis la manieron por diri ke ĉio estis kulpe de nia registaro:

—Kia honto por Kolombio! —Oliver Stone diris al ĵurnalistoj—
Kia honto por Uribe!

Malgraŭ ĉi tiaj izolitaj voĉoj, la epizodo pri Emmanuel malkaŝis la veran naturon de la FARK fronte al la okuloj de la internacia komunumo kaj la trompo estis evidenta por ĉiuj. Dek tagojn poste ili liberigis sinjorinojn Clara Rojas kaj Consuelo González sen delegitaro kaj sen fanfaro: nur kun paro de venezuelaj funkciuloj kaj la Internacia Ruĝa Kruco. Du laboratorioj, unu en Kolombio kaj alia ekster la lando, realigis testojn de ADN por pruvi ke Emmanuel estis la vera filo de Clara Rojas, kaj kelkajn tagojn poste, la mondo ĝojis vidante kunajn la patrinon kaj la filon. La disigo estis daŭrinta preskaŭ tri jaroj.

Liberiginte sinjorinon Clara Rojas, la FARK provis reakiri iom da kredindeco. Tamen ili malsukcesis. La fatalan baton kiu estis sekvonta donis al ili ne la registaro sed la kolombia popolo.

22

En 2008, en la lando jam estis okazinta granda transformiĝo: unuflanke, la kolombianoj ne plu timis la grupon FARK, kaj aliflanke, la kazo de Emmanuel, la eskapoj de Jhon Frank Pinchao kaj Fernando Araŭjo, kaj la signifa pliboniĝo en la sendangereco de Kolombio estis kombiniĝintaj por produkti grandan ŝanĝon en la maniero en kiu la mondo rigardis nian landon.

Inter la pli junaj generacioj de Kolombio, la timo estis anstataŭita de io alia: naŭzo kaj malakcepto. Per la uzado —relative nova— de Facebook, junulara grupo organizis marŝon nomata "Unu miliono da voĉoj kontraŭ la FARK". La celo ŝajnis nerealigebla revo. Tamen, en unu el la unuaj mondaj elmontroj pri kiel la sociaj komunikiloj povas speguli kaj mobilizi la popolan volon, la famo disvastiĝis rapide. Multaj homoj sentis sin altiritaj pro la nepolitika origino de la marŝo kaj pro ĝia eleganta kaj kondamna slogano: "Ne pliaj kidnapoj. Ne pliaj mensogoj. Ne pliaj mortoj. Ne plu FARK".

La lundon 4an de februaro de 2008, la manifestaciantoj eliris sur la stratoj en Kolombio kaj en la mondo, por esprimi sian opozicion al la FARK. En lokoj tiel malproksimaj kiel Japanio kaj Aŭstralio, la manifestaciantoj spitis temperaturojn sub nul celsiaj gradoj. En Kolombio, la personoj plenigis la stratojn: ili svingis flagojn kaj surportis blankajn T-ĉemizojn kiuj estis surprisitaj kun la slogano de la marŝado. Ĝi estis unu tuta nacio unuiĝinta en unu sola mesaĝo. Fakte, la partopreno estis amasega: milionoj da homoj eliris por manifestacii.

Mi partoprenis en la marŝado meze de la homamaso kiel ajna alia kolombiano. La sorto volis ke tiam mi troviĝis en Valledupar, tiu urbo en la nordo de la lando kiu estis ruinigita de la violento, kaj la unuan kiun mi vizitis post mia prezidentigo. Ankaŭ tie, la situacio estis ŝanĝita: anstataŭ resti timigitaj kaj silentaj en siaj hejmoj, kiel okazis en 2002, la loĝantoj de tiu urbo eliris sur la stratojn.

Je la fino de la tago, mi dankis la manifestaciintojn de la tuta mondo pro ilia aliĝo al "ĉi tiu ĉeno de spirita energio kontraŭ kidnapo kaj la krimo".

La drogŝakristoj teroristoj neniam antaŭe estis troviĝintaj en pli fragilaj kondiĉoj. Ili estis milite malfortigitaj, ilia mistiko estis malaperinta kaj la tuta lando unuiĝis kontraŭ ili. Tia estis situacio kiu kelkajn jarojn antaŭe neniu kuraĝus imagi.

Tiam la lasta paŝo dependis de ni.

SESA PARTO

Lojaleco

“Ĉesis la horora nokto”

Nacia Himno de Kolombio

1

Meze de 2007, la ĉefa provizanto de nutraĵoj, brulaĵoj kaj aliaj produktoj por la FARK en la sudo de Kolombio estis ... la kolombia Registaro.

Danke al la eksterordinara laboro de la DIPOL —nia Informiĝada Agentejo de la Nacia Polico—, estis sukcese enfiltriĝinta en preskaŭ la tutan ĉenon de provizado de la t.n. 48-a Fronto de la FARK. Dum la paso de kvar jaroj estis konstruitaj provizejoj kaj doko, estis aĉetitaj rapidaj boatoj, kamionoj, entreprenoj de distribuado kaj bienojn en la areo proksime de la landlimo kun Ekvadoro. Estis instalitaj en la regiono mikrofonoj, kameraoj, sekretaj aparatoj por spurado kaj aliaj avangardaj teknikaĵoj.

Pli ol dekduo da kaŝitaj agentoj estis lokitaj, konstante, en la areo. Ili ŝajnis esti komercistoj, stiristoj de ŝipoj kaj laborantoj de aliaj metioj. La plenaj detaloj de ilia laboro neniam estis malkaŝitaj al la publiko, sed ĝi estis preskaŭ heroa, kaj kelkaj el ili pasigis pli ol tri jarojn tie. Ili estis precipe koncentriĝantaj pri la perhoma informiĝado: ili varbis fontojn tre zorgeme, ili kompiladis informojn kaj sendis ĉi tiujn al la kontrolo centralo por revizio. Baldaŭ poste, ni havis pli ol ducent civiluloj kiu havigis informojn. Por determini ilian verdirecon, ĉiu el ili estis sekrete testitaj per mensogdetektilo. Tra miksaĵo de malnovaj kaj novaj teknologioj —inkluzive sekretajn kodojn en libroj kaj revuoj—, la agentoj transdonadis la rezultojn kaj aliajn informojn al la centra komandejo.

En Bogoto, la agentoj de DIPOL laboris tage kaj nokte por procezi la datumojn kiuj devenis el tiu regiono, datumoj kiujn ili kompletigis pere de pli ol okcent intervjuoj kun membroj de la FARK malmobiliziĝintaj, kaptitaj aŭ kiuj ekde kelka tempo antaŭe estis forlasintaj la vicojn de la organizaĵo. Pli ol 75.000 pecoj de informo estis analizitaj ĝisfunde.

La sola celo de ĉi tiu masiva operaco estis la kapto de Luis Edgar Devia Silva, alinomita "Raŭl Reyes", la dua ĉefo de la FARK kaj, kio estis eĉ pli grava, la guruhoo de la interna komunikiĝo de tiu grupo.

2

Reyes estis la ŝlosilo. Se ni estus atingonta lin, ni estus allasonta mortigan baton al la funkcia kapablo de la FARK kaj eble —nur eble — ni estus malbarontaj la vojon por la rekupero de tiuj ostaĝoj nomitaj "altvaloraj", inkluzive de Ingrid Betancourt kaj la tri usonanoj.

Raúl Reyes estis konita de la kolombia popolo ekde pli ol unu jardeko antaŭe. Li estis unu el la plej rimarkeblaj membroj de la FARK dum la porpaca procezo de la antaŭa registaro, kaj li estis konata pro sia obstina obstrukco al la progreso de tiuj intertraktoj kaj pro siaj deklaroj por pravigi la kidnapadon kaj la drogotrafikon. Li aludis al la kidnapitoj kiel "retenitoj", kaj al la elaĉeta pago por ilia liberigo kiel "milita imposto". Li ankaŭ estis konsiderata kiel ebla posteulo de la alinomita Manuel Marulanda, la supera ĉefo de la FARK, kiu aĝis pli ol sepdek jarojn kaj kies sano estis malfortika, laŭ pluraj raportoj. La perspektivo de la nova generacio, kiu estus prenonta la povon ene de la FARK ne esperigis al ni ajnan plibonigon: Reyes estis parto de malcedema frakcio kiu ne havis interesigon pri paco; tiel li manifestis en 2003, kiam li diris ke la FARK nur estis atendantaj finiĝon de nia regado. Dum Reyes kaj aliaj kiaj li daŭros liberaj, la FARK daŭre estos serioza minaco al la paco en Kolombio.

"Post kvardek kvar jaroj da luktado, la sekretariato de la FARK, konsistigita de sep viroj, restis netuŝita kiel malvirta pastro", skribis la usona ĵurnalisto John Otis en *Law of the Jungle*, libro pri nia lukto kontraŭ la teroristoj. "Kaj kun Manuel Marulanda kaj la ceteraj el siaj supraj komandantoj ordononate, la FARK, kvankam difektitaj, ŝajnis povi postvivi kaj revigliĝi".

Ekzistis alia motivo, eble pli grava, por trovi la teroriston Reyes: lia rolo en la komunikada strukturo de la FARK. Meze de la 2000-aj jaroj, Reyes estis la kanalo por preskaŭ ĉiuj gravaj internaj komunikoj de la grupo. Li estis kiel meza punkto en la triangulo: se la diversaj "frontoj" de la FARK volis komunikiĝi inter si, kutime ili faris tion tra Reyes; se Marulanda kaj la cetero de la "sekretariato" volis sendi ordonojn al la teroristoj en ties operatejoj, ili ĝenerale faris tion tra Reyes. Pro tio, ni kredis ke la fakto malaktivigi la teroriston Reyes estis kondukantaj nin al la frontoj kiuj havis la

ostaĝojn kiel Ingrid kaj aliajn. En la plej malbona kazo, la fakto eltiri lin el lia tendaro farus ke la internaj komunikoj de la FARK venu en totalan kaoson.

En decembro de 2004 mi faris decidon, kiu povus esti malhelpinta la faligon de Reyes. Ni ricevis informon pri ke pluraj ĉefoj de la FARK estis kunvenontaj en domo en Kito, Ekvadoro. La FARK moviĝis konstante en la ĉefurbo de Ekvadoro, kie ili posedis plurajn negocojn per kiuj ili faris monlavadon el ŝakrado de drogoj. Nia informiĝfako eksciis, ke Reyes estis ironta al tiu domo akompanata de Juvenal Ovidio Ricardo Palmera Pineda, alinomita "Simón Trinidad". Kiel Reyes, Trinidad estis antaŭe unu el la ĉefaj intertraktantoj de la FARK dum la porpaca procezo. Kiam ilia farso kolapsis, Trinidad rekomencis sian agadon kiel unu el la plej senkompataj kidnapistoj kaj drogŝakristoj de la organizaĵo —kun speciala zorgo, jarojn antaŭe li terurigis en Valledupar, lia naskiĝurbo—. Li estis filo de familio ligita al la agrikultura sektoro kaj estis studinta kelkajn sesmonatojn da ekonomiko ĉe Harvard. Usono estis serĉanta lin pro multnombraj akuzoj pri internacia drogtrafiko. Ni kunordigis kun ekvadoraj sekurigaj fortoj por aresti ilin.

Je la lasta minuto mi ricevis urĝan telefonvokon el generalo Jorge Daniel Castro Castro, unu el niaj plej bonaj komandantoj de la Polico.

—Prezidento —li diris—, Trinidad estas en la domo, tamen ankoraŭ neniuj signoj pri Reyes! Ĉu ni atendas aŭ ĉu ni efektivas la kapton?

Ni estis maltrankvilaj por tio, ke Trinidad estus sukcesonta eliri el la domo se ni estus atendantaj tro longe.

—Pli bone alporti malgrandan fiŝon ol neniun —mi diris al la generalo por ke ili kaptu la alinomitan Trinidad.

Danke al la laboro de la ekvadoraj sekurigaj fortoj kaj al la registaro de Alfredo Palacio, kiu ĉiam kunlaboris kun niaj penoj por kontraŭbatali terorismon, la operaco estis sukcesaĵo. La ekvadora registaro deportis la alinomitan Trinidad al Kolombio en nur horoj. Kiam li estis en nia gardo, mi proponis ke mi detenus min de ekstradicii lin kaj alian aktivulinon de FARK konita per la nomo "Sonia" —kiu estis arestita en la ĝangalo far nia komanditaro—, se la FARK akceptus liberigi la ostaĝojn. Ni ne atingis respondon, do ni sendis ilin ambaŭ al Usono, kie ili estis juĝitaj kaj kondamnitaj.

La kapto de Trinidad estis triumfo por ni, kaj forta bato al la agadoj de la FARK. Tamen, iom pli ol tri jarojn poste, Reyes ankoraŭ ne estis kaptita far ni.

Danke al la peniga laboro de nia informiĝfako, ni sciis la ĝeneralan situon de Reyes: li estis en suda Kolombio kaj li estis moviĝante senĉese de flanko al flanko de la landlimo kun Ekvadoro. En almenaŭ kvar okazoj, niaj Armitaj Fortoj estis lanĉintaj specialajn operacojn destinitaj al lia kapto, sed Reyes estis tre bone protektita. Kiel ĉiuj gvidantoj de la FARK, li moviĝis senĉese, kaj kiam li mallonge lokiĝis ie, li instaligis multnombrajn "satelitajn" tendarojn en la ĉirkaŭaĵo por certigi sian protekton. Penetri tiujn sekurigajn ringojn kaj identigi la ĉefan tendaron estis tre malfacila tasko. Ni faris aerajn atakojn, sensukcese. En unu misio, ni postenigis kaŝpafistojn en la arboj, pretaj por faligi lin kiam li preterpasus. Tamen, ni havis la malbonan sorton, ke kelkaj el liaj gardistoj pasis sub arbo kie unu el niaj viroj estis kaj eltrovis lin. Okazis pafado kaj Reyes eskapis. Alia operaco lasis kiel rezulto la morto de kapitano de la Armeo, pafita far unu el la sbiroj de Reyes.

Ĉi tiuj operacoj estis tre malfacilaj por la membroj de niaj Armitaj Fortoj kaj ankaŭ por nia registaro. Nur malmultaj personoj konis la kvanton da homaj vivoj kaj rimedoj kiun ni destinis por venki tiun ĉi viron. Nia malsukcesaj provoj estis ankaŭ ege dolorigaj por niaj agentoj de informiĝlaboro situantaj en tiu areo: ili pasigis plurajn jarojn en la ĝangalo, kun falsa identeco kaj ili ne povis malkaŝi sian veran identecon. Ilia sufero estis tiel granda, ke niaj ĉefoj de la informiĝfako de la Polico vizitis ilin ofte por certigi al ili ke ili estis farante grandan servon al nia lando kaj ke iliaj klopodoj estis baldaŭ fruktontaj.

Ili pravis.

3

Reyes pasigis multajn jarojn fuĝante, li tre sukcese evitis kelkajn el la soldatoj kaj agentojn de informiĝado plej bone trejnitajn de la planedo. Tamen, ekde 2002 niaj Armitaj Fortoj kaj informiĝservoj estis enorme pliboniĝintaj kaj, finfine, Raúl Reyes estis homo el karno kaj sango. Li ne havis ŝancon kontraŭ unu Nacio memfida, uniĝinta kontraŭ la FARK kaj kiu aktive laboris por malmunti ilin.

Ni sciis, do, ke Reyes moviĝadis inter pluraj tendaroj en la landlima zono kun Ekvadoro. Unu homo el nia kreskanta listo de informantoj avertis nin ke en la lastaj monatoj Reyes estis uzante unu "specialan" tendaron por ricevi vizitantojn: ĵurnalistojn, studentojn, eksterlandanojn kaj aliajn kiuj aŭskultadis liajn longajn predikojn pri la "virtoj" de la ideologio kaj metodoj de la FARK, al kio kelkaj vizitantoj aldonis la ricevon de trejnado en la uzado de eksplodaĵoj. Unu vizitanto priskribis la tendaron de Reyes kiel "oficejo de publikaj rilatoj de la FARK". Ĝi estis, resume, tio plej simila al fiksa bazo de operacoj kion havis la FARK.

En frua 2008, grupo de vizitantoj alvenis al la tendaro preferita de Reyes. Unu el ili laboris por ni. Li portis specialan aparateton por identigi la frekvencon de la signalo uzita de Reyes por komunikiĝi kun siaj kolegoj de la FARK kaj ĝi estis aktivigita je la eniro en la tendaro. Ekde tiam, ĉiufoje kiam la ĉefo parolis kun la ekstera mondo, ĝia signalo estis por ni kiel lumturo.

Danke al tiu eksterordinara laboro de niaj informiĝservoj, nun ni havis la ĝustan lokon kie Raúl Reyes troviĝis. Tio estis historiiga atingo. La komandantoj de la Armeo kaj de la Polico kaj la ministro Santos sciigis al mi la novaĵon, kaj petis permeson por lanĉi aeron atakon. La misio ŝajnis sekura kaj kun eta risko, tamen, ekzistis unu fundamenta detalo: inter la pluraj tendaroj de Reyes, ambaŭflanke de la landlimo, la koncerna tendaro troviĝis sur la ekvadora flanko, je mallonga distanco de Kolombio.

4

La sciigo pri la situo de Reyes ne estis surprizo: ekde pluraj jaroj antaŭe, la landlimo kun Ekvadoro estis areo kun multaj problemoj. La precipa estis la trafiko de drogoj kaj la nelicaj kultivaĵoj.

Dum la dua duono de nia prezidenteco, kiam ni estis atingintaj redukti la kidnapadon en la tuta kolombia teritorio, la FARK pliigis sian dependecon de la kultivado kaj ŝakrado de drogoj por akiri enspezojn. Fariĝis necese, tiam, pliigi niajn penojn por neniiĝi la kultivaĵojn: kiel en aliaj kokao-produktaj regionoj en nia lando, ni entreprenis impetan agrogramon de aera herbicido-ŝpruco por elradikigi ilin en la kolombia flanko de la limo. Tiuj ŝprucoj provokis plendojn de la ekvadora registaro kiu timis —laŭ ili diris— mediajn damaĝojn kaŭzitaĵ de kemiaĵoj portataj far la vento sur sia suverena teritorio. La scienca pruvo estis kontraŭ tiuj argumentoj. Tamen, pro nia sola intereso konservi la amikecon inter niaj landoj, ni cedis al la deziroj de la prezidento Palacio kaj ni detenis nin de ŝpruci sur unu kolombia strio kvin kilometrojn larĝa, laŭlonge de la landlimo. Unu jaron poste, tiu strio da kolombia teritorio estis plenigita de plantoj de kokao kaj ĝi fariĝis unu el la ĉefaj areoj de la mondo kun nelicaj kultivaĵoj. Mi telefonvokis la prezidenton Palacio kaj diris al li ke mi ne havis alian alternativon ol rekomenci la ŝprucadon. Li ne ŝatis nian decidon, tamen, ni procedis kun plena travidebleco.

En januaro 2007 —unu jaron antaŭ ol trovi la lokon kie Reyes estis—, Rafael Correa estis farata prezidento de Ekvadoro. Juna ekonomikisto aĝinta nur kvardek tri jarojn, li ŝajnis preta sekvi la vojon entreprenitan far prezidento Chávez. Dum la unua raŭndo de la porprezidenta kampanjo, li deklaris ke la FARK ne estis terorisma grupo. Li eĉ diris ke la ekvadora norda landlimo ne estis kun nia registaro sed kun la FARK. Li konstante aludis la violenton en Kolombio, sed pri ĝi li nur kulpigis la kvazaŭarmeanojn. Provokaj deklaroj kiuj pensigis kelkajn moderajn ekvadoranojn ke li estis radikala maldekstristo, motivo kial dum la dua raŭndo de la elektado Correa mildigis iomete sian diskurson. Tamen en Kolombio ni estis vidintaj kaj aŭskultintaj sufiĉe por maltrankviliĝi. En unu Registara-Komunuma Kunsido en Putumayo, apud la landlimo kun Ekvadoro, mi adresis rekte al la prezidonto Correa: mi ripetis kial la FARK estis terorisma organizaĵo, kaj mi argumentis ke la kolombia

demokratio ne povis akcepti ke li licigu la grupon FARK en liaj diskursoj. Zorgigis nin ke Kolombio estis baldaŭ kaptota inter du registaroj kiuj simpatiis kun tiu terorisma grupo.

Kiel mi jam faris antaŭe kun la prezidento Chávez, mi faris montron de paco al la elektita prezidento Correa, esperante gajni lian konfidon kaj kunlaboron en aferoj de sekureco. Kelka tempo antaŭ lia prezidenta enoficiĝo, ni renkontiĝis ĉe la enoficiĝo de Daniel Ortega en Nikaragvo; tie, la elektita prezidento de Ekvadoro demandis min pri la herbicida ŝprucado, kaj malgraŭ nia antaŭa sperto (kiam ni haltigis ĝin en dek kilometroj de nia landlima strio) kaj kiel monro de frateco kaj amikeco inter niaj nacioj, mi respondis ke ni estis farontaj unu lastan rondon de ŝprucado kaj poste ni ĉesigos ĝin.

La alternativo al aera ŝprucado estis la mana elradikigo: kolombiaj trupoj estis irontaj al areoj de kultivado por protekti la civilulojn al kiuj estis taskita la detruo de la kokao-plantoj. Facile dirita, malfacile farebla: la posedantoj de la kokaino ne estis ordinaraj homoj, ili estis la FARK.

Iom da tempo post la komenco de la la mana eliminado, la trupoj estis atakitaj: bandoj de tiu grupo kiuj agadis en la ekvadora flanko de la landlimo faris ekprenetrojn el siaj tendaroj, atakis niajn soldatojn kaj tiam ili rifuĝis en la "sekurecon" de Ekvadoro. Ĉi tiuj atakoj estis ripetitaj multfoje. En unu el tiuj ni perdis du dekduojn da homoj. Mi prenis sur min la malĝojan devon vojaĝi al la landlima regiono por ricevi la kadavrojn.

Plurfoje ni petis al la registaro de prezidento Correa helpo por pli efektivan kontrolon ĉe la landlima zono, sed ni nur atingis kiel respondo la silenton aŭ la deklaron —ripetita foje kaj refoje— ke la violento en la areo estis problemo ekskluzive kolombia.

Ĉi tia estis la cirkonstancaro de niaj rilatoj kun Ekvadoro, kiam ni eksciis ke la tendaro de Reyes estis en ĝia teritorio, nur kelkcent metrojn preter nia landlimo. Li sentis sin tiom sekura, ke li invitis kaj akceptis homojn el la tuta mondo, konvinkita ke li estus netuŝebla dum li restus en tiu lando. Se ni havintus la kunlaboron de la registaro de Kito por atingi la regionan sekurecon, ni petintus al ĝi helpo por ke Reyes estu arestata kiel okazis kelkajn jarojn pli frue pri Simon Trinidad, en la antaŭa registaro de Ekvadoro. Sed jam ne estis tiel. Kaj estis evidente ke, se ni farintus la peton, tre probable Reyes estintus avertita.

Publike kaj en private mi ĉiam diris, ke ni persekutos la teroristojn, ne gravas kie ili troviĝas. Kaj ĉi decido de nia registaro estis klara por la publika opiniantaro nacia kaj internacia: tri jarojn antaŭe tion estis pruvinta la kazo de Rodrigo Granda. Ni konservis la esperon, ke ĉi tiu epizodo utilu al la FARK por ĉesigi la rifuĝadon en apudaj landoj, sed bedaŭrinde ne okazis tiel. Kaj Reyes estis ulo pli grava ol "Granda": li estis fundamenta por la armitaj krimaj operacoj de la FARK kaj por la kontrolo sur la ostaĝoj. Plie, ni estis certaj pri observi unu feran regulon de nia administrado: ne riski senkulpajn civilulojn en niaj aeraj atakoj, pro tio, ke la tendaro de Reyes estis en izolita areo ĉe la ĝangalo. Fine, ĉio indikis ke ni povus lanĉi atakon sen ke niaj aviadiloj estis devigotaj forlasi la kolombian aerspacon.

Tiel, do, la plej granda risko estis en la diplomatia kampo. Kelkaj el miaj kunlaborantoj, inter ili la ministro pri Defendado Santos, prezentis siajn dubojn pri la operaco, pro la eblo krei kverelon kun nia najbaro. Mi rememoris la konsekvencojn de la kazo pri "Granda" kaj la malfacilaĵojn por atingi ke la rilatoj kun Venezuelo revenu al relativa normaleco. Estis evidenta la graveco subteni bonajn rilatojn kun ĉiuj landoj kaj, precipe, kun niaj regionaj partneroj; tamen ĉi tie ni estis denove: unu el niaj najbaroj loĝigis kolombiajn teroristojn en relative malferma maniero kaj kun la ebla kompliceo de kelkaj agentoj de la ekvadora Ŝtato. Situacioj kiel tiu ĉi ne povos pluekzisti, kaj se necesis alia maldolĉa alfronto por malaktivigi tiun murdinton kaj atingi pli da respekto por la sekureco de Kolombio en la longa tempo, ĉi tiel devus esti. Mi rememoris frazon de Ŝekspiro: "Ĉielo tiel ŝarĝita ne klariĝas sen ŝtormo".

Unu plian fojon mi diskutis la detalojn de la aera atako kun la komandantoj de la Armeo kaj ni pesis ĝiajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Temis pri operaco kiu estis faligonta unu el la teroristoj plej serĉitaj ne nur en Kolombio, sed en la tuta mondo, kaj ĝi povus doni al ni unu vojon al la ostaĝoj, kiuj estis pasigintaj pli ol kvin jarojn en kaptiteco. Nia informiĝado estis bonega. Niaj militaj kapabloj estis ĉe la postulata nivelo.

Procedu —mi diris al la generaloj—. Procedu sub mia responso.

5

Nokte, je la dek-dua kaj dudek minutojn mi faris la unuan telefonvokon al generalo Padilla:

—Ni ĵetis la bomboj, Prezidento —li diris.

—Tre bone, generalo.

Mallonge poste mi ricevis telefonvokon:

—Ni trafis la celon. La unuaj raportoj indikas ke la operaco estis sukcesa.

—Tre bone, generalo.

Post kelkaj minutoj kaj post nova konversacio kun la generalo Padilla, mi parolis kun la Ministro Santos, kiu diris:

—S-ro Prezidento, ni bezonas vian permeson por eniri la teritorion de Ekvadoro kaj kontroli la rezultojn de la operaco.

Tio estis alia risko, kaj eble pli granda: kvankam ĝi estis misio esplorrigarda, ne batala, la kolombiaj specialaj fortoj enirus al ekvadora teritorio. Aliflanke, ni estis devontaj scii kun certeco ĉu Reyes mortis aŭ ne. La momento ne taŭgis por rezigni, do mi donis la permeson.

Atendante novan telefonvokon, mi restis en mia domo en Rionegro, kie mi estis alveninta ĉirkaŭ noktomeze. Mi imagis la lokon, kie la krimuloj estis, kaj la aspekton kiun ĝi devus havi tiumomente: tendoj kaj ĝangalo. La tendaroj sur la ĉirkaŭaĵo de Reyes estus infero el paniko kaj konfuzo, kelkaj senrangaj gerilistoj kurus al la scenejo kaj se Reyes ankoraŭ vivus ili provus savi lin. La ĉefa tendaro estus ĉirkaŭvolvita en flamoj kaj fumo, ekzistus rubo kaj rompitaĵoj disĵetitaj, disbatitaj arboj en la planko kaj komputiloj.

Ja, la komputiloj de Reyes.

La rompitaĵoj, la flamoj kaj la komputiloj alportis la memoron de tiu decembro de 1992, kiam mi estis unu paŝon proksime de perdi la vivon pro la bombo metita far la FARK en la Hotelo Orquídea Real, kaj mia portebla komputilo estis postvivinta sendamaĝe la eksplodojn. Ankaŭ okazis same kiam ni plenumis la atakon —kun armiloj de alta precizeco— kontraŭ Tomás Medina Caracas,

alinomita la "Negro Acacio": post la fino de la operaco, liaj komputiloj plue funkciadis. En tiu kazo, la informaĵoj trovitaj ne pruviĝis tre utila. Tamen ĉi-foje la afero temis pri Reyes, la ŝlosila viro de ĉiuj komunikiĝoj de la FARK.

Kiam la generalo Padilla telefonis min, mi faris eksplicitan peton:

—Generalo, estas tre grave ke vi diru al niaj viroj, ke ili serĉu la portebajn komputilojn. Se trovitaj, ili devas esti portataj al Kolombio!

—Komprenite, Prezidento!

6

Proksimume je la tria horo frumatene mia telefono sonoris denove.

—Prezidanto —diris la ministro Santos—, Mi povas informi vin ke Reyes estis senvivigita.

—Dankon, Ministro —mi respondis.

Mi tuj pensis Pri la ceteraj gvidantoj de la FARK kaj demandis:

—Kaj la "Mono Jojoy"? Kiam li falos?

7

La unua telefonvoko kiun mi faris tiutage, ĝuste post tagiĝo, estis al la prezidento Correa.

Dum tion mi faris, niaj fortoj estis ankoraŭ en Ekvadoro, ĉar kvankam la distanco estis relative mallonga, la reveno al la lando estis tre malfacila pro la denseco de la ĝangalo. Mi esperis, per mia frua alvoko al la Prezidento Correa —antaŭ ol la novaĵo pri la operaco estis diskonigita—, turni min al lia demokratia sentemo kaj tiumaniere limigi, ĝis kiom eblis, la ŝokon kiu estis venonta.

La prezidento Correa reagis trankvile. "Mi vidas", li ripetis plurfoje. Mi rakontis al li tion kio okazis sen pritrakti detalojn. Je la fino de nia konversacio, li trankvile dankis min pro la alvoko kaj finis la komunikon. Mi rememoris, ke en la kazo pri "Granda" la prezidento Chávez ankaŭ estis tre trankvila unue, ĝis kiam la FARK kaj iliaj maldekstrismaj bazoj reagis kolere, pelante lin preskaŭ al histerio. Do, mi suspektis ke tio kion mi aŭdis el la prezidento Correa ne estus la lastaj vortoj kiujn mi estis aŭdonta el li pri ĉi afero.

Ni sekvis la kutiman procedon kiun ni uzis kiam temis pri bonaj novaĵoj por la popolo de Kolombio: la ministro Santos informis al la Nacio pri la operaco kaj la morto de Raúl Reyes. Tiun saman matenon ni lernis ke la ekvadora Armeo estis mobilizinta siajn fortojn, kaj marŝis rapide al la loko de la operaco. Bonŝance, niaj viroj sukcesis reveni al Kolombio ĝustatempe, evitinte tiel eblan alfrontadon.

Dum kelkaj horoj ĉio estis kvieta. Tamen la situacio ŝanĝiĝis kiam la prezidento Chávez enmetiĝis. Kvankam la situacio havis neniun rilaton kun Venezuelo, lia reago post la morto de Reyes baldaŭ akiris apokalipsan kaj personan tonon: La prezidento Chávez parolis tra televido kaj kondamnis la "kovardan murdon" de Reyes, kiun li konsideris "bona revoluciulo"; li pludiris, ke se la kolombiaj fortoj iam enirus venezuelan teritorion tiamaniere, li konsiderus tion "kaŭzo por milito".

—Ne pensu ke vi povas fari tion ĉi tie! —Li diris skuante fingron fronte al la kameraoj.

Tio kio sekvis estis speco de konkuro inter la prezidentoj Correa kaj Chávez, por vidi kiu el ambaŭ povus iri pli foren. La unua revokis sian ambasadoron en Bogoto, kaj la dua forpelis la personaron de nia ambasado en Karakaso. La prezidento Chávez nomis niajn agojn de "krimo de milito", kaj la prezidento Correa denunciis nin ĉar ni atakis la tendaron dum la teroristoj "dormis ... en piĝamoj". La modelo kiun ambaŭ sekvis estis tiu establita en la kazo de "Granda" far la prezidento Chávez, li tamen nun iris multe pli foren en liaj deklaroj al la televido, li ordonis la translokigon de dek batalionoj de la venezuela Armeo —inkluzive tankojn kaj aviadilojn— por la landlimo kun Kolombio. Tiam la prezidento Correa decidis mobilizi la ekvadorajn fortojn.

La alfrontado estis kreskanta. En mesaĝo elsendita tra la kolombia televido, mi klarigis al la lando kaj al la internacia publika opinio, ke nia celo estis la FARK kaj ne la frato lando Ekvadoro. Denove mi rimarkigis ke la bombado estis efektivigita en izolita areo sen civila loĝantaro, kun la sola celo malaktivigi krimulon de la plej alta danĝereco.

—Ni faris alian paŝon por venki la sangavidan terorismon, kiu kvindek jaroj antaŭe estis ideologia sed hodiaŭ ĝi estas terorismo de solduloj kaj drognegocistoj —mi diris.

Dume, la Armeo de Kolombio ricevis striktajn ordonojn por "ne movi eĉ unu soldaton al la landlimo", mesaĝo, kiun la ministro Santos elsendis publike. Nia agado estis kontraŭ la teroristoj, neniam kontraŭ la fratpopoloj de Venezuelo kaj Ekvadoro. Fernando Araŭjo —iam kidnapita far la FARK, kiun mi estis nomuminta iom antaŭe ministro pri Eksterlandaj Aferoj— laboris senlace por komuniki al niaj regionaj partneroj, ke la solaj deziroj de Kolombio estis sekureco kaj paco.

Ni neniam kredis pri tuja konflikto kun Venezuelo aŭ Ekvadoro: la popoloj de niaj tri nacioj, pacon amantaj, neniam estus permesantaj ĝin. Kaj en iu ajn kazo, ni neniam estus la agresantoj. La "tintigo de sabroj" ekkaŭzita far la prezidentoj Chávez kaj Correa estis pli unu provo regajni gvidan rolon en la okuloj de la regiono, ol aŭguro pri iu agresa ago. Eĉ nia informiĝservo sciis ke, kiam la venezuelaj soldatoj ekiris al la landlimo, la parencoj de iuj el ili petis ilin fari kelkajn aĉetojn en Kolombio, se ili povus. Tamen, dum ĉi parola alfronto kaj movadoj de trupoj, la situacio estis alte riska: iuj militaj analizistoj argumentis ke, pro la streĉoj kreitaj per la

senĉesa retoriko de la prezidento Chávez, junaj soldatoj sen multe da sperto povus perdi sian trankvilon kaj fari kelkajn pafojn.

Ja, la prezidento Chávez daŭrigis leviĝante la tonon de sia retoriko kaj siaj agoj. Li denove rimedigis la fermon de la komerco trans la landlimo, ĉar li sciis ke tio farus pli da damaĝo al Kolombio ol al Venezuelo. En sia televida programo, li oferis minuton da silento por honori la memoron pri Reyes. Li uzis lingvaĵojn kiu estis forta eĉ laŭ siaj kutimaj parolnormoj kaj li priskribis Kolombion kiel "la Israelo de Latinameriko", komento, kiun kelkaj analizistoj taksis kiel aparte malagrabla pro la kreskanta partnerecoj de la venezuela prezidento kun Hezbollah, Hamaso kaj la irana prezidento Mahmud Ahmadinejad.

—Ni ĉiuj devos pripensi —li diris—. Ĉu ni elektos militon aŭ pacon?

Fakte, la reago de la prezidento Chávez estis tiel troa, ke kelkaj homoj demandis sin publike pri la kialo de lia konduto. Laŭ informoj el amaskomunikiloj, la rusa prezidento Vladimir Putin telefonvokis prezidenton Chávez kaj urĝis lin moderigi la alfronton kaj serĉi diplomatian solvon. Prezidento Sarkozy faris la samon. Unu eksa ambasadoro de Venezuelo al Unuiĝintaj Nacioj raportis al la internacia gazetaro: "Chávez donas efikan subtenon al la drogŝakristoj teroristoj kiuj rifuĝas en Venezuelo kaj Ekvadoro, dum li diras samtempe ke demokratie elektita gvidanto de Kolombio ne povas defendi sin". Eĉ la administracio de Bush, kiu estis delonge preninta la sintenon fari kiel eble plej grandan silenton pri la agoj de la prezidento Chávez, por ne provoki lin eĉ plu, sentis sin devigita priskribi liajn agojn kiel "strangaj". Neniu komprenis kial la prezidento Chávez agis tiel neracie.

Tamen, ni en Kolombio ja komprenis lin. La prezidentoj Chávez kaj Correa eble antaŭsentis tion kio estis venonta.

8

—Uribe?

La voĉo en la telefono estis de grava kolombia politikisto. Mi ne malkaŝos lian nomon pro respekto al nia privata konversacio. Li telefonvokis min por fari peton kiun mi jam estis aŭskultinta plurfoje dum tiuj streĉigaj tagoj: mi devus kvietigi la krizon kun Ekvadoro kaj Venezuelo petante al la ministro pri Defendado, Santos, lian demision kiel ago de pento fare de Kolombio.

—Neniel —mi respondis—. Kompreneble ne. La responso pri tiu operaco estis mia kaj mia sole.

—Kaj kion se la generalo Padilla rezignus?

Temis pri la ĉefo de la Armitaj Fortoj.

—Absolute ne.

—Prezidento —li diris ĉagrenite— vi alfrontas senprecedencan krizon. Vi faris ke du apudaj landoj fermis siajn limojn kaj ili estas sur la rando de milito.

—Ni agis defende por protekti nin de teroristoj. Ni faris nenion malbonan —mi respondis.

Okazis longa paŭzo.

—Almenaŭ, Álvaro, petu la rezignon de la komandanto de la Aera Forto —li diris—. Se li demisias, vi povas diri ke tiu tuta incidento estis misuzo flanke de la Aera Forto. Tio sufiĉus por solvi la diplomatian situacion.

—Kiel vi diras —mi replikis— ke tiu rezigno povus solvi la diplomatian situacion. Tamen, ĝi farus grandan malbonon al la lando. Ni perdis la fidon de la armitaj fortoj, kaj sen ili ni ne havus sufiĉe da sekureco por lanĉi estontajn operaciojn kiuj povos eviti al ni la problemon de terorismo.

Vi faras grandan eraron —li avertis.

Ĝi estas afero de lojaleco —mi respondis—. Lojaleco ebligis al ni alveni ĝis tiu ĉi punkto kaj ĝi portos nin antaŭen.

En tiu momento mi ne rimarkis, ke tiu konversacio estis riveligonta kiel unu el la plej gravaj momentoj de mia prezidenteco. Ambaŭ la Armitaj Fortoj —kun la generalo Padilla ĉe la kapo kaj la generaloj Mario Montoya kaj Jorge Ballesteros kiel estroj de la Armeo kaj Aera Forto respektive— same kiel la Polico —gvidita far ĝia direktoro, la generalo Oscar Naranjo— realigis ekzemplan laboron por la hejmlando. Kiam mi parolis al la lando, publike mi dankis ilin kaj prenis sur min la plenan respondecon pri la diplomatiaj malfacilaĵoj.

9

Je la fino de la krizo malaktiviĝis. Sed tio ne estis pro peto de ekskuzo aŭ devigita demisio, sed pro la vortoj de Raúl Reyes mem.

La dosieroj trovitaj en la komputiloj kiujn li havis en sia tendaro estis ne nur nerompitaj, ili ankaŭ estis vera trezoro. La fiksitaj diskaj enhavis milojn da retmesaĝoj senditaj kaj ricevitaj de Reyes dum plurjara periodo. Ili montris, do, preskaŭ kompletan historian registron de la lastatempaj agadoj de la FARK: en ili ni trovis eksplicitajn detalojn pri la agadoj de ĉi tiu grupo kaj ĝiaj rilatoj kun eksterlandaj registaroj, inkluzive tiujn de Venezuelo kaj Ekvadoro, kaj pri planoj ellaboritaj kun la ceteraj ĉefoj de la FARK —inkluzive kun Manuel Marulanda— por fari plujajn atakojn kontraŭ la kolombia loĝantaro.

Pro peto de nia registaro, la aŭtentikeco de la enhavo de la komputiloj estis tuj kontrolita far Interpol. Ronald Noble, ties ĝenerala direktoro, vojaĝis al Bogoto por atesti ke la retmesaĝoj ne estis modifitaj, forigitaj aŭ ŝanĝitaj.

Kelkaj el la plej gravaj informeroj estis:

- La FARK estis negocantaj en eksterlando por atingi 55 kilogramojn da uranio por eksplodigi "malpuran bombon" kaj terori la kolombian loĝantaron.
- En la jaro 2007, la registaro de prezidento Chávez estis promesinta al la FARK proksimume 300 milionojn da usonaj dolaroj kiel senpera helpo.
- La kampanjo por prezidenteco de la prezidento Correa estis ricevinta almenaŭ 700.000 dolarojn el la FARK.
- La gvidantoj de la FARK estis kunvenintaj kun altrangaj membroj de la registaro de la prezidento Correa kaj ricevis permeson por establi konstantajn bazojn en Ekvadoro.

Tiuj pruvoj estis nedubigaj kaj akuzantaj. Ili klarigis la konduton de la prezidentoj Chávez kaj Correa antaŭ kaj post la okazintaĵo de Raúl Reyes. Unu raporto eldonita en septembro de 2011 far la Internacia Instituto por Strategiaj Studoj (IISS), sendependa organizaĵo baziĝinta en Londono, konkludis, interalie, ke prezidento

Correa estis "persone petinta kaj kontraŭleĝe akceptinta neleĝajn fondusojn el la FARK en la jaro 2006".

La fiksitaj diskoj enhavis ankaŭ informojn pri la agadoj de kontrabando de drogo fare de la FARK, pri la penado de la FARK por kaŝi la veron rilate la masakron de la assembleanoj de Valo de Kaŭko, kaj pri multaj aliaj kruelaĵoj.

La nerebatebleco de la pruvoj instigin nin al ilia publika diskonigo. Kaj la okazo prezentiĝis: la 7-an de marto de 2008, kelkajn tagojn post la operaco, la latinamerikaj prezidentoj estis ĉeestontaj al regiona pintkunveno en Sankta Domingo, Dominika Respubliko. Ankaŭ la prezidentoj Chávez kaj Correa estis ĉeestontaj. La ministro pri Eksterlandaj Aferoj, Fernando Araŭjo, ricevis mesaĝojn el diplomatoj kaj gvidantoj en la regiono en kiuj ili proponis sin por fari privatajn kunvenojn en tagoj antaŭaj al la pintkunveno, por mildigi la tonon de alfronto. Ni volis, tamen, diskonigi niajn plendojn en malfermita kaj travidebla maniero. Kaj ne pro persona rankoron aŭ deziro de publika alfronto, sed pro io pli grava: ni esperis ke elmontrinte la veron pri la FARK kaj identiginte tiujn kiuj estis kunlaborintaj kun la teroristoj, eble ni povus malhelpi estontajn kontraŭaĵojn kaj fari pozitivan kontribuon al Kolombio sekureco longtempe.

Tiu mateno en Sankta Domingo, sidantaj ĉe la tablo kun preskaŭ ĉiuj latinamerikaj ŝtatestroj, mi legis la enhavon de la retroŝtoj de Raúl Reyes. Ĉiuj aŭskultis silente, konsternitaj, kaj la kameraoj de dekoj da televidkanaloj elsendis la pintkunvenon dum ĝi estis okazanta. Mi ne levis mian voĉon nek koleriĝis. Mi simple ripetis la vortojn de Reyes: liajn leterojn al Manuel Marulanda, lian korespondadon kun diversaj homoj en Kolombio kaj en eksterlando, kaj lian priskribon de la speciala rilato kiun havis la FARK kun la ekvadora kaj venezuela registaroj. Tramonde, la spektantoj eksciis la veron pri la grupo FARK, pri ĝia malestimo por la homa vivo kaj pri la interligoj kiujn ĝi havis en la regiono.

Dum mi estis parolanta, la prezidento Correa sinkis sur sia seĝo kaj direktis al mi akran rigardon. Kiam lia vico venis, kaj sen kontentiga klarigo, li atakis min:

—Kiel malfacile estas kredi al iu kiu estis mensoginta tiom multe! —li diris.

Tamen, la vortoj de la prezidento Correa estis senutilaj: la farso estis rivelita kaj ĉiuj sciis. Dum la kunveno disvolviĝis, mi ricevis

noton el la prezidento de Honduro, Manuel Zelaya, kiu estis parto de la grupo de maldekstrismaj ŝtatestroj en la regiono. En ĝi li diris, ke prezidento Chávez estis preta por diskuti eblan interkonsenton. Dume, aliaj prezidentoj —inkluzive tiujn de Meksiko, Felipe Calderón, kaj de Dominika Respubliko, Leonel Fernández, gastiganto la pintkunveno— faris pacigajn paroladojn en kiuj ili invitis nin por konservi la unuecon de la regiono favore al la paco.

Mi akceptis la klopodojn de perado je la fino de la tago. La vero estis prezentita al la publiko kaj ni atingis niajn celojn. Fronte de la kameraoj mi manpremis kun la prezidento Chávez, kaj ni deklaris ke la alfronto estis finita. Mi sentis, ke li faris tion sincere, kaj ke li ŝajnis avida voli plu iri. Ne okazis same kun la prezidento Correa: ankaŭ ni manpremis, sed lia rigardo montris evidentan malamikecon. Ne nur en tiu okazo, sed ankaŭ en multaj aliaj, mi pardonpetis al Ekvadoro kaj mi klarigis publike ke la bombardo al la tendaro de Raúl Reyes estis eksterordinara rimedo pro nia lukto kontraŭ terorismo, kaj ke neniel ĝi intencis atenci kontraŭ la suvereneco kaj la popolo de Ekvadoro.

En la sekvintaj monatoj kaj jaroj ni faris nian eblon por restarigi nian rilaton kun Ekvadoro, por ĉi tio ni havis la valoran helpon de la Centro Carter. Ni neniam sendis niajn trupojn al la landlimo, ni neniam fermis niajn merkatojn kaj ni ne postulis vizojn al la ekvadoraj vizitantoj. En la jaro 2010, dum unu kunveno de prezidentoj en Meksiko, Mi proponis al la prezidento Correa la tutan pruvajaron —escepte de la nomoj de la pilotoj—, por malkonfirmi lian supozon ke Usono estis efektiviginta la frapon kontraŭ Reyes. La prezidento Correa diris, ke li ne demandis al mi la nomojn de la pilotoj.

En la paciga rondvojaĝo entreprenita far la sekretario de la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, José Manuel Insulza, por respondi lian zorgon pri la milita ago, mi proponis ke oni montru al li la videjaĵo de la operaco. Malfrue en la nokto li telefonvokis min por danki kaj li esprimis ke li estis trankvila kaj kontenta. Mi havis la esperon, ke en lia vizito al Kito la sekvintan tagon li forigus ĉiujn dubojn por tiel solvi la diplomatian kontraŭaĵon. Tamen, la vundoj estas malrapidaj por saniĝi. La formalaj rilatoj inter la du landoj nur estis plene restaŭrita post la finiĝo de nia prezidenta periodo.

Malgraŭ la problemoj, mi ĝojas, ke la streĉiĝoj neniam kreskis al violento. La deklaroj de konflikto inter niaj landoj finiĝis preskaŭ tiel rapide kiel ili estis komencintaj. Kaj tiam ni povis vidi

kiamaniere jam mortigita Reyes kaj defiita la miton pri nevenkebleco kiun ĝuis de la ĉefoj de la FARK dum kvardek jaroj, la implodo de ĉi tiu grupo komencis tiel rapide, kiel ni povus nur esti imagintaj.

10

Nur tri tagojn post la morto de Reyes, la kolombia Polico ricevis unu informon en la municipo Pácora, departemento Kaldas, norde de la urbo Manizales kaj sude de Medegino: la korpogardisto de Iván Ríos, alia membro de la t.n. "sekretariato" de la FARK, volis transdoni sin kaj li havis ion kio povus interesi nin.

Ríos, kies vera nomo estis José Juvenal Velandia, estis la estro de la centra bloko de la FARK kaj li kontrolis grandan parton de la drografika agado de tiu grupo. La registaro de Usono ofertis kvin milionojn da dolaroj rekompence por lia kupto. La membroj de la roto komandita far Ríos, inkluzive de lia fianĉino, estis responsaj pri centoj da kidnapoj tra tuta Kolombio. Li agis nur kvardek ses jarojn, kaj tiel li estis unu el la malmultaj gvidantoj de la FARK kies aĝo lin permesus daŭrigi faronte krimojn dum multaj pluaj jaroj. En antaŭaj monatoj, unu dizertinto el lia proksima cirklo estis koniginta al ni la situon de tiu ĉi ulo, kaj ekde tiam li kaj lia bando estis sub intensa premo far niaj trupoj: tranĉinte ties provizoliniojn kaj streĉinte la sieĝon en ties ĉirkaŭaĵo.

Tri tagojn post la anonco pri la intenco sinliveri, la korpogardisto de Ríos elvenis el la ĝangalo kiel planite. Li portis sakon kaj li estis eskortita far nia Polico ĝis proksima armea bazo por lia renkonto kun kolonelo de la Armeo.

—Do —diris la kolonelo—, kie estas Iván Ríos?

La korpogardisto eltiris el la sako unu detranĉitan manon.

—Tie ĉi estas Iván Ríos —li respondis.

Li informis ke la premo metita far niaj Armitaj Fortoj sur la FARK fariĝis neeltenebla, kaj ke li sciis ke ĉio estis finita por ili. Poste li rakontis, ke du noktojn antaŭe, Ríos kaj lia kunulino estis mortigitaj far li dum ili dormis; tuj poste li kuris kriante, ke la Armeo estis atakanta la grupon kaj li urĝis la gerilistojn fuĝi, kion ili faris rapide. La korpogardisto revenis en la tendon kaj detranĉis la dekstran manon de Ríos: li esperis ke tiu pruvo permesus lin enspezi la rekompencen en kontanta mono. En lia tornistro li postis ankaŭ lian pasporton, lian identigan karton kaj la tekokomputilon de la murdita ĉefo.

Tiu epizodo starigis en la lando moralan dilemon: unu afero estis ke iu krimulo dizertu el terorisma grupo, konfesu siajn krimojn kaj reeniru en la kolombian socion, tamen unu afero tute alia estis ke iu krimulo murdu alian kaj provi enspezi rekompencan pro lia krimo. Kaj kvankam tio temis pri la morto de danĝera teroristo, la cirkonstancoj ne estis kontribuo al niaj fundamenta objektivo: reakiri la monopolon pri la uzo de la forto.

Ĉirkaŭ tri semajnojn poste ni ricevis la novaĵon ke Manuel Marulanda, supra ĉefo de la FARK ekde 1964, mortis pro korinfarkto: li havis la aĝon de ĉirkaŭ 76 jaroj. Li pasigis siajn lastajn tagojn fuĝante, ne povante dormi pli ol unu nokton en la sama loko pro la konstantaj aeratakoj kaj aliaj militaj agoj direktitaj kontraŭ li. La FARK, komociitaj kaj demoralizitaj pro serio de kontraŭaĵoj, povis rezervi sekreta lian morton nur dum kelkaj tagoj. La simboleco de lia morto estis melodrameska: Marulanda estis ne nur kruela ĉefo, sed ankaŭ ekzemplo de la retroira sinteno de la FARK kaj de la tuta malestimo kiun ili sentis pri la opinio de la kolombia popolo.

La premo metita far niaj Armitaj Fortoj kaŭzis ruinojn ĉe la senrangularo de la FARK. En la sola unua jarkvarono de 2008, pli ol ducent el ĝiaj membroj malmobiliziĝis. Eskapinte dum pluraj monatoj el la persekutado kiun disvolvis nia sekuriga agentaro, Nelly Ávila Moreno, alinomita "Karina" —ĉefino de la t.n. 47-a fronto de la FARK— kapitulacis en majo: ŝi estis plena de cikatroj kaj ĉe la sojlo de inanicio. Kiam la terorisma bando de Karina estis ĉe sia apogeo, ĝi konsistis el ĉirkaŭ tricent ribeluloj, tamen en la fino, kiel kelkaj amaskomunikiloj raportis, la nombro falis al malpli ol kvindek. Karina estis senskrupula virino kaj dum pluraj jaroj ŝia krueleco disvastiĝis tra Antjokio kaj apudaj departementoj; estis do grave malaktivigi ŝin per ĉiuj eblaj rimedoj. Ni garantiis publike ŝian sekurecon, se ŝi transdonus sin, kion ŝi faris du semajnojn poste.

Kun la gvidantaro de la FARK disfalanta kaj iliaj senrangaj aktivuloj demoralizitaj, ni sciis ke estis epoko por direkti nian kapablon por atingi unu celon eĉ pli grandan: trovi sinjorinon Ingrid, la tri usonanojn kaj ceterajn ostaĝojn. La tempo estis ideala kaj finfine ni atingis la informon kiun ni bezonis. La faligo de Raúl Reyes estis doninta al niaj operacoj tre gravan profiton.

11

En ĉiuj niaj klopodoj —en la lukto kontraŭ terorismo, same kiel en la ekonomia progreso kaj en la plifortigo de socia kohereco— ekzistis komuna elemento: la lojaleco.

Nia maniero analizi kaj pridiskuti problemojn kaj solvojn inter la membroj de la registaro, kun la komandantoj de la armitaj fortoj, kaj kun la komunumo, disvolviĝis laŭ sento de teameco kaj Komunuma Ŝtato aŭ alta partopreno de la civitanoj. Ĉiu renkontigo kun la komunumo, ĉu kun patronoj, ĉu kun laboristoj, ĉu kun alia grupo, fariĝis dialogo kaj finis kun akto pri konkludoj por gvidi la agadon de la registaro. Mi estas argumentema, verva, mi atente ekzamenas la kialojn, mi proponas objektojn, tamen fine mi cedas al argumentoj, neniam al premo. Mi elektis la kunlaborantojn kun la plej granda zorgo, pri multaj el ili mi ne sciis iliajn politikajn partiojn, mi ekzamenis ilian moralan kaj profesion kompetentecojn kaj ilian devontigon por la celoj de nia registaro. Pluraj el ili atingis la plej altajn postenojn kiam ili estis malpli aĝaj ol tridek kvin jaroj, kaj mia celo estis profili gvidantojn por la estonteco de la Patrujo. Mi konfesas ke mi metas plenan konfidon en tiuj kiuj laboras kun mi, eĉ mi pasa el la defendo de iliaj taskoj al la defendo de ili kiel personoj. Mi preferis erari pro troa lojaleco ol pro ĝia manko. Kaj ĝenerale mi estis abunde rekompencita. Ekzistas modela ekzemplo de lojaleco: la Operaco Ŝakon¹.

Post la forigo de Raúl Reyes, kelkaj homoj en la kolombia gazetaro supozis ke unu aŭ pli el nia armeaj komandantoj estus devigitaj demisii. Ne okazis tio; publike mi apogis ilin kaj mi prenis plenan responson sur min, samkiel mi ĉiam faris. Kiam la ŝtormo estis pasinta, la komandantoj sentis sin fortigitaj: ili estis vidintaj denove ke ili havis la konfidon kaj apogon de la kolombia popolo kaj de la prezidento. Ĉi tio montris al ili, ke ili povus pensi en manieroj aŭdacaj, kreivaj kaj riskaj, sen timi perdi sian postenon aŭ suferi malutilon. Tial ne estis pro hazardo, ke kelkajn semajnojn post la fino de Reyes, ili proponis al mi eksterordinaran kaj tre aŭdacan planon por rekuperi la ostaĝojn.

1 NT Hispane: "Operación Jaque".

La rekupera plano komencis esti disvolvita kelkajn monatojn pli frue, en februaro 2008. Speciala taĉmento konsistinta el dek du soldatoj, vestitaj en kamuflaj uniformoj kaj ekipita por travivi dum unu monato en la ĝangalo, sekvis per rigardado la ostaĝojn tra unu bordo de la rivero Apaporis, proksime de vilaĝo nomata Cornelio. Unu tagon, je proksimume la naŭa matene, ili vidis kiamaniere, ĉe la alia bordo de la rivero, kvar teroristoj de la FARK demetis siajn vestojn kaj lasis siajn fusilojn sur la bordo, por bani sin en la rivero; la bano daŭris ĉirkaŭ duonhoro. Niaj viroj restis en la loko, kaj je ĉirkaŭ duono post la unua posttagmeze ili vidis ke la teroristoj revenis kun kvin ostaĝoj kondukitaĵ pistol-minace: du kolombiaj policanoj kaj la tri usonaj kontraktintoj.

Laŭ tio kion Juan Carlos Torres asertas en sia libro *Operación Jaque*, tiu fojo estis la unua en dek jaroj, en kiu la Armeo havis proksimecon tiel granda kun la ostaĝoj de la FARK; tio estis rimarkinda atingo. Bedaŭrinde, ne estis eble elliberigi ilin en tiu momento: niaj trupoj kalkulis ke en tiu areo estis inter okdek kaj cent membroj de la FARK, nombro kiu troe superis tiun de la soldatoj de la speciala taĉmento, la rivero kiu apartigis ilin disde la tendaro estis larĝa; kaj la milita rekupero de malgranda nombro da ostaĝoj povus endanĝerigi la vivojn de la ceteraj kaptitoj kiuj estis proksimaj. La soldatoj elsendis la informon kaj simple observis. Ni ne povis trovi la precizan lokon kie la tendaro estis, sed la nura fakto scii ĝian ĝeneralan situon estis eksterordinara progreso.

Jam lokalizinte la areon ĝeneralan kie la ostaĝoj estis, niaj armeaj komandantoj devis trovi efikan metodon por rekuperi ilin kun sekureco. Sed tio ne estis farita antaŭe kaj, kiel ĉiam, la FARK estis montrinte klare —kaj la kazoj de Urrao kaj de la deputitoj de Valo de Kaŭko pruvis tion— ke ili mortigus siajn pli valorajn ostaĝojn prefere ol vidi ilin liberaj. La liberigo de Fernando Araŭjo estis montrinta al ni la riskojn kiujn havis ajna operaco, eĉ kun granda nombro da agentoj kaj bone organizita laŭ militaj kriterioj; aldone, Jhon Frank Pinchao —la policano kiu eskapis el la tendaro de Ingrid en 2007— konfirmis al ni ke la bando de la FARK kiu retenis tiujn ostaĝojn ricevis eksplicitajn ordonojn por mortigi ŝin kaj la usonanojn en kazo de provo por rekuperi ilin.

Laŭ propono mia, farita publike, niaj komandantoj konsideris alian eblon: humaneca ĉirkaŭado. Tio estas, granda ringo el trupoj estus ĉirkaŭontaj la lokon de la ostaĝoj, iom post iom la ringo estus mallarĝigota kaj poste unu komisiito estus sendota por provi

konvinki la FARK, ke ili transdonu la kaptitojn vivaj. Tamen, ĉi tiu opcio prezentus riskojn kaj evidentajn malfacilaĵojn, pro kies konsidero, niaj komandantoj decidis doni prioritaton al strategio bazita sur trompado. Kaj por tio estis ke la morto de Raúl Reyes malfermis al ni pardonon.

Kiel liganto en la triangula sistemo de komunikado de la FARK, Reyes estis doninta ian ordon al la agadoj de tiu grupo. Tamen, post lia malapero —kaj la malapero de Marulanda— konfuzo regis ene de la FARK kaj ofte la teroristoj ne scipovis kiamaniere komunikiĝi inter si. Aliflanke, ni havis la komputilojn de Reyes kaj en ili ni trovis abundon da informo pri la metodoj de interna komunikado de la FARK; por ne menciigi ke niaj agentejoj de informigado estis laborintaj plurajn jarojn por decifri la sekretan kodon de ĉi tiu grupo kaj siaj grandegaj penoj estis tiel valoraj kiel tiuj de niaj viroj kaj virinoj en uniformo. Meze de aprilo de 2008, la kompreno pri la maniero kiel la teroristoj komunikiĝis inter si estis preskaŭ perfekta.

Jam decifrinte ilian kodon, niaj militaj komandantoj —gviditaj far generalo Mario Montoya— elpensis planon, ebligita pro la foresto de Reyes: se ili sukcesus saboti la komunikiĝojn de la FARK, ili provus trompi la teroristojn por ke ĉi tiuj transdonu la ostaĝojn vole, sen ke niaj agentoj faru eĉ unu pafon.

La koncepto estis vere inĝenia. Ĝi celis detranĉi mesaĝojn kaj simuli interparolantoj inter la "centra komandantaro" kaj la roto de la FARK kiu retenadis sinjorinon Ĝingird, la usonanojn kaj aliajn ostaĝojn. Unue, malgranda nombro da agentoj estis trejnita por imiti la teroristojn ĝis perfekteco, kun ties slango kaj regionaj akĉentoj. Por ŝajnigi ke tiuj agentoj parolis el la ĝangalo, ili translokiĝis al domo, luita far la armeanoj, en izolita monto proksime de Bogoto, havanta la saman akustikan proprecon de la ĝangalo. Kiam ĉio estis preta kaj la agentoj estis preparitaj, ili interferis per avangarda teknologio la radiofrekvencon uzita far la roto de la FARK kiu havis la ostaĝojn, kaj tiel niaj agentoj trompe anstataŭis la voĉojn de iliaj gvidantoj. Ekde tiu momento, anstataŭ paroli kun la centra komandantaro de la FARK, ĉi tiu roto parolis kun niaj agentoj de informigado. La sama procedo estis ripetita kun ties interparolantoj: la centraj komandantoj de la FARK kredis ke ili parolis kun la membroj de la roto, kiam fakte estis kun la agentoj. Tiu ĉi trompado daŭris pli ol du monatoj sen esti detektita. Ĉefverko

de la informiĝada laboro kaj klara signo de kiom ni progresis dum la lastaj jaroj.

Niaj agentoj metis grandan zorgon por certigi ke la menciita roto de la FARK suspektu nenion. Ŝajniginte esti la centra komandejo, ili donis bazajn ordonojn: unu el tiuj ordonoj estis movi la ostaĝojn el unu loko al alia. Kelkajn tagojn poste, la roto informis per la radioaparato ke ili estis sekvintaj la instrukciojn. Niaj agentoj ekestis tre ĝojaj, nun ili povis efike kontroli la movojn de la ostaĝoj.

Tamen, unu grava demando ankoraŭ restis sen respondo: kiamaniere konvinki tiun roton de la FARK por liberigi la ostaĝojn? Unu afero estis kontroli la moviĝojn de la FARK, kaj alia tre malsama fari ke ili volonte liberigu la "plej valorajn" ostaĝojn. En tiu ĉi kazo, la talentaj viroj kaj virinoj el la kolombiaj sekurigaj fortoj kaj informiĝagentejoj denove unuigis siajn penadojn kaj ili pensis ĉiajn ideojn. Ili sciis ke ili havis plenan apogon de ni.

Post pesi multnombrajn alternativojn, finfine ili interkonsentis. La ideo estis vere brila kaj, unu fojon plu, estis bazita en la ĵuspasinta serio de eraroj de la FARK. Unu el la plej elstaraj momentoj de Kolombio estis venonta.

12

Dum nia prezidenteco, la plej seriozaj krizoj havis strangan manieron por alveni en ondoj. En multaj okazoj ni alfrontis, samtempe, du aŭ pli substancajn temojn, kio donis gravecon kaj metis al provo la lertecon kaj la kapablo de nia teamo de konsilantoj. La monato majo de 2008 estis, eble, la plej signifa ekzemplo de tio: la rekupero de la ostaĝoj estis giganta defio, kaj en tiu monato ni estis pritraktantaj la finaj detalojn de nia plano; kaj, samtempe, ni estis okupitaj pri aliaj du grandegaj defioj kiuj minacis ruinigi preskaŭ la tutan progreson kiun ni intencis solidigi dum la pasintaj ses jaroj.

Por nia registaro, la malaktivigo de la terorismo konsistis el tri elementoj: aŭtoritato sen kurbigoj, resocianigo malavara kaj sen nepuniteco, kaj socia politiko por ke la junuloj ne estus altiritaj de terorismo. En 2005 estis liverita la Leĝo de Justeco, Paco kaj Riparado. Ĝi estis la unua regularo pri paco en Kolombio kiu postulis justecon kaj riparon por la viktimoj. Ni donis la plej grandan gravecon al la malmobiliziĝo de la teroristoj, mortigi ilin estis tio malplej dezirata. En la ok jarojn pli ol 52.000 membroj de diversaj krimaj grupoj malmobiliziĝis: proksimume 35.000 kvazaŭarmeanoj kaj 17.000 gerilistoj. Nia intenco estis procedi kun malavareco por tiuj kiuj plenumus la postulojn de malmobiliziĝo, kaj severe kun tiuj, kiuj malobservus ilin. Malgraŭ la homaj kaj buĝetaj klopodoj por reenmeti ilin en la kolombian socion, ĉirkaŭ sep procentoj el kiuj akceptis la proponon recidivis en krimaj agadoj.

Tamen, ni baldaŭ konstatis, ke kelkaj drogŝakristoj teroristoj provis profiti el nia malavareco. Kaj, speciale, grupo de kvazaŭarmeaj ĉefoj kiuj, kvankam akceptintaj la kondiĉojn de la malmobiliziĝo, ili rifuzis plenumi siajn laŭleĝajn devontigojn: ili ne transdonis siajn riĉaĵojn nek siajn terenojn kiel ili estis promesintaj kaj aldone ili daŭrigis siajn krimajn agadojn. Ni ricevis multajn raportojn laŭ kiuj ili daŭrigis ordonate murdojn kaj kunordigante trafikon de drogoj. Ili ordonis la morton de unu el siaj kolegoj, Carlos Castaño, en kio ŝajnis esti sanga interna konflikto; en alia okazo, Rodrigo Tovar Pupo —la kvazaŭarmeano konita per la alinomo "Jorge 40"—, dum li partoprenis en la intertraktadoj por malmobiliziĝi, ordonis la kidnapon de José Eduardo Gnecco, eksa

senatano el la departemento Cesaro¹. Mi parolis tra la televido, kaj mi diris ke se "Jorge 40" ne liberus tuj s-ron Gnecco, la Armeo serĉus lin. Li malvolonte liberigis lin, sed sia sinteno estis klare defia. Alia el ili, Diego Murillo, konita per la alinomo "Don Berna" estis trovita far unu juĝisto kiel ligita al la murdo de deputito el la departemento Córdoba. Mi ordonis al la generalo Jorge Daniel Castro Castro, tiama direktoro de la Polico, ke li persone eniru en la areon kie la kvazaŭarmeanoj en procezo de malmobiliziĝo estis situantaj kaj ke li procedu kapti lin. En la tria tago de serĉado, "Don Berna" akceptis kapitulaci.

Tiuj krimuloj pensis, eble, ke siaj malnovaj rilatoj kun kelkaj senskrupulaj individuoj el la Polico kaj el la kolombia jursistemo permesus ilin malobei la regulojn kiuj estis dekretitaj far ni. Eble ili pensis, ankaŭ, ke la kolombia Ŝtato ne estis sufiĉe forta por devigi ilin plenumi ilian vorton. Tamen ili estis eraraj.

Tra la monatoj, ni premis ilin ĉiufoje pli en provo por atingi ilian kunlaboradon. La unuan de decembro de 2006, kiam mi estis vojaĝinta en Meksikurbo por ĉeesti en la enoficiga ceremonio de prezidento Felipe Calderón, pluraj de tiuj kvazaŭarmeaj ĉefoj estis translokitaj al malliberejo de maksimuma sekureco. Tamen, je nia konsterno, ni eksciis ke ili, malantaŭ la kradoj, daŭris ordonante murdojn kaj aliajn krimojn. Komence de 2007 mi diris al la komandantoj ke tiuj individuoj ne estis plenumintaj ilian devon transdoni iliajn riĉaĵojn —kiel klare kondiĉis la Leĝo de Justeco kaj Paco— kaj mi petis al generalo Óscar Naranjo, tiama direktoro de la Nacia Polico, ke li apliku specialan klaŭzon de la kolombia leĝaro kiu donis la Ŝtato la aŭtoritaton por konfiski iliajn aktivojn (klaŭzo kies plibonigo estis laboro de la ministro pri Enlandaj Aferoj kaj Justico, Fernando Londoño Hoyos). Tio ne sufiĉis por deadmoni ilin de fari pluajn krimojn. Ili agoj estis mokado pri la principoj, kiujn nia registaro klopodis fari plenumi, kaj ili estis kaŭzintaj la morton de multaj senkulpaj homoj. Dum la jaro 2008 pasis, mi komprenis ke ni devus trovi solvon pli firman.

Nia registaro havis la profundan konvinkigon, kvankam tio ne estis tiumomente juĝa verdikto, pri io evidenta al multaj civitanoj: tiuj uloj daŭrigis sian deliktadon spite la konvenajn al ili proponita. Ankaŭ ekrestis evidenta unu tre dolora fakto: la kolombiaj prizonroj ne estis sufiĉe sekuraj por malhelpi al tiuj uloj la daŭrigo de la terurado al la kolombia popolo. Mi renkontiĝis kun

1 [NT Hispano "Cesar"](#).

la Ministro Santos kaj kun altrangaj komandantoj, kaj mi petis al ili antaŭenigi la procedon de ekstradicio de dek kvar kvazaŭarmeaj ĉefoj al Usono, inkluzive de "Jorge 40", Salvatore Mancuso, Diego Murillo (Don Berna) kaj kelkaj aliaj: ĉiuj tre potencaj kaj timitaj.

Ili konsideris la ekstradicion kiel la plej malbona puno, kaj ni devis agi pro la pezo de la faktoj.

Kiam, private, mi rakontis al Lina pri niaj intencoj, ŝia respondo estis:

—Nu, Álvaro. Vi devas scii ke tiuj homoj prenos rimedojn, mensogojn, ion ajn, por venĝi kontraŭ vi, nia familio, membroj de la registaro, la komandantoj, post la prezidenteco, ĉiame.

Ŝi konsentis kun mia respondo: mi komprenis ŝiajn ĝustajn zorgojn, tamen mi devus plenumi mian devon.

Ni jam tiam estis vidintaj kelkajn zorgigajn ekzemplojn de kia estus tiu "venĝo": pere de la advokatoj de "Don Berna", ni eksciis ke unu juĝisto asociita kun la Supera Kortumo de Kolombio estis ofertinta al sia kliento iujn favorojn se tiu akuzus min, mensoge, pri esti farinta kelkajn krimojn. Ni neniam ricevis palpeblan pruvon pri ĉi tia propono, kaj mi estis povinta prokrasti la ekstradicion por atingi pli da informo pri la kazo. Tamen, mi elektis ne fari tiel: denove mia devo kiel prezidento estis pli grava ol ajna klopodo por protekti min mem.

Do, ni procedis. Tiutage en mia oficejo, kiam mi donis la ordonon por ekstradicio, unu el la komandantoj diris al mi:

—Prezidento, mi obeos viajn ordonojn. Tamen mi demandas ion al vi: Kiu gardos nin kiam ni ne plu estos en ĉi tiuj postenoj?

—Dio gardos nin —mi respondis—. Nun ni devas ekstradicii ilin.

Kelkajn horojn antaŭe, je la ekkonigo de la ekstradicio, okazis ekscitiĝo ĉe la amaskomunikiloj. Tiuj uloj komencis telefonvoki la gazetaron kaj amikojn, en unu lasta peno por mobilizi la publikan opinion kaj, eble, nuligi la ordonon de ekstradicio. Ili ne sukcesis. En la horoj antaŭaj al la tagiĝo de la 14-a de majo de 2008, la dek kvar kvazaŭarmeaj ĉefoj, mankatentaj, kaj kun kontraŭkuglaj veŝtoj, estis pasaĝerigitaj en aviadiloj flugontaj al Usono. Mi sentis grandegan dankemon al generalo Naranjo, direktoro de la Polico, kiam li diris al mi ke la ekstradicitoj jam estis en flugo ekster la

kolombia aerspaco. En la sekvintaj tagoj, aliaj kvazaŭarmeaj ĉefoj renkontis similan sorton.

La ekstradicio vekis grandajn mallaŭdojn, ne nur inter la kvazaŭarmeanoj kaj iliaj aliancanoj. Aldone, multaj analizistoj kiuj antaŭe estis riproĉintaj min ĉar supozite mi ne emis ekstradicii ilin por kaŝi ties krimojn, kaj eviti ke, antaŭ usonaj juĝistoj, ili akuzu politikistojn kiuj apogis la registaron, abrupte ŝanĝis sian sintenon. Ilia nova riproĉo estis kontraŭ la ekstradicio: ili pledis ke senditaj al Usono tiuj ne kompensus al la viktimoj kaj ne ekzistus maniero por scii la veron.

Mi nur havis unu kialon por ekstradicii ilin: kontribui al la plibonigo de la sekureco en Kolombio. Mi kredis ke formetinte tiujn individuojn el nia lando ni estis evitontaj ke ili faru novajn deliktojn kaj ni estis montrintaj al aliaj krimuloj ke ili alfrontus gravajn konsekvencojn se ili ne kunlaborus kun la Justico. Kiel skribite en la gazetaro far Alfredo Rangel, renoma analizisto pri sekureco: "Ekzistos pli da premo por ke la partoprenantoj en la procezo diru la veron kaj faru la kompensojn ĉar nun la risko de ekstradicio estas reala, ne hipoteza".

La ekstradicio de tiuj krimuloj havis nenian rilaton kun la kolombia politiko, kaj la decido ne estis subita en iu ajn senco. Ĝi estis produkto el procezo kiu daŭris plurajn jarojn, dum kiuj ni provis atingi ilian kunlaboron. Kaj mi sankciis la ekstradicion al Usono nur post kiam tiu lando donis al ni plenajn garantiojn por ke ili ĉiuj povu esti pridemanditaj far la kolombiaj aŭtoritatoj kiuj estis enketantaj la kruelaĵojn kiujn ili faris kaj, ankaŭ, por postuli kompensadon. Ne okazus senpuneco en ĉi tiu kazo aŭ ajna alia. En tia Kolombio kiun ni regis, la leĝo estis aplikata al ĉiuj.

13

La tria plej granda defio de tiu monato majo ne venis el la interno de Kolombio sed el eksterlando, kaj iusence estis la plej danĝera el ĉiuj.

Laŭ 2008 progresis, la usona kaj aliaj disvolviĝintaj ekonomioj komencis suferi severan krizon, la rezulto el malekvilibroj en la financaj sistemoj de tiuj landoj estigitaj far la nedaŭrigebla preza bobelo de nmoveblaĵoj¹, la anstataŭigo de produktado per spekulado kaj la grandegaj enŝuldiĝoj de ambaŭ Registaroj kaj civitanoj. En Kolombio ni ne havis tiujn problemojn: ekde pluraj jaroj pli frue nia ekonomio estis fortika kaj ĝi montris kreskantan ekspansion danke al plibonigita sekureco kaj al nia senlacaj kaj sukcesaj penoj por ke la entreprenoj kreu laborpostenojn kaj faru investojn kiuj helpas redukti la malriĉecon. Ni pasis el kresko de la Malneta Enlanda Produkto de nur 1,9 procento en 2002, la unua jaro de nia regado, al 4,4 procento en 2005, al 6,7 en 2006 kaj al 6,9 procento en 2007. Ĉi tiu kresko okazis sen bobeloj de aktivoj, danke, parte, al forta financa regularo komencita far la antaŭa Registaro kaj profundigita en la nia.

Nu, kvankam ni estis aŭsteraj kaj responsaj, la problemoj de la disvolviĝintaj landoj baldaŭ alvenis al Kolombio. La mendado por niaj ĉefaj eksportaĵoj malpliigis, kaj la likvideco en la tutmonda financa sistemo malkreskis rimarkinde. Meze de 2008, aldone al ĉiuj defioj kiujn ni havis, kelkaj analizistoj el Wall Street diris ke ni estis antaŭ recesio certa kaj, eble tre severa. Krome, la internacia financa krizo samtempis kun la fermo de la merkato de Venezuelo kaj la katastrofode financaj piramidoj kreitaj far drogŝakristoj por lavi sian monon.

Tamen, la atingoj de Kolombio estis preskaŭ miraklaj: nia ekonomio kreskis en 2008 kaj 2009 —ĝi estis unu el la malmultaj ekonomioj en Latinameriko kiuj faris tion— kaj nia kapablo por restariĝi kontrastis kun la seriozaj problemoj en Eŭropo kaj Usono.

Kiamaniere atingis ni tion? Unue, danke al la forta laboro kaj la saĝo de nia ekonomia teamo —gvidita far la tiama Ministro pri Financoj, Óscar Iván Zuluaga kaj far Carolina Rentería, direktorino

1 NT prez-altiĝo de konstruaĵoj, precipe domoj.

de la Nacia Fako pri Planado—, kiu aplikis kun lerteco fiskan strategion kontraŭciklan kaj stimulis la ekonomion por diversaj rimedoj. Unu el la plej gravaj paŝoj estis starigi subvenciitajn interezokvotojn por la sektoroj de la loĝantarokiuoj havis malaltajn kaj mezajn enspezojn por ke ili akiru loĝejojn, kio impulis rimarkinde la konstruadon. Ĉi tio estis ebligita far la reformoj, la aŭstereco, kaj la ŝparado de la antaŭaj jaroj. Feliĉe, antaŭ la krizo, la Registaro estis vendinta la bankojn kiuj estis ŝtatigitaj pro bankrotoj okazintaj dum la malfruaj 1990-aj jaroj. La prezo atingita estis tre akceptebla pro la konfido por investado en Kolombio kiun ni estis gajnintaj. La ekonomia teamo laboris forte por gajni la fidon de hejmaj kaj fremdaj investantoj, kaj la valoro de Borso de Kolombio pliiĝis kvinoble dum la daŭro de nia administrado. Nia lando, for de esti "fiaskinta Ŝtato", nun tiam ĝi estis konsiderata unu el la plej sekuraj destinoj por eksterlandaj investantoj. Efektive, la konfido por investado de la privata sektoro permesis ke tiu ĉi investado plenumis unu tre gravan kontraŭciklan rolon.

Due, kaj egale grava, estis la progreso kiun ni faris dum ok jaroj por fari el Kolombio unu landon socie pli justan. Eble la plej bona garantio kontraŭ la krizo estis havi fortan kaj larĝan universon de entreprenistoj de ĉiaj grandoj. Dum nia regado, pli ol 150.000 malgrandaj kaj mezaj entreprenoj estis kreaĵoj, kio pliiĝis sian partoprenon en la ekonomio el 72 procento ĝis 86 procento. La mikrokreditoj —malgrandaj monsumoj pruntedonitaj al malriĉaj homoj— estis kreskintaj tiel rapide, ke la ŝuldoj levigis el 380 milionoj al 4 miliardoj da dolaroj je la fino de nia regado.

Multajn fojojn oni demandis min kial Kolombio reagis tiel rapide al niaj strategioj; mi rimarkigas, nun, nur unu punkto el mia respondo: pro la kreiveco kaj laboremo de ĝiaj civitanoj.

Mi konscias ke en la longa tempo, nia regado povos esti memorita pli por siaj kontribuoj al la sekureco. Sed nia registaro metis egalan emfazon en la socialaj agprogramoj, kiuj por ni estas nedisigeblaj de sekureco: la sekureco provizas la rimedojn kaj la socialaj agprogramoj validigas en la koroj de la civitanoj la bezonon de sekureco. Ne estis malfacile, kiel kontraŭcikla rimedo, pligrandigi la sociajn kovradojn por protekti kontraŭla krizo la plej vundeblan popolon: ni portis tiun politikon ekde la komenco de nia administrado. Dum la ok jaroj kiujn daŭris nia prezidenteco, ni pliiĝis la socian elspezadon, en reala valoro, proksimume je 85 procento, kompare kun kresko de 65 procento en elspezado por

defendo. En la lasta jaro de nia regado ni investis trifoje pli da mono en sociaj elspezoj ol en defendo. Nia emfazo en edukado —devontigo surpranita antaŭ la zorgo-plenaj urbestroj en Florencia ekde la unua tago de nia regado¹—ne nur pagis klarajn dividendojn baldaŭ sed ĝi faris bonon al Kolombio por la sekvaj jaroj. Danke al la klopodoj de la ministrino pri Edukado, Cecilia Maria Vélez White —kiu restis dum la ok jaroj, diference de pli ol 110 ministroj de la antaŭaj cent jaroj— kaj ŝia teamo, kaj danke al la Nacia Servo por Lernado, SENA², gvidita far Dario Montoya Mejía, ni faris signifajn progresojn pri la popolo-kovrado, la kvalito-testado, la eblecoj por aliro al la universitato, bazoj por plibonigo en Scienco kaj Teknologio kaj profesiiga instruado. Danke al multipliko per ok de la nombro de trejnitaj civitanoj, Kolombio fariĝis elstara regiona ekzemplo. Por la estonteco de la lando ni dediĉis nin kun entuziasmo al la edukado, sciante ke ĝiajn efikojn ne vidos nia registaro. Ĉi tiu kazo ekzempligas la ideon de doni stabilecon al la registaraj funkciuloj, super la politika sorto-ŝanĝo, kondiĉe, ke ili antaŭenigu siajn programojn.

Entute, la malriĉeco falis draste dum nia administrado. Se ĝi estas mezurita laŭ la nivelo de persona enspezo, ĝi falis el 53 procento al 38 procento. Tamen, ni ankoraŭ ne kontentiĝis kun tiuj rezultoj, ĉar nia celo estis redukti la nivelojn de malriĉeco ĝis 35 procento, celo kiun ni ne povis atingi pro: la tutmonda financa krizo, la komercaj malfacilaĵoj kiujn ni havis kun Venezuelo kaj la ĝenerala krizo generita far la financaj piramidoj kaj la monlavado, al kiu nia registaro devis esti reaginta kun pli urĝe. Aldonante al la enspezoj de la homoj la apogojn de nia socialaj agprogramoj, la malriĉeco falis al 22 procento, kaj tiel dek tri milionoj da civitanoj superis la malriĉecon dum nia regado —nombro tre supera al la tuta loĝantaro de Bogoto kaj ĉirkaŭaĵoj—; ververa atingo kiu ŝanĝis multajn vivojn. Aliaj latinamerikaj registaroj asertis ke ili estis la solaj kiuj helpis la malriĉulojn kaj ili kredis ke ili povis fari tion nur ekspropriigante industriistojn kaj timigante la investantojn, en provo por krei la "socialismon". Ja, ĉi tiuj registaroj atingis pli da egaleco: ili faris ĉiujn siajn loĝantojn pli malriĉaj, kun la evidenta escepto de siaj amikoj kaj kompanoj. Kontraŭe, ni pruvis ke estis eble respekti la rajtojn de la investantoj kaj, samtempe, fundamente redukti la malriĉecon kaj krei veran riĉecon.

1 NT Paĝoj 148-149.

2 NT Mallongigo de la hispanlingva nomo: [Servicio Nacional de Aprendizaje](#).

Esti traktinta tiujn defiojn samtempe estis atesto pri la lerteco kaj la teama laboro de miloj da funkciuloj de nia registaro kaj pri la graveco kiun ni donis al la tri elementoj de la "Triangulo de Konfido": la demokratia sekureco, la konfido de la investantoj kaj la socia kohereco. Sen la samtempa funkciado de ĉi tiuj tri elementoj, probable nia lando estus travivinta unu tre gravan krizon inter 2008 kaj 2009. Sen socia kohereco, ekzemple, la komencaj efikoj de la krizo povus esti detruinta la popolan apogon al nia registaro. Sen la konfido de la investintoj, ni ne estus havintaj la rimedojn por la militaj operacoj kiuj plibonigis nian sekurecon, nek por laproduktivaj etendoj kiuj kreis laborpostenojn kaj kontribuis per imposto-pagoj.

Mi parolis senĉese pri la "Triangulo". Tiome, ke ĝidonis oportunun por okazintaĵo tre amuza kaj, samtempe, tre rivela, dum la lastaj monatoj de nia regado. En majo de 2010, la urbo Kartageno gastigis la jaran konferencon de la Monda Ekonomia Forumo pri Latinameriko. Estis la unua fojo ke tiu kunveno de mondaj gvidantoj bazita en Davos, Svislando, okazigis lia regiona renkontiĝo en Kolombio, kio estis konsiderita kiel grava paŝo en niaj klopodoj por atingi internacian konfidon. Dum la konferenco, ni portis parton de la registaro al Kartageno kaj ni establis provizoran oficejon proksime de la kongresejo.

En unu sunplena posttagmezo, dum mi iris el la sidejo de la kunveno al nia oficejo, mi haltis por babili kun pluraj piedirantoj. Tiam pasis buso de lernejo kun infanoj, kiuj elrigardis tra la fenestroj kaj komencis krei "Uribe! Uribe!". Tio faris min tre ĝoja. Kiam mi estis preta por reveni al la oficejo, mi vidis taksion parkumita flanke de la strato, la ŝoforo dormis. Mi frapetis la fenestron de la taksiisto por saluti lin. Li vekigis tuj, li vidis min kaj malfermis siajn okulojn larĝe. Li mallevis la fenestro-vitron kaj kriis:

—Prezidento! Demokratia sekureco, konfido por investado kaj socia kohereco!

Mi ridis.

—Saluton —mi diris—. Diru al mi, kial vi diris tion?

—Ĉar mi aŭdas vin ripeti la samon ĉiumatene en la radio —li diris ridetante.

Por mi, tio estis klara signalo pri tio, ke la vasta plimulto de kolombianoj estis en la sama ebena kaj ke ni havis la saman

rigardon por la estonteco. Unuiĝintaj kaj kun la tri motoroj de la Registaro funkciantaj samtempe, neniuj taskoj estus neeblaj por ni.

14

Mi rigardis generalon Padilla dum sekundero, dum palpebrumo. Mi ne povis kredi tion, kion mi aŭdis.

Li rigardis min kaj ridetis.

—Ĉu ni havas vian aprobon?

La plano por trompi la grupon FARK tiel ke ili liberigu S-inon Ingrid, la tri usonanojn kaj aliajn ostaĝojn superis la imagon de Holivudaj filmoj. Mi ne povas pretendi iun dankon pro la ideo, kiu estis kreaĵo de dediĉitaj viroj kaj virinoj el niaj Armitaj Fortoj kaj informigaj fakoj. Mia laboro kiel prezidento estis doni al ili la necesan apogon, kaj fari al ili kelkajn demandojn pri la realigebleco kaj eventualaĵoj de la plano: kiuj estus niaj ebloj se la operaco ne funkcius kaj kiamaniere ni provus savi la vivojn de la ostaĝoj se okazus iu misfunkciado?

La ministro Santos, la generalo Padilla kaj mi diskutis pri la riskoj. La ministro havis prudentajn dubojn pri la operaco. Li sugestis ke, en kazo de malsukceso, ni devus konsideri la eblon permesi ke la FARK kaj la ostaĝoj reiru en la ĝangalon. Tamen, mi pensis ke, post pli ol ses jaroj ekde la kidnapo de Ingrid dum ŝia porprezidenta kampanjo, ni ne devus perdi la spuron de la kaptitoj. Do, mi proponis planon B, se nia unua plano malsukcesus: Amasa ringo de trupoj pretaj por ĉirkaŭi rapide la areon, kun la celo streĉi la kordonon ĉirkau la FARK kaj konvinki ilin por liberigi la ostaĝojn pace. En konversacio kun Bernard Kouchner, la ministro pri Eksterlandaj Aferoj de Francio, mi demandis lin ĉu li pretus veturi al Kolombio por transiri kordonon el militistoj —humana kordono —, kontakti senpere kun la FARK kaj postuli la liberigon de la ostaĝoj. Li akceptis. Mi ne donis al li multajn detalojn, sed mi diris al li ke ni kontaktus lin baldaŭ. Li donis al mi la telefonnumeron de sia domo kaj diris ke li atendos nian alvokon.

Malgraŭ ĉi tiuj antaŭzorgojn, ni sciis ke ĝi estis eksterordinare riska operaco. La usona ambasadoro diris poste ke li pensis, ke nia plano nur havis 50 procenton da probableco de sukceso. Tamen, la tempo elĉerpiĝis kaj ni ne povus atendi plu. Ni sciis ke la sano de la ostaĝoj, kaj speciale de Ingrid, estis tre malfortika. Dume, samtempe kiam ni estis sabotintaj la komunikigon de la FARK kaj

pretigis nin por la fina etapo de la Operaco Ŝakon!, ni estis klopodante intertrakti pri solvo. La 28-an de marto ni faris novan oferton: kontanta mono, la eblo de reduktitaj puntempoj kaj la enloĝigo en fremda lando, intersanĝe por la liberigo de la ostaĝoj. La unuan de aprilo, la prezidento Sarkozy deklaris ke Ingrid estis preskaŭ mortanta, kaj li proponis ke li sendus kuracistan teamon por trakti ŝin. Ni apogis tiun proponon, tamen, por la surpriziĝo de preskaŭ neniuj, la FARK rifuzis ricevi la mision.

La milita operaco estis la sola maniero disponebla. Kaj ĝi devus resti en la plej absoluta sekreteco por sukcesi. En la tagoj antaŭ la operaco, nur kvar personoj —la generalo Montoya, la generalo Padilla, la ministro Santos kaj mi— konis ĉiujn detalojn. Eĉ la trupoj kiuj estis trejnataj por realigi la operacon eksciis sian veran celon nur malmultajn tagojn antaŭ ĝia efektivigo, planita por la 2-a de julio de 2008.

Ni faris unu solan escepton rilate la konfidencon. La unua de julio ni ricevis la viziton de du eminentaj usonaj senatanoj, Joe Lieberman kaj John McCain, kiu tiutempe estis la kandidato de la Respublikana Partio por prezidento de sia lando. Kiel eksa malliberulo de milito, kiu restis kaptita dum kvin jaroj kaj duono en brutalaj kondiĉoj en Vjetnamio, la senatano McCain konis tre bone la kruelecon de kaptiteco. Kiam li demandis min pri la tri usonaj kontraktintoj, mi diris ke la sekvontan tagon ni estis provontaj elliberigi ilin. Li kapjesis solene kaj deziris al ni la plejan bonon.

La trupoj kiuj estis partoprenontaj en Operaco Ŝakon! estis farante siajn lastajn prepariĝojn, kiam la armeaj komandantoj petis al mi la finan aprobon.

15

La operaco estas preta, sinjoro prezidanto.

—Do, procedu —mi diris—. Procedu sub mia responso.

Mi fermis la okulojn kaj preĝis. Poste mi vidis iliajn vizaĝojn.

16

La 2-an de julio la ostaĝoj vekigis en malgranda konstruaĵo, en la departemento Gŭavjaro, la sama areo kiu iam formis la kernon de la zono senarmeigita por la FARK. La humoro de la kaptitoj estis modera, tamen esperiga. Ili sciis ke io okazas: iliaj retenantoj donis al ili novajn vestojn kaj decan nutraĵon, kaj por la unua fojo en pluraj jaroj ili povis dormi sur maldikaj matracoj. Tamen, ili ne havis ideon pri kio estis venonta.

Nek la FARK.

Dum kelkaj semajnoj la ostaĝoj estis rimarkintaj, ke siaj kaptitoj estis konfuzitaj kaj senesperaj. La ostaĝoj estis aŭdintaj la novaĵojn pri la mortoj de Raúl Reyes, Iván Ríos kaj Manuel Marulanda tra la radio, kaj ili vidis la manieron kiel siaj retenantoj, kiu dum multaj jaroj estis montrintaj disciplinon, nun ŝajnis drivantaj sen orientiĝo. Verŝajne ili estis persekutitaj, kaj do la ekskursoj en la ĝangalo fariĝis pli penigaj kaj longaj, aldone, la manĝoprovizo fariĝis intermita kaj ĝi estis limigita je kelkaj kuleroj da rizo akompanita kun iom da buljono. Keith Stansell, unu el la tri usonaj kontraktintoj, nomis tiujn piediradojn la "piediradoj de la malsato". La plimulto el la ostaĝoj aspektis kiel "lignostangoj sur kiuj iu eltranĉis vangojn kaj kolojn" skribis Stansell. Ingrid Betancourt estis en eĉ pli malbona kondiĉo. Unu grupo de dek unu kolombiaj soldatoj kaj policanoj —kelkaj kun pli ol jardeko en kaptiteco fare de la FARK— estis translokita al tiu ĉi tendaro.

Je sunleviĝo, la dek kvin kidnapitoj eksciis kial ili estis portitaj al tiu loko, kaj kial ilia traktado estis pliboniginta iom el unu momento al alia. La detaloj estis svagaj, sed la FARK rakontis al ili ke unu internacia delegitaro de sukuristoj estis alvenonta tiun posttagmezon per helikoptero. La celo de la delegitaro estis ekzameni la sanstaton de la ostaĝoj —probable tiale, la ostaĝoj estis ricevintaj pli bonan manĝaĵon— kaj porti ilin al alia parto de la ĝangalo, kie alia roto de la FARK estos okupiĝonta por ili. Kelkaj kidnapitoj kredis ke tio estis ebla enkonduko al konsento pri kiu iuj homoj intertraktis por la liberigo. "Mi kredis ke ili liberigus nin proksimume unu jaron poste", skribis Stansell. Dum la FARK preparis sin por ricevi la delegitaron, ili ordonis al la kaptitoj vestiĝi

per la novaj kamufluniformoj kaj stari en vico, kio indikis ke io signifoplena estis okazonta.

Ĉio ŝajnis tre kuraĝige. Tamen, la humoro de la ostaĝoj ŝanĝiĝis abrupte kiam la du helikopteroj aperis. Ili vidis konsternite ke unu surteriĝis apud kultivaĵo de plantoj de kokao, dum la alia restis en la aero, kaj ke nekonataj homoj kun fremdaj aspektoj malsupreniris el la unua flugmaŝino. Kelkaj sukuristoj surhavis T-ĉemizojn kun la bildo de Che Guevara. Ili estis akompanitaj de raportisto kaj kameraisto de venezuela televidkanalo.

—Meze de la kolombia ĝangalo —kriis la raportisto, sub la surdiga bruo de la helikoptero— ni estas tie ĉe io kio fariĝos historia momento por Kolombio kaj la mondo!

La ostaĝoj tuj komprenis ke tio ne temis pri humaneca misio kaj ke pli ĝuste tio ŝajnis alia propaganda artifiko de la FARK. Kun kreskanta ĉagreno, la ostaĝoj rigardis kiel la sukuristoj komencis babili kaj ŝerci kun la membroj de la FARK, kaj kiamaniere tiuj homoj donis malgrandan donacon al la ĉefgerilisto.

Tiam la vizitantoj haltis ŝerci kaj turnis sin al la dek kvin ostaĝoj. Ili prenis el siaj poŝoj plastajn mankatenojn kaj ili diris al la ostaĝoj ke la mankatenoj necesis por porti ilin al la loko determinita. La malkontento de la ostaĝoj estigis veran ekribelon. Anstataŭ signali la komencon de la fino de ilia kaptiteco, kiel ili estis esperinte, tiu procedo ŝajnis heroldi etapon eĉ pli obskura por ili. La usonanoj kriis kolere al la sukuristoj ke ili neniel eniros la helikopteron. Unu el la kidnapitaj policianoj ĵetis sin al la tero kaj baraktis en protesto, rifuzante stariĝi. Dume, la helikopteraĵoj helicoj ankoraŭ giris plenrapide, donante senton de urĝeco al okazaĵoj.

Fine, la sukuristoj sukcesis persvadi la ostaĝojn por ne plu rezisti kaj komenci eniri en la helikopteron. Du el la ĉefoj de la FARK eniris kun ili. Kiam la helikoptero ekflugis, la sukuristoj traktis pli senindulge la ostaĝojn, pelante ilin sur iliajn sidejojn, demetante iliajn botojn kaj ligante iliajn piedojn. La ĉefoj de la FARK rigardis la scenon kun rideto de kontenteco en siaj vizaĝoj. La helikoptero kliniĝis okcidenten kaj altiĝis super la ĝangalo.

Kelkajn sekundojn poste, haoso eksplodis. La ostaĝoj observis en stato de absoluta surpriziĝo, kiamaniere la sukuristoj ĵetis al la planko la du ĉefojn de la FARK kaj submetis ilin rapide. La "doktoro" de la delegitaro prenis injektilon kaj enŝprucigis fortan

sedativon al unu el la ĉefoj. Tiam la gvidanto de la "humanismaj laboristoj" alparolis la ostaĝojn:

—Ni estas la Nacia Armeo. Vi estas liberaj!

La ostaĝoj rigardis unu la alian kun mirego kaj komencis festi kaj brakumi inter ili.

Ĝi estis senegala operaco en milita historio. La dek kvin ostaĝoj estis elliberigitaj, kaj du ĉefoj el la FARK submetitaj sen ajna vundito. Okazis neniu pafo.

La fina fazo de la Operaco Ŝakon! estis planita dum pluraj semajnoj. Kiam niaj armeanoj decidis uzi la trompon kiel bazo por la elliberigo, ili studis la signojn lasitaj de la lastaj agoj de la teroristoj. Kelkajn monatojn antaŭe, la FARK estis liverinta sinjorinon Clara Rojas, la patrino de Emmanuel, al venezuela delegitaro kiu venis per helikoptero kun televida ekipaĵo. Nia Armitaj Fortoj studis la videon detale, kaj ili kredis ke tio, kio iam funkciis havis la plej bonan ŝancon funkcii denove. Por inspiriĝi, ili vidis grandajn filmojn el Holivudo pri artifikoj, kiel *Ocean's Eleven*. Kiam niaj komandantoj determinis la planon, naŭ kuraĝaj kolombiaj soldatoj volontuliĝis por partopreni en la operaco, kaj ili ricevis kelkajn rolojn kiujn ili estis devontaj personigi. Dum kelkaj tagoj ili faris provludojn kaj konsideris ĉiujn eblajn situaciojn. Ili eĉ vokis instruiston pri aktorado por helpi ilin plibonigi siajn rolojn.

Niaj komandantoj prenis ankaŭ ĉiujn antaŭzorgojn eblajn, sciante ke multaj aferoj povus disvolviĝi malbone, en tiu situacio tiom nervostreĉiga kaj kiu implikis multajn malkonfidantajn homojn. La plastaj mankatenoj estis necesaj por malinstigi la ostaĝojn provi ribelon ene de la helikoptero kaj antaŭ ol ili povis esti informitaj pri la plenumita trompo. Ribelo estintus katastrofa: la ostaĝoj superis nombre, je preskaŭ du al unu, la "humanismajn laboristojn". En proksima bazo en Gŭavjaro estis traŭmatologoj atendantaj kaj pretaj por la okazaĵo ke la misio havis misfortunan rezulton. Dume, la "kameraisto" faris elsendon per sona kanalo rekte al la pilotoj de la helikopteroj, por ke ili atentu la faktojn dum ĉio estis okazanta. Se la "ĵurnalistino" estus dirinta "Mi perdis mian monujon", tio estis kodo kiu signifis ke la teroristoj estis eltrovitaj la trompon kaj ili devus ekflugi por savi siajn vivojn.

Feliĉe por ĉiuj, la operaco disvolviĝis sen problemoj. Ekde la surterigo de la helikoptero ĝis la momento kiam la du teroristoj de

la FARK estis senaktivigitaj, la tuta tempodaŭro estis dudek du minutoj kaj dek tri sekundoj.

La plej granda danĝero prezentigis en dum la festeto. Dum la pasaĝeroj saltis brakumante unu la alian, ridante kaj kriante pro ĝojo, iuj timis, ke la malnova helikoptero povus kolapsi. Tamen la Providenco ridetis denove tiun tagon kaj tiuj homoj estis savitaj el ĉiuj danĝeroj.

—Kolombio! Kolombio! —ili kriis.

Kaj tiam ili kantis la nacian himnon, tute fieraj pri nia lando.

17

Dum la Operaco Shakon! estis disvolviĝanta, mi sekvis mian kutiman praktikon: labori por la komunumoj, kvazaŭ nenio estis okazanta.

Mi iris al la departemento Santandero, kiu estis difektita pro severa inundo, esperante helpi kunordigi la respondon al la katastrofo. La destino volis ke tiame tiu areo ne havis fidindan komunikservon por poŝtelefonoj. Mi havis satelitan telefonon por eventuala uzo en okazo de urĝo, sed la malforteco de la signalo malhelpis min sekvi la operacon paŝon post paŝo. Mi procedis kiel kutime, dediĉante mian tutan atenton al la raportoj de la viktimoj de la inundoj kaj mi provante pensi pri kiamaniere nia registaro povus helpi ilin. Eble la situacio de tiuj homoj ne ŝajnis tiom drama al la ekstera mondo, sed vere ĝi estis tiel katastrofa kiel tiu de la ostaĝoj. Ankaŭ iliaj vivoj estis en danĝero.

Fine, dum ni revenis per helikoptero el la damaĝita areo, mi ricevis telefonvokon el la ministro Santos.

—S-ro Prezidento —li diris per rompiĝema voĉo—, la operaco estis kompleta sukceso! Ingrid, la tri usonanoj kaj dek unu soldatoj kaj policianoj estas sekuraj kaj sanaj.

—Dankon, S-ro Ministro, dank' al Dio —mi respondis—. Gratulojn. Bonvole transdonu mian saluton al la komandantoj kaj al la kolombia Armeo. Hodiaŭ estas tago tre fieriga.

Mi rakontis la novaĵon al la pasaĝeroj de nia helikoptero. Neniu sciis ion ajn pri la operaco. Alicia Arango ploris pro ĝojo kaj donis al mi grandegan brakumon. Mi manpremis kun la ministro Andrés Uriel Gallego, kun la generalo Flavio Buitrago kaj kun la admiralo Rodolfo Amaya. Horacio Serpa, la reganto de Santandero, kaj kiu estis unu el miaj rivaloj en la porprezidentaj kampanjoj de 2002 kaj 2006, ankaŭ festis kun ni.

Laŭ nia norma proceduro en tiaj kazoj, la ministro Santos prezentigis en la televido kaj diskonigis la novaĵon al la kolombia popolo kaj la mondo. Ene de la sekvintaj horoj mi ricevis telefonvokojn el multaj estroj. La prezidento Bush telefonis por gratuli nin pro la operaco kaj kiamaniere ĝi simbolis la radikalan transformiĝon de Kolombio. La prezidento Sarkozy esprimis sian

ĝojon, Ban Ki-Moon, la sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj manifestis sian kontenton pro la operaco kaj publike petis al la FARK "liberigu tuj kaj senkondiĉe la ceterajn ostaĝojn". Barack Obama, la kandidato de la Demokrata Partio por la prezidenteco de Usono, publikigis deklaron por esprimi sian apogon por nia "konstanta strategio de ne fari koncesiojn al la FARK", kaj li promesis, ke, se li estus elektita, li farus "ĉion kion mi povas ... por venki tiun terorisman organizaĵon".

La ministro Santos petis min iri kun li al la armea bazo de Tolemaida¹ por bonvenigi la eksajn ostaĝojn fronte al la tuta nacio. Mi rifuzis.

—Iru sola, ministro —mi diris—. Necesas ke vi faru tion por la bono de via politika estonteco.

Mi volis diri al la lando, ke en tempoj de granda ĝojo aŭ de tragedio, nia laborvolo restos sendamaĝa kaj ke ni reagos prudente. Ni estis procedontaj kiel kutime pri la aferoj de nia lando kaj ni estis plenumontaj nian devon. Mi sekvis la ceteron de la tiutaga tagordo, kiu inkluzivis la remalfermon de la hospitalo San-José en Bogoto. Tiu estis alia projekto kun granda graveco: Antaŭ nia regado, pluraj publikaj hospitaloj bankrotis kaj fermis siajn pordojn. Sub nia administracio ni reviziis la strukturon de 224 publikaj hospitaloj. Danke al pli efika administrado, al la senlaca laboro de la ministroj Juan Luis Londoño kaj Diego Palacio, kaj al la enfluo de enspezoj devenintaj de la sukcesa revigligo de la kolombia ekonomio, ni povis savi multajn hospitalojn el bankroto kaj flegi grandan nombron de pacientoj. Kiam ni alvenis al la hospitalo, multaj homoj staris kaj aplaŭdis nin. Mi dankis ilin kaj antaŭeniris kun nia laboro. Niaj agadoj estis pli gravaj ol la gratuloj.

Tiunokte mi kunvenis kun la liberigitoj en la Armea Klubo de Bogoto. Ingrid ploris kaj dankis abunde al la kolombiaj armeanoj.

—Ili savis nin en senmanka maniero —ŝi diris—. Mi neniam esperis eliri viva. —Ŝi urĝis la najbarajn landojn haltigi ilian entrudiĝon en la kolombian demokration—: La kolombianoj elektis S-ron Álvaro Uribe —ŝi pludiris—. La kolombianoj ne elektis la grupon FARK.

1 NT Elparolita "Tolemaida", estas armea aerbazo en la municipo Nilo, departemento Kundinamarko, tiome apuda al municipo Melgar (departemento Tolimo), ke en multaj tekstoj aperas Tolemaida kvazaŭ apartenanta al Melgar.

Tiam la usonanoj estis survoje al Teksaso, akompanataj de la ambasadoro de Usono, kiu estis alportinta bier-keston por kunhavi kun ili en la aviadilo. Ankaŭ la kontraktintoj esprimis sian dankon kiam ili parolis al la amaskomunikiloj. Unu el ili, Marc Gonsalves, diris, ke la Operaco Ŝakon! estis "la plej perfekta rekupero okazinta en la historio de la mondo".

Mi invitis ĉiujn eksajn ostaĝojn kolombiajn al la Domo de Nariño, kaj petis ĉiun el ili sendi mesaĝon al la lando tra televido. Kiam mia vico venis mi komencis dankante Dion kaj la Sanktan Virgulinon. Mi gratulis la ministrojn Santos, la generalon Padilla, la generalon Montoya kaj aliajn membrojn de la alta ordonantaro arma. Dum Ingrid kaj la soldatoj kaj policanoj rigardis, mi gratulis la familiojn de tiuj liberigitaj, ĉar ili estis tiel kuraĝaj kiel la ostaĝoj dum la tuta tempo kiam tiuj estis en kaptiteco. Kaj mi tiam promesis ke mi ne ripozos ĝis kiam ĉiuj ceteraj kidnapitoj en Kolombio estu liberigitaj: mi legis la nomojn, unu post alia, de tiuj kiuj tiam daŭris en kaptiteco.

—Meze de ĉiuj niaj malfortaĵoj kaj limigoj, ni ne forgesu, eĉ ne unu tagon, pri la familioj de tiuj kiuj ankoraŭ restas kidnapitaj. Tio ĉi estas nia devontigo: ke ni ne forgesos vin, eĉ momente, ĝis kiam vi ĉiuj estu liberaj denove.

18

La sekvintan tagon, Ĝngrid renkontiĝis kun siaj gefiloj en la flughaveno de Bogoto. Ili eltenis pli ol ses jarojn disigitaj. Ŝi estis tiel feliĉa, ke ŝi supreniris la ŝtuparon kurante kaj brakumis la gefilojn antaŭ ol malsupreniri el la aviadilo. Ili eliris, manon en mano, kun plenaj ridetoj.

—Ĉi tiuj estas miaj gefiloj, mia fiero, mia motivo por vivi —ŝi diris, sekigante la larmojn.

Ili, kiuj apenaŭ atingis adoleskecon kiam sia patrino estis forrabita, nun jam estis junaj plenkreskuloj dek naŭ kaj dudek jarojn aĝaj.

—Ili aspektas tiel malsamaj, sed tiel egalaj —diris Ĝngrid—. Ili estas tiel belaj. Mi pensas ke ili estas belaj.

Por la usonaj kontraktintoj, la renkontiĝo kun la amatoj prokrastiĝis iom plu, tamen ĝi estis same feliĉa. Post surteriĝo en Teksaso, ili estis ricevataj de armeaj kuracistoj kiuj helpis ilin por prepariĝi mense por ilia reveno al civila vivo, procezo kiun ili estis priskribontaj poste, kune kun siaj teruraj travivaĵoj kiel ostaĝoj, en sia sukcesa libro *Out of Captivity*. Multaj aferoj estis ŝanĝitaj post tiuj pluraj jaroj kiujn ili pasigis en kaptiteco, kaj ili devis alfronti kelkajn problemojn en iliaj privataj vivoj. Tamen, nenio povis venki la gajecon vidi siajn familiojn. Keith Stansell ekkonis siajn ĝemelajn filojn, kiuj jam aĝis kvin jarojn. "Paĉjo! Paĉjo!" Ili kriis dum ĉiu el ili alkroĉiĝis al unu el liaj kruroj. La patrino estis pendiginta foton pri Stansell sur muro de la ĉambro de siaj filoj.

Ĉiuj familioj estis konservintaj la fidon.

Mi havis la privilegion ĉeesti plurajn el tiuj renkontiĝoj. Tiunokte en la Armea Klubo, mi vidis plurajn el la dek unu kolombiaj soldatoj kaj policianoj elliberigitaj brakumi siajn amatojn post pli ol dek jaroj da disigo. Miaj okuloj pleniĝis de larmoj je la penso pri tiom da doloro kiom ili suferis, kaj pri la feliĉo kaj korfaciliĝo kiun ili devis senti ĉar ili povis esti denove kun siaj amatoj.

Ĉi tio estis sceno de tiu Kolombio al kiu mi estis sopirinta, de tiu Kolombio, kiun mi amis, de la Kolombio al kiu ni estis dediĉantaj la klopodojn de la tuta vivo. Tiu Kolombio kie la familioj povu vivi

kune en paco, kie la gepatroj povu brakumi siajn gefilojn sen ke iu ajn atencu kontraŭ ilia unuiĝo.

19

Kelkajn horojn post la operaco, ni interkaptis alian mesaĝon de la FARK. Ĝi estis el la roto kiu estis reteninta la ostaĝojn; la mesaĝo estis direktita al la centra komandantaro. Ĝi diris simple: "ILI TROMPIS NIN".

Dum du semajnoj ni aŭskultis la grupon FARK riproĉi inter si kun kreskanta amareco, en la plena nescio ke ili estis spionitaj ĝis la plej profunda nivelo kaj ni estis aŭskultante ĉiun vorton kiun ili diris. Kaj poste, la frekvenco eksilentis.

La Operaco Ŝakon! estis katastrofa bato por la FARK. Al ĉiuj progresoj kiujn ni estis farintaj en la lastaj jaroj, aldoniĝis tiu ĉi operaco kiu restigis la grupon FARK sen kelkaj el la plej gravaj kidnapitoj kaj kiu klare pruvis la operacan superecon de la kolombiaj sekurigaj fortoj. Tamen, ni sciis, ke tio ne estis la fino de nia lukto. Ni estis antaŭvidintaj, prave, ke la FARK estis provontaj reakiri sian ĉefrolemon mortigante senkulpulojn kaj efektivigante atakojn, samkiel ili faris sennombrajn fojojn en la pasinteco. La 5-an de julio, tri tagojn post la elliberigo de la ostaĝoj, la Armeo kaptis preskaŭ tunon da eksplodaĵoj en bieno en la ĉirkaŭaĵo de Bogoto, kiuj, laŭ indikaĵoj, estis destinitaj por forta atako kiel venĝa signalo. La 10-an de julio, ni frustris sturmon al la prizono de alta sekureco Doña Juana, en la departemento Kaldas, kie pli ol 500 membroj de la FARK estis entenataj.

Fakte, nia lukto kontraŭ la FARK daŭre havis flugojn kaj falojn. En la sekvintaj jaroj, aliaj gravaj teroristoj estis malaktivigitaj per nia militaj agoj. En junio de 2010, ni realigis Operacon Kameleonon, iasence preskaŭ tiel aŭdaca kiel la Operaco Ŝakon!: bazita sur la informaĵoj kolektitaj tra malmobiliziĝinto el la FARK, niaj Armitaj Fortoj elliberigis unu policiston kaj tri soldatojn kiuj estis restintaj kiel ostaĝoj pli ol dek du jaroj. Tamen, malgraŭ nia progreso, la FARK kaj aliaj violentaj grupoj daŭre mortigis kaj kripligis senkulpulojn. En 2009, la FARK elprenis la reganton de la departemento Kaketao¹ el lia hejmo, li estis forrabita kaj murdita per gorgotranĉo, en maltraktivila eĥo de antaŭaj tragedioj. La

1 [NT Hispanlingve "Caquetá", en la suda parto de Kolombio.](#)

teroristoj ne estis malaperontaj per si mem, kaj la kolombia popolo bezonas teni sin fortika.

La longtempa filozofio de teroristoj, kaj lia rifuzo malaperi, estis bone esprimita de viro kiu pasis multe da tempo inter ili: Fernando Araújo.

—La problemo estas ke la FARK havas nenian realan nocion de la tempo —li diris en intervjuo—. Ili pensas ke ili iras tra malfacila epoko kaj ili kredas ke neeviteble ili releviĝos, kiel ili ĉiam faris. Dum mi estis katenita, mi aŭskultis ilin kanti jene: "Se hodiaŭo estas malbona, morgaŭo estos bona". La ĉefa trajto de la FARK estas persisteco. Mi persone ne kredas ke ili iam ajn sidos ĉe tablo de intertraktadoj kaj rezignos sian mision. Kiam ajn ili havos fondusojn, tio estas: drogoj kaj subteno de eksterlandaj registaroj, ili havos ŝancon por ekzisti.

20

Araŭjo kaj mi havis la saman takson pri la defioj —kaj iliaj kaŭzoj— kiujn ankoraŭ ni havis antaŭ ni. Ĝis la lasta tago de nia regado ni daŭrigis la klopodojn por nei al la teroristoj sekuran rifuĝejon en aliaj landoj. Mi bedaŭras diri ke, malgraŭ nia bona fido, nia tasko neniam estis facila.

Unu ekzemplo pri tio okazis en 2009, kiam mi parolis kun prezidento Chávez pri la kazo de Luciano Marín Arango, alinomita "Iván Márquez", konata teroristo de la FARK. Márquez, estro de la Kariba Bloko de la FARK, estis responsa pri la murdo de pluraj centoj da kolombianoj, kaj niaj raportoj el informiĝado montris ke li estis en Venezuelo. Ni ankaŭ havis nedubebajn informojn pri la ĉeesto de pluraj nelegaj armitaj tendaroj en la venezuela teritorio. Mi donis la tutan informon tiurilatan al la prezidento Chávez. En unu posta kunveno li diris al mi ke li sendis armeanojn de Venezuelo tien, kaj tamen ili ne trovis iun spuron de la teroristoj.

—Prezidento, vi devas uzi viajn servojn de informiĝado —mi diris al li— ĉar se vi simple sendas vian Armeon, la teroristoj havas personojn kiuj avertas ilin, kaj do ili fuĝos.

La prezidento Chávez suspiris kaj ŝanĝis la temon. Ĝin li poste reprenis kaj diris, ke se lia registaro batalus kontraŭ la "gerilistoj", Venezuelo neniam povus esti utila kiel peranto por la paco en Kolombio. Mi respondis ke la teroristoj neniam estus interesitaj pri paco, dum ili havus kaŝejon en Venezuelo, ĉar ili sentus sin komfortaj en tia "ekzilejo" kaj ili alkroĉiĝus al siaj esperoj por reveni al Kolombio kaj rekomenci siajn krimajn agadojn.

—Nu bone —la prezidento Chávez respondis seke—. Mi pensos pri unu solvo kaj tiam mi kontaktos vin.

Nelonge poste, mi ĉeestis la Pintkunvenon de la Amerikoj en Trinidado kaj Tobago. Tiam estis la unua fojo ke prezidento Brack Obama kunvenis kun gvidantoj el la tuta regiono. Tuj post la fino la plena sesio, Mi turnis min al la prezidento Chávez en la sama kunvena salono.

—S-ro Prezidento —mi alparolis lin—, ĉu vi jam havas la solvon kiun vi promesis al mi rilate al Iván Márquez?

La prezidento Chávez flustris en mian orelon.

—Jen la situacio: Se vi kapablas, vi povas iri preni lin, kiel vi agis pri Granda. Sed vi ne povos diri, ke mi donis al vi permeson. Se vi diras tion, mi diros ke tio estas mensogo.

Mi estis perturbita pro tiuj vortoj, kaj mi tuj esprimis mian maltrankvilon al Jaime Bermúdez, ministro de Eksterlandaj Aferoj, kaj al Carolina Barco, nia ambasadorino en Usono.

Ni daŭre provadis solvi niajn diferencojn per dialogo kaj bonvolo. Tamen, kun tiaj partneroj kiajn ni havis, haltigi la agadojn de la FARK kaj la NLA en la najbaraj landoj estis konstanta defio.

La urĝeco de ĉi tiu tasko pliiĝis kiam la drogŝakristoj teroristoj eniris pli vundeblan stadion. Mi estis lerninta ke organizaĵoj kiel ETA —la eŭska terorisma grupo— daŭrigis siajn krimajn agadojn multajn jarojn post la perdo de sia popola subteno kaj de la plimulto el sia agadkapablo. Simile al la FARK, dum multaj jaroj ĝiaj gvidantoj uzis la francan teritorion kiel rifuĝejo. La hispanaj responsuloj rakontis al mi antaŭ nelonge ke la mortiga bato kiun ĉi tiu grupo ricevis okazis kiam Francio permesis al la hispana Polico eniri sian teritorion por serĉi la teroristojn. Iom poste, ETA anoncis la finon de sia armita kampanjo. Mi pensas, do, ke por estigi ĉenon de similaj okazaĵoj kiuj igu la grupojn FARK kaj NLA fini iliajn armitajn agadojn, necesas malaperigi ilian eblecon senti sin komfortaj en najbaraj landoj.

Meze de 2010, kiam restis nur kelkaj semajnoj ĝis la fino de nia prezidenteco, ni ricevis novajn fotojn el satelito kaj freŝdatajn videaĵojn kaptitaj de proksime far informantoj; bildoj kiuj montris la ekziston de tendaroj da la FARK en Venezuelo.

Ni konsideris tri eblajn agojn: la unua estis bombado simila al tiu kiun ni faris kontraŭ Raúl Reyes, tamen, ni decidis ke jam estis tro malfrue por ke nia registaro povus alfronti la eblajn konsekvencoj. La dua eblo estis resti silenta, sed ĉi tio estus nekongrua kun ĉio kion ni faris dum la lastaj ok jaroj, kaj malutila por la sekureco de Kolombio. Turmentis min de la ideo ke en la estonteco oni demandus min: *se vi sciis ion, kial vi ne agis?* Ĉiam kiam mi konfirmis kun la aŭtoritatoj informon el la komunumo pri iu krimulo, mi mem denunciis lin publike, videbligis lin, kaj tiel, perdinte la anonimecon, la krimulo komencis perdi la senpunecon. En mia menso konstruiĝis tiu ĉi paralelaĵo, mi ne povis akcepti resti silenta. Do, la lasta elektelejaĵo estis denunci la ekziston de la

terorismaj tendaroj al la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj. Ĝi estis la plej bona havebla elekteblaĵo, sub la cirkonstancoj, kaj tio estis kion ni faris.

Kiel atendinde, tiu denunco rezultigis unu lastan internacian interalfronton en la lastaj monatoj de nia regado. Unu plian fojon, mi estis montrita far kelkaj riproĉantoj kvazaŭ mi estus la agresanto: unu homo kiu volis altiri atenton aŭ ruinigi ĉion per unu lasta kverelo antaŭ ol forlasi la mondan scenejon. Kvazaŭ la fakto havi bildojn el satelito kiuj klare montris la ĉeston de terorismaj tendaroj en venezuela teritorio estus *mia* kulpo, aŭ kvazaŭ mi devus resti silenta kaj permesi la daŭrigon de ĉi tiu farso. Tio estis alia ekzemplo de la duobla moralo al kiu estis submetita Kolombio en ĝia serĉo de sekureco. Ĉu Usono devintus resti kun krucitaj brakoj, kiam ĝi malkovris la kaŝejon de Osama Bin Laden en Pakistano? Aŭ, por citi ekzemplon el la historio, ĉu Prezidento John F. Kennedy kulpis kiam li malkovris la ĉeston de sovetiaj nukleaj misiloj en Kubo? Ĉu iu serioze pensis ke prezidento Kennedy devintus simple ignori tian minacon, aŭ ke li povintus atingi solvon provinte konduki bone kun Fidel Castro?

Ne; ni estis defendontaj la sekurecon de Kolombio ĉiakoste, senkonsidere de la konsekvencoj. Tiamaniere estis la aferoj dum nia regado kaj ili ĉiam estos samaj.

Mallonge antaŭ ol finiĝi mia prezidenteco, okazis en Kankuno, Meksiko, pintkunveno de prezidentoj por antaŭenigi la kreadon de institucio unuiganta por la latinamerikaj kaj karibiaj landoj. Post la parolado de la prezidento de Haitio kaj la ekzameno pri la kazo de tiu frata nacio parte detruita pro tertremo, mi petis la parolon, mi antaŭsciigis kun respekto ke mi estis pritraktonta nian situacion kun Venezuelo, kiu inkluzivis la haltigon de la komercaj rilatoj, trudita far la Registaro de tiu lando. La prezidento Chávez respondis, li plendis, ke li estis "ĵetitaj" el la faciliga tasko por peti la liberigon de ostaĝoj de la FARK¹ kaj li finis dirinte ke li ne plu aŭskultos min kaj foriros. Mi diris al li:

—Prezidento, ĉi tiuj kunvenoj estas por solvi la problemojn. —Li insistis pri sia foriro kaj tiam mi ripostis—: Prezidento, vi insultas el pli ol du mil kilometrojn for, kaj vizaĝ-al-vizaĝe vi ne permesas superi la malfacilaĵojn.

1 NT Vidu la paĝojn 245-an ĝis 247-an.

Nenio utilis. Li kvazaŭis foriri, kaj tiam mi leviĝis el mia seĝo, mi agnoskas ke mi donis polmofrapon al la tablo kaj kriis:

—Estu viro, ne foriru.

Tra mia menso ŝprucis vico de pensoj; unuflanke, min maltrankviligis rompi la regulojn de diplomatio estante mi reprezentanto de mia lando, aliflanke, mi pensis ke, pro digno, necesis agi kun plena energio fronte al la malkuraĝo de la tiranoj.

Ĉi tiaj alfrontoj estis ripetigantaj ĝis la fino, tamen ili estis limigitaj al tre malgranda nombro da landoj. Ni ĝuis pozitivajn rilatojn kun la vasta plimulto el la landoj el Latinameriko kaj el la tuta mondo. Ekzistis homoj kiuj asertis, ke la agoj de nia registaro estis kontribuintaj por izoli Kolombion. Tio estas ne nur malvera, sed kontraŭa al la realeco: danke al niaj multaj komercaj interkonsentoj, investoj, kaj multaj aliaj agoj, je la fino de nia regado Kolombio ekestis, el ekonomia vidpunkto, pli integrita ol iam antaŭe kun la cetero de Latinameriko kaj la mondo; niaj ligoj kun Eŭropo ankaŭ pliboniĝis rimarkinde. Dum la lasta jaro de nia prezidenteco, la kanada ĉefministro Stephen Harper, faris al mi specialan inviton al la pintkunveno de la nacioj de la G8 —integrita de ok landoj el inter la plej grandaj ekonomioj el la mondo— por, en ĝi, klarigi la manieron kiel ni antaŭeniris en Kolombio.

En januaro 2009 mi estis honorita ricevi el prezidento Bush la Prezidentan Medalon de Libereco, la plej alta honoro por civiluloj en Usono. La ceremonio okazis en Vaŝingtono kaj tiam ankaŭ ricevis tiun honorajon la brita eksa ĉefministro Tony Blair kaj la eksprezidento de Aŭstralio John Howard. Min ĝojigis la fakto ke kiam prezidento Bush parolis al mi tiun tagon, li honoris la fortecon kaj persistecon de la kolombia popolo, gratulante la tutan landon pro nia granda antaŭeniro.

—Komence de ĉi tiu jardeko, la Respubliko Kolombio estis proksime al esti, en la plej bona kazo, fiaskinta Ŝtato —diris la prezidento George W. Bush—. "Sub ĉi tiuj kondiĉoj, iu ajn bezonis ion pli ol ambicio kaj idealoj por kandidatiĝi por politika ofico: tio postulis grandegan personan kuraĝon kaj forton de karaktero. La prezidento Uribe forĝis fortan ligon kun sia popolo; popolo kiu kunvenis kun sia prezidento en la komunumoj de la tuta lando kaj kiu vidis lin atingi rezultojn ... Rifuzinte permesi ke la lando kiun li tiom multe amas estu detruita far interna malamiko, pruvinte ke la terorismo povas esti konfrontita kaj venkita, la prezidento Uribe

revivigis la esperojn de siaj samlandanoj, kaj li montris modelon de gvidado al la mondo kiu lin observas".

En la sekvintaj jaroj mi havis tre koran rilaton ankaŭ kun la prezidento Obama kaj kun la altrangaj funkciuloj de lia administracio. Kiam en junio 2010 la ŝtatsekretariino Hillary Clinton vizitis nin en Kolombio, ŝi, mirigita, rakontis ke ŝi kunvenis kun sia edzo —kiu estis plenumante filantropian laboron en alia urbo en Kolombio— por vespermanĝo en unu restoracio de Bogoto: io kio estus neebla nur kelkajn jarojn antaŭe por la problemoj de nesekureco.

—Ni parolis pri kiel eksterordinare estis povi fari tiajn agojn — Clinton diris al reporteroj la sekvintan tagon—. Mia koro pleniĝis de la espero kiu, mi scias, plenigas la korojn de multaj kolombianoj por ĉio, kio estis atingita.

Ŝi aldonis, ke la registaro de Obama "plene apogis" la Planon Kolombion, kaj volis "konstrui sur la sukceso de la lastaj jaroj, atendante por estonteco de pli daŭrigebla paco, progreso kaj prospero por la popolo de ĉi tiu bela lando".

Mi renkontis la prezidenton Obama en pluraj okazoj. Unu el ili, kiel jam menciite, estis ĉe la pintkunveno en Trinidado kaj Tobago. Tiutage, dum tagmanĝo kun la prezidento Alan Garcia de Peruo, mi rimarkis ke la prezidento Obama estis varma kaj inteligenta, kaj ke li estis tre interesata pri Kolombio. Ni pritraktis iom detale la Triangulon de Konfido, kiun mi skizis sur paperfolio. Fine, la prezidento Obama ridetis kaj diris ke li plene konsentis pri la tri punktoj; tiam li proponis al mi sian aŭtografo. Mi konsentis. *Por la prezidento Uribe, kun admiro*, diris la dediĉo.

Mi havis bonegajn rilatojn kun gvidantoj el tuta Latinameriko. Mi ĉiam taksis ege kuraĝa la meksikan prezidenton, Felipe Calderón. Alan Garcia el Peruo estis admirinda eminentulo. Antaŭe, la prezidento Toledo estis apoginta nin rezolute por venki la amazonan fronton de la FARK. Mi sentas grandan dankemon kaj respekton por la prezidentoj de Ĉilio, de Dominika Respubliko kaj de la landoj de Centra Ameriko kaj Karibio. Ni ankaŭ ŝuldas specialan dankon al la prezidentoj de Panamo Mireya Moscoso, Martín Torrijos kaj al la tre kompetenta Ricardo Martinelli.

Por la surprizo de multaj observantoj, mi havis tre fortajn rilatojn ankaŭ kun multaj regionaj gvidantoj kiuj estis emaj al la ideologia maldekstro. La prezidentoj Tabare Vázquez de Urugvajo, Fernando

Lugo de Paragvajo kaj multaj aliaj. Mi sentis respekton por Luiz Inácio Lula da Silva el Brazilo: lia persona supreniro el malriĉeco ŝajnis al mi admirinda, kaj lia pragmata politiko estis pozitiva ekzemplo por tiuj, kiuj estis adoptintaj malcedeman socialismon. Mi vidis lin pliampleksigi la sociajn gvidliniojn kiujn lia antaŭulo, la prezidento Cardozo, klarigis al pluraj regionaj gvidantoj por apliki ilin en niaj landoj. En 2008, la prezidento Lula estis en Kolombio dum la festo de nia sendependiĝo, kiam centoj da homoj eliris denove al la stratoj por kontraŭstari al la FARK¹. La manifestacioj okazis en urboj ĉirkaŭ la mondo; en lokoj kiel Madrido, Toronto, Sidnejo kaj Parizo, kie Ingrid Betancourt alparolis la homamasojn kaj instigis per la slogano "Ne pliaj kidnapiroj!". La prezidentoj Lula kaj García kaj mi estis en Leticia, Kolombio, amazona urbo lima kun Brazilo, kie Shakira, la kolombia kantistino kiu faris tiom da bono al nia lando, partoprenis en koncerto. Tiutage, la prezidento Lula apogis senrestrikte nian aferon, li rimarkigis ke la rilatoj inter niaj landoj estis "bonegaj" kaj apogis nian lukton kontraŭ la teroristoj.

Eĉ tiuj, kiuj povis senti nekonfidon —ĉu pro miaj interagoj kun la prezidento Chávez, ĉu pro aliaj kialoj— tre ofte ŝanĝis sian opinion. Mi rememoras ke mi estis kun la prezidento de Urugvajo, José Mujica, kiu estis antaŭe gerila ĉefo dum pluraj jaroj. Mi rimarkis, ke li rigardis min kun skeptikemo. Mi komencis nian konversacion kun rideto kaj diris al li:

—Ha, la rakontoj, kiujn vi eble aŭdis pri mi!

La prezidento Mujica ekridis kaj tiel komenciĝis forta kaj konstrua rilato. Kun la landoj kiuj apogis nin en nia serĉado por sekureco kaj paco ni nur havis la plej bonajn sentojn de frateco kaj respekto. Estas neeble menciigi tiom multajn regantojn, kun kiuj mi povis amiki. Mi rememoros kun admiro la fortikecon de José María Aznar, la pragmatismojn aŭskultita en la dialogoj kun Felipe González. La bonajn rilatojn kun la prezidento Rodríguez Zapatero kaj, ĉiam, kun Lia Moŝto Juan Carlos, reĝo de Hispanio, kaj kun la granda amiko Tony Blair, brita ĉefministro.

1 NT Temas pri manifestacioj de la 20-a de julio; la lundon 4-an de februaro samjara estis okazintaj similajn manifestaciojn en urboj de la tuta mondo kontraŭ la FARK.

21

Inter la multaj defioj, kiujn ankoraŭ havas Kolombio, eble neniu tiel maltrankviliĝis min —aŭ mi opinias tiom grava— kiel la plago de la drogoj.

Tiel longe kiel Kolombio estas grava produktanto de narkotajoj, ĉiam estas la ekzisteblo de droĝsakristoj teroristoj. Fernando Araŭjo pravis: la solaj drogoj per si mem povas subteni la grupon FARK kaj aliajn grupojn dum multaj jaroj. Kiam nia prezidenteco finiĝis, la FARK ankoraŭ lukris ĉirkaŭ 200 milionojn da dolaroj ĉiujare per trafiko de drogoj. Ĉi tio, malgraŭ ĉiuj niaj klopodoj —kiuj estis iagrade sukcesaj— por venki la produktantojn de narkotajoj. Fine de nia regado, la areo de Kolombio kun kultivaĵoj de kokao estis reduktita al ĉirkaŭ 68.000 hektaroj. Kompare, en la jaro 2000 la areo kun kultivaĵoj estis almenaŭ 170.000 hektaroj, kaj eble ĝis 400.000 se oni estus uzinta modernajn teknikojn por mezurado. En ajna kazo, la malpliigo de kultivaĵoj estis nekompleta tamen signifa.

Aldone al aera ŝprucado kaj al la mana elradikigo, ni provis apliki novigajn agrogramojn. Unu el ili estis nomita "Arbargardistaj Familioj". Sub tiu ĉi iniciato, preskaŭ 100.000 familioj kiuj estis implikitaj en la kultivado de kokao en la tuta Kolombio subskribis interkonsentojn kun nia registaro por kontroli la arbarojn kaj ĝangalojn kiuj situis proksime al siaj hejmoj, por ke tiuj vegetaĵejoj restu liberaj de kokao-plantoj kaj por kontroli la rekuperon de la indiĝena ekosistemo cele al la protektado de la medio. Interŝanĝe, post la certigo fare de Unuiĝintaj Nacioj pri ke tiuj civitanoj plenumis siajn devojn, oni pagis al ili sumon de mono kiu, por periodo de dek ok monatoj, estis proksimume 2.000 dolaroj. Aldone, ni klopodis apogi ilin per instruado, sanprotektado kaj diversaj sociaj servoj.

Ni ankaŭ faris grandajn penojn por malmunti la kartelojn kiuj kunlaboris kun organizaĵoj kiel la FARK, la kvazaŭmilitistoj kaj aliaj dediĉitaj nur al trafiko de drogoj. Dum nia regado, proksimume 1.140 droĝsakristoj estis ekstradiciitaj al Usono kaj aliaj landoj. Ni aplikis la leĝon kiu rajtigis la konfiskon, laŭ la kategorio de nelica riĉiĝo, tiel ke en la lastaj tri jaroj de nia administrado 15.000 nelicaj proprietaĵoj estis konfiskitaj.

Tamen, la streboj de Kolombio ne estis sufiĉaj. Necesas la redukto de tutmonda droguzo. Multaj Registaroj faras klopodojn, aliaj turnas sian dorson al la problemo, kelkaj sen entrepreni la lukton volas la facilan vojon de licigo. Tamen, la afero estas ankaŭ, kaj tre altgrade, de la socioj kaj de la familioj. Tiel danĝere estas provi lasi ĝin ekskluzive al la Ŝtato, kiel ignori ĝin fare de la Ŝtato kun la ekskuzo, ke ĝi devus esti limigita al la sino de la familio.

Mi malaprobas la licigon. Ne nur kiel patro, nek nur pro nia lukto, sed ankaŭ ĉar mi ne trovas logikon en la kialoj kiuj subtenas ĝin. Ne necesas licigi la drogojn por eviti porti la droguzanton al malliberejo kaj por doni al li kuracan traktadon. Por ke en la traktado al la drogmaniulo, la kuracisto preskribu drogojn laŭ malkreskantaj dozoj, ankaŭ ne necesas licigi; la leĝo ne neas la spacojn de la scienco. Fakuloj pri la temo antaŭvidas ke la licigo stimulus tiom multe la socian droguzadon —speciale en la unuaj jaroj— ke ne ekzistus maniero forpreni enspezojn el la krimuloj, aŭ enspezi impostojn, kun akcepteblaj procentoj kaj en sufiĉa kvanto por pagi la sentoksignon de la eksponenciale kreskanta nombro de droguzantoj.

La libera volo ne devas endanĝerigi aliajn homojn. Per la libereco por uzi drogojn la individuo perdas sian veran liberecon, li aŭ ŝi agas freneze, kaj endanĝerigas tiujn kiuj estas ĉirkaŭe. Ankaŭ li aŭ ŝi perdas la sinregadon, la esencon de sia libereco, tion kio diferencigas onin disde la besta regno.

En multaj landoj, inkluzive de Kolombio, preskaŭ ĉiuj sikarioj kaptitaj post kiam ili faris krimojn, estis trovitaj sub la influo de drogoj, ofte en kombino kun alkoholo.

Pro la kreskanta produktado en la nordo kaj la droguzo en la sudo, malaperis la malnova divido inter produktantaj landoj kaj droguzantaj landoj: la faktoj plifortigas la bezonon de la tutmonda penado.

La media temo estas fundamenta, kaj en landoj kun amazona arbaro, kiel Kolombio, de granda graveco. Sendepende de kiom ajn malgrandiĝus la prezo, kiel rezulto de eventuala laŭleĝigo, la kultivado de drogoj restus estante grava minaco al la ĉefa arbaro: pli malalta prezo povus malkuraĝigi la plantadon en Kalifornio kaj pliigi ĝin en la amazona arbaro.

Por multaj scienculoj la divido inter mildaj kaj fortaj drogoj estas eŭfemismo, la unuaj estas vehikloj, kiuj kondukas al la lastaj.

Kiam studento demandis min kial alkoholo jes kaj mariĥuano ne, mi nur respondis: "Pretiĝu por respondi kial mariĥuano jes kaj kokaino ne".

La ekonomio de la drogoj iras kontraŭ la produktiva ekonomio; la trafiko de drogoj estas spekulado kun krimo.

Mi kredas ĝusta la jenan gvidlinio: sentoksigo sen malliberejo por la droguzanto, strategioj de publika sanprotektado kaj prevento por la komunumo kaj malliberejo por la distribuantoj.

Kiam turistoj komencis veni al Kolombio, unu internacia videaĵo akuzis unu el niaj urboj pri esti destino por turismo de droguzantoj. Ni provis kapti la distribuantojn kaj malsukcesis: ili portis permesitan personan dozon. Multaj homoj el tiuj kiuj akuzas tiujn faktojn, stimulas la licigon. Ni ne povas akcepti tion.

Pli grava ol la debato pri la laŭleĝigo estus postuli al ĉiu lando la raporton pri siaj agoj rilate la droguzon, la kaptan de droĝsakristoj, la konfiskadon de nelicaj proprietaĵoj, la kontrolo de kemiaj prekursoroj, ktp.

22

Kiam mia prezidenteco estis finiĝante, mi frontis al unu lasta demando. Unu afero, grandparte kaŭzinta tion kion ni faris en la lastaj ok jaroj, maltrankviligis min. Eble la maltrankvilon estigis vojaĝo kiun mi faris al loko situanta nur cent kilometrojn de la Kariba Maro, tamen tiel alta en la Andoj ke ofte neĝas en la ĉirkaŭaĵo. Tie ekzistas malgranda indiana vilaĝo nomata Kankawarwa.

La loĝantoj de Kankawarwa vestas sin per blankaj roboj kiuj etendiĝas ĝis la piedoj. Iliaj triboj estas rektaj posteuloj de la inkaoj, kaj eĉ hodiaŭ kelkaj el la plejaĝuloj ne parolas la hispanan. Ilia izolado dum granda parto de la historio estis preskaŭ totala: en epoko tiom proksima kiel la 1950-aj jaroj kelkaj loĝantoj ankoraŭ kredis, ke la hispanaj reĝoj regis la ĉirkaŭajn teritoriojn. Eblas alveni tien nur piede, aŭ rajde sur mulo aŭ per helikoptero. La nebulo ĉirkaŭvolvas la pintojn de la montaro Sierra Nevada, kie situas Kankawarwa. Kiam pluvigas, multaj lokanoj estas feliĉaj, kredante, ke tiu akvo purigas la animon.

La Sierra Nevada estas loko bela kaj profunde spirita. Tamen, dum multaj jaroj ĝi estis mikrokosmo el la plej malbonaj tragedioj de Kolombio. Laŭ la plejaĝuloj de la tribo, blankaj viroj restis for de la areo ĝis la frua dudeka jarcento. Kiam ili alvenis, ili opiniis ke la indianoj estis malfortaj; do, ili alportis tiam negrojn el la marbordo por seksperforti la indianinojn, kaj tiel generi pli fortikan rason por la manlaboro. En la jaroj 1950-aj, la delokitaj homoj kiuj fuĝis el "La Violento", ekkaptis la plej bonajn agrikulturajn terenojn kaj devigis la indianojn fuĝi al pli altaj kaj malfekundaj teroj. En la 1970-aj jaroj, kelkaj el la unuaj kultivaĵoj de mariĥuano en Kolombio aperis sur la flankoj de la montoj. Baldaŭ poste venis la FARK kaj la NLA, sekvitaj de la kvazaŭmilitistoj: dum ĉi tiuj interbatalis por la regado de trafiko de drogoj, ili murdis multajn senkulpaĵajn indianojn.

Dum nia regado, ni laboris kun la indianaj triboj por restarigi la sekurecon kiu estis malaperinta ekde preskaŭ unu jarcento antaŭe. Ni konstruis plurajn vilaĝojn, inkluzive la vilaĝon Kankawarwa, kies inaŭguron mi ĉeestis en 2009. Ĝiaj loĝantoj diris ke multaj aferoj ŝanĝiĝis, kaj kvankam la perforto ne malaperis tute el la areo, la

tribaj plejaĝuloj diris ke la transformo estis tre signifa. Efektive, niaj altmontaj brigadoj elpelis multajn droĝsakristojn teroristojn kiuj antaŭe agadis senpune dum pluraj jardekoj; ni konstruis novajn lernejojn kaj kreis laborpostenojn; kaj la ekoturismo tra la mondo komencis malkovri la ĉarmojn de la Sierra Nevada.

—La ŝanĝo estas kvazaŭ inter tago kaj nokto —Danilo Villafañe Torres, unu el la plejaĝuloj de la tribo, diris al ĵurnalisto—. La aferoj ne estas kiel ili estis antaŭe.

—Ĝuste, kiam estis tiu "antaŭe"? —Demandis la raportisto.

Villafañe pensis dum momento.

—En 2007 —li respondis—. En 2007 la aferoj misokazis tie ĉi.

La vortoj de la maljunulo estis alia pruvo de nia progreso kiel Nacio. Tamen ili tuj poste sugestis al mi alion: ke nia progreso en multaj areoj de Kolombio estis tre freŝdata kaj malfirma.

En unu Registara-Komunuma Kunsido kiun ni okazigis en Nabusimaque, vilaĝeto en la Sierra Nevada —ankoraŭ en la unua periodo de nia regado— la maljunaj indianoj kiuj posedis la aŭtoritaton diris al mi, ke tri semajnoj antaŭe, viroj en uniformo estis alvenintaj asertante ke ili estis kvazaŭarmeanoj, kaj kelkajn tagojn poste, alvenis aliaj viroj kun identaj uniformoj kaj diris ke ili estis gerilistoj, kaj la tagon antaŭ nia renkontiĝo, tiuj kiuj alvenis estis identigitaj kiel soldatoj de la Registaro. Tiun tagon ni taskis al kolonelo de la Armeo la mision esti ligilo por konstrui konfidon kun la komunumo; strategio kiu estis ripetita en pluraj lokoj. Agitas min io kio daŭre gastas en mia menso: la konfido devas esti por ĉiam.

Ju pli nia dua prezidenta mandato alproksimiĝis al sia fino, des pli mi maltrankviliĝis, pro tio, ke mi ne havis sufiĉan tempon por fari transformon longedaŭra kaj konstanta. La sekureco estis plibonigita en grandaj areoj de la lando, tamen ĝi ankoraŭ estis tre febla. Eĉ en tiuj areoj, kie ni estis koncentrigintaj ekde la komenco de nia prezidenteco —kiel la metropola areo de Medegino—, la mortigoj daŭre okazadis kun maltrankviliga ofteco. Mi memoris denove ke en du jarcentoj da historio, Kolombio nur havis kvardek sep jarojn da paco. Ni estis alfrontantaj malfacilaĵojn, kiuj estis tiel malnovaj kiel nia lando. Kaj mi ne estis certa, ke ok jaroj estintus sufiĉaj por doni definitivan solvon al tiuj problemoj kaj transformi la landon en longedaŭra maniero.

Dume, kelkaj el niaj partianoj komencis diskuti la eblecon de mia kandidateco por tria periodo. La opiniondoj montris, ke pli ol duono el la kolombianoj volis ke mi kandidatigu denove; kaj laŭ enketo publikigita far la ĵurnalo *El Tiempo* en januaro 2010, pli ol 85 procento el verŝajnaj voĉdonontoj diris, ke ili voĉdonus "jes" al eventuala referendumo por amendi la konstitucion por permesi al mi serĉi la trian mandaton.

Mi havis interkontraŭajn sentojn pri tiu ebleco kaj mi priskribis ilin publike en multaj okazoj kiel "vojkruciĝo de la animo". Unuflanke, mi ne ŝatis la ideon eternigi la prezidenton, ĉar dum mia tuta vivo mi baraktis en harmonio kun la demokratiaj principoj. Tial, la eblo de tria mandato sentigis min tre malkomforta. Tamen, ankaŭ zorgigis min, ke la gvidlinioj de nia registaro ne daŭrus, kaj ke la tuta progreso kiun ni faris estus renversebla. Mi memoris ĉiujn amikojn kaj amatojn, kiujn ni estis perdintaj en la lastaj jaroj pro la violento. Mi pensis ankaŭ pri ĉiuj civitanoj kiuj profitis el nia politiko, kiel la ostaĝoj kiuj nun ĝuas la liberon, aŭ la loĝantoj de Kankawarwa. Tiusence mi komprenis la popolan deziron por ke nia registaro daŭru kvar jarojn plu: ni daŭre estus alfrontontaj la problemojn kaj atingontaj pliajn venkojn.

Mi kredis ke Kolombio devis preni decidon surbaze de siaj bezonoj, siaj cirkonstancoj kaj siaj leĝoj. Kaj mi ankaŭ rememoris ke en la freŝdata historio, kelkaj demokratie elektitaj ŝtatestroj en aliaj landoj restis pli ol jardeko en regado, por efektiviĝi la transformojn kiujn ili estis komencintaj. Franklin Roosevelt estis prezidento de Usono dum dek tri jaroj. Margaret Thatcher estis ĉefministrino de Britio dum dek unu jaroj. Felipe González estis ĉefministro de Hispanio dum dek kvar jaroj. Neniu el tiuj gvidantoj damaĝis la demokratiajn instituciojn de sia lando ĉar li aŭ ŝi restis en sia posteno dum tiel longa tempo. Kaj ili ĉiuj profitis de tiuj tempoj por certigi ke siaj registaroj signu definitive "antaŭan" kaj "postan" epokojn en la historio de siaj landoj.

Ju pli la debato intensiĝis, des pli mi estis kritikita ĉar mi ne decidiĝis kaj ne konigis klare mian intencon ĉu aproban, ĉu rifuzan. Retrospektive, mi kredas ke eble estis eraro mia tio: ne haltigi la popolan iniciaton por permesi ke tria mandato eblu. Mi povus esti dirinta simple "ne". Tamen, mi profitis de la debato por paroli ĉiutage, ne pri la reelekto de la prezidento, sed pri la neceso plidaŭrigi la tri gvidliniojn de la Triangulo de Konfido.

Finfine, mi pensis ke la plej bona strategio estis montri respekton al niaj demokratiaj institucioj kaj lasi ke la temo sekvu ĝian iradon tra la Kongreso kaj la tribunaloj, kaj tio estas kion mi faris. Tre baldaŭ ili donis sian verdikton. La 26-an de februaro de 2010 la Konstitucia Tribunalo de Kolombio verdiktis kontraŭ la leĝecon de la klopodoj de niaj partianoj por fari referendumon pri eventuala tria mandato.

Mi troviĝis en Barranquilla, en publika evento pri problemoj kaj solvoj rilate la sanzorgan servon kiam la tribunala decido estis oficiale anoncita. Kelkaj raportistoj tuj invadis la kunvenejon kaj komencis krei: "Kio estas via reago al la decido?". Mi petis al ili la favoron atendi ĝis la finiĝo de la kunsido, ĉar la temoj de la Ŝtato ĉiam estis unue ol la politiko. Kiam ni finis, kelkajn minutojn poste, mi alparolis la landon.

—Mi akceptas kaj respektas la decidon de la Tribunalo —mi diris — ĉiuj ni civitanoj devas respekti la leĝon, precipe la prezidento.

Mi parolis mallonge pri mia respekto al la disigo de povoj, pri la graveco de la demokratio kaj pri la neceso submeti la popolopinion ŝtaton —kiel la plej partoprenebla aspekto de la Laŭjura Ŝtato— al la verdikto de la institucioj, en tiu ĉi kazo la konstitucia Tribunalo. Mi ankaŭ parolis, ankoraŭfoje, pri la graveco de la Triangulo de Konfido. Mi finis per la promeso "servi Kolombion el ajna tranĉeo, en ajna cirkonstanco, kaj ĝis la lasta tago de mia vivo".

Tiam mi faris kion mi ĉiam estis farinta: reiri al la laboro.

23

Iom antaŭ la finiĝo de nia mandato, mi vizitis la municipon Urrao, tiu loko kiu ludis unikan kaj plurfojan rolon en mia vivo kaj en mia prezidenteco. Ĝi estis la areo kiu servis kiel operaca bazo de la kapitano Franko¹ kaj lia liberala gerila roto dum mia infanaĝo. Poste, ĝi estis la loko kie operaciis la ĉefoj de la FARK kiuj murdis la sinjorojn Guillermo Gaviria Correa kaj Gilberto Echeverri Mejía.

Norde de Salgar —la malgranda urbeto proksime de la bieno kie mi kreskis— kaj sur la sama vojo, situas Urrao; ĝia tradicio de violento kaj de mirinda beleco datiĝas ekde la deknaŭa jarcento. La generalo Rafael Uribe Uribe, unu el miaj herooj kaj kies portreton mi havis en la prezidenta oficejo, diris ke Urrao estis unu "perdita paradizo".

Kaj fakte ĝi estas paradizo: ĝiaj belaj verdaj montetoj estas sekvataj de ĝangala valo kiu kondukas unue al la rivero Atrato kaj sekve al la Pacifika Oceano. La orkideoj, kun ruĝaj kaj rozkoloraj tonoj, floras ĉie. La mirinda Kolombio, tiu kiun mia patrino kaj mia patro instruis min ami, prezentiĝas tie por ke la tuta mondo povu ĝin vidi. Tamen, kaj malgraŭ ĝiaj naturaj trezoroj, por la jaro 2002 kaj pro la violento, la loĝantaro de Urrao estis malkreskinta al ĉirkaŭ 30.000 homoj, kaj la plimulto el la negocejoj fermis siajn pordojn je la kvina horo posttagmeze ĉar la komercistoj timis esti atakataj —laŭ Luis Ernesto Vélez, urbestro de tiu municipo—. Je nur tri kilometroj de la vilaĝo estis avizoj dirantaj: "Bonvenon al la FARK". Kiam la teroristoj ekagis, la loĝantoj de Urrao pasigis tri aŭ kvar tagojn enfermiĝintaj en la domoj ĝis kiam la situacio estis renormaliĝinta.

Kiam mi revenis al Urrao en la lastaj tagoj de nia regado, por fari unu el la lastaj Registara-Komunumaj Kunsidoj, la municipo estis renormaliĝinta kaj sia loĝantaro estis pliiĝinta denove al ĉirkaŭ 45.000 homoj, laŭ tio kion diris al mi la urbestro Vélez. La FARK estis forpelita plejparte, ekzistis denove laborpostenoj, kaj la ĉeesto de la Ŝtato estis profunde sentata. La transformo de Urrao estis tiel granda, ke ĝi ne plu estis konata kiel terorisma bastiono, sed kiel unu el la plej bonaj lokoj en la mondo por glisparaŝutado pro ĝiaj

1 [NT Bonvole rememoru aŭ relegu la paĝojn 53-an kaj 54-an.](#)

fortaj ventoj kaj superbaj montopintoj. Turistoj el Eŭropo kaj Usono venis en kreskanta nombro, surprizitaj pro ĝia natura beleco. La mendo de restejoj kreskis ĝis tia punkto ke la urbestro Vélez kaj aliaj homoj ofte ludonis siajn bienajn domojn por loĝigi turistojn el Kolombio kaj el eksterlando.

Post la surteriĝo en Urrao, mi vidis avizon metita de la lokanoj sur proksima monto. Ĝi diris: prezidento URIBE, PRO VIA KULPO URRAO ESTAS EN PACO. Tio estis mesaĝo de dankemo kun tuŝeto de ironio, kiu reflektis la polemikojn kiuj akompanis mian prezidentecon ĝis la lasta tago. En la renkontiĝo kun la loĝantoj dum la Registara-Komunuma Kunsido, ni parolis pri la defioj kiujn ankoraŭ havis nia lando. Ekzistis multaj temoj diskutindaj. Tamen, la problemoj de Urrao menciitaj tiun tagon jam tiam estis kiel tiuj de multaj aliaj landoj: temoj kiel publikaj servoj, ŝoseoj kaj lernejoj. Estis klare, ke la sinteno de la loĝantoj estis ŝanĝita. Kiam mi ekestis prezidento, la kolombianoj suferis silente la perforton, la viktimoj ne depostulis, en la unuaj Registara-Komunumaj Kunsidoj la depostuloj estis esprimitaj kun vervo kiu limis la koleron. En la finaj Kunsidoj, la plimulto el la homoj estis ŝanĝinta la sintenon: la samaj depostuloj, aŭ eĉ pli, estis prezentataj, jam ekzistis konscienco por postuli al la aŭtoritatoj, tamen la granda plimulto sentigis konfidon. Multajn fojojn mi estis devigita elteni la plej malmolajn el tiuj postuloj, nu, mi estis certa ke la ŝanĝo estis ekstreme pozitiva. La civitanoj nun fidas sian registaron sufiĉe por atendi ŝanĝon; tio estis rimarkinda transformo. Ni pasis el Registaro kiu petegis dialogon kun la teroristoj al Registaro devontigita kiu dialogis kun la kolombia popolo.

Mi rememoras ke dum nia regado ekzistis kelkaj momentoj, kiam mi sentis min plene kontentigita kaj eĉ feliĉa. Mi ĉiam pensis ke ekzistis pli da farendaj aferoj, ke alia grupo de homoj devus esti elliberigita, ke ni devus superi alian obstaklon en nia vojo al la bonstato de ĉiuj kolombianoj. Nu, tiun tagon en Urrao mi havis fortan senton pri la pasinteco, la nuntempo kaj la estonteco de Kolombio. Mi povis vidi, en kiu loko de sia "filmo" troviĝis Kolombio, reference al io kion prezidento Clinton iam diris fronte al granda aŭkultantaro —en defendo de nia registaro—: ke Kolombion oni devas rigardi en filmon kaj ne en la bildo de unu tago, por vidi el kie ĝi venis, kie ĝi troviĝas, kaj kien ĝi iras. Pluraj generacioj, inkluzive de la mia, estis ruinigitaj far bandoj de krimuloj. Kaj kvankam la krimuloj ne estis tute malaperintaj, la vivo estis plibonigita en ekonomia kaj sekureca aferoj.

Dum mi pretiĝis por forlasi mian prezidentan postenon, mi havis la esperon, ke Juan Manuel Santos, mia eksa ministro pri Defendado, kaj kiu estis elektita por sukcedi min kiel prezidento, estis daŭrigonta nian laboron nome de la kolombia popolo.

Je proksimume la sama tempo, dum mi trairis kampanon areon, mi renkontis kampanon kiu dankis min pro la multo kiom la lando pliboniĝis.

—Tiu ĉi lando ne estas lando el lakto kaj mielo —mi respondis.

—Ha, ja —li diris—, tamen, almenaŭ la riveroj ne plu estas makulitaj per sango.

Ĉi tia estis la Kolombio kiun mi transdonis al niaj posteuloj: tiu Kolombio kiu ne estis paradizo, tiu Kolombio kiu ankoraŭ havis multajn seriozajn problemojn, tamen tiu Kolombio kiu estis antaŭeniranta en la ĝusta direkto.

Estas vere, ke ni faris erarojn kaj mi surprenas la respondecon pri ili. Tamen mi certas ke, ĝenerale, ni faris bone la aferojn. Ni batalis kontraŭ la violentuloj kaj ni venkis multajn el ili kaj, samtempe, ni bontenis la respekton por la demokratio, la homaj rajtoj kaj la kohereco de nia socio. Ni faris ĉion en maniero, kiu igis nin gajni la subtenon kaj respekton de la granda plimulto el la kolombia popolo. Fine de nia regado, ni havis popolan aprobon inter 74 kaj 84 procentoj.

Nun, kiam mi vidas la internacian panoramon, la okazaĵojn en la araba mondo, en Afganio, en Pakistano kaj en la cetero de Latinameriko, mi vidas ke ili alfrontas defiojn similaj al tiuj kiujn alfrontis Kolombio unu jardekon antaŭe. Mi esperas ke la gvidantoj de tiuj landoj povas lerni el niaj sukcesoj kaj el multaj el niaj malsukcesoj. La deziro por sekureco kaj bonstato estas universala kaj neniuj sistemo ekster demokratio povas certigi la daŭrigeblon de ili ambaŭ.

Mi esperas ke nia historio servos al la estontaj generacioj de kolombianoj, kaj de junaj gvidantoj el la tuta mondo, kiel pruvo, ke *ajna* situacio, kiel ajn neesperiga ĝi povas ŝajni, povas esti alfrontata. La historio de Kolombio montras, ke ĉiuj homaj problemoj havas homan solvon. Kiam ekzistas amo, ekzistas sindonemo, kaj do, ekzistas efikeco kaj oni povas konkludi ke la celo estas atingebla.

EPILOGO

Unu vesperon en novembro 2011, dek kvin monatoj post la fino de mia prezidenteco, mi estis en la oficejo en Bogoto kun la usona ĵurnalisto Brian Winter, fundamenta helpinto por skribi tiun ĉi libron. Ni estis ĝuante kelkajn kuketojn kaj ni akompanis ilin kun glasoj da lakto dum ni interparolis pri la lastaj tagoj de mia regado. Kaj tiam la interparolo ektemis pri Urrao kaj ĝia rimarkinda ŝanĝiĝo. Ni decidis telefonvoki la urbestron de tiu vilaĝo, Luis Ernesto Vélez, por peti al li pliajn detalojn pri la lastatempa progreso de Urrao. Kaj li rakontis al ni la historion kiu aperas en la lasta ĉapitro. Antaŭ ol fini la telefonaĵon, li diris al mi:

—Dankon pro ĉio, S-ro eksprezidento. Kolombio ŝanĝiĝis por ĉiam danke al la laboro de vi ĉiuj en la Registaro.

Du horojn poste mi ricevis telefonan alvokon. Estis denove la urbestro Vélez:

—La FARK bruligis mian bienon —li diris angorplene.

La domo kiun li ludonis al turistoj nun estis en flamoj. Kaj nur la Providenco malhelpis pli grandan tragedion: la urbestro diris al ni ke, se ne estintus ĉar nia telefonvoko retenis lin dum kelkaj minutoj, probable li estus alveninta al sia bieno en la momento kiam la teroristoj estis bruligante ĝin.

—Certe mi estintus forrabita aŭ mortigita —li diris per trema voĉo. Iom poste li eksciis, ke aliaj bienoj, de pluraj personoj, ankaŭ estis bruligitaj.

Tiel kiel tiu ĉi epizodo ilustras, la progreso de Kolombio restas fragila. La lando pliboniĝis, ni eliminis kelkajn terorismajn grupojn, kaj malfortigis aliajn, tamen ilia krima avido persistas. La serpento estas ankoraŭ vivanta. Okazintaĵoj kiel tiu de S-ro Vélez denove prezentigas kaj montras signojn de pliiĝemo. Ŝajnas ke la Registaro estas perdinta terenon fronte al la violento en kelkaj regionoj de Kolombio. Kaj kvankam mi kredas, ke la prezidento Santos havas firman decidon venki la teroristojn, timigas min la penso ke kelkaj individuoj ene de lia Registaro konsideras neinvertigebla la progreson de la lasta jardeko aŭ ili subtaksas ĝin, ili ŝanĝas la kurson kaj tiel kreas novajn kaj seriozajn riskoj. Por la bono de nia

demokratio ni devas resti firmaj. Ni ne povas cedi al la teroristoj aŭ al tiuj kiuj ŝirmas ilin. Se ni malsukcesus, ekzistas la ebleco, ke ombra epoko envolvos denove Kolombion.

Ekde la tempo, kiam mi revenis al la bela kondiĉo de simpla civitano de Kolombio, la 7-an de aŭgusto de 2010, mi provis konservi bonan ritmon de laboro. Mi estis honorita por ofici kiel vicprezidanto de la Grupo de Enketo de la Unuiĝintaj Nacioj kreita por enketi pri la sturmo al la floteto naviginta al Gazo, en majo 2010. Mi estis vizitanta instruisto kaj mi iris al multaj universitatoj por diskuti. Mi defendis la heredaĵon el nia registaro kaj tiujn, kiuj estas maljuste persekutitaj dum la sekvinta tempo. Mi denove renkontiĝis kun la aktivecoj de la kamparo. Nun mi helpas plenumi la revon de nova universitato, neprofitcela, kiu estos disponebla por kolombianoj de foraj vilaĝoj.

Mi plutenas mian partoprenon en politiko, mi neniam ĝin forlasis. Mi amas Kolombion kaj mi vivas dankema al miaj samlandanoj kiuj permesis al mi konduki la Nacion dum du prezidentaj periodoj. Miaj kritikantoj konfuzas mian partoprenon en politiko kun personaj ambicioj. Mi ŝatas fari kampanjon sen la neceso ke mi estu kandidato; mi defendas kelkajn tezojn kaj mi kontraŭas la mankon de konsekvenco inter la paroladoj de iu kandidato kaj ties agoj kiam tiu fariĝas reganto. Mi tute komprenas ke ideoj ne povas stagni, tamen naŭzas min ke oni lasu ilin senvartaj aŭ anstataŭitaj pro la aplaŭdoj de la momento. La gvidantaro devas esti kapabla naĝi kontraŭ la fluo kiun aliuloj volas trudi, kaj devas persisti por ĝin ŝanĝi.

Mi kredas en la Pura Demokratia Centro difinanta la ekvilibron inter Sekureco, Investado kaj Socia Kohero. La malriĉeco kaj neegaleco en Kolombio postulas sekurecon kiel fonto de rimedoj por venki ilin.

Teruras min la penso ke ni povas pasi el sekureco kiu progresis, al apenaŭa sekureco kaj, denove, al la ĝenerala malsekureco.

Mi petas la Kreinton ke permesu min diskuti ĝis la fina tago, kun amo al Kolombio, kun la sola intenco servi al tiu ĉi lando, kiel omaĝo al tiom multaj homoj mortigitaj en ĉi tiu lukto, kaj kiel devontigo al la rajto de la novaj generacioj vivi en la hejmlando de justeco, bonstato kaj egaleco.

DANKOJ

Ĉio, kion mi atingis en la vivo kaj kio valoris la penon estis rezulto el teama laboro. Ĉi tiu libro ne estis escepto.

Mi volas danki al Brian Winter. Li helpis min skribi libron kiu ampleksas mian regadon kaj mian vivon kun detalo kaj kun emocio. La talento de Brian kiel verkisto, lia sentokompreno kiel intervjuisto kaj lia sagaceco por ĉerpi interesajn anekdotojn estis esencaj laŭlonge de la du jaroj kiujn ni pasigis laborante kune en tiu ĉi projekto.

La saĝa helpo kaj konsilado de mia asesoro Iván Duque Márquez estis same utila laŭlonge de tiu procezo. Iván estas pli ol saĝa kaj mi certas ke li havas brilan estontecon fronte.

Pluraj proksimaj amikoj proponis al mi siajn plej profundajn pensojn kaj faris al mi multajn sugestojn por plibonigi ĉi tiun libron, inkluzive de Francisco Santos, la generaloj Óscar Naranjo, Freddy Padilla kaj Mario Montoya; Alicia Arango, Luis Guillermo Plata, Jaime Bermúdez, Luis Alberto Moreno, Fernando Araŭjo, Cecilia María Vélez kaj César Mauricio Velásquez. Beatriz Delgado, mia persona afergvida asistantino kaj Carolina Escamilla Pacheco, juna kaj talenta asistantino, ankaŭ havigis sian valoran helpon.

Lina Maria Moreno, mia edzino, kaj Tomás kaj Jerónimo Uribe, miaj filoj, estis la plej akrevidaj kaj postulemaj legantoj de tiu ĉi libro. Iliaj konsiloj kaj kontribuoj riĉigis ĉiun paĝon. Mi amas ilin ĉiujn.

Mi ankaŭ tre dankas al Leticia Bernal, pro ŝia senmezura helpo en la eldona korektado de la libro, kun Jan Miller, mia agento, kun Ray García, Mark Chait, kaj lia teamo de *Penguin*. Danke al ilia imago kaj fido, ni havis la okazon rakonti la historion de Kolombio al la mondo en detala kaj serioza maniero. Por tiu ĉi privilegio mi estas senfine dankema.

Ĉiuj profitoj el la vendo de tiu ĉi libro estos destinitaj por financi senprofitan universitaton en kies kreado ni estas laborante. Komence la universitato havos fokuson sur teknologio kaj inĝenierado kaj ĝi funkcios kiel eble plej multe per Interreto por ke junaj kolombianoj kiuj vivas for de la grandaj urboj havu aliron al

altkvalita instruado. Estas kun granda ĝojo, ke mi rimarkis, ke la publikigo de tiu ĉi libro koincidas kun la naskiĝo de nia unua nepo, filo de Tomás kaj Isabel Sofía, kaj kun la geedziĝo de Jerónimo kaj Shadia. Laŭmezure, kiel mi iĝas pli maljuna, mi esperas povi fordoni mian tutan animon al la novaj generacioj de kolombianoj, por ke ili, same kiel niaj nepoj, povu vivi feliĉe en tiu ĉi nia nobla lando. Tiele miaj gepatroj kaj miaj avoj povos esti feliĉaj en la ĉielo.

Plian fojon, mi volas danki al la membroj de la Armitaj Fortoj kiuj protektis min kaj mian familion. Mi ĉiam estos danka al la generalo Flavio Buitrago, la admiralo Rodolfo Amaya, la kolonelo Eduardo Ramírez kaj al ĉiuj viroj kaj virinoj, lojalaj kaj sinoferemaj, kiuj dediĉis sin al tiu ĉi malfacila kaj riska tasko.

Fine, kaj plej grave: tiu ĉi libro ne estintus ebla sen la sinoferoj kaj firma laboro de la nekonitaj herooj kiuj laboris por krei pli bonan Kolombio. Ĉu ili estis membroj de la Armeo, ĉu de la Polico, ĉu de la juĝa sistemo, ĉu de la diversaj ministerioj aŭ simplaj kolombianoj kiuj laboris por plibonigi iom nian landon; la ŝanĝo de la lastaj jaroj simple ne estintus ebla sen ilia peno. Iliaj kontribuoj impresas kaj kortuŝas min. Mia historio estas ilia historio; ilia historio estas tiu mia. Kune ni laboros por plibonigi Kolombion.

KELKAJ VORTOJ PRI LA FONTOJ

Same kiel ĉiuj homaj kapabloj, la memoro estas neperfekta. Ni strebis por havigi en tiu ĉi libro informon, kiel eble plej riĉan kaj detalan, pri mia vivo kaj mia prezidenteco, kaj ni forte laboris por ĉerpi precedencoj, kunteksto kaj informoj el diversaj fontoj. La ĉefa fonto por la enhavo de tiu ĉi libro estis la intervjuoj kiujn Brian Winter faris al mi dum kvar semajnoj inter majo de 2010 kaj novembro de 2011 en Vaŝingtono, en Bogoto, en Rionegro kaj en El Ubérrimo, mia bieno en Montería. Tiuj dialogoj estis kompletigitaj per intervjuoj kun proksimume dudek kvin homoj, inkluzive de membroj de mia familio, funkciuloj de miaj registaroj kaj oficiroj de la kolombia sekuriga agentaro. Brian turnis sin al prestiĝaj amaskomunikiloj por la kunteksto de ŝlosilaj datoj kaj eventoj, inkluzive de kolombiaj fontoj kiel la ĵurnaloj *El Colombiano*, kaj *El Mundo* de Medeĝino, *El Tiempo* de Bogoto, la gazeto *Semana*, kaj konataj internaciaj fontoj kiel *Reuters*, *The Economist* kaj *New York Times*.

Brian kaj mi faris ĉion kio estis en nia ebleco por kontroli la informaĵojn kiuj estas enhavitaj en tiu ĉi libro per multnombraj bonreputaciaj fontoj. Neeviteble, malgraŭ niaj plej bonaj klopodoj, povas ekzisti enŝteligitaj eraroj rezultantaj el malĝustaj aŭ nekompletaj informoj de la amaskomunikiloj kaj de akademiaj verkoj. Ĉiuj eraroj de memoro estas sole miaj.

FONTOJ

UNUA PARTO: La rakonto pri la kidnapo de Guillermo Gaviria Correa kaj la okazintaĵoj kondukintaj al ĝi, estis ĉerpitaj el raportoj de kolombiaj amaskomunikiloj, kaj el artikolo publikigita en la gazeto *Times* de Londono verkita far Glenn D. Paige, usona politikologo kiu studis detale la vivon de la departementestro kaj lin kandidatigis por Nobel Premio. La priskriboj de la kaptiteco de la departementestro Gaviria venis el la leteroj kiujn li skribis al sia edzino, multaj el ili estis eldonitaj postmorte. La rakontoj pri la okazintaĵoj kondukintaj al la morto de mia patro estas preskaŭ ekskluzive bazita sur rakonto skribita far mia frato Santiago Uribe, publikigita en 2002 sub la titolo *El día que las FARC mataron a mi padre*¹. Ricardo Galán kaj la generalo Mario Montoya helpis nin por rekonstrui multajn detalojn de la sekvajoj el la milita operaco kiu elliberigintus la departementestron Gaviria kaj la ceterajn ostaĝojn. La detaloj de la milita operaco kontraŭ la

1 NT "[La tago ke la FARK mortigis mian patron](#)".

alinomita "El Paisa" en 2008 baziĝas sur intervjuo kun oficiroj de la Nacia Polico de Kolombio kaj sur internaj dokumentoj.

DUA PARTO: Mia priskribo de la freŝdata historio de Kolombio estas bazita en multnombraj akademias verkoj cititaj en la bibliografio kiu aperas ĉe la fino. La historiaj arkivoj de la gazeto *Time* ankaŭ estis utilaj por la priskribo de okazintaĵoj dum "La Violento" kaj la perturboplena jardeko de 1980 en Medegino kaj en la tuta Kolombio. Lina helpis min rememori la detalojn pri kiamaniere ni interkonatiĝis kaj pri la tempo kiun ni pasigis en Rionegro, en Cambridge kaj aliloke. Robin, kiu ankoraŭ restas fidinda laboristo en El Uberrimo, provizis nin per kelkaj detaloj pri la provo de sturmo al nia bieno. La lokaj novaĵoj donis al ni la kuntekston en rilato kun la atako al la Hotelo Orquídea Real.

TRIA PARTO: La arkivoj de la gazeto *Semana* kaj la ĵurnalo *El Tiempo*, precipe, helpis nin por rekonstrui la okazintaĵojn dum mia regado de la departemento Antjokio. Tre variaj internaciaj amaskomunikiloj, inkluzive de *Los Angeles Times*, *The Guardian* kaj *Associated Press*, donis al ni detalojn pri la raporto kaj la historio de Werner Mauss. Any Vásquez helpis nin por plenigi multajn memor-truojn pri mia tempo kiel departementestro, kaj ankaŭ pri la atako al Vegachí. La novaĵagentejoj, precipe *Reuters*, helpis nin provizi kuntekston por la kreskanta ĥaoso de la jardeko de 1990, inkluzive de la perforto dum la departementaj kaj urbaj voĉdonadoj de 1997. La historio pri la partopreno de la FARK kaj aliaj armitaj grupoj en la trafiko de drogoj venas el pluraj fontoj, inkluzive de la libro de la Corporación Observatorio para la Paz, la libro de Michael Reid, kaj kelkaj fragmentoj el la libro de Juan Manuel Santos. Unu enketo pri Kolombio realigita en 2001 far *The Economist* donis al ni kelkajn datumojn pri la ekonomio kaj laŭsperte pri la disvastiĝo de la violento antaŭe ol mia prezidanteco. Jaime Bermúdez helpis nin plenigi spacojn pri la jaroj en Oksfordo, kaj ankaŭ pri multaj el la progres-punktoj de mia porprezidenta kampanjo. Ricardo Galán ankaŭ donis al ni multajn detalojn sur tiu kampanjo. La kunlaborado de Lina tiurilate estis ankaŭ fundamenta.

KVARA PARTO: Ricardo Galán, Francisco Santos kaj la admiralo Rodolfo Amaya helpis nin rememori iujn detalojn pri la tago de la prezidenta enpostenigo kaj pri niaj klopodoj por certigi la sekurecon de ĉiuj. La viglaj raportoj de *El País* kaj *El Tiempo* provizis nin per multe da detaloj pri tiu decida tago en Valledupar kaj Florencia. La libro de Ingrid Betancourt donis al ni ŝian personan rigardon pri ŝia kidnapo kaj kaptiteco, kaj la libro far la tri usonaj kontraktintoj kidnapitaj ludis similan rolon rilate al iliaj travivaĵoj. La usona profesoro Harvey F. Kline kolektis utilajn datumojn kaj kelkajn gravajn okazintaĵojn rilate al la Leĝo de Justeco kaj Paco, kaj aliajn okazintaĵojn de mia unua prezidenta periodo. La kunlaborado de Alicia Arango estis decida en la rememoro de mia prezidanteco, ekde la unuaj tagoj.

KVINA PARTO: La memora rekonstruo pri la kapto de Rodrigo Granda, kaj okazintaĵoj ekestantaj el ĉi tio, estis parte prenitaĵoj el la libro de Jaime Bermúdez. La citaĵoj de prezidento Chávez kaj de aliaj agintoj venis plejparte el internaciaj amaskomunikiloj kiel *BBC*, *Reuters* kaj *The New York Times*. Fernando Araŭjo mem donis al ni detalan rakonton pri sia kaptiteco kaj fuĝo. Luis Guillermo Plata estis sufiĉe afabla por doni al ni multe da datumoj kaj informoj pri la komercaj intertraktadoj de nia lando, kaj pri la ĝenerala irado de nia ekonomio. Francisco Santos helpis kun la kritika kunteksto en niaj klopodoj por plibonigi la homajn rajtojn. Ni baziĝis plejparte sur informoj de la amaskomunikiloj, kaj speciale tiuj de perkablaj informoservoj, por la priskribo de niaj intertraktadoj kun armitaj grupoj, kaj por la nombroj de viktimoj el terorismaj atakoj. Iuj detaloj pri la afero de la infano Emmanuel venis el intervjuo kun la generalo Montoya, kaj aliaj estas prenitaĵoj el la libro far Juan Manuel Santos.

SESA PARTO: La detaloj pri la agoj de informiĝado celintaj al la alinomita "Raúl Reyes" devenas el privataj intervjuoj kun funkciuloj de la kolombia Polico. Unu libro far la usona ĵurnalisto John Otis donis al ni tre utilan partan kuntekston de la operaco, kaj ankaŭ superrigardon de la taktikoj de la FARK dum la dua periodo de mia prezidenteco. Granda parto el la datumoj uzataj por liveri la finan bilancon de niaj ekonomiaj, sociaj kaj sekurecaj politikeroj devenas el *Uribe: Trabajo, hechos y corazón*¹, libro eldonita far mia registaro kiam nia dua mandato alproksimiĝis al sia finiĝo. La oficialaj transskriboj kaj la raportoĵoj de la amaskomunikiloj helpis nin por rekonstrui miajn renkontiĝojn kun eksterlandaj gvidantoj, inkluzive de la Prezidento Bush kaj la prezidento Lula. La detala rakonto pri la Operaco Shakon! originas grandparte el intervjuo kun la generalo Montoya, kaj ankaŭ el samtitola libro skribita far Juan Carlos Torres. Aliaj detaloj de tiu operaco venis ankaŭ el neforgesebla konversacio havita inter la Generalo Freddy Padilla, la generalo Oscar Naranjo, Brian Winter kaj mi, en majo de 2010, apud kamento en la ĉirkaŭaĵo de Bogoto, unu tagon antaŭ la unua raŭndo de la porprezidenta voĉdonado por elekti mian sukcedonton.

1 NT Esperantlingve: "*Uribe: Laboro, faktoj kaj koro*".

Fotaro

La publikigo de ĉiuj fotoj en tiu ĉi sekcio estas ĝentilajo de la aŭtoro.



Mia patro, Alberto Uribe Sierra



Mia patrino, kiu sciis kiamaniere
nutri la energion kaj la persiston
en siaj gefiloj.






Mia amata frato Jaime kaj mi, ĉiam kune. Ĉi tie mi aĝas plimalpli tri jarojn

Rajdante mulon kun Jaime, tre eble survoje al la lernejo.



Mia patrino, Laura Vélez Uribe, kun siaj kvin gefiloj. El maldekstre dekstren: Mi, María Isabel, Santiago, María Teresa, kaj Jaime Alberto.

El la jarlibro de la lernejo,
dek ok jaraĝa.



Alvaro Uribe Vélez



La tago kiam mi edziĝis kun Lina,
Gloraj tagoj en kiuj ni estis
ĉirkaŭitaj de niaj amatoj.



Kun Lina kaj Tomás





La Registara-Komunumaj Kunsidoj komenciĝis kiam mi estis reganto de la departemento Antjokio.

Ĉiam ni protestis kontraŭ la kidnapoj.



URIBE

PRESIDENTE

Mano firme, corazón grande



La afiŝo de la kampanjo de 2002: "Firma mano, granda koro".

Kun Lina kaj niaj filoj,
Tomas kaj Jeronimo,
dum mia prezidenta
enoficigo.
Tago malfacila kaj
plena de streĉeco.



Lina Moreno, sen kies amo kaj apogo,
nia traizado estintus neebla.

La tagon de enoficigo, kun
Bogoto sub sieĝo, ni havis
nian unuan kunvenon de
sekureca konsilantaro ĉe
la enira ŝtuparo de la
prezidenta palaco.





La funebraĵoj de Gilberto Echeverri, mia kara amiko, kies memoro inspiris nin tra la tuta prezidenteco.

La vicprezidento Francisco Santos, fidinda amiko kaj morale neriproĉebla.



Gabriel Garcia Márquez, granda kolombiano kaj amiko de la paco.

La unuaj jaroj de la prezidenteco estis speciale malfacilaj, kun la perdo de multaj karuloj.





La Registara-Komunumaj Kunsidoj estis potenca ilo, ebligantaj senperan komunikadon kun la popolo pri sociaj aferoj kaj aliaj temoj.



Mi ĉiam serĉis novajn invest-projektojn, precipe tiujn
kiuj montras la mirindan flankon de Kolombio.



La nindra joko kaj aliaj praktikoj min helpis por centri min dum malfacilaj momentoj.



Nia regado estis aktiva kaj vigla, ĉiam engaĝiginta kun la popolo.



Mi dankis la apogon kiun prezidento Bill Clinton donis al Kolombio, kaj lian rimarkindan vidpunkton pri la defioj kiujn ni alfrontis.



Prezidento George W. Bush estis granda amiko de Kolombio.



Prezidento Barack Obama apogis nian "firman strategion fari neniun cedon" antaŭ la teroristoj.



Mi desegnis la "Triangulon de Konfido" por prezidento Obama, kiu ŝatis ĝin tiom multe ke li subskribis ĝin por mi.



Kun prezidento Hugo Chávez. Mia amo al nia frata lando neniam malpliĝis.

La okazo kiam mi proponis amikan veton al prezidento Hugo Chávez, pri ĉu mi kapablu rajdi ĉevalon verŝante eĉ ne unu guton da kafo, en la parko Tutucán, en Rionegro.





Ĥngrid Betancourt brakumas sian patrinon en la tago de sia elliberigo, post pli ol ses jaroj da disigo.



Unu el la tagoj plej fierigaj el mia prezidenteco: la elliberigo de Ĥngrid, la soldatoj kaj policanoj kiuj estis ostaĝigitaj far la FARK.



La "Koncerto por la Paco", kun la talenta kolombia artistino Shakira. Tiun tagon la prezidento de Brazilo, Luiz Inácio Lula da Silva, la prezidento de Peruo, Alan García, kaj la kantisto Carlos Vives honoris nin per sia ĉeesto.



Ĉe la edziĝo de mia filo Jerónimo, en 2012, ĝojante pro la kresko de nia familio.



Kun miaj fratoj Camilo kaj Santiago, mia nevo Luis Martín kaj miaj filoj Jerónimo kaj Tomás, ĉe la edziĝo de Jerónimo.

PARTA BIBLOGRAFIO

- Bermúdez, Jaime. *La audacia del poder*. Bogoto, eldonejo: Planeta Colombiana, 2010.
- Bushnell, David. *The Making of Modern Colombia*. Berkeley, eldonejo de la Universitato de Kaliforio, 1993.
- Carpenter, Frank G. *South America: Social, Industrial and Political*. Bostono, eldonejo: Geo. M. Smith & Co., 1900.
- Cepeda Ulloa, Fernando, editoro. *Fortalezas de Colombia*. Bogoto, eldonejo: Planeta, 2004.
- Coghlan, Nicholas. *The Saddest Country: On Assignment in Colombia*. Toronto, eldonejo de la Universitato de McGill-Queen, 2004.
- Corporación Observatorio para la Paz, kaj aliaj. *Guerras inútiles: una historia de las FARC*. Bogoto, Eldonejo: Intermedio Editores Ltda., 2009.
- Davies, Howell, editoro. *The South American Handbook 1948*. Londono, eldonejo: Trade and Travel Publications Ltd., 1948.
- Gaviria Correa, Guillermo. Editorita far James F. S. Amstutz. *Diary of a Kidnapped Colombian Governor*. Tenford (Pensilvanio), eldonejo: DreamSeeker Books, 2010.
- Gonsalves, Marc, kaj aliaj. *Out of Captivity*. Novjorko, eldonejo: William Morrow, 2009.
- Izquierdo, Maria. *Álvaro Uribe: Con la patria en el corazón*. Bogoto, eldonejo: Panamericana, 2004.
- Kline, Harvey F. *Showing Teeth to the Dragons: State-building by Colombian President Álvaro Uribe Vélez*. Tuscalossa (Alabamo), eldonejo de la Universitato de Alabamo, 2009.
- Martin, Franklin H. *South America*. Novjorko, eldonejo: Fleming H. Revell Company, 1922.
- Nacia Polico de Kolombio. *DIPOL: 15 años contra el crimen*. Bogoto, eldonejo: Panamericana, 2010.
- Otis, John. *Law of the jungle*. Novjorko, eldonejo: Harper Collins, 2010.
- Reid, Michael. *The Forgotten Continent: the Battle for Latin America's Soul*. New Haven (Konektikuto), eldonejo de la Universitato Yale, 2007.

- Robinson, James kaj Urrutia, Miguel, editoroj. *Economía colombiana del siglo XX*. Bogoto, eldonejo: Fondo de Cultura Económica, 2007.
- Roldán, Mary. *Blood and Fire: La Violencia in Antioquia, Colombia, 1946-1953*. Durham (Norda Karolino), eldonejo de la Universitato Duke, 2002.
- Santos, Juan Manuel. *Jaque al Terror: Los años horribles de las FARC*. Bogoto, eldonejo: Planeta, 2009. [Esperantlingva eldono: *Ŝakon al la teroro. La jaroj hororaj por la FARK*, trovebla en Interreto kaj elŝutebla en formo PDF].
- Torres, Juan Carlos. *Operación Jaque, La verdadera historia*. Bogoto, eldonejo: Planeta, 2008.
- Vincent, Frank. *Around and About South America: Twenty Months of Quest and Query*. Novjorko, eldonejo: D. Appleton and Company, 1890.